


**TRI**  
**VERKOJ de VOLTER**  
(VOLTAIRE)

**KANDID aŭ la OPTIMISMO**  
**ZADIG aŭ la DESTINO**  
**SENARTIFIKULO**

**EN TRADUKO de E. LANTI**

1956

**SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA**  
**67 Avenue Gambetta, Paris - 20**





TRI  
VERKOJ de VOLTER  
(VOLTAIRE)

KANDID aŭ la OPTIMISMO  
ZADIG aŭ la DESTINO  
SENARTIFIKULO

EN TRADUKO de E. LANTI

1956

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

67 Avenue Gambetta, Paris - 20

*Unu el la plej egaj  
malfeliĉoj en la vivo  
estas la lingvodiverseco.*

*Volter*





François-Marie AROUET

(Pseüdonime: Voltaire)

1694—1778

*desegnita de R. Bartelmes*


## Noto de la Eldonanto

La unua eldono de *Kandid*, tre fama verko de Volter (Voltaire), aperis en la jaro 1929 ĉe SAT, kaj ĝi estis elĉerpita en 1937. Per tiu ĉi traduko E. Lanti manifestis sin unuafoje kiel brila stilisto, sukcese plenuminte tiun ĉi tre malfacilan traduk-taskon.

Restis tamen kelkaj makuletoj en tiu unua eldono. El Meksiko Lanti sendis al la pariza centro de SAT ekzempleron, sur kiu li faris kelkajn korektojn evidente necesajn. Pluraj aliaj personoj kontribuis ankaŭ al la celo prezenti 2-an eldonon de la verko kiel eble plej senmankan.

Lanti sendis al Parizo el Meksiko ankaŭ la manuskripton de du aliaj tradukoj el Volter, — temas pri la verketoj »Zadig« kaj »La Senartifikulo«. Ni decidis kunigi tiujn du literaturajn juvelojn kun »Kandid«. La legantoj mem juĝos, ĉu ni agis prave. Almenaŭ estas nia opinio, ke per tiu prezento de atentinda volumo ni havigos novajn amikojn tiel al la nepereema genio de Volter, kiel al ĝia majstra interpretisto, nia kamarado Lanti.

KANDID  
aŭ  
LA OPTIMISMO



## ANTAŬPAROLO

Jam forpasis cent sep dek jaroj, de kiam aperis *Kandidid*. Kaj tamen tiu filozofia rakonto restas ankoraŭ aktuala. Ĝi estas aktuala en tiu senco, ke la malbonoj, kiujn kontraŭbatalis Volter<sup>1</sup>, daŭras ekzisti: maltoleremo, superstiĉemo, fanatikemo, kruelemo, trompemo regas ankoraŭ ĉie en la mondo. La jezuitoj — plej diversspecaj — estas same influhavaj, regemaj kaj intrigemaj kiel antaŭ du jarcentoj.

Malgraŭ tio, ke la scienco kaj tekniko faris grandegajn progresojn, la racio tamen ne multe penetris en la cerbojn de la popolamaso. Se la religia fanatikemo perdis iom da sia forto kaj akro en kelkaj mondpartoj, tie starigis aliaj ne malpli danĝeraj kaj detruaj: la naciisma, rasisma, faŝisma, partieca fanatikoj ne faras nuntempe malpli da viktimoj ol la »Sankta Inkvizicio«. Hodiaŭ kiel dum la naskiĝa tempo de *Kandidid* la pika, morda, sagaca ironio de Volter estas same necesega kaj restas imitinda modelo nesuperebla. Ĝi estas armilo senkompare taŭga por disbati la malbonojn, kreitajn de la blinda sento, de la stulta tradicio kaj de la senkontrola emo al ĉio neracia.

Kvankam Volter estis grandburĝo riĉa kaj ema al ricevo de honoroj, li tamen forte sentis la suferojn de siaj samtempuloj; per akra kaj kompatema rigardo li vidis la mizeron, la maljuston, la perforton. Kaj ĉe tia konstato lia spirito ribelis kontraŭ la tiutempe reganta filozofio de l'optimismo, kiu resumigis per jena frazo de Lajbnic<sup>2</sup>: »Ĉio en la mondo statas kiel eble plej bone«.

<sup>1</sup> France: Voltaire.

<sup>2</sup> Germane: Leibnitz.

Anstataŭ verki longan, nebulan, nefacile kompreneblan disertacion por refuti la sistemon de l'fama germana filozofa, Volter preferis montri per amuza rakonto, kiel senbaza estas la optimismo. Ĝi vidiĝas sub formo de kruelaj kaj stultaj militoj, de tertremoj, de epidemioj kaj plej diversspecaj katastrofoj.

Je morala vidpunkto ankaŭ ne estas pravigebla la optimismo. La homoj ja estas malbonaj: ili mensogas, trompas, rabas, mortigas kaj montras ĉiujn signojn de malsaĝo. Kaj se »ĉio en la mondo statas kiel eble plej bone«, ne utilis do penadi por plibonigi la sorton de l'homaro. Krimeco kaj malsaĝo ja eniras la konsiston de tiu plejeble bona mondo. Se la naturo povas fari bonon nur el malbono, la homo ne rajtas kontraŭstari ian ajn malbonon, ĉar li eble per tio malhelpus venon de estonta pli granda bono...

Oni senpene ekvidas, ke tia filozofio povas havi malbonajn efikojn sur la pens- kaj agadmanierojn de la homoj. Volter do prave atakas la optimismon per sia malica ironio. Dum la rakontado, *Kandid* estos senĉese trompata kaj trafos de malfeliĉo en malfeliĉon. Same okazos al ĉiuj aliaj ĉefroluloj el la romano, kio instruas al la leganto pri neceso vidi la mondon tia, kia ĝi fakte estas kaj ne tra la okulvitro de l'optimismo.

La amuza formo, per kiu la aŭtoro de *Kandid* disbatas la filozofian sistemon de Lajbnic, povas ĉe kelkaj legantoj doni la impreson, ke Volter ne estis tre profunda filozofa. Se por akiri reputacion de granda pensulo necesas verki peze, enuige kaj nebule, estas fakto, ke Volter ne povas esti metata en tiun kategorion. Mi tamen opinias, ke nia aŭtoro tre bone scipovis prezenti al si la multflankecon de l'problemoj kaj demandoj. Sed lia raciemo detenis lin erarvagi en nekonataĵon. Ĉu fakte utilas starigi belajn sistemojn, kiujn la racio ne povas ĉiurilate pravigi? Ekzemple, ĉu Dio ekzistas aŭ ne? Estas malfacile trovi ĉe Volter jesan aŭ nean respondon al tiu demando. »Se Dio ne ekzistus, li diris, oni devus ĝin elpensi«. Tia paradokso povas esti klarigata per tio, ke Volter opiniis necesa la kredon je dio por starigo de moralaj principoj kaj vivreguloj inter la



homoj. Aŭ eble estis nur simpla klasa intereso de riĉulo, kiu volas certigi al si la posedon de siaj riĉoj per ia ĝendarmono-dio?

Se estas malfacile decidi, ĉu Volter estis ateisto aŭ deisto, oni almenaŭ povas trovi en lia verkaro abundon da argumentoj kontraŭ la ekzisto de la dio de v'kristanoj. Kaj la surteraj reprezentantoj de tiu dio estas per forta mano vikipediaj kaj per senkompata ironio profunde vundataj.

La vivo ankaŭ estas ironia: Volter estis instruita kaj edukita de jezuitoj. Ĉe ili tre diligente li lernis. Sed la bona lernanto havis tro fortan intelekton por lasi sin subigi per la lerta kaj subtila edukmaniero de siaj profesoroj. Li fakte fariĝis la plej timinda kontraŭulo de la jezuitoj. Lia malamo kontraŭ la jezuita societo speguligas tra multaj paĝoj el *Kandid*.

Pro siaj viglaj atakoj kontraŭ ĉiuj maljustoj, kontraŭ potenculoj kaj altranguloj Volter estis kelkfoje malliberigata aŭ devis forkuri eksterlanden. Sed li ĉiam sukcesis fine atingi indulgon ĉe siaj persekutantoj. Oni eble povus riproĉi al nia aŭtoro, ke li ne estis tre fortakarakterata. Li ne konsentis tro suferi pro siaj ideoj. Kiel lia fama antaŭulo Rabelais<sup>3</sup>, li pretis defendi sian vidpunkton nur ĝis bruligo ekskluzive! Tio estas ankaŭ karakteriza trajto pri lia raciemo: konsenti suferi aŭ morti pro ideoj, tio ja signas ian religiezan spiritostaton. Verdire ni sentas pli da simpatio kaj admiro por homo, kiu pretas oferi sian vivon pro sia idealo aŭ pro la liberigo de subpremata klaso. Sed ni ne rajtas postuli, ke homo estu ĉiel perfekta, bona, imitinda. Tia homo estus dio kaj sekve nur fantazia elpenso. La aŭtoro de *Kandid* estis nur homo...

Volter mortis maljuna, riĉa kaj supersutata per honoroj. Tamen ĉiuj konsentas, ke el inter la t. n. Enciklopedianoj li estis unu el tiuj, kiuj faris plej multe en la ideologia preparado al la gvidantoj de v'Granda Revolucio burĝa el la jaroj 1789—1793.

<sup>3</sup> France: Rabelais.

Por konigi la penson de Volter en esperanta vesto, kial do el abunda verkaro mi elektis prefere *Kandid*? Tial ke, laŭ mi, ĝi estas lia ĉefverko. Ĉi okaze estas interese noti, ke tiu romano ne estis tre ŝatata, kiam ĝi aperis. En la *Leteraro* de la fama barono Grim, *Kandid* estas eĉ tre severe prijuĝata, kiel oni povas vidi per jena cito:

»Versajne, diros sagaca kritikisto post du mil jaroj, la aŭtoro estis nur dudek-kvinjara, kiam li verkis *Kandid*. Ĝi estis lia unua provo en tiu verkmaniero. Lia gusto estis ankoraŭ juna; tial li ofte malatentas la decregulojn, kaj lia gajo degeneras en frenezon. Vidu, li aldonos, kiom lia gusto edukiĝis kaj firmiĝis poste, laŭgrade; kiom li fariĝis pli saĝa en siaj postaj verkoj!«

Nia severa kritikisto plene eraris. Hodiaŭ *Kandid* havas multe da legantoj en la popolamaso, kaj eĉ plej eminentaj literaturistoj relegas ĝin pro plezuro kaj distro, dum tragedioj kiel *Merop*, *Zair*, *Mohamed*, poemaro kiel *La Henriad*, historiaĵoj kiel *La Jarcento de Ludoviko la XIV. k. a.* verkoj, kiuj famigis Volter dum lia vivo, estas legataj nuntempe nur de malgranda aro da profesoroj kaj fakuloj.


Cetere Volter estis sesdek-kvinjara, kiam li verkis *Kandid*!! Kaj certe ĝi estas lia ĉefverko. Kiuj jam legis ĝin en la originalo aŭ en nacilingva traduko, tiuj tamen deziras konatiĝi kun la esperanta. Mi ne dubas, ke dum la legado ili ne havos malpli da plezuro ol mi havis dum la tradukado. Tiu laboro estis ja por mi ĝuo, plezuro — ripozo.

Kun la simpatia *Kandid* ili trakuros la mondon, partoprenos pense liajn aventurojn kaj per tio akiros iom pli da saĝo por konduki en la vivo. Volter tre delikate instruas ĉe la fino de sia rakonto, ke la nura rimedo por forigi la malbonon estas: laboradi. Vera saĝulo estas tiu, kiu vivas modeste, ne ambicias, ne perfortas, ne rompas al si la kapon por kompreni nekompreneblaĵojn. *Kandid* perdinte sian kredon je optimismo, konkludas, ke la plej bona maniero por pasigi la vivon estas kulturi sian ĝardenon. Kaj tio signifas, ke la plej modestaj taskoj estas la plej necesaj, la plej utilaj, la plej laŭdindaj.

Mi penis konservi laŭeble la formon de la frazoj kaj okazis, ke ne ĉiam mi alprenus saman se mi verkus originale. Oni rimarkos, ke la lingvo estas kiel eble plej senbalastigita per forlaso de ĉiu senutila sufikso. Ĉe la komenco tia senbalastigo eble tiklos al kelkaj legantoj; sed mi estas konvinkita, ke ĉe la fiĝo ili opinios, ke ĝi estas trafa, ĉar ĉio restas klara kaj facile komprenebla.

E. L.

Marte 1929.



## KANDID<sup>1</sup> AŬ LA OPTIMISMO

Tradukita francen el la germana lingvo de sinjoro doktoro Ralf<sup>2</sup>, kun la aldonoj, kiujn oni trovis en la poŝo de l'doktoro post lia morto, okazinta dum la favora jaro 1759.

### ĈAPITRO I

**Kiel Kandid estis edukata en bela kastelo,  
kaj kiel li estis el ĝi forpelata**

En Vestfalia, en la kastelo de lia barona moŝto Thunder-ten-tronckh, estis junulo al kiu la naturo estis doninta plej mildajn ecojn. Lia fizionomio spegulis lian animon. Li havis sufiĉe da juĝkapablo kun la plej simpla spirito; pro tio, mi kredas, oni nomis lin Kandid. La malnovaj servistoj suspektis, ke lia patrino estis la fratino de lia barona moŝto kaj lia patro iu nobelo el la ĉirkaŭaĵo, kun kiu ŝi neniam volis edziniĝi, tial

---

<sup>1</sup> France: Candide; tiu vorto signifas: *malruza, senmalica, naiiva*.

<sup>2</sup> Germane: Ralph. Tiu doktoro Ralph estas, evidente, nur imagita persono. Ne malprave Volter kaŝis sin sub tiu pseŭdonimo, ĉar, jam la 2. de marto 1759, Kandid estis denunciata ĉe la konsilantaro de Genevo, kaj baldaŭ bruligita fare de la ekzekutisto.

ke li povis doni pruvon nur pri sepdek unu gradoj da nobeleco kaj ke la cetero de lia generacia tabelo forperdiĝis.

Lia barona moŝto estis unu el la plej potencaj sinjoroj el Vestfalia, ĉar lia kastelo havis pordon kaj fenestrojn. Ĝia granda ĉambro estis eĉ ornamita per tapeto. Ĉiuj hundoj el liaj birdo-kortoj konsistigis se necese ĉasantaron; liaj stalistoj estis ankaŭ ĉevalistoj; la vilaĝa vikario estis lia kapelpastro. Ĉiuj nomis lin mia sinjorega moŝto, kaj ili ridis, kiam fantazie li rakontis.

La barona sinjorino pezis tri cent kvindek funtojn kaj estis pro tio treege ŝatata; ŝi akceptis la gastojn kun digno, kiu igis ŝin ankoraŭ pli respektinda. Ŝia deksepjara filino Kunegond estis tre kolororiĉa, freŝa, grasa, dezirdona. La filo de l'barono ĉiurilate ŝajnis esti inda je sia patro. La gubernisto Panglos<sup>3</sup> estis la hejma orakoldiranto kaj la malgranda Kandid aŭskultis liajn instruojn kun la tuta sincero, akordiĝanta kun lia aĝo kaj lia karaktero.

Panglos instruis la metafizik-teologi-kosmologologion. Li mirinde bone pruvis, ke ne ekzistas efiko sen kaŭzo, kaj ke, en la plejeble bona mondo<sup>4</sup>, la kastelo de lia barona moŝto estas la plej bela el ĉiuj kasteloj, kaj la sinjorino la plejeble bona el la baroninoj.

»Estas pruvite, li diris, ke la aferoj ne povas esti aliaj ol ili estas: ĉar ĉio estante farita por iu celo, ĉio rilatas nepre la plej bonan celon. Atentu bone, ke la nazoj estas faritaj por porti okulvitrojn; tial ni havas okulvitrojn. La kruroj videble estas faritaj por esti

<sup>3</sup> Laŭ la grekaj vortoj *πᾶν*, kiu signifas: *tuto, universo*, kaj *γλῶσσα* *lingvo* aŭ *lingvo*.

<sup>4</sup> Aludo al diro de Lajbnic.

ŝtrumpe vestataj. La ŝtonoj estis formitaj por esti prilaborataj kaj por konstrui per ili kastelojn; tial lia sinjorega moŝto havas tre belan kastelon; la plej granda barono el la provinco devas ja esti loĝata plej bone; kaj la porkoj estante faritaj por esti manĝataj, ni do manĝas porkaĵon dum la tuta jaro: sekve, kiuj diris, ke ĉio estas bona, tiuj diris sensencaĵon; necesis diri, ke ĉio estas la plej bona.«

Kandid atente aŭskultis, kaj naive kredis: ĉar li trovis F-inon Kunegond treege bela, kvankam neniam li kuraĝis tion diri al ŝi. Li konkludis, ke post la feliĉo esti barono de Thunder-ten-tronckh, la dua grado de feliĉo estas esti F-ino Kunegond; la tria, vidi ŝin ĉiutage; kaj la kvara, aŭdi majstron Panglos, la plej grandan filozofon el la provinco, kaj sekve el la tuta tero.

Iun tagon, Kunegond, promenante apud la kastelo, en arbareto, kiun oni nomis parko, vidis doktoron Panglos, kiu donis lecionon pri eksperimenta fiziko al la ĉambristino de ŝia patrino, brunulineto tre bela kaj obeema. Tial ke F-ino Kunegond estis tre inklina lerni la sciencojn, ŝi silente observadis la ripetitajn eksperimentojn kiujn ŝi ĉeestis; ŝi klare vidis la sufiĉan kialon<sup>5</sup> de la doktoro, la efikojn kaj la kaŭzojn, kaj tute maltrankviligite, tute enpenŝiginte, ŝi foriris kun la deziro esti klera, revante, ke ŝi bone povus esti la sufiĉa kialo por la juna Kandid, kiu bone povus ankaŭ esti la ŝia.

Revenante al la kastelo, ŝi renkontis Kandid kaj ruĝiĝis; Kandid ankaŭ ruĝiĝis; ŝi salutis lin per treme-

<sup>5</sup> Lajbnica principo, laŭ kiu nenio ekzistas aŭ okazas sen sufiĉa kialo.

tanta voĉo, kaj Kandid parolis al ŝi, ne sciante, kion li diras. La morgaŭan tagon, post la tagmanĝo, ĉe la detabliĝo, Kunegond kaj Kandid troviĝis malantaŭ ekranego; Kunegond lasis fali sian naztukon. Kandid ĝin levis; ŝi senpeke prenis lian manon, la junulo kisis senpeke la manon de la juna fraŭlino kun viveco, sentemo kaj tute aparta afabla plaĉemo; iliaj buŝoj renkontiĝis, iliaj okuloj ardis, iliaj genuoj tremis, iliaj manoj ŝoviĝis. Lia barona moŝto Thunder-ten-tronckh preterpasis la ekranegon, kaj, vidante la kaŭzon kaj la efikon, forpelis Kandid el la kastelo per piedbatoj sur la postajon; Kunegond svenis; tuj rekonsciiĝinte, ŝi estis vangofrapata de la barona sinjorino; kaj ĉio estis konsternita en la plejble bela kaj agrabla el la kasteloj.

## ĈAPITRO II

### Kio fariĝis Kandid inter la Bulgaroj<sup>1</sup>

Kandid, forpelite el la tera paradizo, marŝadis longe, ne sciante kien, rigardante al la ĉielo kaj al la plej bela el la kasteloj, kiu enfermis la plej belan el la baroninetoj; nemangiĝinte li kuŝiĝis meze de kampoj inter du sulkoj; la neĝo faladis per dikaj flokoj. Kandid, tute frostite, treniĝis al proksima urbo, kiun oni nomis *Valdberghof-trarbkdikdorff*, estante senmona, mortiĝante pro malsato kaj laco. Malgaje li haltis ĉe la pordo de drinkejo. Du homoj, blue vestitaj<sup>2</sup>, rimarkis lin.

<sup>1</sup> En ĉi tiu ĉapitro Volter nomas la Prusojn Bulgaroj; kaj la Francojn Abaroj.

<sup>2</sup> Aludo al la prusaj rekrutistoj, kiuj havis bluan uniformon.



— Kamarado, diris unu, jen estas junulo kun bela staturo kaj kiu havas la postulitan alton.

Ili iris al Kandid kaj tre ĝentile invitis lin por tagmanĝi.

— Sinjoroj, diris al ili Kandid kun ĉarma modesto, vi tre honoras min, sed monon mi ne havas por pagi mian parton.

— Ha! sinjoro, diris al li unu el la bluuloj, la personoj kun vizaĝo kaj indo similaj al la viaj neniam pagas: ĉu vi ne estas alta je kvin futoj kaj kvin coloj?'

— Jes, sinjoroj, tioma estas mia alto, li diris, riverencante.

— Nu! sinjoro, altabliĝu; ne nur ni pagos la tuton, sed ni ne konsentos, ke homo tia, kia vi estas, restu sen mono; la homoj estas kreitaj por helpi sin reciproke.

— Vi pravas, diris Kandid, tion ĉiam instruis al mi S-ro Panglos kaj mi bone vidas, ke ĉio estas plej bona.

Oni petas, ke li akceptu kelkajn monerojn, li prenas ilin kaj volas skribi repagpromeson; oni rifuzas ĝin kaj altabliĝas.

— Ĉu vi ne havas fortan korinklinon? ...

— Ho! jes, li respondas, mi tre forte amas F-inon Kunegond.

— Ne, diris unu el la sinjoroj, ni demandas vin, ĉu vi ne havas fortan korinklinon por la reĝo de la Bulgaroj.

— Tute ne, li diris, ĉar neniam mi vidis lin.

— Nu! li estas la plej ĉarma el la reĝoj, kaj ni devas trinki pro lia sano.

— Ho! tre volonte, sinjoroj; kaj li trinkas.

— Sufiĉas, oni diris al li; nun vi estas la apogo, la subteno, la defendanto, la heroo de la Bulgaroj; vi trafis riĉon, kaj certa estas via gloro.

Tuj oni katenas liajn piedojn kaj oni kondukas lin al la regimento. Oni igas lin turni dekstren, maldekstren, altigi la vergon<sup>3</sup>, remeti la vergon, celi, pafi, pli rapide paŝadi, kaj oni donas al li tridek bastonfrapojn<sup>4</sup>; la morgaŭon li ekzerciĝas iom malpli malbone kaj ricevas nur dudek batojn; la postmorgaŭon, nur dek, kaj li estas konsiderata de siaj kamaradoj kiel eksterordinarulo.

Kandid, mirkonsternite, ne sukcesis ankoraŭ kompreni klare, kiel li fariĝis heroo. Iun belan printempan tagon, li decidis fari promenadon, marŝante rekte antaŭen, kredante, ke estas privilegio de la homaro kiel de la bestaro, utiligi laŭplaĉe siajn kruojn. Apenaŭ li estis irinta du mejlojn, kiam kvar aliaj herooj, altaj je ses futoj, kuratingas lin, ligas, kaj kondukas en karceron. Oni ĵure demandis lin, ĉu li preferas esti vergata tridek ses fojojn de la tuta regimento, aŭ ricevi dek du kuglojn en la cerbon. Li vane diris, ke liberaj estas la volo kaj ke li volas nek la unuan, nek la duan punon; li fine devis elekti, li decidis laŭ la speciala kapablo, donita de Dio, kaj kiun oni nomas libero, ke li ricevos la vergadon. Li suferis du punbatojn. La regimento konsistis el du mil homoj; li do ricevis kvar mil vergobatojn, -kiuj, de la nuko ĝis la postaĵo, malkovris al li la muskolojn kaj la nervojn. Kiam oni estis tuj komenta trian batadon, li estis tiom suferanta, ke li petegis, ke oni rompu lian kapon. Li akiras tiun favoron; oni vindas liajn okulojn; oni igas lin genuigi.

<sup>3</sup> En tiu epoko, la soldatoj bezonis vergon, por ŝargi la pafilon. — *Trad.*

<sup>4</sup> La punvergado estis tiutempe uzata en la prusa armeo. — *Trad.*

La reĝo de la Bulgaroj<sup>5</sup> preterpasas ĉe tiu momento, li informiĝas pri la krimo de la paciento; kaj, ĉar tiu reĝo havis grandan genion, li komprenis, per ĉio, kion diris Kandid, ke temas pri juna metafizikisto tre nescia pri la aferoj de ĉi tiu mondo, kaj li pardonis kun pardonemo, kiu estos laŭdata en ĉiuj ĵurnaloj kaj dum ĉiuj jarcentoj. Iu bonkora kuracisto resanigis Kandid dum tri semajnoj per moligaj kuraciloj, rekomenditaj de Dioskoridos<sup>6</sup>. Li jam havis iom da haŭto kaj povis marŝi, kiam la reĝo de la Bulgaroj ekbatalis kontraŭ la reĝo de la Abaroj.

### ĈAPITRO III

#### Kiel Kandid forkuris el inter la Bulgaroj kaj kio li fariĝis

Nenio estis tiom bela, tiom facilnova, tiom brila, tiom bonorda kiel la du armeoj. La trumpetoj, la fajfiloj, la hobojoj, la tamburoj, la kanonoj, formis tian harmonion, kia neniam estis en infero. Unue la kanonoj ambaŭflanke terenfaligis proksimume ses mil homojn; poste la muskedistaro forigis el la plej bona mondo proksimume naŭ aŭ dek mil friponojn, kiuj putrigis ĝian supraĵon. La bajoneto ankaŭ estis la sufiĉa kialo por la morto de kelkaj miloj da homoj. Sume oni buĉis eble tridek mil homojn. Kandid, kiu tremis kiel filozofo, sin kaŝis tiel bone, kiel li povis, dum tiu heroa buĉado.

Fine, dum la du reĝoj, ĉiu en sia propra tendaro, ordonis, ke oni kantu *Te Deum*-ojn, li decidis iri en alian lokon rezonadi pri la efikoj kaj la kaŭzoj. Li

<sup>5</sup> Frederiko la II.

<sup>6</sup> Greka kuracisto. — Trad.

trapasis amason da mortintoj kaj mortantoj, kaj atingis apudan vilaĝon; ĝi estis cindrigita; ĝi estis abara vilaĝo, kiun bruligis la Bulgaroj, laŭ la leĝoj de la internacia juro. Ĉi tie estis trapikitaj maljunuloj, kiuj rigardis morti buĉitajn virinojn, tenantajn siajn infanojn ĉe la sangantaj mamoj; tie estis junulinoj kun tratanĉitaj ventroj, kiuj, satiginte la naturajn bezonojn de kelkaj herooj, ellasis la lastan spiron; aliaj, duone bruligitaj, kripetegis, ke oni finmortigu ilin. Cerbaĵoj estis disŝutitaj sur la tero apud tratanĉitaj kruroj kaj brakoj.

Kandid kiel eble plej rapide forkuris en alian vilaĝon: ĝi apartenis al la Bulgaroj, kaj estis ricevinta de la abaraj herooj saman traktadon. Kandid, ĉiam marŝante sur membroj ankoraŭ vivantaj aŭ tra ruinoj, finfine atingis ekster la bataalkampon, portante iom da provizaĵo en sia sako, kaj neniam forgesante F-inon Kunegond. Lia provizaĵo mankis, kiam li trafis Holandon; sed aŭdinte, ke en ĉi tiu lando ĉiuj personoj estas riĉaj kaj kristanaj, li ne dubis, ke oni traktos lin tiel bone, kiel li estis traktata en la kastelo de lia barona moŝto, antaŭ ol li estis forpelata pro la belaj okuloj de F-ino Kunegond.

Li almozpetis ĉe kelkaj gravaj personoj, kiuj respondis, ke se li daŭrigos tiel konduti, oni fermos lin en pundomon por lin eduki.

Poste, li sin turnis al iu viro, kiu en granda kunveno dum unu horo estis ĵus parolanta pri humaneco. Tiu oratoro, strabe rigardante al li, diris:

— Kion vi faras ĉi tie? Ĉu vi servas la bonan kaŭzon? (aferon)<sup>1</sup>.

<sup>1</sup> Ludvorto; en la franca lingvo la vorto *cause* (kaŭzo) tradukas la esperantajn vortojn *afero* kaj *kaŭzo*. — *Trad.*

— Ne ekzistas efiko sen kaŭzo, modeste respondis Kandid, ĉio estas nepre interligita kaj aranĝita plej bone. Necesis, ke oni forpelu min de apud F-ino Kune-gond, ke mi estu vergata, kaj ke mi almozpetu panon ĝis mi povos ĝin laborakiri; ĉio tio ne povis aliel okazi.

— Mia amiko, diris al li la oratoro, ĉu vi kredas, ke la papo estas la Antikristo?

— Ĝis nun pri tio mi ne aŭdis, respondis Kandid; sed ĉu li estas, aŭ ne estas, tio ne povas ŝanĝi la fakton, ke mankas al mi pano.

— Ci ne meritus manĝi panon, diris la alia; for, fripono, for, malŝatindulo, neniam proksimiĝu al mi.

La edzino de la oratoro, rigardinte tra la fenestron, kaj vidinte homon, kiu dubas ĉu la papo estas aŭ ne la Antikristo, elverŝis sur lian kapon plenan... Ho ĉielo! ĝis kia grado atingas ĉe virinoj la fervoro al religio!

Iu viro, kiu ne estis baptita, iu bona anabaptisto, nomita Jakobo, vidis la kruelan kaj malnoblegan manieron laŭ kiu oni traktis unu el liaj fratoj, unu estulon kun du piedoj kaj sen plumoj<sup>2</sup>, kiu havas animon; li kondukis la fraton hejmen, purigis lin, donis al li panon kaj bieron, donacis al li du florenojn kaj volis eĉ lernigi lin labori en siaj holandaj manufakturoj, en kiuj oni fabrikis persajn ŝtofojn. Kandid preskaŭ genuiĝante antaŭ li, ekkriis:

— Majstro Panglos prave diris, ke ĉio statas kiel eble plej bone en ĉi tiu mondo, ĉar mi estas multe pli forte kortuŝata de via treege granda malavaro ol de la senkompato de tiu sinjoro kun nigra mantelo kaj de lia edzino.

---

<sup>2</sup> Moka aludo al iu difino de la fama antikva filozofo Plato. — Trad.

La morgaŭon, promenante, li renkontis mizerulon, tute kovritan per pustuloj, kun malvivaj okuloj, kun nazo ĉirkaŭmanĝita, kun malrekta buŝo, kun nigraj dentoj kaj gorga voĉo, turmentata de fortega tuso kaj sputanta denton ĉe ĉiu peno.

#### ĈAPITRO IV

##### **Kiel Kandid renkontis sian malnovan majstron, doktoron Panglos, kaj kio rezultis el tio**

Kortuŝate de kompto pli ol de abomeno ĉe la vido de tiu terura mizerulaĉo, Kandid donis al li la du florenojn, kiujn li estis ricevinta de la honesta anabaptisto Jakobo. La fantomo fikse rigardis lin, eksploris kaj ĵetis sin al li sur la kolon. Timigite, Kandid malantaŭenpaŝis:

— Ho ve! diris la mizerulo al la alia mizerulo, ĉu do vi ne rekonas vian karan Panglos?

— Kion mi aŭdas? Vi, mia kara majstro! vi, en tia abomena stato! Kia malfeliĉo okazis al vi? Kial vi ne plu estas en la plej bela el la kasteloj? Kio okazis kun F-ino Kunegond, la plej perfekta el ĉiuj junulinoj, la ĉefverko de l'natur?

— Mi ne plu povas elteni, diris Panglos.

Tuj Kandid kondukis lin en la stalon de la anabaptisto, kie li manĝigis al Panglos iom da pano; kaj kiam ĉi tiu lasta rebonigis sian farton:

— Nu, demandis Kandid, Kunegond?

— Ŝi mortis, respondis Panglos.

Ĉe tiuj vortoj, Kandid svenis; lia amiko rekonsciigis lin per iom da malbona vinagro, kiu hazarde troviĝis en la stalo. Kandid remalfermis la okulojn:

— Kunegond mortis! Ha! plej bona mondo, kie vi estas? Pro kia malsano ŝi mortis? Ĉu ne pro tio, ke ŝi vidis min forpelata el la bela kastelo de sinjoro ŝia patro per fortaj piedbatoj?

— Ne, diris Panglos; ŝi havis la ventron tratranĉatan de bulgaraj soldatoj, post kiam ŝi estis seksperfortita, tiom, kiom estas eble; ili disrompis la kapon al sinjoro ŝia patro, kiu volis defendi ŝin; la sinjorino barona estis dispecigata; mia kompatinda zorgato havis la saman traktadon kiel lia fratino; kaj el la kastelo ne restas ŝtono sur ŝtono, ne restas unu garbejo, nek unu ŝafo, nek unu anaso, nek unu arbo; sed ni estis bone venĝataj, ĉar la Abaroj faris la samon en apuda baronejo, kiu apartenis al bulgara sinjoro.

Ĉe tiu parolado, denove Kandid svenis; sed, rekonsciiginte kaj dirinte ĉion dirindan, li informiĝis pri la kaŭzo kaj la efiko, kaj pri la sufiĉa kialo, kiu metis Panglos en tian mizeran staton.

— Ho ve! diris la lasta, estas la amo; la amo, la konsolanto de l'homa speco, la konservanto de l'universo, la animo de ĉiuj sentemaj estuloj, la juna amo.

— Ho ve! diris Kandid, mi ĝin konas, tian amon, tiun reĝon de la koroj, tiun animon de nia animo; kaj ĝi havigis al mi nur unu kison kaj dudek piedbatojn sur la postajon. Kiel tia bela kaŭzo povis produkti en vi tiel abomenan efikon?

— Ho kara Kandid! vi konis Paket, tiun beletan servistinon de nia plejnobla baronino; en ŝiaj brakoj mi ĝuegis kiel en paradizo kaj tio produktis la inferajn turmentojn, kiuj min forkonsumas; ŝi estis infektita kaj pro tio eble mortis. Paket ricevis tiun donacon de tre klera monaĥo, kiu kutimis ĉion kontroli. Ĉe la fonto: li ja ricevis la malsanon de maljuna grafino, kiu ricevis

ĝin de kavaleria kapitano, kiu dankis ĝin al markizino, kiu prenis ĝin de jezuito, kiu, dum sia noviceco, ek-kaptis ĝin rekte de unu el la kunuloj de Kristofa Kolumbo. Mi mem povos transdoni ĝin al neniu, ĉar mi mortigas.

— Ho Panglos, ekkriis Kandid, jen stranga genealogio! ĉu la diablo ne troviĝas ĉe la komenco?

— Tute ne, rerespondis ĉi tiu granda homo; ĝi estis nepre necesa malsano en la plej bona mondo, ĝi estis necesa rimedo. Ja, se Kolumbo ne estus kaptinta en iu insulo de Ameriko tiun malsanon, kiu putrigas la fonton de la nasko, kiu ofte eĉ malhelpas la naskon, kio evidente tute kontraŭas la celon de la naturo, ni ne havus la ĉokoladon nek la koĉenilon; necesas ankaŭ atenti, ke ĝis hodiaŭ, sur nia kontinento, tiu malsano, kiel la interargumentemo, karakterizas nin. La Turkoj, la Hindoj, la Persoj, la Ĉinoj, la Siamanoj, la Japanoj ĝin ankoraŭ ne konas; sed ekzistas sufiĉa kialo por ke siavice, post kelkaj jarcentoj, ili ankaŭ ĝin konos. Dume, ĝi mirinde progresis inter ni, kaj precipe en tiuj grandaj armeoj, konsistantaj el honestaj dungitoj, bone edukitaj, kiuj decidas pri la sorto de la Ŝtatoj; oni povas certigi, ke, kiam tridek mil viroj enviciĝe batalas kontraŭ samnombra armeo, ambaŭflanke estas proksimume dudek mil sifilisuloj.

— Tio estas admirinda, diris Kandid; sed necesas, ke vi resaniĝu.

— Nu, kiel mi povus? diris Panglos; mi estas tute senmona, amiko, kaj, sur la tuta amplekso de ĉi tiu terglobo, ni ne povas ricevi senpage ian ajn kuracilon, krom se iu pagas donace por ni.

Ĉi lasta diro decidigis Kandid; li iris al la bonfarema anabaptisto Jakobo, genuiĝis antaŭ li, kaj faris



tiel kortuŝan priskribon pri la stato de sia amiko, ke la bonulo ne ŝanceliĝis komplete helpi doktoron Panglos; li kuracigis lin per siaj elspezoj. Dum la resaniĝo Panglos perdis nur unu okulon kaj unu orelon. Li havis belan skribmanieron kaj konis perfekte aritmetikon. La anabaptisto Jakobo faris el li sian libroteniston. Post du monatoj, devigate veturi al Lisbono pro komercaj aferoj, li veturigis en sia ŝipo la du filozofojn. Panglos klarigis al li, ke ĉio estis kiel eble plej bona. Jakobo ne havis saman opinion.

— Ŝajnas, li diris, ke la homoj iom difektis la naturon, ĉar ili ne naskiĝis lupoj, kaj ili fariĝis lupoj. Dio donis al ili nek kanonon, nek bajoneton por sin interbuĉi. Same mi povus argumenti pri la bankrotantoj kaj la juĝistaro, kiu kaptas la bienojn de la bankrotantoj por senigi je ili la kreditantojn.

— Ĉio tio estis nepre necesa, rebatis la unuokula doktoro, kaj la apartaj malfeliĉoj faras la ĝeneralan feliĉon, tiel ke ju pli estas da apartaj malfeliĉoj, des pli ĉio statas bone.

Dum li rezonadis, la vetero malheliĝis, blovis la ventoj el la kvar anguloj de l'mondo, kaj la ŝipo estis atakata de plej terura uragano, kiam estis videbla la haveno de Lisbono.

## ĈAPITRO V

**Uragano, ŝiprompo, tertremo, kaj kio okazis kun doktoro Panglos, kun Kandid kaj la anabaptisto Jakobo**

La duono el la pasaĝeroj estis tiom malfortiĝintaj, mortiĝantaj pro tiuj nekompreneblaj premdoloroj, kiujn la ŝipsanceliĝo metas en la nervojn, en la fluidaĵojn de l'korpo, svingiĝantajn en kontraŭaj direktoj, ke ĝi eĉ

ne havis la forton atenti pri la danĝero. La alia duono kriadis kaj preĝadis; la veloj estis disŝiritaj, la mastoj rompitaĵ, la ŝipo disŝendita. Laboris, kiu povis, neniu aŭdis alian, neniu komandis. La anabaptisto iom helpis la manovron; li estis sur la ferdeko; iu furioza ŝipisto malmilde batis kaj ĵetis lin sur la plankon; sed pro la bato, kiun li donis, la ŝipisto ricevis tiom fortan skuon, ke li falis el la ŝipo kun la kapo malsupren. Li restis pendigita kaj alkroĉita ĉe rompita peco el masto. La bona Jakobo kuras por helpi al li, helpas lin suprenleviĝi, kaj pro sia streĉo li falas en la maron, ĉe la vido de la ŝipisto, kiu lasas lin pereĝi, ne komplezante lin eĉ per rigardo.

Kandid alproksimiĝas, vidas sian bonfarinton, kiu reaperas dum unu momento kaj falas poste por ĉiam en la abismon. Li volas sin ĵeti en la maron; la filozofo Panglos tion malhelpas, pruvante al li, ke la rodo de Lisbono estis formita tute speciale por ke en ĝi dronu tiu anabaptisto. Dum *apriore*<sup>1</sup> li tion pravas, la ŝipo fendigĝas, ĉio pereas krom Panglos, Kandid kaj tiu bruta ŝipisto, kiu dronigis la virtan anabaptiston; la fripono bonŝance naĝis al la marbordo, kien Panglos kaj Kandid estis portataj sur tabulo.

Kiam ili rekonsciĝis iomete, ili marŝis al Lisbono; restis al ili iom da mono, per kiu ili esperis sin savi el malsato post ilia saviĝo el la uragano.

Apenaŭ enirinte la urbon, priplorante la morton de sia bonfaranto, ili sentas subpiede la teron tremanta<sup>2</sup>; la maro ŝaŭmegante suprenleviĝas en la haveno, kaj

<sup>1</sup> Antaŭeksperimente.

<sup>2</sup> Temas pri la tertremo en Lisbono, kiu okazis la 1-an de novembro 1755, kaj kiu pereigis proksimume 15.000 personojn. — *Trad.*

disrompas la ŝipojn, kiuj ankre restadis. Kirilaĵoj el flamo kaj cindro kovras la stratojn kaj la publikajn placojn; la domoj disfalas, la tegmentoj renversiĝas sur la fundamentojn, kaj la fundamentoj disĵetiĝas; tridek mil loĝantoj ĉiuagaĵ kaj ĉiuseksaj estas subpremegataj per la ruinoj. La ŝipisto diris fajfante kaj blasfemante: »Ĉi tie oni povos ion gajni«.

— Kia povas esti la sufiĉa kialo de ĉi tiu fenomeno? diris Panglos.

— Jen estas la lasta tago de l'mondo, ekkriis Kandid.

La ŝipisto senprokraste kuras mezen en la rompaĵojn, maltimas la morton por trovi monon, li sukcesas, ĝin kaptas, ebriiĝas, kaj fordorminte sian ebriecon, aĉetas la karesojn de la unua bonvolema fraŭlino, kiun li renkontas sur la ruinoj de la detruitaj domoj, kaj meze de mortantoj kaj mortintoj. Panglos tamen tiris lin ĉe la maniko kaj diris: »Mia amiko, tio ne decas, vi malobeas al la universala saĝo, vi malbone pasigas vian tempon.«

— Kapo kaj sango! respondis la alparolito, mi estas maristo kaj naskiĝis en Batavio; kvarfoje mi metis la piedojn sur la krucifikson ĉe kvar vojaĝoj en Japanion<sup>3</sup>, ci vere bonelektis la viron al kiu ci volas prediki cian universalan saĝon!

Kelkaj ŝtonaj fragmentoj estis vundintaj Kandid; li sterniĝis sur la strato kaj estis kovrita de rompaĵoj. Li diris al Panglos:

---

<sup>3</sup> Sekve de konspiro de kristanoj en Japanio, la imperiestro Jemic ediktis, ke oni forpelu ĉiujn fremdulojn. Nur la Holandanoj, kiuj eltrovis kaj denunciis la komploton, estis rajtigataj resti, kondiĉe, ke ili malkonfesu la kristanisman kaj publike piedpremu krucifikson. — Trad.

— Ho ve, havigu al mi iom da vino kaj oleo; mi mortigas.

— Ĉi tiu tertremo ne estas novaĵo, respondis Panglos; la urbo Lima en Ameriko spertis la samajn skuojn lastan jaron; samaj kaŭzoj, samaj efikoj: certe ekzistas subtera sulfura tavolo de Lima ĝis Lisbono.

— Tio estas tre kredebla, diris Kandid; sed pro Dio, iom da oleo kaj vino.

— Nu, kredeble? rebatis la filozofo: mi asertas, ke tio estas pruvita.

Kandid senkonsciigis, kaj Panglos alportis al li iom da akvo el proksima fontano.

La morgaŭon, trovinte iom da manĝaĵoj, ŝoviĝinte sub rompaĵojn, ili reakiris iom da forto. Poste ili kunlaboris kun aliaj personoj, por helpi al la loĝantoj, kiuj bonŝance evitis la morton. Kelke da civitanoj, al kiuj ili helpis, regalis ilin per tagmanĝo tiom bona, kiom ebla ĝi povis esti en tia ruinegiĝo; estas vere, ke la manĝado estis malgaja; la kunmanĝantoj surverŝis sian panon per larmoj; sed Panglos konsolis ilin, klarigante, ke tio estas normala:

— Tial ke, li diris, ĉio ĉi kio estas, tio plej bonas: tial ke se vulkano estas en Lisbono, ĝi ne povas esti alie; tial ke estas neeble, ke la aferoj estu ne tiaj, kiaj ili estas; tial ke ĉio estas bona.

Malgranda, nigra viro, intima kun la Inkvizicio, kiu sidis apud li, ĝentile ekparolis:

— Sajnas, ke sinjoro ne kredas je la origina peko: tial ke, se ĉio estas plej bona, sekve ne okazis peko nek puno.

— Mi tre humile petas pardonon de via Moŝto, respondis Panglos ankoraŭ pli ĝentile, tial ke la pekfalo

de l'homo kaj la malbeno estis entenataj en la plej bona el la mondoj eblaj.

— Ĉu do sinjoro ne kredas je la libero? diris la intimulo.

— Via Moŝto pardonos al mi, diris Panglos; la libero povas ekzisti kun la nepra neceso: tial ke estis necese, ke ni estu liberaj; tial ke fine la determinita volo...

Panglos estis ĉe la mezo de sia frazo, kiam la intimulo kapsignis al sia armita servistaĉo, kiu donis al li por trinki vinon el Porto aŭ el Oporto.

## ĈAPITRO VI

**Kiel oni faris belegan bruligon<sup>1</sup> por malhelpi la tertremojn, kaj kiel Kandid estis sidvange punfrapata**

Post la tertremo, kiu detruis la tri kvaronojn de Lisbono, la saĝuloj el la lando ne povis trovi pli efikan rimedon por malhelpi kompletan ruiniĝon ol doni al la popolo belan religian punbruligon; estis decidite de la universitato de Koimbro<sup>2</sup>, ke la spektaklo de kelkaj personoj bruligataj per malvigla fajro, dum granda ceremonio, estas nepre bona rimedo por malhelpi la teron tremi.

Oni konsekvence kaptis Biskajanon, kiu estis edziĝinta kun sia sambaptopatrino<sup>3</sup>, kaj du Portugalojn,

<sup>1</sup> Tiu bruligo reale okazis la 26. junio 1756.

<sup>2</sup> La Universitato de Lisbono estis jam de post 1308 translokita en la urbon Koimbro (portugale: Coimbra).

<sup>3</sup> En 615 la papo Dieudone malpermesis la edziĝon inter gesambaptopatroj: *Nullus christianus suam commatrem in conjugium susciperet debet.*

kiuj ĉe manĝado de kokido deprenis ties lardon; post la tagmanĝo oni venis por ligi doktoron Panglos kaj lian disĉiplon Kandid, unu pro tio ke li parolis, kaj la alian, ĉar li aŭskultis kun aproba mieno: ambaŭ estis apartigite kondukataj en ĉambrojn, kie regis ega freŝo kaj en kiuj la suno neniam maloportunis; ok tagojn poste, oni vestis ilin per iu »san-benito«<sup>4</sup>, kaj oni ornamis iliajn kapojn per paperaj mitroj. Sur la mitro kaj la »san-benito« de Kandid estis pentritaj flamoj renversitaj kaj diabloj, kiuj havis nek ungojn, nek vostojn; sed la diabloj de Panglos havis ungojn kaj vostojn kaj la flamoj staris nerenversite. Estante tiele vestitaj, ili procesie marŝis, kaj aŭdis tre kortuŝan predikon, kiun sekvis bela unutona muziko. Kandid estis kadence sidvange batata, dum oni kantis; la Biskajano kaj la du homoj, kiuj ne volis manĝi lardon, estis bruligataj, kaj Panglos estis pendigata, kvankam tio estis ne kutima<sup>5</sup>. La saman tagon, la tero denove tremadis kun terura brukrakado<sup>6</sup>.

Ekterurite, konsternite, duonfreneziginte, tute sangante, Kandid diris al si: »Se ĉi tie estas la plej eble bona mondo, kiaj do estas la aliaj? Ne tre gravas mia sidvanga frapado, tion mi jam spertis ĉe la Bulgaroj; sed, ho, mia kara Panglos! la plej eminenta el la filozofoj, ĉu estas eble, ke mi vidis vin pendigata, ne konante eĉ la kialon! Ho, mia kara anabaptisto! la plej bona el la homoj, ĉu estas eble, ke vi dronis en la haveno! Ho, fraŭlino Kunegond, la plej inda el ĉiuj, ĉu estas eble, ke oni trafendis al vi la ventron!«

<sup>4</sup> Flava jako, per kiu la inkvizitoroj vestis la bruligotojn.

<sup>5</sup> La Inkvizicio ne kutimis pendigi herezulojn.

<sup>6</sup> Efektive okazis aliaj tremoj en 1756.

Aŭdinte predikon, ricevinte batojn sur la postajon, absolvon kaj benon, li revenis apenaŭ povante stari, kiam maljunulino aliris al li kaj diris: »Mia filo, havu kuraĝon, iru kun mi.«

## ĈAPITRO VII

### Kiel maljunulino flegis Kandid, kaj kiel li retrovis la amatinon

Kandid ne perdis kuraĝon, kaj sekvis la maljunulinon en domaĉon; ŝi donis al li poton da pomado por ke li ŝmiru sin, donis al li por manĝi kaj trinki; ŝi montris al li malgrandan liton sufiĉe puran; estis apud la lito komplete vestaro. »Manĝu, trinku kaj dormu, ŝi diris al li, zorgas pri vi Nia Sinjorino de Atoña, sinjorego sankta Antonio de Padova, sinjorego sankta Jakobo de Kompostel: mi revenos morgaŭ.«

Kandid, mirigite de ĉio, kion li vidis, de ĉio, kion li suferis, kaj ankoraŭ pli de la bonkoreco de la maljunulino, volis al ŝi kisi la manon. »Ne mian manon vi devas kisi, diris la maljunulino; mi revenos morgaŭ. Ŝmiru vin per pomado, manĝu kaj dormu.«

Kandid, malgraŭ tiom da malfeliĉoj, manĝis kaj dormis. La morgaŭon la maljunulino alportas al li matenmanĝon, ekzamenas lian dorson, frotŝmiras lin per alia pomado; poste ŝi alportas al li tagmanĝon, ŝi revenas vespere, kaj kunportas vespermanĝon. La postmorgaŭon, ŝi faris samajn klopodojn.

»Kiu vi estas? ĉiam demandis al ŝi Kandid; kiu inspiris al vi tiom da bonkoreco? Kiel mi povas danki al vi?«

La bonulino neniam respondis; ŝi revenis ĉirkaŭ la vespero kaj ne kunportis manĝon. »Iru kun mi, ŝi diris, kaj silentu«. Ŝi prenas lin ĉe la brako kaj lin subtenante marŝas kun li sur la kamparo proksimume dum triona kilometro. Ili atingis izolan domon, ĉirkaŭitan per ĝardeno kaj kanaloj. La maljunulino frapas pordeton. Oni malfermas; ŝi kondukas Kandid, laŭ kaŝa ŝtuparo, en orumitan kabineton, sidigas lin sur orŝtofan kanapon, kaj ferminte la pordon foriras. Kandid kredis sonĝi, kaj rigardis sian tutan vivon kiel malfeliĉigan sonĝon, kaj la nunan momenton kiel agrablan sonĝon.

La maljunulino baldaŭ reaperis; ŝi pene subtenis tremantan virinon, kun majesta staturo, brilornamitan per juveloj kaj vuale kovritan.

»Demetu ĉi tiun vualon«, diris al Kandid la maljunulino. La junulo alproksimiĝas; per tima mano li levas la vualon. Kia momento! kia surprizo! Li kredas vidi fraŭlinon Kunegond; li fakte ŝin vidas; estis ŝi mem. Mankas al li forto, li ne povas eldiri vorton, li falas al ŝiaj piedoj. Kunegond falas sur la kanapon. La maljunulino superverŝas ilin per alkoholaĵoj, ili rekonsciĝas, ili interparolas, unue per interrompaj mallongaj vortoj, demandoj kaj respondoj, kiuj intermiksiĝas, per ĝemetoj, larmoj, krioj. La maljunulino rekomendas, ke ili faru malpli da bruo kaj lasas ilin solaj.

— Nu! estas vi, diris al ŝi Kandid, vi vivas, mi retrovas vin en Portugalio! Oni do ne seksperfortis vin? Oni do ne tranĉis al vi la ventron, kiel al mi certigis filozofa Panglos?

— Jes, fakte, tio okazis, diris la bela Kunegond; sed oni ne ĉiam mortas pro tiaj akcidentoj.

— Sed ĉu viaj gepatroj ne estis mortigataj?

— Tio bedaŭrinde estas ja vera.



— Kaj via frato?

— Mia frato ankaŭ estis mortigata.

— Kaj kial vi estas en Portugalio? Kaj kiel vi eksciis, ke ankaŭ mi estas tie? kaj pro kia stranga aventuro vi kondukis min en ĉi tiun domon?

— Mi klarigos al vi ĉion, respondis la sinjorino, sed antaŭe vi devas rakonti ĉion, kio okazis al vi depost la senpeka kiso, kiun vi donis al mi kaj la piedbatoj, kiujn vi ricevis.

Kandid respektplene respondis; kaj, kvankam konsternita li estis, kvankam malforta estis lia voĉo, kvankam lia spino ankoraŭ doloretis, li rakontis ĉion, kion li spertis depost la momento de ilia disiĝo. Kunegond ĉielen levis la okulojn; ŝi larmis, eksciante pri la morto de la bona anabaptisto kaj de Panglos, post tio ŝi parolis jene al Kandid, kiu aŭskultegis kaj avidege ŝin rigardis.

## ĈAPITRO VIII

### Historio de Kunegond

»Mi estis en lito kaj dormegis, kiam plaĉis al la Ĉielo sendi Bulgarojn en nian belan kastelon de Thunder-ten-tronckh; ili tranĉis la gorgon de mia patro kaj de mia frato, kaj dispecigis mian patrinon. Iu granda Bulgaro, ses futojn alta, konstatante, ke ĉe tia spektaklo mi senkonsciigis, ekkomencis min seksperforti; tio redonis al mi la konscion, mi kriis, baraktis, mordis, ungovundetis, mi volis elŝiri la okulojn de tiu granda Bulgaro, ne sciante, ke tio, kio okazis en la kastelo de mia patro, estis kutima afero: la perfortulo trabatis

mian flankon per tranĉilo kaj faris vundon, kies postsignon mi ankoraŭ portas.

— Ho ve! tiun postsignon mi esperas vidi, diris la naiva Kandid.

— Ĝin vi vidis, diris Kunegond; sed ni daŭrigu.

— Vi daŭrigu, diris Kandid.

La sekvon de sia historio ŝi rakontis tiele: »Bulgara kapitano eniris, li vidis min tute sanganta, kaj la soldato ne atentis lin. La kapitano ekkoleris pro la nerespektemo al li de la perfortulo kaj mortigis lin kuŝantan sur mia korpo. Poste li min bandaĝigis, kaj kondukis kiel militkaptiton en sian kazernon. Mi lavis lian malgrandan kvanton da ĉemizoj, mi kuiris liajn manĝaĵojn; mi devas konfesi, ke li opiniis min tre bela, kaj mi ne neos, ke li estis belstatura kaj havis blankan kaj glatan haŭton; cetere ne tre sprita li estis kaj ne tre klera: oni tuj povis konstati, ke ne edukis lin doktoro Panglos.

»Post tri monatoj, perdinte sian monon kaj ŝaton al mi, li vendis min al iu judo nomita don Isaĥar, kiu ŝakris en Holando kaj en Portugalio, kaj kiu pasie ŝatis la virinojn. Tiu judo tre forte ligiĝis al mia persono, sed li ne povis ĝin venki; mi pli bone rezistis al li ol al la bulgara soldato: digna persono povas unu fojon esti seksperfortata, sed ĝia virto pro tio plifirmiĝas. La judo, por akiri mian favoron, kondukis min en ĉi tiun kamparan domon. Ĝis nun mi kredis, ke ne ekzistas sur la tero io pli bela ol la kastelo de Thunder-ten-tronckh; mi seniluziĝis.

»Iun tagon la granda inkvizitoro ekvidis min ĉe diservo; li multe rigardis min oblikve kaj avide, kaj sciigis, ke li bezonas paroli al mi pri sekretaj aferoj. Oni kondukis min en lian palacon; mi sciigis al li mian

devenon; li klarigis, ke estas ne inda je mia rango aparteni al izraelido. Je lia nomo oni proponis al don Isaĥar, ke li transcedu min al la sinjorego.

»Don Isaĥar, kiu estas la bankiero de la kortego kaj influhava persono, ne konsentis tian proponon. La inkvizitoro minacis lin je bruligo. Fine la judo timigite faris kontrakton, laŭ kiu la domo kaj mi komune apartenos al ambaŭ; ke la judo estós la ĝuanto lunde, merkrede kaj sabate, kaj la inkvizitoro dum la aliaj tagoj. Jam de ses monatoj daŭras tiu konvencio. Ne sen interdisputoj: ĉar ofte estis malfacile decidi, ĉu la nokto de sabato ĝis dimanĉo apartenas al la malnova leĝo aŭ al la nova. Ĝis nun mi rezistis al ambaŭ; kaj mi kredas, ke pro tio mi ĉiam estis amata.

»Fine, por forigi la malfeliĉegon, kiun kaŭzas tertremoj kaj timigi don Isaĥar, plaĉis al sinjorego la inkvizitoro solene fari bruligon. Li honoris min per invito. Tre bonan lokon mi ricevis; oni alportis al la sinjorinoj refreŝigaĵojn inter la diservo kaj la ekzekuto. Verdire mi sentis abomenon, vidante bruli tiujn du judojn kaj tiun honestan Biskajanon, kiu edziĝis kun sia sambatopatrino, sed kia estis mia surprizo, mia teruro, mia maltrankvilo, kiam mi vidis en »san-benito« kaj sub mitro, vizaĝon, kiu similis al tiu de Panglos! Mi frotis al mi la okulojn, atente rigardante, mi vidis lin pendigita; mi svenis. Apenaŭ mi estis rekonsciiginta, ke mi ekvidis vin senvestigita, tute nuda: tio estis plej alta grado da abomeno, da konsterno, da doloro, da mal-espero. Mi diros al vi, ke via haŭto vere estas eĉ pli blanka kaj havas karnokoloron pli perfektan ol tiu de mia kapitano de Bulgaroj. Tia vido duobligis ĉiujn sentojn, kiuj min premŝarĝis, kiuj min forkonsumis. Mi

ekkriis, mi volis diri: »Haltu, barbaroj!« sed la voĉo mankis al mi, kaj miaj krioj estus senutilaj.

»Kiam vi estis forte batata sur la sidvangojn: »Kiel povas okazi, mi diris, ke la aminda Kandid kaj la saĝa Panglos troviĝas en Lisbono, unu por ricevi cent vipobatojn, kaj la alia por esti pendigata laŭ ordono de sinjorego la inkvizitoro, kies amatino mi estas? Panglos tre kruele trompis min, kiam li diris, ke ĉio statas plej bone.«

»Maltrankviligite, konsternite, jen pro kolero estante duonfreneza, kaj jen preskaŭ morta pro malforteco, mia penso estis tute okupita de la buĉo al mia patro, al mia patrino, al mia frato, pri la malrespekto de mia malbela bulgara soldato, pri la tranĉilbato, kiun li donis al mi, pri mia servuteco, pri mia kuirmetaĵo, pri mia bulgara kapitano, pri mia malbela don Isañar, pri mia abomena inkvizitoro, pri la pendigo al doktoro Panglos, pri tiu granda *miserere* kun ludo de unutona muziko, dum kiu oni batis vin sur la sidvangojn, kaj ĉefe pri la kiso, kiun al vi mi donis malantaŭ ekranego, la tagon, kiam mi vidis vin por la lasta fojo. Mi laŭdis al Dio, kiu revenigis vin al mi, post tiom da afliktoj. Mi rekomendis al la maljunulino, ke ŝi zorgu pri vi, kaj konduku vin ĉi tien, tuj kiam ŝi povos. Ŝi tre bone plenumis mian komision; mi ĝuis la neesprimeblan plezuron revidi vin, aŭdi vin, paroli al vi. Vi kredeble malsategas; grandan apetiton mi havas; ni komencu per vespermanĝo.«

Jen ili ambaŭ altablighas; kaj, post la vespermanĝo, ili reokupas la belan kanapon, pri kiu ni jam parolis; ili estis tie, kiam sinjoro don Isañar, unu el la mastroj de la domo, alvenis. Estis sabate. Li venis por ĝui siajn rajtojn, kaj klarigi sian delikatan amon.

## ĈAPITRO IX

**Kio okazis kun Kunegond, kun Kandid,  
kun la ĉefinkvizitoro kaj kun judo**

Tiu Isaĥar estis la plej kolerema hebreo, kiun oni vidis en Izraelio, depost la kaptiteco en Babilono. »Kio! li diris, hundeca galileano, ĉu do ne sufiĉas al vi la sinjorego inkvizitoro? Ĉu necesas, ke ĉi tiu fripono estu ankaŭ partoprenanto?« Dirante tion, li elprenas longan ponardon, kiun li ĉiam kunportis, kaj, kredante, ke lia kontraŭulo ne havas armilojn, li sin ĵetas al Kandid; sed nia bona Vestfaliano estis ricevinta de la maljunulino belan spadon kun kompleta vestaro. Li elprenas la spadon, kvankam li estis pacema, kaj mortfaligas la izrealidon sur la plankon, ĉe la piedoj de la bela Kune-gond.

— Sankta Virgino! ŝi ekkriis, kio okazos kun ni? Homo ĉe mi mortigita! se venos juĝistaro, ni pereos.

— Se Panglos ne estus pendigita, diris Kandid, li donus al ni ĉi-okaze bonan konsilon, ĉar li estis granda filozofo. Ĉe lia foresto ni petu konsilon al la maljunulino.

Ŝi estis tre prudenta, kaj komencis diri sian opinion, kiam malfermiĝis alia malgranda pordo. Estis unu horo post noktomezo, komenciĝis dimanĉo. Tiu tago apartenis al la sinjorego inkvizitoro. Li eniras kaj vidas la sidvange batitan Kandid kun spado en la mano, mortinton sterniĝinta surtere, Kunegond frenezaspekta kaj la maljunulinon, donanta konsilojn.

En ĉi tiu momento jen kio okazis en la animo de Kandid, kaj kiel li rezonis: »Se ĉi tiu sankta homo

vokas por helpo, li nepre bruligos min; li povos same fari pri Kunegond, li jam senkompate vipigis min; li estas mia amkonkuranto; mi nun mortigas, ne temas ŝanceligi.« Tiu rezono estis decida kaj rapida; kaj, ne donante tempon al la surprizita inkvizitoro retrovi sian memregecon, li trapikas kaj ĵetas lin apud la judon.

— Jen alia bela afero, diris Kunegond; ne plu ekzistas pardoneblo; ni estas ekskomunikataj, alvenis nia lasta horo. Ĉu estas eble, ke tiom milda homo, kia vi estas, povis en du minutoj mortigi unu judon kaj unu prelaton?

— Mia bela fraŭlino, respondis Kandid, kiam oni estas amanta, ĵaluza kaj vipita de la Inkvizicio, oni pro kolero perdas la konscion.

Tiam la maljunulino ekparolis: »En la stalo estas tri andaluziaj ĉevaloj, kun siaj seloj kaj bridoj: la brava Kandid pretigu ilin; sinjorino havas monerojn kaj diamantojn: ni tuj ekrajdu, kvankam mi povas sidi nur sur unu vango, kaj ni iru al Kadiz; estas plej eble bela vetero, kaj estas granda plezuro vojaĝi ĉe la malvarmeto de l'nokto.«

Tuj Kandid selas la tri ĉevalojn. Kunegond, la maljunulino kaj li trarajdas tridek mejlojn senhalte. Dum ili foriris, la Sankta Hermandad<sup>1</sup> venas en la domon; oni entombigas la sinjoregon en bela preĝejo kaj oni ĵetas Isañar en la rubejon.

Kandid, Kunegond kaj la maljunulino estis jam en la malgranda urbo Avacena, meze en la montoj de Siera-Morena; kaj ili jene parolis en gastejo.

<sup>1</sup> Laŭlitere: La Sankta Fratularo, speco de tiutempa ĝendarmaro.

## ĈAPITRO X

**En kia mizerego Kandid, Kunegond kaj la maljunulino  
alvenas en Kadiz, kaj pri ilia enŝipiĝo**

— Kiu do sukcesis ŝteli miajn monerojn kaj miajn diamantojn? diris plorante Kunegond. Per kio ni vivos? kiel ni faros? kie trovi inkvizitorojn kaj judojn, kiuj donacos al mi aliajn?

— Ho ve! diris la maljunulino, mi tre suspektas, ke la ŝtelinto estas tiu respektinda kordeliero<sup>1</sup>, kiu tranoktis kun ni ĉe la sama gastejo en Badajozo, Dio gardu min, ke mi faru nepravan juĝon! sed dufoje li eniris nian ĉambron; kaj foriris longe antaŭ ni.

— Ho ve! diris Kandid, la bona Panglos jam ofte pruvis al mi, ke la riĉoj de la tero estas komunaj por ĉiuj homoj, ke ĉiu pri ili havas saman rajton. Laŭ tiuj principoj, tiu kordeliero devus almenaŭ lasi al ni sufiĉon por fini nian vojaĝon. Ĉu do restas al vi nenio, mia bela Kunegond?

— Ne eĉ unu monero, ŝi diris.

— Kion fari? diris Kandid.

— Ni vendu unu el la ĉevaloj, diris la maljunulino; mi postselę sidos kun fraŭlino, kvankam mi povas sidi nur sur unu vango, kaj ni atingos Kadiz.

En la sama gastejo estis prioro de benediktanoj, li malkare aĉetis la ĉevalon. Kandid, Kunegond kaj la maljunulino pasis tra Lucena, tra Silas, tra Lebriksa, kaj fine venis al Kadiz. Ĉi tie oni ekipis ŝiparon por milite prudentigi la respektindajn jezuitojn de Paragvajō, kiujn oni kulpigis, ke ili ribeligis unu el siaj hordoj kontraŭ la reĝoj de Hispanio kaj Portugalio,

<sup>1</sup> Monaĥo el la societo de franciskanoj.

apud la urbo Sankta Sakramento. Kandid, kiu milit-servis ĉe la Bulgaroj, faris antaŭ la generalo de la malgranda armeo bulgaran ekzercadon kun tiom da eleganta facilo, da rapido, da lerto, da fiero, da facil-moveco, ke oni donis al li por komandi infanterian roton. Jen li estas kapitano; li enŝipiĝas kun fraŭlino Kunegond, la maljunulino, du servistoj, kaj du andaluziaj ĉevaloj, kiuj apartenis al sinjoro la granda inkvizitoro de Portugalio.

Dum la marvojaĝo ili multe rezonadis pri la filozofio de la kompatinda Panglos.

— Ni iras en alian mondon, diris Kandid; sendube estas en tiu, kie ĉio estas bona: ĉar estas konfesende, ke oni povus iom ĝemi pro tio, kio fizike kaj morale okazas en la nia.

— Per mia tuta koro mi amas vin, diris Kunegond; sed mi ankoraŭ havas la animon tute timigita de tio, kion mi vidis, de tio, kion mi spertis.

— Ĉio bone prosperos, respondis Kandid; la maro de ĉi tiu nova mondo jam estas pli bona ol tiuj en Eŭropo; ĝi estas pli kvieta, la ventoj pli konstantaj. Certe estas la nova mondo, kiu estas la kiel eble plej bona mondo.

— Tia estu la volo de Dio! diris Kunegond; sed mi estis tiom terure malfeliĉa en la malnova, ke mia koro ne plu kapablas esperi.

— Vi plendas, diris la maljunulino! ho ve! vi ne spertis tiajn malfeliĉojn, kiaj estis la miaj.

Kunegond preskaŭ ekridis, kaj opiniis, ke tiu bonulino estas tre amuza, pretendante, esti pli malfeliĉa ol ŝi. »Ho ve! ŝi diris al ŝi, mia bonulino, krom se vi estis seksperfortata de du Bulgaroj; se vi ricevis du tranĉil-pikojn en la ventron, se oni fordetrus al vi du kastelojn,



mortigis ĉe via vido du patrojn kaj du patrinojn, kaj se vi havis du amatojn vipitajn ĉe religia bruligo, mi ne vidas, ke vi superas min tiurilate; aldonu, ke mi naskiĝis baronino kun sepdek du gradoj da nobeleco, kaj ke mi estis kuiristino.«

— Fraŭlino, respondis la maljunulino, vi ne konas mian devenon; kaj se mi montrus al vi mian postajon, vi ne parolus tiel, kiel vi parolas kaj vi hezitus en via juĝo.

Tia parolado naskis tre grandan scivolon en la spirito de Kunegond kaj de Kandid. La maljunulino parolis al ili jene.

## ĈAPITRO XI

### Historio de la maljunulino

»Mi ne ĉiam havis la okulojn kun returnitaj palpebraj randoj kaj skarlate borderitaj; mia nazo ne ĉiam tuŝis mian mentonon, kaj ne ĉiam mi estis servistino. Mi estas la filino de la papo Urbano la Xa<sup>1</sup> kaj de la princino Palestrina. Ĝis mia dekkvara jaro oni edukis min en palaco por kiu ĉiuj kasteloj de viaj germanaj baronoj ne estus indaj servi kiel staloj; kaj unu el miaj roboj kostis pli ol ĉiuj luksaĵoj de Vestfalia. Mi kreskis en belo, en gracio, en talento, meze de plezuroj, de respektoj kaj esperoj: mi jam sentigis amon, mia brusto formiĝis; kaj kia brusto! blanka, malmola, simila al tiu de Venuso Medicea, kaj kiaj okuloj! kiaj palpebroj! kiaj nigraj brovoj! kiaj flamoj brilis en miaj du pupiloj, kaj forigis la movbriladon de la steloj, kiel diris al mi la najbaraj poetoj. La virinoj

<sup>1</sup> Ne ekzistis tiatitola papo. *Trad.*

kiuj vestis kaj senvestigis min, ekstazis rigardante min de antaŭe kaj de malantaŭe; kaj ĉiuj viroj deziris esti ĉe ilia loko.

»Mi fianĉiniĝis kun princo, suvereno de Masa-Karara: kia princo! tiel bela, kiel mi, knedita el mildo kaj plaĉo, distinginda pro sprito kaj ardanta pro amo; mi amis lin, kiel oni amas la unuan fojon, kiel idolon, kun malmodero. La edziĝo estis preparita: ĝi estis nepri-skribebla pompo, ĝi estis festoj, karuseloj, senĉesaj opero-burleskoj; kaj la tuta Italio verkis por mi sonetojn el kiuj ĉiuj staris super la nivelo de mezbono. Alproksimiĝis la momento de mia feliĉo, kiam maljuna markizino, kiu estis estinta amdonantino al mia princo, invitis lin al si por trinki ĉokoladon: li mortis en malpli ol duhora tempo kun teruraj konvulsioj; sed tio estis nur bagatelo. Mia patrino, malesperigite, kaj malpli afliktite ol mi, volis fortiri min dum kelka tempo el tiu restadejo tiom pereiga. Ŝi havis tre belan bienon apud Gaieta; ni ekvojaĝis per landa galero, kiu estis orumita kiel la altaro de Sankta Petro en Romo. Jen korsara ŝipo el Sale<sup>2</sup> rapidege alkuras kaj nin atingas; niaj soldatoj sin defendas kiel la soldatoj de l'papo: ili ĉiuj surgenuiĝis, forĵetante siajn armilojn kaj petante al la korsaro ab-solvon *in articulo mortis*.<sup>3</sup>

»Tuj oni senvestigas ilin, kaj ili aperas nudaj kiel simioj, kaj ankaŭ mian patrinon, ankaŭ niajn akompanantinojn kaj ankaŭ min. Estas admirinda afero la diligento, laŭ kiu tiuj sinjoroj senvestigas personojn; sed kio pli surprizis min estis, ke al ni ĉiuj ili metis fingron en iun lokon, kien ni, virinoj, ordinaras lasas

<sup>2</sup> Maroka urbeto.

<sup>3</sup> En la horo de la morto. — *Trad.*

meti al ni nur kanulojn. Tia ceremonio ŝajnis al mi tre stranga: jen kiel oni juĝas pri ĉio, kiam oni neniam forlasis sian landon. Baldaŭ mi eksciis, ke oni volis konstati ĉu ni ne kaŝis tie kelkajn diamantojn: ĝi estas kutimo starigita jam de nememorebla tempo ĉe la civilizitaj nacioj, kies ŝipoj trakuras la marojn. Mi eksciis, ke sinjoroj la religiuloj kavaliroj de Malta neniam malatentas tiun kutimon, kiam ili kaptas Turkojn kaj Turkinojn; ĝi estas leĝo de la internacia juro, kiun oni neniam malobeis.

»Mi ne diros al vi, kiom estis peniga por princino esti kondukata kiel sklavo al Maroko kun sia patrino; vi facile povas imagi kiom ni suferis en la korsara ŝipo. Mia patrino estis ankoraŭ tre bela; niaj akompanantinoj, niaj simplaj ĉambristinoj havis pli da allogoj ol oni povas trovi en tuta Afriko; rilate min, mi estis rava, mi estis la belo, la ĉarmo mem kaj mi estis virga; tia mi ne restis longe: tiu floro, kiu estis rezervata por la bela princo de Masa-Karara, estis al mi rabata de la korsara kapitano; li estis abomena negro, kiu eĉ opiniis, ke li faris al mi grandan honoron. Certe, necesis, ke sinjorino la princino de Palestrina kaj mi estu tre fortaj por elteni ĉion, kion ni spertis ĝis nia alveno en Maroko! Sed sufiĉas pri tio; tiuj aferoj estas tiom ordinaraj, ke ili ne estas preparolindaj.

»Maroko naĝis en sango, kiam ni alvenis. Kvindek filoj de la imperiestro Mulej-Ismael<sup>4</sup> havis ĉiu unu partion; kio fakte okazigis kvindek civilajn militojn, de

<sup>4</sup> Tiu imperiestro regis de la j. 1672 ĝis 1727. La nombro de liaj gefiloj estis nekalkulebla; nur la filoj superis la nombron okcent. La lastaj jaroj de lia reĝado estis tumultigitaj per la ribelo de liaj filoj.

negroj kontraŭ negrojn, de nigruloj kontraŭ brunulojn, de brunuloj kontraŭ brunulojn, de duonnegroj kontraŭ duonnegroj. Estis konstanta hombuĉado tra la tuta imperio.

»Ni apenaŭ estis elŝipiĝintaj, kiam negroj de partiaĉo malamika al tiu de mia korsaro alvenis por forpreni lian rabaĵon. Ni estis, post la diamantoj kaj la oro, tio, kio estis plej altvalora. Mi estis atestanto ĉe batalo tia, kian vi neniam vidas en Eŭropo. La nordaj popoloj ne havas sufiĉe ardan sangon; ili ne havas pasiegon por virinoj kiel ĝi estas ordinara en Afriko. Ŝajnas, ke viaj Eŭropanoj havas lakton en la vejnoj; en tiuj de la loĝantoj de la monto Atlas kaj najbaraj landoj fluas vitriolo, fajro. Oni batalis kun la furiozo de la leonoj, de la tigroj kaj de la serpentoj tieaj, por decidi al kiu ni apartenos. Iu Maŭro kaptis mian patrinon ĉe la dekstra brako, la leŭtenanto de mia kapitano tenis ŝin ĉe la maldekstra; maŭra soldato kaptis unu ŝian kruron, unu el niaj rabistoj tenis la alian. Niaj akompanantinoj preskaŭ ĉiuj troviĝis dum mallonga tempo tiel distirataj de kvar soldatoj. Mia kapitano tenis min kaŝita malantaŭ li; li havis kurban glavon ĉe la mano, kaj mortigis ĉiun, kiu kontraŭis lian furiozon. Fine, mi vidis ĉiujn niajn Italinojn kaj mian patrinon disŝirataj, distranĉataj, buĉataj de la monstroj, kiuj batalis pro ili. La kaptitoj miaj kunuloj, la kaptintoj, la soldatoj, ŝipistoj, nigruloj, brunuloj, blankuloj, duonnegroj, kaj fine mia kapitano, ĉio estis mortigita, kaj mi restis mortiganta sur amaso da mortigitoj. Similaj scenoj okazis, kiel estas konate, sur la spaco de pli ol tri cent mejloj, kvankam oni ĉiutage ne forgesis la kvin preĝojn, ordonitajn de Mahometo.

»Kun granda peno mi eltiris min el inter tiom da sangantaj kadavroj amasigitaj, kaj trenis min sub grandan oranĝarbon ĉe proksima rivereto; tie mi falis pro teruro, pro laciĝo, pro abomeno, pro malespero kaj malsato. Baldaŭ poste, miaj senenergiitaj sentoj ebligis al mi dormadon, kiu pli similis svenon ol ripozon. Mi estis en tia stato el malforto kaj sensenteco, inter la morto kaj la vivo, kiam mi sentis min premata de io, kio moviĝis sur mia korpo; mi malfermis la okulojn, mi vidis blankulon kun bona mieno, kiu ĝemetis kaj murmuris: *O che sciagura d'essere senza c.....!*«<sup>5</sup>

## ĈAPITRO XII

### Daŭrigo pri la malfeliĉoj de la maljunulino

»Mirigite kaj ravite ĉe la aŭdo de mia gepatra lingvo kaj ne malpli surprizite de la paroloj, kiujn eldiris tiu viro, mi respondis, ke ekzistas pli grandaj malfeliĉoj ol tiu, pro kiu li ĝemas; per malmulte da vortoj mi sciigis al li pri la abomenoj, kiujn mi spertis, kaj denove mi svenis. Li kunportis min en najbaran domon, ordonis, ke oni metu min en liton, ke oni donu al mi por manĝi, servis al mi, konsolis min, flatis min, kaj diris al mi, ke neniam li vidis ion pli belan ol min, kaj ke neniam li tiom bedaŭris tion, kion neniu povas al li redoni.

— Mi naskiĝis en Napoli, li diris al mi; ĉiujare oni kastras du-tri mil infanojn; unuj pro tio mortas, aliaj akiras voĉon pli belan ol tiun de virinoj, aliaj foriras

<sup>5</sup> Itale: »Ho, kia malfeliĉo esti sen testikoj!«

por regadi Statojn<sup>1</sup>. Oni operaciis min tre sukcese, kaj mi estis muzikisto en la kapelo de S-ino la princino de Palestrina.

— »De mia patrino, mi ekkriis.

— »De via patrino! li ekkriis plorante; kio! ĉu vi estus tiu juna princino, kiun mi edukis ĝis ŝia sesjara aĝo, kaj kiu jam esperigis, ke ŝi estos tiom bela, kiom vi estas?

— Ĝi estas mi mem; mia patrino estas je kvarcent paŝoj de ĉi tie, distranĉita en pecojn kaj kuŝanta sub amaso da mortintoj...

»Mi rakontis al li ĉion, kio okazis al mi; li ankaŭ rakontis siajn aventurojn, kaj sciigis min, ke kristana potenco<sup>2</sup> sendis lin al la reĝo de Maroko, por fari kun li kontrakton laŭ kiu oni liveros al li pulvon, kanonojn kaj ŝipojn por ke li helpu ekstermi la komercon de aliaj kristanoj. »Mia misio estas plenumita, diris tiu honesta eŭnuko; mi estas enŝipiĝonta por Ceŭta, kaj mi revenigos vin en Italion. *Ma che sciagura d'essere senza c.....!*«

»Kortuŝite kaj larmokule mi dankis al li; kaj, anstataŭ veturigi min en Italion, li kondukis min al Alĝero, kaj vendis min al la guberniestro de tiu provinco. Apenaŭ mi estis vendita, ke tiu pesto, kiu

<sup>1</sup> Aludo al Karlo Broski (itale: Carlo Broschi) alnomita Farinelli, kiu naskiĝis en 1705, mortis en 1782. Li estis kastrita kaj fariĝis unu el la plej famaj kantistoj de Italio. En 1736 li iris en Hispanion, fariĝis favorato de la reĝoj Filipo la V kaj Ferdinando la VI kaj ludis tre gravan politikan rolon. — *Trad.*

<sup>2</sup> Dum la milito pro la heredo de Hispanio, pluraj kristanaj potencoj (Portugaliao interalie) petegis la helpon de Mulej-Ismael. — *Trad.*

rondiris Afrikon, Azion kaj Eŭropon, ekfuriozis en Alĝero. Vi vidis tertremojn; sed, fraŭlino, ĉu vi jam spertis peston?

— Neniajn, respondis la baronino.

— Se vi ĝin spertus, daŭrigis la maljunulino, vi devus konfesi, ke ĝi superas tertremon. Ĝi estas tre ofta en Afriko; ĝi atakis min. Imagu la situacion de filino de papo, dekkvinjara, kiu en trimonata tempo spertis malriĉon, sklavecon, seksperforton preskaŭ ĉiutage, vidis sian patrinon kvaronigita, suferis malsaton kaj militon, kaj pestule mortigas en Alĝero. Tamen tiu pesto ne mortigis min, sed mian eŭnukon, la guberniestron kaj preskaŭ la tutan hareman virinaron.

»Kiam la unuaj difektegoj de tiu terura pesto malaperis, oni vendis la sklavojn de la guberniestro. Komercisto aĉetis min kaj kondukis min al Tuniso; li vendis min al alia komercisto, kiu revendis min en Tripoliso; el Tripoliso mi estis revendata en Aleksandrio, el Aleksandrio denove mi estis vendata en Smirno, de Smirno al Konstantinoplo. Fine mi apartenis al iu estro de janiĉaroj al kiu oni baldaŭ ordonis, ke li iru defendi Azov sieĝatan de la Rusoj.

»La janiĉarestro, kiu estis tre amaĉema viro, kondukis kun si ĉiujn siajn virinojn, kaj loĝigis nin en malgranda fortikaĵo, kuŝanta sur la Paŭs-Meotides, kiu estis gardata de du negraj eŭnukoj kaj de dudek soldatoj. Oni mortigis eksterordinaran kvanton da Rusoj, sed ili malavare repagis al ni. Azov brulis kaj dronis en sango<sup>3</sup>, kaj oni atentis nek pri sekso, nek pri aĝo; restis nur nia malgranda fortikaĵo; la malamikoj provis venki

<sup>3</sup> La urbo Azov fakte estis sieĝata de la Rusoj dum tuta jaro kaj kapitulacis en 1696. — *Trad.*

nin per malsato. La dudek janiĉaroj estis ĵurintaj, ke ili ne cedos. La malsatego, kiun ili spertis, instigis ilin manĝi la du eŭnukojn, pro timo rompi sian ĵuron. Post kelkaj tagoj, ili decidis manĝi la virinojn.

»Ni havis tre pian kaj kompateman pastron, kiu faris al ili tre belan predikon, per kiu li persvadis ilin, ke ili ne tute mortigu nin. »Tranĉu, li diris, nur unu sidvangan al ĉiu el ĉi tiuj sinjorinoj, kaj vi havos tre delikatan manĝon; se vi estas devigataj denove fari la samon, restos al vi la sama provizo post kelkaj tagoj; la Ĉielo dankos al vi pro tio, kaj vi ricevos helpon.«

»Li estis tre elokventa; li persvadis ilin. Oni faris al ni tiun teruran operacion; la pastro aplikis al ni la saman balzamon, per kiu oni ŝmiras infanojn, kiujn oni ĵus cirkumcidis: ni ĉiuj estis mortiĝantaj.

»Apenaŭ la janiĉaroj estis glutintaj la manĝon, kiun ni estis al ili liverintaj, jen alvenas la Rusoj sur plataj ŝipoj; ne eĉ unu janiĉaro elsaviĝis. La Rusoj tute ne atentis pri la stato, en kiu ni estis. Ĉie estas francaj ĥirurgoj: unu el ili, kiu estis tre lerta, prizorgis nin; li resanigis nin, kaj dum mia tuta vivo mi memoros, ke, kiam miaj vundoj estis bone fermiĝintaj, li faris al mi amproponojn. Cetere, al ĉiuj li diris, ke ni devas konsoliĝi; li certigis, ke dum pluraj sieĝoj okazis sama afero, kaj ke tio estas leĝo de l'milito.

»Tuj kiam miaj kunulinoj povis marŝi, oni irigis ilin al Moskvo. Kiel lotaĵo mi trafis en la manojn de nobelo, kiu faris el mi sian ĝardenistinon, kaj kiu donis al mi ĉiutage dudek vipobatojn. Sed post du jaroj tiu sinjoro kaj tridek aliaj nobeloj estis radŝirataj pro kelkaj kortegaj ĉikanoj; mi profitis ĉi tiun aventuron kaj forkuris; mi transiris la tutan Rusion; dum longa tempo mi estis drinkeja servistino en Riga, poste en Rostok,



en Vismar, en Lajpcig, en Kasel, en Utreĥt, en Lejden, en Hag, en Roterdam: mi maljuniĝis en mizero kaj en malhonoro, havante nur duonan postajojn, ĉiam memorante, ke mi estas filino de papo; centfoje mi volis min mortigi, sed mi ankoraŭ ŝatis la vivon. Tiu ridinda malforto estas eble unu el niaj plej pereigaj inklinoj: ĉu ja estas pli granda stultaĵo ol voli senĉese porti ŝarĝon, kiun oni ĉiam volas ĵeti teren; havi abomenon por sia vivo, kaj voli ĝin konservi; resume karesi la serpenton, kiu formanĝas nin, ĝis kiam ĝi estas formanĝinta al ni la koron?

»En la landoj, kiujn la sorto igis min travojaĝi, kaj en la drinkejoj, kie mi estis servistino, mi vidis eksterordinaran nombron da personoj, kiuj havis abomenegon por sia ekzisto; sed mi vidis nur dek du, kiuj memvole faris finon al sia mizero: tri negroj, kvar Angloj, kvar Genevanoj kaj unu germana profesoro nomita Robek<sup>4</sup>.

»Laste mi fariĝis servistino ĉe la judo don Isaĥar; li metis min je via dispono, mia bela fraŭlino; mi ligis min al via sorto, kaj mi estis pli okupata per viaj aventuroj ol per miaj. Mi eĉ neniam parolus al vi pri miaj malfeliĉoj, se vi ne incitus min iomete, kaj se ne estus kutimo sur ŝipo fari rakontojn por sin distri. Fine, fraŭlino, mi havas sperton, mi konas la homojn; donu al vi distron, instigu ĉiun pasaĝeron, ke li rakontu pri sia vivo; kaj se troviĝos unu sola, kiu ne ofte malbenis sian ekziston, kaj kiu ne ofte diris al si, ke li estas la plej malfeliĉa inter la homoj, ĵetu min en la maron kun la kapo antaŭen.«

<sup>4</sup> Germane: *Robeck*; li verkis latine libron per kiu li faris apologion pri memmortigo, kaj sin dronigis en la rivero Vesper ĉe Bremen dum la jaro 1735.

## ĈAPITRO XIII

**Kiel Kandid estis devigata disiĝi de la bela Kunegond kaj de la maljunulino**

Aŭdinte la rakonton de la maljunulino, la bela Kunegond faris al ŝi ĉiujn ĝentilaĵojn, kiujn oni ŝuldas al persono de ŝia rango kaj merito. Ŝi akceptis la proponon; ŝi instigis ĉiujn pasaĝerojn unu post alia, ke ili rakontu siajn aventurojn. Kandid kaj ŝi konfesis, ke la maljunulino estas prava. »Estas tre domaĝe, diris Kandid, ke la saĝa Panglos estis kontraŭkutime pendigata ĉe bruligo; li dirus al ni admirindajn parolojn pri la fizika kaj morala malbono, kiu kovras la teron kaj la maron, kaj mi havus sufiĉe da forto por kuraĝi respekt-plene eldiri al li kelkajn kontraŭparolojn.«

Dum ĉiu eldiris sian rakonton, la ŝipo antaŭeniris. Oni albordigis en Bonaero<sup>1</sup>. Kunegond, kapitano Kandid kaj la maljunulino iris al la domo de la guberniestro Don Fernando de Ibaran, kaj Figuerora, kaj Maskarenes, kaj Lampurdos, kaj Suza. Tiu sinjoro havis fieron konvenan por homo posedanta tiom da nomoj. Li parolis al la viroj kun plej nobla malŝato, portante la nazon tiom alten, tiom malkompateme laŭtigante la voĉon, tiom impone parolante, afektante irmanieron tiom malhumilan, ke ĉiuj, kiuj salutis lin, sentis emon lin bati. Li pasiege ŝatis la virinojn. Kunegond ŝajnis al li esti tio, kion li vidis plej bela. Lia unua parolo estis por demandi ĉu ŝi estas la edzino de la kapitano. La mieno, laŭ kiu li faris tiun demandon, timigis Kandid; li ne kuraĝis diri, ke ŝi estas lia edzino, ĉar efektive ŝi ne estis tia; li ne kuraĝis diri, ke ŝi estas lia fratino, tial

<sup>1</sup> Buenos-Aires.

ke ŝi ankaŭ ne estis; kaj kvankam tia duonoficiala mensogo estis iam tre laŭmoda ĉe la antikvuloj<sup>2</sup>, kaj ke ĝi povus utili al la modernuloj, lia animo estis tro pura por ne diri la veron. »Fraŭlino Kunegond, li diris, estas faronta al mi la honoron edziniĝi kun mi, kaj ni petegas vian ekscelencan moŝton konsenti pri nia edziĝo.«

Don Fernando de Ibaran, kaj Figuerora, kaj Maskarenes, kaj Lampurdos, kaj Suza, levante siajn lipharojn akre ridetis, kaj ordonis al kapitano Kandid, ke li iru revui sian roton. Kandid obeis; la guberniestro restis kun Kunegond. Li malkovris al ŝi sian pasion, solene certigis, ke morgaŭ li edzinigos ŝin kun la konsento de la Eklezio, aŭ aliel, laŭ tio, kion postulos ŝiaj ĉarmoj. Kunegond petis kvaronan horon por enpensiĝi, por konsulti la maljunulinon kaj decidi.

La maljunulino diris al Kunegond: »Fraŭlino, vi havas sepdek du gradojn da nobeleco, kaj ne eĉ unu obolon; dependas nur de vi, ĉu vi fariĝos la edzino de la plej granda sinjoro el suda Ameriko, kiu havas belajn lipharojn; ĉu utilas, ke vi tenu vian dignon en neŝanceliĝebla fidelo? Vi estis perfortata de Bulgaroj; judo kaj inkvizitoro ĝuis vian amfavoron; la malfeliĉoj donas rajtojn. Mi konfesas, ke, se mi estus ĉe via loko, mi sen ia skrupulo edziniĝus kun la sinjoro guberniestre kaj riĉiĝus S-ron kapitanon Kandid«. Dum parolis la maljunulino kun la tuta prudento, kiun donas la aĝo kaj la sperto, oni vidis eniri en la haveno malgrandan ŝipon; ĝi portis alkadon<sup>3</sup> kaj algvazilojn<sup>4</sup>, kaj jen kio estis okazinta.

<sup>2</sup> Aludo al la historio de Abraham kaj Sara en la Biblio. — *Trad.*

<sup>3</sup> Hispana urbestro aŭ juĝisto.

<sup>4</sup> Hispanaj policistoj.

La maljunulino tre prave divenis, ke la monon kaj la diamantojn de Kunegond ŝtelis iu grandmanika kordeliero en la urbo Badajozo, kiam ŝi rapideme forkuris kun Kandid. Tiu monaĥo provis vendi kelkajn el la gemoj al iu juvelisto. La komercisto rekonis ilin kiel apartenantajn al la granda inkvizitoro. La kordeliero, antaŭ ol esti pendigata, konfesis, ke li ŝtelis ilin: li sciigis pri la personoj kaj pri la vojo, kiun ili iris. La forkuro de Kunegond kaj de Kandid jam estis konata. Oni sekvis ilin ĝis Kadiz; oni sendis, sen ia prokrasto, ŝipon por persekuti ilin. La ŝipo jam estis en la haveno de Bonaero. La famo disvastiĝis, ke iu alkado estis elŝipiĝonta, kaj ke oni persekutas la murdintojn de sinjorego la granda inkvizitoro. La prudenta maljunulino tuj vidis tion, kio estas farenda. »Vi ne povas forkuri, ŝi diris al Kunegond; ne estas vi, kiu mortigis la sinjoregon; kaj cetere la guberniestro, kiu vin amas, ne permesos, ke oni malbone traktu vin; restu.« Tuj ŝi kuras al Kandid: »Forkuru, ŝi diris, aŭ post unu horo vi estos bruligata«. Ne estis perdota momento; sed kiel disiĝi de Kunegond, kaj kien rifuĝi?

#### ĈAPITRO XIV

#### **Kiel Kandid kaj Kakambo estis akceptataj ĉe la jezuitoj de Paragvajo**

Kandid estis kondukinta kun si serviston tiaspecan, kian oni multe trovas ĉe la hispanaj marbordoj kaj en la kolonioj. Li estis kvarone Hispano, estante naskigita de mestizo en Tukuman; li estis akolito, preĝeja pedelo, maristo, monaĥo, leterportisto, soldato, lakeo. Li nomiĝis Kakambo, li tre ŝatis sian mastron, tial ke lia mastro

estis tre bona homo. Rapidege li selis la du andaluziajn ĉevalojn. »Nu, mia mastro, ni obeu la konsilon de la maljunulino; ni foriru, ni kuru, ne rigardante malantaŭen.« Kandid larmis. »Ho mia kara Kunegond! estas korŝire forlasi vin en la tempo, kiam sinjoro la guberniestro estas nin edzigonta! Kunegond, el tiom malproksime kondukita, kio okazos kun vi?

— Okazos al ŝi laŭŝance, diris Kakambo; la virinoj neniam embarasiĝas je si; Dio prizorgas pri tio; ni kuru.

— Kien ci kondukas min? kien ni iras? kion ni faros sen Kunegond? diris Kandid.

— Pro sankta Jakobo de Kompostel, diris Kakambo, vi estis iranta por militi kontraŭ la jezuitoj; ni iru militi por ili: mi sufiĉe bone konas la vojojn, mi kondukos vin en ilian reĝlandon, ili estos ĉarmataj havi kapitanon, kiu bulgare ekzercadas; vi akiros eksterordinaran riĉon; kiam oni ne trovas sian profiton en iu mondo, oni ĝin trovas en alia. Estas tre granda plezuro vidi kaj fari novajn aferojn.

— Ĉu jam ci iris en Paragvajojn? diris Kandid.

— Tutcerte! diris Kakambo; mi estis servisto en la kolegio de la Ĉieliro, kaj mi konas la gubernion de *los padres*<sup>1</sup>, kiel mi konas la stratojn de Kadiz. Tiu gubernio estas admirinda afero. La reĝlando jam havas diametre pli ol cent mejlojn; ĝi estas dividita en tridek provincojn<sup>2</sup>. *Los padres* posedas ĉion tie, kaj la popoloj nenion; tio estas ĉefverko de l'racio kaj de l'justo. Por mi nenio estas pli dieca ol *los padres*, kiuj ĉi tie militas

<sup>1</sup> Hispana esprimo: *la patroj*.

<sup>2</sup> En 1717, la nombro da triboj formitaj de la jezuitoj en Paragvajo estis tridek unu. En tiuj triboj oni nombris 121.161 Indianojn. — *Trad.*

kontraŭ la reĝo de Hispanio kaj la reĝo de Portugalio, kaj kiuj en Eŭropo estas iliaj konfesprenantoj; kiuj ĉi tie mortigas Hispanojn, kaj kiuj en Madrid sendas ilin en la ĉielon: tio ravas min; ni antaŭeniru: vi estos la plej feliĉa homo el ĉiuj. Kian plezuron havos *los padres*, kiam ili ekscios, ke venas al ili kapitano, kiu konas la bulgaran ekzercadon!«

Tuj kiam ili estis alvenintaj ĉe la unua barilo<sup>3</sup>, Kakambo diris al la unuavica gvardio, ke kapitano deziras paroli al sinjorego la komandanto. Oni iris averti la grandan gvardion. Paragvajana oficiro alkuris ĝis la piedoj de la komandanto por transdoni al li la sciigon. Kandid kaj Kakambo estis unue senarmigataj; oni kaptis iliajn du andaluziajn ĉevalojn. La du fremduloj estis enkondukataj inter du vicojn da soldatoj; la komandanto estis ĉe la fino kun la triangula ĉapo, kun la robo falde levita, kun spado ĉe la flanko kaj lanco en la mano. Li faris geston; tuj dudekkvar soldatoj ĉirkaŭas la du novevenintojn. Iu serĝento diris al ili, ke necesas atendi, ke la komandanto ne povas al ili paroli, ke la provinca respektinda patro permesas al ĉiu ajn Hispano malfermi la buŝon nur dum sia ĉeesto,<sup>4</sup> kaj resti en la lando ne pli ol tri horojn.

— Kaj kie estas la respektinda provinca patro? diris Kakambo.

— Farinte meson, li ĉeestas nun la paradon, respondis la serĝento, kaj vi povos kisi liajn spronojn nur post tri horoj.

<sup>3</sup> La jezuitoj malhelpis, ke la Indianoj interkomunikiĝu kun la fremduloj. — *Trad.*

<sup>4</sup> La jezuitoj ne instruis al la Indianoj la hispanan lingvon.

— Sed, diris Kakambo, sinjoro kapitano, kiu malsatas same kiel mi, ne estas Hispano, li estas Germano; ĉu ni ne povus tagmanĝi, atendante lian respektindan Moŝton?

Senprokraste la serĝento iris por raporti tiun paroladon al la komandanto. »Dio estu benata! diris tiu sinjorego; ĉar li estas Germano, mi povas paroli al li; oni konduku lin en mian branĉoŝirmaĵon.« Tuj oni kondukas Kandid en laŭbon ornamitan per tre beleta kolonaro el verda kaj orkolora marmoro, kaj el latkradoj, kiuj entenis papagojn, kolibrojn, numidojn, kaj ĉiujn plej maloftajn birdojn. Treege bona tagmanĝo estis preparita en oraj vazoj; kaj dum la Paragvajanoj manĝis maizon en lignaj pelvetoj, meze en la kampo, ĉe la ardo de la sunradioj, la respektinda patro komandanto eniris la branĉoŝirmaĵon.

Li estis tre bela junulo, kun grasa tre kolora vizaĝo, kun alta brovo, kun viva okulo, kun ruĝa orelo, kun ruĝegaj lipoj, kun fiera mieno, sed lia fiero ne similis tiun de Hispano, nek tiun de jezuito. Oni redonis al Kandid kaj al Kakambo la armilojn, kiujn oni de ili estis deprenintaj, ankaŭ la du andaluziajn ĉevalojn; Kakambo donis avenon al ili por manĝi apud la branĉoŝirmaĵo, senĉese observante ilin, pro timo je surprizo.

Kandid kisis unue la malsupron de la robo de l'komandanto, poste ili altabliĝis.

— Do vi estas Germano? diris germanlingve la jezuito.

— Jes, mia respektinda patro, diris Kandid.

Ambaŭ, eldirante tiujn vortojn, rigardis unu la alian kun treege granda surprizo kaj emocio, kiujn ili ne povis superregi.

— Kaj el kiu lando de Germanio vi estas? diris la jezuito.

— El tiu malŝatinda provinco Vestfalia<sup>5</sup>, diris Kandid: mi naskiĝis en la kastelo de Thunder-ten-tronckh.

— Ho ĉielo! ĉu estas eble! ekkriis la komandanto.

— Kia miraklo! ekkriis Kandid.

— Ĉu estas vi? diris la komandanto.

— Tio estas neebla, diris Kandid.

Ambaŭ falas renverse, ili ĉirkaŭbrakas sin, ili ploregas.

— Kio! ĉu estas vi, mia respektinda patro? vi, la frato de la bela Kunegond! vi, kiu estis mortigita de la Bulgaroj! vi, la filo de sinjoro la barono! vi, jezuito en Paragvajo! Oni devas konfesi, ke ĉi tiu mondo estas io stranga. Ho Panglos! Panglos! kiom feliĉa vi estus, se oni ne pendigus vin!

La komandanto ordonis, ke la negraj sklavoĵ foriru kaj ankaŭ la Paragvajanoj, kiuj donis por trinki en pokaletoj el kvarca kristalo. Li dankis al Dio kaj sankta Ignaco milfoje; li premis Kandid en siajn brakojn; iliaj vizaĝoj estis superverŝataj per larmoj.

— Vi estus multe pli mirigata, pli kortuŝata, vi ne plu povus regi vin, diris Kandid, se mi dirus al vi, ke F-ino Kunegond, via fratino, kiu viakrede havis la ventron tratranĉita, estas tute sana.

— Kie?

---

<sup>5</sup> En letero de la 6-a de decembro 1740 Volter jam diris al Frederiko:

»Ho malŝatinda Vestfalia!

. . . . .  
 Kiu volas vivi sen ia bono,  
 Sen trinko, dormo kaj sen mango,  
 Trafa por li vojaĝ-arango  
 En via hunda regiono.«



— En via najbaraĵo, ĉe sinjoro la guberniestro de Bonaero; kaj mi venis por militi kontraŭ vin.

Ĉiu vorto, kiun ili eldiris dum tiu longa konversacio, estis nur sinsekvo de miregindaĵo post miregindaĵo. Ilia tuta animo kvazaŭ flugis per ilia lango, estis atentema en iliaj oreloj kaj brilegis en iliaj okuloj. Tial, ke ili estis Germanoj, ili restis ĉetable dum longa tempo, atendante la respektindan provincan patron; kaj la komandanto parolis jene al sia kara Kandid.

## ĈAPITRO XV

### **Kiel Kandid mortigis la fraton de sia kara Kunegond**

»Dum mia tuta vivo mi memoros pri la terurega tago, en kiu mi vidis mortigataj mian patron kaj mian patrinon kaj seksperfortata mian fratinton. Kiam la Bulgaroj estis for, oni ne plu trovis tiun adorindan fratinton, kaj oni metis sur ĉaron mian patrinon, mian patron kaj min, du servistinojn kaj tri malgrandajn knabojn buĉitajn, por transporti nin al jezuita kapeleto, lokita du mejlojn for de la kastelo, kaj tie fari la enterigan ceremonion. Iu jezuito aspergis nin per benita akvo; ĝi estis terure salita; kelkaj gutoj eniris miajn okulojn: la pastra moŝto ekvidis, ke mia palpebro iomete moviĝis; li metis sian manon sur mian koron kaj sentis ĝin bati; oni flegis min, kaj post tri semajnoj mi estis tute resaniĝinta. Vi scias, mia kara Kandid, ke mi estis tre bela, mi ankoraŭ pli beligis; tial la respektinda patro Krust, direktoro de la edukejo, fariĝis tre amikema al mi: li donis al mi kostumon de novico; post kelka tempo mi estis sendata al Romo. Lia patra generala moŝto bezonis rekrutaron da junaj germanaj jezuitoj. La suve-

renoj de Paragvajo akceptas kiel eble malplej da hispanaj jezuitoj; ili preferas la fremdulojn, kies regateco ŝajnas al ili pli certa. La respektinda generala patro juĝis min taŭga por iri labori en tiun vinberegion. Ni forvojaĝis, unu Polo, unu Tirolo kaj mi. Ĉe mia alveno, mi havis la honoron esti elektata sub-diacono kaj leŭtenanto; hodiaŭ mi estas kolonelo kaj pastro. Ni vigle militas kontraŭ la trupoj de la reĝo de Hispanio; mi certigas al vi, ke ili estos ekskomunikataj kaj venkataj. La Providenco sendas vin ĉi tien por helpi al ni. Sed ĉu estas tute vere, ke mia kara fratino Kunegond estas en la najbaraĵo, ĉe la guberniestro de Bonaero?»

Kandid ĵuris, ke nenio estas pli vera. Iliaj larmoj denove ekfluis. La barono ne laciĝis ĉirkaŭbraki Kandid; li nomis lin sia frato, sia savanto.

— Ha! eble, li diris, mia kara Kandid, ni sukcesos eniri la urbon kiel venkantoj kaj liberigi mian fratino Kunegond.

— Tion mi deziras, diris Kandid, ĉar mi esperis edziĝi kun ŝi kaj tion mi ankoraŭ esperas.

— Vi, malrespektulo! respondis la barono, vi havas tian aroganton edziĝi kun mia fratino, kiu havas sepdek du gradojn da nobeleco! mi opinias, ke vi estas tre impertinenta, kuraĝante paroli al mi pri tiom senkonsidera intenco!

Kandid, mirkonsternite de tia parolo, respondis: »Mia respektinda patro, ĉioma ajn nobeleco ne povas ŝanĝi la fakton, ke mi tiris vian fratino el la brakoj de judo kaj de inkvizitoro; ŝi do estas al mi sufiĉe dankodeva, ŝi volas edziniĝi kun mi. Majstro Panglos ĉiam diris al mi, ke la homoj estas egalrajtaj, kaj certe mi edziĝos kun ŝi.

— Pri tio mi mem decidis, fripono! diris la jezuito barono de Thunder-ten-tronckh; kaj samtempe li forte batis lian vizaĝon per la plato de sia spado.

Tuj Kandid elingigas la sian kaj ĝin alpuŝas ĝis la manŝirmilo en la ventron de la barona jezuito; sed, ĝin eltirante sange makulitan, li ekploris: »Ho ve! Dio mia, li diris, mi mortigis mian eksmastron, mian amikon, mian bofraton; mi estas plej bona homo el la mondo, kaj tamen jen mi mortigis tri homojn, kaj el tiuj tri estas du pastroj.«

Kakambo, kiu gardostaris ĉe la pordo de l'branĉoŝirmaĵo, alkuras. »Restas al ni vendi kare nian vivon, diris lia mastro al li; oni sendube estas enironta en la branĉoŝirmaĵo, ni mortu kun armiloj ĉemane.« Kakambo, kiu jam spertis aliajn similajn okazojn, ne perdis sian memregecon; li prenis la jezuitan robon per kiu sin vestis la barono, metis ĝin sur la korpon de Kandid, donis al li la kvadratforman ĉapon de la mortinto, kaj igis lin surĉevaliĝi. Ĉio ĉi tio estis farata dum tre mallonga tempo. »Ni kuru, mia mastro; ĉiuj kredos, ke vi estas iu jezuito, kiu iras por komuniki ordonojn; kaj ni jam estos transpasintaj la landlimojn, antaŭ ol oni povos persekuti nin.« Li jam rapidegis, eldirante tiujn vortojn kaj hispanlingve kriante: »Lokon, lokon por la respektinda patro kolonelo.«

## ĈAPITRO XVI

**Kio okazis al la du vojaĝantoj kun du junulinoj, du simioj, kaj kun la sovaĝuloj nomataj Grandoreluloj**

Kandid kaj lia servisto jam estis trans la bariloj, kaj neniu ankoraŭ sciis en la tendaro pri la morto de l'germana jezuito. La vigle atenta Kakambo estis zor-

ginta pri plenigo de sia kofro je pano, ĉokolado, ŝinko, fruktoj kaj ioma kvanto da vino. Rajdante sur siaj andaluziaj ĉevaloj, ili penetris en nekonatan landon, kie ili nenium vojon eltrovis. Fine bela herbejo tratranĉita de riveretoj aperis antaŭ ili. Niaj du vojaĝantoj paŝtas siajn rajdobestojn. Kakambo proponas al sia mastro, ke ili manĝu kaj li mem ekmanĝas. »Ĉu estas eble, ke mi manĝu, diris Kandid, ĉe la penso, ke mi mortigis la filon de lia barona moŝto kaj ke mi estas kondamnita neniam plu vidi dum mia vivo la belan Kunegond? Ĉu utilas, ke mi plidaŭrigu miajn mizerajn tagojn, ĉar mi devas for de ŝi pasigaĉi ilin kun konscienciproĉoj kaj mal-espero? Kaj kion diros la ĵurnalo de Trevu?«<sup>1</sup>

Tiel parolante, li tamen manĝis. La suno malleviĝis. La du erarvagantoj aŭdis kelkajn krietojn, kiuj ŝajne estis eligataj de virinoj. Ili ne sciis, ĉu tiuj krioj atestis doloron aŭ ĝojon; sed ili rapidiĝante stariĝis kun tia maltrankviliĝo kaj tia timo, kiujn havigas ĉio en nekonata lando. Tiun brukriadon faris du junulinoj, tute nudaj, kiuj kvazaŭ flugetante kuris ĉe la rando de la herbejo, dum du simioj sekvis ilin, mordante iliajn sidvangojn. Kandid estis kortuŝata pro kompatato: li lernis pafi ĉe la Bulgaroj, kaj li kapablis traffaligi nukseton en arbustotufo, ne tuŝante la foliojn. Li prenas sian dutuban pafilon, pafas, kaj mortigas la du simiojn.

— Dio estu laŭdata, mia kara Kakambo! mi tiris el granda danĝero tiujn du kompatindajn kreitaĵojn; se mi pekis, mortigante unu inkvizitoron kaj unu jezuiton, tion mi certe repaĝis, savante la vivon al du junulinoj.

<sup>1</sup> Aludo pri *Raportoj por helpi al la historio de sciencoj kaj belartoj*, kiujn publikigis la jezuitoj de Trevu (france: Trévoux) kaj Parizo de 1701 ĝis 1761. — Trad.

Eble ili estas du nobelaj fraŭlinoj, kaj tiu aventuro havigos al ni en la lando grandajn avantaĝojn.

Li estis daŭriganta, sed lia lango kripliĝis, kiam li vidis tiujn du junulinojn ameme kisi la du simiojn, ploregi ĉe iliaj korpoj kaj plenigi la aeron per plej doloraj krioj.

— Mi ne antaŭvidis tiom da bonanimeco, diris fine Kandid al Kakambo, kiu rebatis:

— Nu, vi faris belan ĉefverkon, mia mastro; vi mortigis la amatojn de tiuj fraŭlinoj.

— Iliaj amatoj! ĉu eble? vi mokas min, Kakambo; kiel mi povus kredi vin?

— Mia kara mastro, rebatis Kakambo, vi ĉiam estas pri ĉio mirigita; kial vi juĝas stranga, ke en kelkaj landoj estas simioj, kiu akiras favoron de virinoj? Ili estas kvarone homoj, kiel mi estas kvarone Hispano.

— Ho ve, daŭrigis Kandid, mi memoras, esti aŭdinta majstron Panglos diri, ke similaj akcidentoj jam okazis, kaj ke el tiuj miksiĝoj naskiĝis kaproviroj, faŭnoj, satirusoj; ke tiajn vidis pluraj altranguloj; sed mi konsideris tion kiel fabelojn.

— Nu, vi nun devas esti konvinkita, ke ĝi estas vero, kaj vi vidas kiel kondukas la personoj, kiuj ne ricevis ian edukadon; tio ne gravas, sed mi timas, ke tiuj sinjorinoj preparas por ni ian insidon.

Tiuj solidaj pripensoj instigis Kandid forlasi la herbejon kaj penetri en arbaron. Tie li verspermanĝis kun Kakambo; kaj ambaŭ, malbeninte la inkvizitoron el Portugalio, la guberniestron de Bonaero kaj la baronon, ekdormis sur musko. Ĉe sia vekigo, ili sentis, ke ili ne povas moviĝi; la kaŭzo estis, ke dum la nokto la Grandoreluloj, la enlandanoj, katenis ilin per ŝnuroj el ŝelo de arbo, sekve de denunco de la du sinjorinoj. Ili

estis ĉirkaŭitaj de kvindeko da Grandoreluloj tute nudaj, armitaj per sagoj, frapilegoj kaj hakiloj el ŝtono: unuj boligis akvon en granda kaldrono; aliaj pretigis rostostangojn, kaj ĉiuj kriis: »Ĝi estas jezuito, ĝi estas jezuito! ni estos venĝataj, kaj havos bonan manĝon; ni manĝu jezuitaĵon, ni manĝu jezuitaĵon!«<sup>2</sup>

— Mi jam diris al vi, mia kara mastro, ekkriis Kakambo, ke tiuj du junulinoj insidos al ni.

Kandid ekvidante la kaldronegon kaj la rostostangojn, ekkriis:

— Ni certe estos ĉu rostataj, ĉu boligataj. Ha! kion dirus majstro Panglos, se li vidus, kiel kondukas primitivuloj? Ĉio estas bona, konsentite; sed mi konfesas, ke estas tre kruele esti perdinta F-inon Kunegond kaj esti rostota de Grandoreluloj.

Kakambo neniam perdis sian memregon. Li diris al la malĝojigita Kandid:

— Ne malesperu; mi iomete komprenas la ĵargonon de ĉi tiuj popoloj; mi tuj parolos al ili.

— Ne forgesu, diris Kandid, admone komprenigi al ili, ke ili kondukas terure malhumanece, kuirante homojn, kaj ke tio estas tute nekristana.

»Sinjoroj, diris Kakambo, ĉu do vi hodiaŭ intencas manĝi unu jezuiton? nu, bone; nenio estas pli justa ol tiel trakti siajn malamikojn. Efektive la natura juro instruas al ni mortigi nian proksimulon, kaj tiel oni agas sur la tuta tero. Se ni ne profitas nian rajton ĝin manĝi, estas pro tio cetere, ke ni havas bonan alian manĝon; sed vi ne havas samajn vivrimedojn kiel ni: certe estas preferinde manĝi siajn malamikojn ol forlasi

<sup>2</sup> Tio estas unu el la unuaj fortegaj atakoj de la filozofoj kontraŭ la jezuitoj, kiuj, per siaj denuncoj, malpermesigis la publikadon de la *Enciklopedio*. — *Trad.*

al korvoj kaj kornikoj la rezultaĵon de sia venko. Sed, sinjoroj, vi certe ne volus manĝi viajn amikojn. Vi kredas esti trapikontaj per rostostango jezuiton, kaj estas via defendanto, estas malamiko de viaj malamikoj, kiun vi estas rostonta. Rilate min, eksciu, ke mi naskiĝis en via lando; la sinjoro, kiun vi vidas, estas mia mastro, kaj, anstataŭ esti jezuito, li ĵus mortigis jezuiton, li surhavas ties vestojn: jen estas la kaŭzo de via eraro. Por kontroli mian diron, prenu lian robon, portu ĝin ĝis la unua barilo de la regno de *los padres*; demandu, ĉu mia mastro ne mortigis jezuito-oficiron. Vi bezonos malmulte da tempo; vi ja povos manĝi nin poste, se vi eltrovos, ke mi mensogis al vi. Sed, se mi diris al vi la veron, vi tre certe liberigos nin, ĉar vi bone konas la principojn de la ĝenerala juro, la morojn kaj la leĝojn.»

La Grandoreluloj juĝis tiun parolon tre saĝa; ili deputis du eminentulojn por iri diligente informiĝi pri la afero; la du deputitoj saĝe plenumis sian komision, kaj baldaŭ revenis, kunportante bonajn sciigojn. La Grandoreluloj liberigis siajn du kaptitojn, faris al ili multe da afabloj, proponis al ili junulinojn, donis refreŝigojn kaj kondukis ilin ĝis la limapudoj de siaj ŝtatoj, kun ĝojego kriante: »Li ne estas jezuito, li ne estas jezuito!«

Kandid ne laciĝis admirari la motivon de sia liberiĝo. »Kia popolo! li diris, kiaj homoj! kiaj moroj! Se mi ne havus la feliĉon esti per mia spado trapikinta la korpon de la frato de F-ino Kunegond, mi estus senpardone manĝita. Sed, ĉion konsiderante, la pura naturo estas bona, ĉar ĉi tiuj homoj, anstataŭ min manĝi, faris al mi mil ĝentilojn, tuj kiam ili eksciis, ke mi ne estas jezuito.«

## ĈAPITRO XVII

**Pri alveno de Kandid kaj de lia servisto en la landon  
Eldorado<sup>1</sup> kaj pri tio, kion ili tie vidis**

Kiam ili estis ĉe la limoj de la lando de la Grandoreluloj, Kakambo diris al Kandid:

— Vi vidas, ke ĉi tiu mondparto ne estas pli bona ol la alia: kredu al mi, ni reiru en Eŭropon per la plej mallonga vojo.

— Kiel reiri tien, diris Kandid, kaj kien iri? Se mi iras en mian landon, la Bulgaroj kaj Abaroj tie buĉas ĉion; se mi revenos en Portugalion, tie oni bruligos min; se ni restos en ĉi tiu lando, ni riskas je ĉiu momento esti stange trapikataj kaj rostataj. Sed kiel decidi forlasi la parton de l'mondo, kie loĝas F-ino Kunegond?

— Ni direktu nin al Kajeno, diris Kandid: tie ni trovos Francojn, kiuj travojaĝas la mondon; ili povos helpi al ni. Dio eble kompatos nin.

Ne estis facile iri al Kajeno: ili bonè sciis la proksimuman direkton; sed montoj, riveroj, profundejoj, rabistoj, sovaĝuloj, konsistigis terurajn malhelpojn. Iliaj ĉevaloj mortis pro laciĝo; iliaj provizoj estis konsumitaj; dum tuta monato ili sin nutris per sovaĝaj fruktoj, kaj fine troviĝis apud malgranda rivero borde-rita per kokosarboj, kies fruktoj subtenis iliajn vivon kaj esperojn.

Kakambo, kiu ĉiam donis same bonajn konsilojn kiel la maljunulino, diris al Kandid:

<sup>1</sup> Nomo, kiun la Eŭropanoj en la XVI-a jarcento donis al iu fantazia lando, kiun oni lokis ĉe la bordoj de iu supozita lago Parimo, en la nuna Venezuelo. — *Trad.*



— Ni estas elĉerpitaj, ni sufiĉe marŝis; mi ekvidas malplenan boaton ĉe la bordo, ni plenigu ĝin per kokosoj; ni enboatigu, ni konfidu nin al la fluo; rivero ĉiam kondukas al iu loĝigata loko. Se ni ne trovos agrablajn aferojn, ni almenaŭ trovos novajn aferojn.

— Nu, diris Kandid, ni konfidu nin al la Providenco.

Ili alnaĝis kelkajn mejlojn inter bordoj jen florriĉaj, jen senkreskaj, jen ebenaj, jen krutaj. La rivero ĉiam plilarĝiĝis; fine ĝi forfluis sub arkajo el teruraj rokoj, kiuj altiĝis ĝis la ĉielo. La du vojaĝantoj havis la kuraĝon sin fordonadi al la akvoj sub tiun arkaĵon. La riverego, mallarĝa en tiu loko, portis ilin kun terurega rapido kaj bruo. Post dudek kvar horoj ili revidis la lumon; sed ilia boato rompiĝis kontraŭ rifo; ili devis treniĝi de roko al roko dum tuta mejlo; fine ili eltrovis vastegan horizonton, ĉirkaŭitan per nealireblaj montoj. La lando estis kulturita por la plezuro, kiel por la bezono; ĉie la utilo estis agrabla. La vojoj estis kovritaj aŭ pliĝuste ornamitaj per veturiloj el formo kaj materio brilanta, portantaj virojn kaj virinojn de aparta beleco, rapide trenataj de dikaj ruĝaj ŝafoj<sup>2</sup>, kiuj superis je rapideco la plej belajn ĉevalojn el Andaluzio, el Tetuan kaj el Meknes.

»Jen lando, diris Kandid, kiu tamen pli valoras ol Vestfalia.« Li alteriĝis kun Kakambo ĉe la unua vilaĝo, kiun li renkontis. Kelkaj infanoj el la vilaĝo, vestitaj per ore brodteksitaj ŝtofoj tute ŝiritaj, ludis per ŝetdisketoj ĉe la cnirejo de l'vilaĝo; niaj du viroj el la alia mondo amuziĝis, rigardante ilin: iliaj ŝetdisketoj estis rondaj pecoj, flavaj, ruĝaj, verdaj, kiuj havis tute apar-

<sup>2</sup> Sendube Volter aludas al la alpako, al la lamao, kaj aliaj remaĉuloj, kun flavruĝaj haroj, el Sud-Ameriko. — *Trad.*

tan brilon. Kaptis ilin la deziro kolekti kelke da ili; ĝi estis oro, ĝi estis smeraldoj, ĝi estis rubenoj, el kiuj la malplej valora estus la plej granda ornamo de la trono de Mogol. »Sendube, diris Kakambo, ĉi tiuj infanoj estas la filoj de la reĝo de la lando, kiuj ludas per ĵetdisketoj.« La vilaĝa instruisto ĉe tiu momento aperis por revenigi ilin en la lernejon. »Jen estas, diris Kandid, la gubernisto de la reĝa familio.«

La malgrandaj buboj tuj ĉesigis la ludon, lasante surtere siajn disketojn kaj ĉion, kio servis por ilia distro. Kandid prenas la disketojn, kuras al la gubernisto, kaj prezentas ilin humile, komprenigante al li per gestoj, ke iliaj princaj moŝtoj forgesis sian oron kaj siajn gemojn. La vilaĝa instruisto, ridetante, ĵetis ilin teren, dum momento rigardis la vizaĝon de Kandid kun multe da surprizo, kaj daŭrigis sian vojon.

La vojaĝantoj ne preterlasis la okazon preni la oron, la rubenojn kaj la smeraldojn. »Kie mi estas? ekkriis Kandid; certe la infanoj de la reĝoj de ĉi tiu lando estas bone edukataj, ĉar oni instruas al ili malŝati la oron kaj la gemojn.« Kakambo estis same surprizata kiel Kandid. Ili fine proksimiĝas al la unua domo de la vilaĝo; ĝi estis konstruita kiel palaco el Eŭropo. Popolamaso svarmis ekstere, kaj eĉ pli en la interno; aŭdiĝis agrabla muziko, kaj tre bonodoris kuirajoj. Kakambo proksimiĝis al la pordo, kaj aŭdis, ke oni parolas peruve: ĝi estis lia gepatra lingvo: ĉar ĉiu ajn scias, ke Kakambo naskiĝis en Tukuman, en vilaĝo, kie oni konas nur tiun lingvon. »Mi servos al vi kiel interpretisto, li diris al Kandid; ni eniru; ĉi tio estas gastejo.«

Du kelneroj kaj du kelnerinoj, vestitaj per ora drapo, kaj kun haroj ligitaj per rubandoj, tuj invitas ilin sidiĝi ĉe la tablo de la gastiganto. Oni alportis kvar

supojn garnitajn ĉiu per du papagoj, bolitan kondoron, kiu pezis du cent funtojn, du rostitajn simiojn treege bongustajn, tri cent kolibrojn sur unu plado, kaj ses cent similspecajn aliajn birdetojn sur alia; bonegajn saŭcaĵojn, delikategajn kukojn; ĉio kuŝis sur pladoj el ia speco de diafana kvarco. La gekelneroj de la gastejo verŝis plurajn likvorojn el sukerkano.

La kunmanĝantoj plejparte estis komercistoj aŭ veturigistoj, ĉiuj treege ĝentilaj, kiuj faris kelkajn demandojn al Kakambo kun plej singardema diskreto, kaj kiuj respondis liajn laŭ kontentiga maniero.

Kiam la manĝado estis finita, Kakambo, same kiel Kandid, opiniis, ke ili malavare pagas sian parton, ĵetante sur la tablon de la gastiganto du el tiuj larĝaj oraj pecoj, kiujn ili kolektis; la gegastigantoj ekridegis, kaj longe tenis al si la koksojn. Fine ili kvietiĝis: »Sinjoroj, diris la gastiganto, ni bone vidas, ke vi estas fremduloj; da ili ni ne kutimas vidi. Pardonu al ni, se ni ekridis, kiam vi proponis ŝtonojn el niaj vojoj kiel pagilon. Vi sendube ne havas enlandan monon, sed tio ne necesas por tagmanĝi ĉi tie. Ĉiuj gastejoj establitaĵoj por la oportuno de l'komercado estas pagataj de la registaro. Ĉi tie vi malbone manĝis, tial ke ĝi estas malriĉa vilaĝo; sed ĉie alie vi estos gastigataj kiel vi meritas esti.« Kakambo klarigis al Kandid ĉiujn parolojn de la gastiganto, kaj Kandid ilin aŭskultis kun la sama admiro kaj sama konfuzo, laŭ kiu lia amiko Kakambo tradukis ilin. »Kiu do estas tiu lando, ili ambaŭ diris, de neniuj konataj sur la tero, kaj kie la naturo estas el speco, kiu tiom malsimilas la nian? Konjekteble ĝi estas la lando, kie ĉio bonstatas: ĉar nepre necesas, ke ekzistu unu el tia speco. Kaj, malgraŭ tio, kion diris majstro Panglos, mi ofte ekvidis, ke ĉio sufiĉe malbonstatas en Vestfaliao.«

## ĈAPITRO XVIII

## Kion ili vidis en la lando Eldorado

Kakambo konfesis al sia gastiganto sian tutan scivolemon; la gastiganto diris al li: »Mi estas tre nescia, kaj tio al mi ne domaĝas; sed ni havas ĉi tie retiriĝintan el la kortego maljunulon, kiu estas la plej klera el la reĝlando, kaj la plej malkaŝema.« Li tuj kondukas Kakambo ĉe la maljunulon. Kandid ludis la rolon nur de duaranga persono, kaj akompanis sian serviston. Ili eniris tre simplan domon, ĉar la pordo estis nur el arĝento, kaj la paneloj estis nur el oro, sed prilaboritaj kun tiom da bongusto, ke la plej riĉaj paneloj ne superis ilin. La antaŭĉambro, estas vere, estis inkrustita nur el rubenoj kaj smeraldoj, sed la ordo laŭ kiu ĉio estis aranĝita, bone kompensis tiun tre grandan simplecon.

La maljunulo akceptis la du fremdulojn, petante, ke ili sidiĝu sur sofon, remburitan per plumoj de kolibrojoj, kaj antaŭ ilin metis likvorojn en vazoj el diamanto; poste li kontentigis ilian scideziron per jenaj paroloj:

»Mi havas la aĝon de cent sepdek du jaroj, kaj mi eksciis de mia mortinta patro, kiu estis subkavaliro de la reĝo, pri la mirigaj revolucioj okazintaj en Peruvio, kiujn li ĉeestis. La reĝlando ĉi-tiea estis la malnova patrio de la Inkasoj<sup>1</sup>, kiuj eliris el ĝi tre malsingarde por iri milite submeti unu mondparton, kaj kiuj fine estis formortigataj de la Hispanoj.

<sup>1</sup> Nomo de la dinastio, kiu reĝis en Peruvio antaŭ la hispana konkero. La lasta reĝo de la familio de la Inkasoj, Atahualpa, estis mortigata de Pizaro, en 1533.

»La princoj de ilia familio, kiuj restis en sia naskiĝlando, estis pli saĝaj; ili ordonis, laŭ la konsento de la nacio, ke neniu loĝanto eliru el nia malgranda reĝlando; kaj tio konservis al ni nian senpekecon kaj nian feliĉon. La Hispanoj havis malklaran scion pri ĉi tiu lando, ili nomis ĝin Eldorado, kaj iu Anglo, nomita kavaliro Rali<sup>2</sup>, eĉ proksimiĝis al ĝi antaŭ proksimume cent jaroj; sed, tial ke ni estas ĉirkaŭitaj per nealireblaj rokoj kaj profundegoj, ni ĉiam ĝis nun estis ŝirmataj kontraŭ la rabemo de la nacioj el Eŭropo, kiuj havas nekomprenblan pasiegon por la ŝtonoj kaj por la koto de nia tero, kaj kiuj, por ilin akiri, mortigus nin ĉiujn ĝis la lasta.«

Longa estis la interparolo; ĝi temis pri la moroj, pri la virinoj, pri la publikaj spektakloj, pri la artoj. Fine Kandid, kiu ĉiam havis emon por la metafiziko, demandis pere de Kakambo ĉu en la lando ekzistas religio.

La maljunulo iomete ruĝiĝis. »Nu! li diris, kiel vi povas pri tio dubi? Ĉu vi rigardas nin kiel maldankemulojn?« Kakambo humile demandis, kiu religio estas en Eldorado. La maljunulo denove ruĝiĝis. »Ĉu povas ekzisti du religioj? li diris; ni havas, mi kredas, la ĉies religion; ni adoras Dion de la vespero ĝis la mateno.

— Ĉu vi adoras nur unu Dion? diris Kakambo, kiu ĉiam divenis la dubojn de Kandid.

— Memkomprenble, diris la maljunulo, ne ekzistas du, nek tri, nek kvar. Mi konfesas al vi, ke la homoj el via mondo faras tre strangajn demandojn.«

Kandid nelaciĝis demandadi la bonan maljunulon; li volis scii kiel oni preĝis Dion en Eldorado. »Ni ne

<sup>2</sup> Angle: Raleigh.

preĝas al li, diris la bona kaj respektinda saĝulo; ni ne bezonas peti ion de li; li donis al ni ĉion necesan; ni senĉese dankas al li.« Kandid havis la scivolon vidi pastrojn; li demandigis, kie ili troviĝas. La bona maljunulo ridetis. »Miaj amikoj, li diris, ni ĉiuj estas pastroj; la reĝo kaj ĉiuj famiĉestroj ĉiusemajne solene kantas dankajn kantojn; kaj kvin aŭ ses mil muzikistoj akompanas ilin.«

— Nu! ĉu do vi ne havas monaĥojn, kiuj instruas, disputas, regas, intrigas kaj bruligas la homojn, kiuj ne havas saman opinion kiel ili?

— Necesus por tio, ke ni estu frenezaj, diris la maljunulo; ni ĉiuj ĉi tie estas samideanoj kaj ne komprenas, kion vi diras pri viaj monaĥoj.

Ĉe ĉiuj tiuj paroloj Kandid statis kvazaŭ ekstaze kaj diris al si pense: »Ĉi tio tre diferencas je tio, kio ekzistas en Vestfaliao kaj en la kastelo de lia barona moŝto: se nia amiko Panglos estus vidinta Eldoradon, li ne plu dirus, ke la kastelo de Thunder-ten-tronckh estas la afero plej bela sur la tero; estas ja certe, ke oni devas vojaĝi.«

Post tiu longa interparolado, la bona maljunulo pretigis sessafan kaleŝegon, kaj donis dek du el siaj servistoj al la vojaĝantoj por konduki ilin al la kortego. »Senkulpigu min, li diris, ke mia maljuneco senigas min je la honoro akompani vin. La reĝo akceptos vin laŭ maniero, pri kiu vi ne estos malkontentaj, kaj vi sendube indulgos la morojn de la lando, se estas kelkaj, kiuj malplaĉas al vi.«

Kandid kaj Kakambo enkaleŝiĝis; la ses ŝafoj kvazaŭ flugis, kaj en malpli ol kvarhora veturado oni alvenis ĉe la palaco de la reĝo, lokita en iu fino de la ĉefurbo. La portalo estis du cent dudek futojn alta kaj

cent futojn larĝa; estas neeble klarigi, el kia materialo ĝi konsistis. Estas evidente, ke ĝi eksterordinarege superis la ŝtonojn kaj sablon, kiujn ni nomas *oro kaj gemoj*.

Dudek belaj deĵorantinoj akceptis Kandid kaj Kakambo ĉe ilia elkaŝiĝo, kondukis ilin en banĉambrojn, vestis ilin per roboj teksitaj el kolibra lanugo; poste la grandoficiroj kaj grandoficirinoj de la Reĝeco kondukis ilin en la apartamenton de Lia Reĝa Moŝto, meze inter du vicoj, ĉiu el mil muzikistoj, laŭ la kutima maniero. Kiam ili proksimiĝis al la trona salono, Kakambo demandis al iu grandoficiro kiel oni devas fari por saluti Lian Reĝan Moŝton: ĉu oni sin ĵetas genue aŭ ventre surteren; ĉu oni metas la manojn sur la kapon aŭ sur la postajon; ĉu oni lekas la polvon de la planko; unuvorte, kia estas la ceremonio. »La kutimo, diriĝ la grandoficiro, estas ĉirkaŭbraki la reĝon kaj kisi lin sur ambaŭ vangojn.« Kandid kaj Kakambo sin ĵetis sur la kolon de Lia Reĝa Moŝto, kiu akceptis ilin kun la tuta eleganta facileco, kiun oni povas imagi kaj ĝentile invitis ilin por vespermanĝi.

Dume oni travidigis al ili la urbon, la publikajn konstruojn, kies supro atingis la nubojn, la vendejojn milkolone ornamitajn, la fontanojn kun pura akvo, la fontanojn kun roza akvo, tiujn kun likvoroj el sukeroj, kiuj konstante fluis, starante sur grandaj placoj, pavimitaj per ia speco de gemoj, kiuj eligis odoron similan al tiu de la kariofilo kaj de la cinamo. Kandid petis, ke oni montru al li la kortumon, la parlamenton; oni diris, ke da ili ne ekzistas, kaj ke oni neniam pledis. Li demandis, ĉu estas malliberejoj, oni diris al li, ke ne. Kio pli surprizis lin, kaj kio plej plezurigis lin, tio estis la palaco de la sciencoj, en kiu li vidis galerion dumil-

paŝe longan, tute plenan je matematikaj kaj fizikaj instrumentoj.

Trarigardinte, dum la posttagmezo, proksimume la milonan parton de la urbo, ili estis rekondukataj al la reĝo. Kandid altablighis inter Lia Reĝa Moŝto, sia servisto Kakambo kaj pluraj sinjorinoj. Neniam oni tiom bone manĝis, kaj neniam la reĝo estis pli sprita ol dum la vespermanĝo. Kakambo klarigis la spritajn vortojn de la reĝo al Kandid, kaj, malgraŭ la tradukiĝo ili restis spritaj. El ĉio, kio mirigis Kandid, tio ne estis la malplej miriga.

Ili restis monaton en tiu gastejo. Kandid ne ĉesis diri al Kakambo: »Estas vere, mia amiko, mi rediras, ke la kastelo, kie mi naskiĝis, ne indas je la lando, kie ni estas; sed F-ino Kunegond forestas kaj vi sendube havas en Eŭropo iun amatinon. Se ni restas ĉi tie, ni estos nur same bonstataj kiel la aliaj; male, se ni revenos en nian mondon nur kun dek du ŝafoj ŝarĝitaj per ŝtonoj el Eldorado, ni estos pli riĉaj ol ĉiuj reĝoj kune, ni ne plu bezonos timi inkvizitorojn, kaj ni facile povos repreni F-inon Kunegond.«

Tiu parolo plaĉis al Kakambo: oni tiom ŝatas migradi, akiri famon ĉe siaj samgentanoj, fanfaroni pri tio, kion oni vidis dum siaj vojaĝoj, ke la du feliĉuloj decidis ne plu esti feliĉaj kaj peti sian liberiĝon de Lia Reĝa Moŝto.

»Vi faras malsaĝaĵon, diris al ili la reĝo, mi bone scias, ke mia lando estas negrava; sed, kiam mezbone oni estas ie, oni tie devas resti; mi certe ne havas la rajton teni fremdulojn; tio estas tiranio<sup>3</sup>, kiu forestas el niaj moroj, el niaj leĝoj: ĉiuj homoj estas liberaj;

<sup>3</sup> Tiranaĵo.



foriru, kiam al vi plaĉos, sed la eliro estas tre malfacila. Estas neeble iri kontraŭ la fluo de la rapida rivero, per kiu kvazaŭ mirakle vi alvenis, kaj kiu fluas sub rokaj arkaĵoj. La montoj, kiuj ĉirkaŭas mian tutan landon, estas dek mil futojn altaj kaj staras kiel muroj: ĉiu el ili larĝe okupas spacon de pli ol dek mil mejloj; oni povas malsupreniri ilin nur laŭ krutegoj. Tamen, ĉar vi nepre volas foriri, mi ordonos al la intendanto de la maŝinoj, ke li konstruu unu, kiu povos komferte transporti vin. Kiam oni estos forkondukinta vin trans la montojn, neniuj povos akompani vin: miaj regatoj ja ĵuris neniam eliri la ĉirkaŭlimon, kaj ili estas tro saĝaj por rompi sian ĵuron. Ĉetere vi petu de mi ĉion, kio plaĉos al vi.»

— Ni petas de Via Reĝa Moŝto, diris Kakambo, nur kelke da ŝafoj ŝarĝotaj per nutroj, ŝtonoj kaj per la koto el la lando.

La reĝo ridis. »Mi ne komprenas, li diris, kian emon havas la Eŭropanoj por nia flava koto; sed da ĝi kunportu tiom, kiom vi volos, kaj ĝi al vi utilu.«

Tuj li ordonis al siaj inĝenieroj, ke ili pretigu maŝinon por suprenlevi tiujn du eksterordinarajn homojn ekster la reĝlandon. Tri mil bonaj fizikistoj eklaboris; la maŝino estis preta post dekkvin tagoj kaj ne kostis pli ol dudek milionojn da sterlingaj funtoj, en la landa mono. Sur la maŝinon oni metis Kandid kaj Kakambo; aldone estis du grandaj ruĝaj ŝafoj selitaj kaj briditaj por servi al ili kiel rajdobestoj, kiam ili estos transirintaj la montojn, dudek ŝarĝoŝafoj ŝarĝitaj per nutroj, tridek, kiuj portis donacojn el tio, kion la lando havas plej kurioza, kaj kvindek ŝarĝitaj per oro, gemoj kaj diamantoj. La reĝo ameme kisis la du vagulojn.

Estis bela spektaklo ilia foriro kaj la maniero, laŭ kiu ili estis suprenlevataj, ili kaj iliaj ŝafoj, ĝis la supro de l'montoj. La fizikistoj adiaŭis ilin, post kiam ili estis en sendanĝereco, kaj Kandid ne plu havis alian deziron kaj celon ol iri proponi siajn ŝafojn al F-ino Kunegond.

»Ni havas, li diris, sufiĉon por pagi al la guberniestro de Bonaero, se F-ino Kunegond estas vendotaksigota. Ni iru al Kajeno, ni enŝipiĝu, kaj poste ni vidos, kiun reĝlandon ni povos aĉeti.«

## CAPITRO XIX

### Kio okazis al ili en Surinam, kaj kiel Kandid konatiĝis kun Marten

La unua tago de niaj du vojaĝantoj estis sufiĉe agrabla. Ili estis kuraĝigataj per la ideo, ke ili posedas pli da riĉoj ol Azio, Eŭropo kaj Afriko povus enteni. Kandid, ravita, skribis la nomon de Kunegond sur la trunkon de la arboj. Ĉe la dua tago, du el iliaj ŝafoj enmarĉiĝis kaj pereis kun siaj ŝarĝoj; kelkajn tagojn poste du aliaj ŝafoj mortis pro laciĝo; poste sep aŭ ok pereis pro malsato en iu dezerto; aliaj post kelkaj tagoj falis en profundegojn. Fine, post centtaga marŝado, restis al ili nur du ŝafoj. Kandid diris al Kakambo:

— Mia amiko, vi vidas, kiel la riĉoj el ĉi tiu mondo estas pereebblaj; nur solida estas la virto kaj la feliĉo revidi F-inon Kunegond.

— Tion mi konsentas, diris Kakambo; sed restas al ni ankoraŭ du ŝafoj kun pli da trezoroj ol iam havos la reĝo de Hispanio, kaj mi vidas en la malproksimo urbon, kiu laŭ mia konjekto estas Surinam, apartenanta

al la Holandanoj. Ni estas ĉe la fino de niaj penoj kaj ĉe la komenco de nia feliĉo.

Proksimiĝante al la urbo, ili renkontis negron surtere kuŝantan, kiu havis nur la duonon de sia vesto, t. e. kalsono el blua tolo; mankis al tiu kompatindulo la maldekstra kruro kaj la dekstra mano.

— He! Dio mia! diris al li Kandid holande, kion ci faras ĉi tie, mia amiko, en la terurega stato, en kiu oni cin vidas?

— Mi atendas mian mastron, S-ron Vanderdentur, la fama negocisto, respondis la negro.

— Ĉu estas S-ro Vanderdentur, diris Kandid, kiu tiel traktis cin?

— Jes, sinjoro, diris la negro, ĝi estas la kutimo. Dufoje en jaro oni donas al ni kalsonon el tolo kiel nuran veston. Kiam ni laboras en la sukerfabrikoj, kaj kiam la muelŝtono kaptas al ni la fingron, oni tranĉas al ni manon; kiam ni volas forkuri, oni tranĉas al ni kruron: ambaŭ cirkonstancoj okazis al mi: je tia prezo vi manĝas sukeron en Eŭropo. Tamen, kiam mia patrino vendis min por dek patagonaj moneroj ĉe la marbordo de Gvineo, ŝi diris al mi: »Mia kara infano, gloru niajn feliĉojn, ĉiam adoru ilin, al ci ili faros feliĉan vivon; ci havas la honoron esti sklavo de niaj sinjoregoj la blankuloj, kaj per tio ci riĉigas siajn gepatrojn.« Ho ve! mi ne scias, ĉu mi riĉigis ilin, sed ili ne igis min riĉa. La hundoj, la simioj kaj la papagoj estas milfoje malpli malfeliĉaj ol ni: la nederlandaj feliĉoj, kiuj konvertis min, ĉiudimaniĉe diras al mi, ke ni ĉiuj, ĉu blankaj ĉu nigraj, estas infanoj de Adam. Mi ne estas genealogo; sed, se tiuj predikistoj diras la veron, ni ĉiuj estas frataj kuzoj. Nu, vi konsentos kun mi, ke ne povas esti pli terurega maniero konduti kontraŭ siaj parencoj.

— Ho Panglos! ekkriis Kandid, ci ne divenis tian abomenindon; finfine, mi estos devigata rezigni cian optimismon.

— Kio estas optimismo? diris Kakambo.

— Ho ve! diris Kandid, ĝi estas la obstinego asertadi, ke ĉio estas bona, kiam oni malbonstatas; kaj li ploris rigardante la negron; kaj, plorante, li eniris en Surinam.

La unua afero, pri kiu ili informiĝas, estas ĉu oni povas sendi ŝipon al Bonaero. La persono, al kiu ili sin turnis, ĝuste estis hispana ŝipposedanto, kiu sin proponis por fari kun ili honestan kontrakton. Li difinis rendevuon al ili en iun drinkejon. Kandid kaj la fidela Kakambo kun siaj du ŝafoj tien iris por lin atendi.

Kandid, kiu estis konfidema, rakontis al la Hispano ĉiujn siajn aventurojn, kaj konfesis, ke li volas forpreni F-inon Kunegond. »Mi certe ne riskos veturigi vin al Bonaero, diris la maristo; mi estus pendigata kaj vi ankaŭ. La bela Kunegond estas la preferata amatino de la sinjorego.« Tio estis kvazaŭ fulmobato por Kandid; li longe ploradis; fine li apartigis sin kun Kakambo, al kiu li diris: »Mia kara amiko, jen tio, kion ci faru. Ĉiu el ni havas en siaj poŝoj kvar aŭ kvin milionojn da diamantoj: ci estas pli lerta ol mi; ci iru al Bonaero kaj prenu F-inon Kunegond. Se la guberniestro ne tuj konsentas, ci donu al li unu milionon; se tio ne sufiĉas, donu al li du; ci ne mortigis inkvizitoron, oni ne malfidus cin. Mi ekipos alian ŝipon; cin mi iros atendi en Venezion; ĝi estas libera lando, kie oni ne bezonas timi nek Bulgarojn, nek Abarojn, nek judojn, nek inkvizitorojn.«

Kakambo laŭdegis tian saĝan decidon. Li estis tre ĉagrena pro la penso disiĝi for de bona mastro, fariĝinta lia intima amiko; sed la plezuro utili al li, superis la ĉagrenon, kaŭzatan de la disiĝo. Ili ĉirkaŭbrakis unu la alian, larmante. Kandid rekomendis, ke li ne forgesu la bonan maljunulinon. Kakambo foriris tuj la saman tagon: tiu Kakambo estis tre bona homo.

Kandid restis ankoraŭ dum kelka tempo en Surinam, kaj atendis, ke alia ŝipmastro bonvolos veturigi lin en Italion, lin kaj la du ŝafojn, kiujn li ankoraŭ havis. Li dungis servistojn, kaj aĉetis ĉion necesan por longa vojaĝo; fine S-ro Vanderdentur, mastro de granda ŝipo, sin prezentis al li. »Kiom vi deziras, li demandis al tiu homo, por veturigi min rekte al Venetio, min, miajn servistojn, mian pakafaron, kaj la jenajn du ŝafojn?« La mastro konsentis por la prezo de dek mil piastroj; Kandid ne ŝanceliĝis.

»Ho! ho! diris al si aparte la prudenta Vanderdentur, ĉi tiu fremdulo tuj donas dek mil piastrojn! necesas por tio, ke li estu tre riĉa.« Kaj, revenante momenton poste, li deklaris, ke li ne povas foriri por malpli alta prezo ol dudek mil.

— Nu, vi ricevos ilin, diris Kandid.

— Mirige! mallaŭte diris al si la komercisto, ĉi tiu homo donas dudek mil piastrojn same facile kiel dek mil.

Li revenis denove, kaj diris, ke li povos veturigi Kandid ĝis Venetio nur se li ricevos tridek mil piastrojn.

— Mi do pagos al vi tridek mil, respondis Kandid.

— Ho! ho! diris al si la holanda komercisto, tridek mil piastroj estas nenio por ĉi tiu homo; sendube la du

ŝafoj portas grandegajn trezorojn; ni ne plu insistu: li unue pagu la tridek mil piastrojn, poste ni vidos.

Kandid vendis du malgrandajn diamantojn, el kiuj la malpli granda valoris pli ol la tuta sumo, kiun postulis la mastro. Lin li pagis antaŭe. La du ŝafoj estis enŝipigataj. Kandid sekvis en malgranda boato por atingi la ŝipon en la rodo; la mastro ne rapidas, malvolvigas la velojn, ekforiras; la vento lin favoras. Kandid, duonfrenezigite, konsternite, jam ne plu vidis lin. »Ho ve! li kriis, jen faro inda je la malnova mondo.« Li revenas al la bordo, profundiginte en doloron; ĉar fine li estis perdinta tion, kio sufiĉus por riĉigi dudek monarkojn.

Li iras al la holanda juĝisto; kaj, tial ke li estis iom konfuzita, li forte frapas kontraŭ la pordon; li eniras, klarigas pri sia aventuro, kaj krias iom pli laŭte ol decas. La juĝisto unue pagigas al li dek mil piastrojn pro la bruo, kiun li faris; poste li pacience lin aŭskultas, promesas esplori la aferon, tuj kiam revenos la komercisto kaj pagigas al si dek mil aliajn piastrojn por la aŭdiencaj elspezoj.

Tia agmaniero tute malesperigis Kandid; en vero li estis spertinta malfeliĉojn milfoje pli dolorigajn; sed la flegmo de la juĝisto, kaj tiu de la priŝtelinta lin mastro kolerigis kaj ĵetis lin en nigran melankolion. La malbono de la homoj sin prezentis al li en sia tuta malbelo; li cerbumis nur pri malgajigaj ideoj. Fine, franca ŝipo estis forveturonta al Bordo<sup>1</sup>, kaj, ĉar li ne plu havis ŝafojn, ŝarĝitajn per diamantoj por enŝipigi, li luis ĉambron de la ŝipo je ĝusta prezo, kaj sciigis tra la urbo, ke li pagos la vojaĝon, la nutron kaj donacos

<sup>1</sup> France: Bordeaux.

du mil plastrojn al honestulo, kiu konsentos vojaĝi kun li, kondiĉe, ke tiu homo abomenas sian staton kaj estas la plej malfeliĉa el la provinco.

Sin prezentis tioma amaso da kandidatoj, ke tuta ŝiparo ne povus enteni ilin. Volante elekti inter tiuj, kiuj aspektis plej malfeliĉaj, Kandid distingis dudekon da personoj, kiuj ŝajnis sufiĉe societemaj, kaj kiuj ĉiuj pretendis meriti la preferon. Li kolektis ilin en sian gastejon, pagis ilian vespermanĝon, post kiam ĉiu el ili ĵuris, ke li rakontos lojale sian historion; li promesis elekti tiun, kiu ŝajnos al li la plej kompatinda kaj plej malkontenta pri sia stato, kaj kun pli da pravo, kaj li promesis ankaŭ al la aliaj iomete mondonaci.

La kunsido daŭris ĝis la kvara horo post nokto-mezo. Kandid aŭskultante ĉiujn iliajn aventurojn rememoris pri tio, kion diris al li la maljunulino, irante al Bonaero, kaj pri la veto, kiun ŝi faris, ke ne troviĝas sur la ŝipo iu, al kiu ne okazis tre grandaj malfeliĉoj. Li pensis pri Panglos ĉe ĉiu aventuro, kiun oni rakontis al li. »Tiu Panglos estus tre embarasata por pruvi sian sistemon. Mi dezirus, ke li estu, ĉi tie. Certe, se ĉio bonstatas, estas en Eldorado, kaj ne en la cetera parto de l'tero.« Fine li decidis favore al iu kompatinda scienculo, kiu laboris dum dek jaroj por eldonistoj en Amsterdam. Li juĝis, ke ne ekzistas metio en la mondo, pri kiu oni povas havi pli da abomeno.

Tiu scienculo, kiu cetere estis bona homo, estis priŝtelita de sia edzino, batita de sia filo, forlasita de sia filino, kiu aranĝis, ke Portugalulo forprenu ŝin. Li ĵus estis senigita je malgrava ofico, per kiu li ricevis vivrimedojn; kaj la predikantoj el Surinam persekutis

lin, tial ke ili opinias, ke li estas socinano<sup>2</sup>. Oni devas konfesi, ke la aliaj estis same malfeliĉaj kiel li; sed Kandid esperis, ke la scienculo distros lin dum la vojaĝo. Ĉiuj aliaj konkurantoj opiniis, ke Kandid kondukis treege maljuste kontraŭ ilin; sed li kvietigis ilin donacante al ĉiu cent piastrojn.

## ĈAPITRO XX

### Kio okazis surmare al Kandid kaj al Marten

Do la maljuna scienculo, kiu nomiĝis Marten, enŝipiĝis por veturi al Bordo kun Kandid. Ambaŭ estis multon vidintaj kaj suferintaj; kaj eĉ se la ŝipo estus naĝanta de Surinam al Japanio preter la promontoro de Bon-Espero, ili estus havintaj temojn por diskuti pri la morala malbono kaj pri la fizika malbono dum la tuta vojaĝo.

Tamen Kandid havis grandan avantaĝon super Marten: li ĉiam esperis revidi F-inon Kunegond, dum Marten havis nenion por esperi; plie li havis oron kaj diamantojn; kaj, kvankam li estis perdinta cent dikajn ruĝajn ŝafojn, ŝarĝitajn per la plej grandaj trezoroj el la tero, kvankam li ne povis forgesi la friponagon de la holanda mastro, tamen, kiam li pensis pri tio, kion li havis en la poŝoj, kaj kiam li parolis pri Kunegond, ĉefe ĉe la fino de la manĝado, li emis tiam al la sistemo de Panglos.

— Sed vi, sinjoro Marten, li diris al la scienculo, kion vi pensas pri ĉio ĉi? Kia estas via opinio pri la morala malbono kaj la fizika malbono?

<sup>2</sup> Ano de la sistemo de Socin, itala herezulo (1525-1562).  
— Trad.



— Sinjoro, respondis Marten, miaj pastroj kulpigis min, ke mi estas socinano; sed fakte mi estas maniĥeano<sup>1</sup>.

— Vi mokas min, diris Kandid, ne plu ekzistas maniĥeanoj en la mondo.

— Mi estas unu el ili, diris Marten; mi ne scias kial, sed aliel mi ne povas pensi.

— Necesas, ke vi havu la diablon en la korpo, diris Kandid.

— Ĝi tiom aktive enmiksiĝas en la aferoj de ĉi tiu mondo, diris Marten, ke ĝi povas esti en mia korpo, kiel ĉie alie; sed mi konfesas al vi, ke ekrigardante ĉi tiun terglobon, aŭ pli ĝuste ĉi tiun globeton, mi pensas, ke Dio forlasis ĝin al la zorgoj de iu malbonfarulo; mi ĉiam faras escepton pri Eldorado.

Mi malofte vidis urbon, kiu ne deziras la ruiniĝon de la najbara urbo, nek familion, kiu ne volus ekstermi alian familion. Ĉie la malfortuloj malamegas la potenculojn, antaŭ kiuj ili malnoble humiliĝas, kaj la potenculoj traktas ilin kiel gregojn, kies lanon kaj karnon oni vendas. Unu miliono da murdistoj enregimentigitaj, kurantaj de unu fino de Eŭropo ĝis la alia, profesie mortigadas kaj rabadas kun disciplino por gajni sian panon, tial ke ili ne havas pli honestan metion; kaj en la urboj, kiuj ŝajnas ĝui pacon, kaj kie floras la artoj, la homoj estas forkonsumataj de pli da envio, da zorgoj kaj maltrankviligoj ol sieĝata urbo havas da suferiloj. La kaŝitaj ĉagrenoj estas eĉ pli kruelaj ol la publikaj

<sup>1</sup> Maniĥeano estis filozofo, kiu vivis en Persio en la III-a jarcento. La maniĥeanoj instruis la religion kaj filozofian dogmon, laŭ kiu la mondo estas la faro de du kontraŭaj principoj, unu bona, la alia malbona, ambaŭ eternaj, sendependaj kaj egale potencaj. — *Trad.*

mizeroj. Unuvorte, da ili mi tiom vidis, mi tiom spertis, ke mi fariĝis maniĥeano.

— Ekzistas tamen bono, rebatis Kandid.

— Povas esti, diris Marten, sed ĝin mi ne konas.

Meze dum tiu disputo, oni aŭdis kanonbruon. La bruo duobliĝas de momento al momento. Ĉiu prenas sian lornon. Oni ekvidas du ŝipojn, kiuj interbatalas je trimejla distanco proksimume; la vento kondukis ambaŭ tiom proksime de la franca ŝipo, ke oni havis la plezuron vidi laŭplaĉe la batalon. Fine unu el la du ŝipoj pafadis tiom trafe kontraŭ la alian, ke ĉi tiu lasta dronis. Kandid kaj Marten klare ekvidis centon da homoj sur la ferdeko de la ŝipo, kiu subakviĝis; ili ĉiuj levis la brakojn al la ĉielo kaj aŭdigis terurajn kriadojn: dum unu momento ĉio estis enabismigata.

— Nu, diris Marten, jen estas kiel la homoj traktas unuj la aliajn.

— Estas vere, ke en tiu afero estas io diabla.

Tiel parolante, li ekvidis mi ne scias kion kun brilega ruĝa koloro, kio naĝis apud la ŝipo. Oni sendis ŝalupon por esplori la naĝantan objekton: ĝi estis unu el liaj ŝafoj. Kandid havis pli da ĝojo, retrovante tiun ŝafon, ol li havis da aflikto perdante cent da ili, ĉiuj ŝarĝitaj per dikaj diamantoj el Eldorado.

La franca kapitano baldaŭ ekvidis, ke la kapitano de la subakviginta ŝipo estas hispana, kaj ke tiu de la subakvigita estis holanda pirato; ĝi estis tiu sama, kiu priŝtelis Kandid. La grandegaj riĉoj, kiujn tiu krimegulo estis rabinta, dronis kun li en la maro, kaj nur unu ŝafo estis savita.

— Vi vidas, diris Kandid al Marten, ke la krimo iafaje estas punata; tiu fripona holanda mastro havis la sorton, kiun li meritis.

— Jes, diris Marten; sed ĉu do necesis, ke la pasaĝeroj, kiuj estis sur lia ŝipo, ankaŭ pereu? Dio punis la friponon, la diablo dronigis la pasaĝerojn.

Dume la franca kaj la hispana ŝipoj plue iris, kaj Kandid daŭrigis sian interparoladon kun Marten. Dum dekkvin tagoj ili senĉese diskutis, kaj post tiu tempo la solvo estis same netrovebla kiel ĉe la unua tago. Sed almenaŭ ili parolis, ili komunikis ideojn unu al la alia, ili reciproke sin konsolis. Kandid karesis sian ŝafon. »Ĉar mi retrovis cin, li diris, mi povos ankaŭ trovi Kunegond.«

## CAPITRO XXI

### Kandid kaj Marten proksimiĝas al la bordoj de Francio kaj rezonadas

Fine oni ekvidis la bordojn de Francio.

— Ĉu vi jam vizitis Francion? diris Kandid.

— Jes, diris Marten, mi trairis plurajn provincojn. Estas kelkaj, kie la duono el la loĝantoj estas freneza, kelkaj, kie ili estas tro ruzaj, aliaj, kie ili ĝenerale estas sufiĉe trankvilaj kaj sufiĉe malspritaĵaj, aliaj, kie oni afektas spriton; kaj, en ĉiuj, la ĉefa okupado estas la amoro<sup>1</sup>, la dua malice paroli, kaj la tria, diri stultojn.

— Sed, sinjoro Marten, ĉu vi vidis Parizon?

— Jes, mi vidis Parizon; ĝi konsistas el ĉiuj tiuj ecoj; ĝi estas ĥaoso, ĝi estas interpuŝejo, kie ĉiu serĉas plezuron, kaj kie neniu trovas ĝin, almenaŭ laŭ tio, kiel ŝajnis al mi. Mi restis tie dum mallonga tempo; tie, vizitante, ĉe mia alveno, la foiron Sankta Germano,

<sup>1</sup> Seksa amo.

friponoj ŝtelis mian tutan havon; min mem oni rigardis kiel ŝteliston, kaj mi sidis ok tagojn en malliberejo; post tio mi fariĝis korektisto en presejo por akiri rime-dojn por iri piede al Holando. Mi konatigis kun la verkanta kanajlaro, kun la intriganta kanajlaro<sup>2</sup> kaj la konvulsianta kanajlaro<sup>3</sup>. Oni diras, ke en tiu urbo troviĝas personoj tre ĝentilaj; tion mi volas kredi.

— Koncerne min, nenian deziron vidi Francion mi havas, diris Kandid; vi facile komprenas, ke kiam oni pasigis unu monaton en Eldorado, oni nur deziras vidi sur la tero F-inon Kunegond; mi en Venezion iros por ŝin atendi; ni transiros Francion por iri en Italio; ĉu vi akompanos min?

— Tre volonte, diris Marten; oni diras, ke Venecio estas bona nur por la nobelaj Venezianoj, sed ke oni bone akceptas la fremdulojn, kiam ili havas multe da mono; da ĝi mi ne havas, vi havas, ĉie mi akompanos vin.

— Jen, mi pensas, diris Kandid, ĉu vi opinias, ke origine la tero estis iu maro, kiel oni asertas en ĉi tiu dika libro<sup>4</sup>, kiu apartenas al la kapitano de l'ŝipo?

— Mi tute ne kredas tion, diris Marten, nek je la revoj, kiujn oni pribabilas de kelka tempo.

— Sed por kiu celo ĉi tiu mondo estas kreita? diris Kandid.

— Por spiti nin, respondis Marten.

<sup>2</sup> La jezuitoj.

<sup>3</sup> Aludo al mistikaj histeriuloj, kiuj vizitis la tombon de la diakono Pâris kaj tie estis atakataj de konvulsioj. Tiuj fanatikuloj estis ĝenerale jansenistoj, religia sekto malamika kun la jezuitoj. — *Trad.*

<sup>4</sup> La Biblio.

— Ĉu ne mirigas vin, pludiris Kandid, la amo, kiun la junulinoj el la lando de la Grandoreluloj havis por tiuj du simioj, kaj kies aventuron mi rakontis?

— Tute ne, diris Marten; mi ne vidas ion stranga en tia pasio; mi vidis tiom da eksterordinaraj aferoj, ke ne plu ekzistas io eksterordinara.

— Ĉu vi kredas, diris Kandid, ke la homoj ĉiam buĉis sin reciproke kiel ili faras nuntempe? ke ili ĉiam estis mensogemaj, perfidemaj, maldankemaj, rabemaj, malfortanimaj, malkonstantaj, malkuraĝaj, envidemaj, frandemaj, drinkemaj, avaraj, ambiciaj, sangavidaj, kalumniemaj, diboĉemaj, fanatikaj, hipokritaj kaj stultaj?

— Ĉu vi kredas, diris Marten, ke ĉiam la nizoj manĝis kolombojn, kiam da ili troviĝis ĉe ilia renkonto?

— Jes, sendube, diris Kandid.

— Nu bone! diris Marten, se la nizoj ĉiam havis la saman karakteron, kiel povus esti, ke la homoj ŝanĝis la sian?

— Ho! diris Kandid, estas granda diferenco, ĉar la libera volo...

Tiel rezonante, ili alvenis ĉe Bordo.

## ĈAPITRO XXII

### **Kio okazis en Francio al Kandid kaj al Marten**

Kandid haltis en Bordo nur dum la tempo necesa por vendi kelke da ŝtonoj el Eldorado kaj por prizorgi veturilon kun du sidlokoj: tial ke li nepre bezonis sian filozofon Marten; li estis nur tre ĉagrena pro tio, ke li estis devigata disiĝi de sia ŝafo, kiun li fordonis al la

Borda Akademio de la sciencoj, kiu proponis kiel temon por la nunjara premio klarigi, kial la lano de tiu ŝafo estis ruĝa. Kaj la premio estis aljuĝata al scienculo el la Nordo, kiu pruvis per  $A$  plus  $B$ , minus  $C$ , dividita per  $Z$ , ke la ŝafo devis esti ruĝa, kaj morti pro variolo.

Tamen ĉiuj vojaĝantoj, kiujn Kandid renkontis survoje en la drinkejoj, diris al li: »Ni iras al Parizo«. Tia ĝenerala fervoro donis al li fine la deziron vidi tiun ĉefurbon; tio ne postulis grandan fortiriĝon de la vojo al Venecio.

Li eniris laŭ la antaŭurbo Sankta-Marso, kaj kredis esti en la plej malbela vilaĝo el Vestfaliao.

Apenaŭ Kandid estis en sia gastejo, kiam li estis atakata da malgrava malsano, kaŭzita de siaj laciĝoj. Tial ke li havis ĉe la fingro eksterordinare grandan diamanton, kaj ke oni estis ekvidinta en lia pakafaro kesteton mirige pezan, li tuj havis apud si du kuracistojn, kiujn li ne venigis, kelkajn intimajn amikojn, kiuj ne forlasis lin, kaj du bigotinojn, kiuj varmigis liajn tizanojn. Marten diris: »Mi memoras, ke mi ankaŭ estis malsana en Parizo dum mia unua vojaĝo; mi estis tre malriĉa: tial forestis amikoj, bigotinoj, kuracistoj, kaj mi resaniĝis.«

Tamen, dank'al multaj kuraciloj kaj sangelverŝoj, la malsano de Kandid pligraviĝis. Pastro el la kvartalo venis milde por peti sennomman bileton, pagotan en la transmondo; Kandid ne konsentis. La bigotinoj asertis, ke tio estas nova modo<sup>1</sup>. Kandid respondis, ke li ne estas laŭmoda homo. Marten volis ĵeti la pastron trans la fenestrojn; la ekleziulo kolere deklaris, ke oni ne

<sup>1</sup> Aludo al iu skandalo tiutempa pri vendo de konfesbiletoj. — Trad.

entombigos Kandid; Marten same kolere rebatis, ke li entombigos la ekleziulon, se li daŭrigos sin trudi. La disputo akriĝis; Marten kaptis lin ĉe la ŝultroj kaj malmilde lin forpelis; kio kaŭzis grandan skandalon, pri kiu oni protokolis.

Kandid resaniĝis; kaj dum lia resaniĝado li havis aron da tre bone edukitaj homoj por vespermanĝi ĉe li. Oni vetludis grandajn sumojn. Kandid estis tre mirigita, ke neniam la asoj trafis lin, kaj Marten tute ne miris.

Inter tiuj, kiuj honoris lin per sia ĉesto, estis malaltkreska abato el Perigordio,<sup>2</sup> unu el tiuj diligentaj personoj, ĉiam rapidagaj, servemaj, senhontaj, karesemaj, konsentemaj, kiuj ŝtelatendas la fremdulojn ĉe ilia trapaso, rakontas al ili la skandalan aferon de la urbo, kaj proponas al ili ĝuaĵojn por ĉiu prezo. Ĉi tiu kondukis unue Kandid kaj Marten al teatro. Tie oni ludis novan tragedion. Okazis, ke Kandid sidis apud kelkaj sprituloj. Tio ne malhelpis lin plori ĉe kelkaj scenoj perfekte ludataj. Unu el la rezonemuloj, kiu apudsidis, diris al li dum interakto:

— Vi tute malprave ploras: tiu aktorino estas tre maltaŭga; la aktoro, kiu ludas kun ŝi, estas eĉ pli malperta; la teatraĵo estas eĉ pli malbona ol la aktoroj; la aŭtoro ne scias eĉ araban vorton, kaj tamen la sceno okazas en Arabio; kaj, plie, ĝi estas homo, kiu ne kredas je la kunnaskitaj ideoj: mi kunportos al vi morgaŭ dudek broŝurojn, kiuj mallaŭdas lin.

— Sinjoro, kiom da teatraĵoj vi havas en Francio? diris Kandid al la abato, kiu respondis:

— Kvin aŭ ses mil.

---

<sup>2</sup> Franca provinco.

— Estas multe, diris Kandid; kiom da ili estas bonaj?

— Dek kvin aŭ dek ses, respondis la alia.

— Estas multe, diris Marten.

Al Kandid tre plaĉis aktorino, kiu ludis la rolon de la reĝino Elizabeto en iu sufiĉe banala tragedio, kiun oni ludas kelkfoje. »Tiu aktorino, li diris al Marten, tre plaĉas al mi; ŝi havas ian trajtosimilecon kun F-ino Kunegond; mi estus tre kontenta saluti ŝin.« La perigorda abato sin proponis por enkonduki lin en ŝian hejmon. Kandid, edukita en Germanio, demandis, kia estas la etiketo, kaj kiel en Francio oni traktas la reĝinojn de Anglio.

— Oni devas distingi, diris la abato; en provinco, oni kondukas ilin<sup>3</sup> en drinkejon; en Parizo, oni respektas ilin, kiam ili estas belaj, kaj oni ĵetas ilin en rubejon, kiam ili mortis.

— Reĝinojn en rubejon! diris Kandid.

— Jes, certe, diris Marten; sinjoro abato pravas: mi estis en Parizo, kiam F-ino Monim<sup>4</sup> pasis, kiel oni diras, el ĉi tiu vivo en la alian; oni rifuzis al ŝi tion, kion ĉi tiuj homoj nomas la *honorajn de la entombigo*, t. e. putri kun ĉiuj malriĉuloj el la kvartalo en malbela tombejo; ŝi estis entombigata tute sola el sia bando ĉe la angulo de la strato de Burgonj, kio certe tre ĉagrenis ŝin, ĉar ŝi pensis tre noble.

— Tio estas tre malĝentila, diris Kandid.

— Kion vi volas, diris Marten; tiaj naskiĝis ĉi tiuj homoj. Kaj malgraŭ ĉiuj iliaj kontraŭdiroj, ĉiuj eblaj neakordeblecoj, vi tamen vidis ilin en la registaro, en

<sup>3</sup> Temas ĉi tie pri reĝinoj de teatro.

<sup>4</sup> Aludo al fama tiutempa aktorino, Adrienne Lekuvr-eŭr, al kiu la eklezio rifuzis religian enterigon. — Trad.



la tribunaloj, en la preĝejoj, en la teatroj de ĉi tiu stranga nacio.

— Ĉu vere oni ankoraŭ ridas en Parizo? diris Kandid.

— Jes, diris la abato, sed furiozante: ĉar ridegante oni plendas pri ĉio kun eksplodoj de rido; eĉ ridante oni agas plej abomeninde.

— Kiu estas, diris Kandid, tiu porkego<sup>5</sup>, kiu diris al mi tiom da malbono pri la teatraĵo, ĉe kies ludado mi tiom ploris kaj pri la aktoroj, kiuj tiom amuzis min?

— Ĝi estas ia malica mizerulo, respondis la abato, kiu laborakiras vivrimedojn, mallaŭdante ĉiujn teatraĵojn kaj ĉiujn librojn; li malamas iun ajn, kiu sukcesas, kiel la eŭnukoj malamas la ĝuantojn: li estas unu el tiuj serpentoj de la literaturo, kiu sin nutras per koto kaj veneno; li estas iu gazetistaĉo.

— Kion vi nomas gazetistaĉo? diris Kandid.

— Ĝi estas, diris la abato, verkanto de malicaj, senvaloraj artikoloj, iu F...

Tiel rezonadis Kandid, Marten kaj la Perigordano sur la ŝtuparo, vidante preterpasi la homojn ĉe la foriro el la teatro. »Kvankam mi sopiregas revidi F-inon Kunegond, diris Kandid, mi deziras tamen vespermanĝi kun F-ino Kleron, ĉar ŝi ŝajnis al mi admirinda.«

La abato ne estis el la speco de homoj, kiujn akceptus F-ino Kleron, kiu rilatis nur kun ŝatindularo. »Ŝi ne estas libera ĉi tiun vesperon, li diris; sed mi havos la honoron konduki vin al nobelino, ĉe kiu vi konatiĝos kun la pariza bonedukitaro, kiel se vi estus en la urbo jam de kvar jaroj.«

<sup>5</sup> Volter celas al Freron, kritikisto, lia malamiko. — Trad.

Kandid, kiu estis laŭnature scivolema, lasas sin konduki en la domon de la sinjorino, en la fundon de la antaŭurbo Sankta Honorato; tie oni estis okupata per ia kartludo, nomita faraono: ĉiu el la dek du ludantoj tenis en manoj malgrandan kajeron el kartoĵoj, kornhavan registron por siaj malbonŝancoj. Regis profunda silento, palo kuŝis sur la frunto de la ludantoj, maltrankvilo sur tiu de la bankiero, kaj la mastrino, sidante ĉe la flanko de tiu senkompata bankiero, observis kvazaŭ per linkaj okuloj ĉiujn paroliojn<sup>6</sup>, ĉiujn sepojn<sup>6</sup> kaj la vadekampon<sup>6</sup>, pro kiuj ĉiu ludanto angulfaldis siajn kartoĵojn; ŝi zorgis pri la ludado kun severa sed ĝentila atento, kaj ne ekkoleris, pro timo perdi siajn klientojn: la sinjorino nomigis sin markizino de Parolinjak. Ŝia filino, dek-kvinjara, estis unu el la ludantoj kaj avertis per palpebrumo pri la friponaĵoj de tiuj kompatinduloj, kiuj provis artifice kompensi la malbonŝancon<sup>7</sup>. La perigorda abato, Kandid kaj Marten eniris; neniu ekstaris, nek salutis, nek atentis ilin; ĉiuj estis profunde okupataj per siaj kartoĵoj. »Ŝia baronina moŝto Thunder-ten-tronckh estis pli ĝentila«, diris Kandid.

Tamen la abato proksimiĝis al la orelo de la markizino, kiu duone ekstaris, honoris Kandid per favora rideto, kaj Marten per tute nobla mieno; ŝi donigis seĝon kaj kartaron al Kandid, kiu perdis kvindek mil frankojn en du ludoj: poste oni tre gaje noktomanĝis,

<sup>6</sup> Terminoj uzataj ĉe faraona ludo.

<sup>7</sup> Tiumtempe estis kutimo friponi ĉe la ludado. Tion pravas la fakto, ke du jarojn antaŭ la apero de *Kandid* jam ekzistis verko titolita: »Histoire des Grecs ou de ceux qui corrigent la fortune au jeu« (Historio pri la Grekoj aŭ pri tiuj, kiuj artifice kompensas la malbonŝancon ĉe ludado), de kavaliro Ange Gudar, 1757. *Noto en la franca eldono.*

kaj ĉiuj miris, ke Kandid ne estas ekscitata pro sia malgajno; la lakeoj diris inter si en sia lakea lingvaĵo: »Sendube estas ia riĉegulo angla«.

La noktomanĝo estis sama kiel plejparte el la noktomanĝoj en Parizo: unue silento, due ia bruo el nedistingeblaj paroloj, poste ŝercoj, kies plejparto estas sen-spritegaj, falsaj novaĵoj kaj multe da malicaj diroj; oni eĉ parolis pri novaj libroj:

— Ĉu vi vidis, diris la perigorda abato, la romanon de sinjoraĉo Goŝa<sup>8</sup>, doktoro pri teologio?

— Jes, respondis unu el la kunmanĝantoj, sed mi ne povis finlegi ĝin. Ni havas amason da impertinentaj verkoj, sed ĉiuj kune ne entenas tiom da impertinento, kiom tiu de Goŝa, doktoro pri teologio; mi estas tiom sata je tiu grandega amaso da malŝatindaj libroj, kiuj superŝutas min, ke mi preferas faraonludi.

— Kaj kion vi opinias pri la *Miksaĵoj* de la ĉefdiakono T...? diris la abato.

— Ha! diris S-ino de Polinjak, kia teda mortemulo! kiel strange li diras ĉion, kion jam ĉiuj scias! kiel peze li diskutas tion, kio eĉ ne indas esti iomete rimarkata! kiel sensprite li proprigas al si la spriton de aliaj! kiel li difektas tion, kion li plagiatas! kiel li naŭzas min! Sed li ne plu naŭzos min; sufiĉas esti leginta kelkajn paĝojn de la ĉefdiakono.

Kunsidis klera kaj bongusta homo, kiu favore subtenis tion, kion diris la markizino. Poste oni parolis pri tragedioj. La sinjorino demandis, kial estas tragedioj, kiujn oni ludas kelkfoje, kaj kiujn oni ne povas legi. La bongustulo tre bone klarigis kiel teatraĵo povas

<sup>8</sup> France: Gauchoat, li estis abato en Sankta Petro de Falez (france: Falaise) kaj prioro de Sankta Andreo; furioza kontraŭulo de la filozofoj, li plurfoje atakis Volter. — Trad.

esti interesa kaj esti senvalora; per malmulte da vortoj li pruvis, ke ne sufiĉas starigi unu aŭ du el tiuj situacioj, kiujn oni trovas en ĉiuj romanoj, kaj kiuj ĉiam logas la rigardantojn, sed necesas esti originala, ne estante stranga, ofte noblega kaj ĉiam malafekta; koni la homan koron kaj ĝin elmontri; esti granda poeto kvankam neniu rolulo el la teatraĵo ŝajnas esti poeto; scipovi perfekte sian lingvon, ĝin pure paroli, kun senĉesa harmonio, kaj tiele, ke la rimo ne difektu la sencon. Iu ajn, li aldonis, kiu ne aplikas ĉiujn tiujn regulojn povas verki unu aŭ du tragediojn, kiuj estos en teatro aplaŭdataj, sed neniam li okupos lokon inter la grandaj verkistoj; estas tre malmulte da bonaj tragedioj: unuj estas dialogaj idilioj bone verkitaĵ kaj rimitaj; la aliaj, politikaj rezonadoj, kiuj dormigas, aŭ vanaj detaligoj, kiuj mallogas; la aliaj, revoj de malmodereguloj, krudstilaj, maldaŭrigataj paroloj, longaj alparoloj al la dioj, tial ke oni ne scias paroli al la homoj, eraraj maksimumoj, emfazegaj banaloj.

Kandid aŭskultis tiun parolon kun atento kaj akiris la konvinkon, ke la parolanto estas granda homo; kaj, ĉar la markizino estis zorginta, ke li havu sidlokon apud ŝi, li proksimiĝis al ŝia orelo, kaj ekkuraĝis demandi, kiu estas la homo tiel bone parolanta.

— Ĝi estas scienculo, diris la sinjorino, kiu ne ludas, kaj kiun la abato kelkfoje kondukas al mi por noktomanĝi: li estas tre sperta rilate tragediojn kaj librojn, li verkis tragedion, kiun oni malaplaŭdis kaj libron, kies sola ekzemplero vidita ekster la butikon de lia eldonisto estas tiu, kiun li dediĉis al mi.

— La granda homo! diris Kandid; ĝi estas alia Panglos.

Tiam, sin turnante al li, Kandid diris:

— Sinjoro, vi sendube pensas, ke ĉio statas kiel eble plej bone en la fizika mondo kaj en la morala, kaj ke nenio povas aliel esti?

— Mi, sinjoro, respondis la scienculo, mi havas tute alian opinion: mi trovas ke ĉio iras tute malbone; ke neniu scias, kiu estas lia rango, nek kiu estas lia ofico, nek kion li faras, nek kion li devas fari, kaj krom la noktomanĝo, kiu estas sufiĉe gaja kaj dum kiu regas sufiĉe da interkonsento, la tuta cetera tempo pasas en impertinentaj disputoj: jansenistoj kontraŭ molinistojn, parlamentanoj kontraŭ eklezianojn, verkistoj kontraŭ verkistojn, korteganoj kontraŭ korteganojn, financistoj kontraŭ la popolon, edzinoj kontraŭ edzojn, parencoj kontraŭ parencojn; ĝi estas ĉiama batalo.

— Mi vidis pli da malbono, rebatis Kandid, sed saĝulo, kiu poste estis pendigata, instruis al mi, ke ĉio tio estas bonega: ĝi estas ombroj ĉe bela pentro.

— Via pendigito mokis la homojn, diris Marten; viaj ombroj estas teruraj makuloj.

— Estas la homoj, kiuj faras la makulojn kaj ili ne povas tion eviti.

— Pro tio ili do ne kulpas, diris Marten.

La plejparto el la ludantoj, kiuj komprenis nenion pri la temo, trinkadis; kaj Marten rezonis kun la scienculo, kaj Kandid rakontis parton el siaj aventuroj al la gastigantino.

Post la noktomanĝo, la markizino kondukis Kandid en sian ĉambreton kaj sidigis lin sur kanapon.

— Nu! ŝi diris, vi do ĉiam fortege amas F-inon Kunegond el Thunder-ten-tronckh?

— Jes, sinjorino, respondis Kandid.

La markizino aldiris kun amema rideto:

— Vi respondas al mi kiel junulo el Vestfalia; Franco dirus al mi: »Estas vere, ke mi amis F-inon Kunegond; sed, vidante vin, sinjorino, mi timas, ke ŝin mi ne plu amas.«

— Ho ve! diris Kandid, mi respondos laŭ via deziro.

— Via pasio por ŝi, diris la markizino, komencis per levo de ŝia poŝtuko; mi volas ke vi levu mian ŝtrump-ligilon.

— Per mia tuta koro, diris Kandid; kaj ĝin li levis.

— Sed mi volas, ke vi remetu ĝin al mi, diris la sinjorino; kaj Kandid ĝin remetis. Vidu, diris la sinjorino, vi estas fremdulo; kelkfoje mi atendigas miajn amantojn el Parizo dum dek-kvin tagoj, sed mi kapitulacas antaŭ vi tuj ĉe la unua punkto, tial ke oni devas, laŭ la kutimoj de sia lando, honori junulon el Vestfalia.

La belulino, vidinte la grandegajn diamantojn sur la manoj de la juna fremdulo, laŭdis ilin kun tiom da sincero, ke el la fingroj de Kandid ili transiris al tiuj de la markizino.

Kandid, revenante kun sia perigorda abato, sentis kelkajn konscienciproĉojn pro tio, ke li faris unu malfidelon al F-ino Kunegond; la sinjoro abato partoprenis lian ĉagrenon; li ja ricevis malmulte el la kvindek mil frankoj, kiujn lude perdis Kandid, kaj el la valoro de la du brilantoj duone donacitaj, duone trudakiritaj. Lia celo estis profiti, kiom eble, el la avantaĝoj, kiujn lia konatiĝo kun Kandid povas havigi al li. Li parolis al li multe pri Kunegond; kaj Kandid diris al li, ke kiam li vidos Kunegond en Venetio, li petos al tiu belulino pardonon pro sia malfidelo.

La Perigordo fariĝis pli kaj pli ĝentila kaj komplezema, kaj partoprenis kun delikata intereso en ĉio,

kion diris Kandid, al ĉio, kion li faris, al ĉio, kion li intencis fari.

— Vi do havas rendezuon ĉe Venetio? li diris.

— Jes, sinjoro abato, diris Kandid; necesas nepre, ke mi iru retrovi F-inon Kunegond.

Tiam, instigite de la plezuro paroli pri tio, kion li amas, li rakontas, laŭ sia kutimo, parton el siaj aventuroj kun tiu fama Vestfalino.

— Mi kredas, diris la abato, ke F-ino Kunegond estas tre sprita, kaj ke ŝi skribas ĉarmajn leterojn.

— Da ili mi neniam ricevis, diris Kandid; ĉar imagu, ke pro amo al ŝi mi estis forpelita el la kastelo kaj ne povis skribi al ŝi; ke baldaŭ poste mi eksciis, ke ŝi mortis, ke poste mi retrovis ŝin, kaj denove perdis, kaj ke mi sendis al ŝi, je du mil kvincent mejloj for de ĉi tie, ekspresulon, kies respondon mi atendas.

La abato aŭskultis atente kaj ŝajnis iom revema. Li baldaŭ adiaŭdis la du fremdulojn, post kiam li ameme ilin ĉirkaŭbrakis. La morgaŭon Kandid ricevis ĉe sia vekiĝo leteron kun jena enhavo:

*Sinjoro tre kara amato mia, jam de ok tagoj mi estas malsana en ĉi tiu urbo; mi ekscias, ke vi tie estas. Mi flugus en viajn brakojn se mi povus moviĝi. Mi eksciis pri via trapaso tra Bordo; tie mi lasis la fidelan Kakambo kaj la maljunulinon, kiuj devas baldaŭ sekvi min. La guberniestro de Bonaero prenis ĉion, sed restas al mi via koro. Venu, via ĉeesto redonos al mi la vivon aŭ mortigos min pro plezuro.*

Tiu ĉarma letero, tiu neesperita letero, treege ĝojigis Kandid; kaj la ekscio pri la malsano de lia kara Kunegond dolore premis lin. Instigite de tiuj du sentoj, li prenas sian oron kaj siajn diamantojn, kaj kondukigas sin kun Marten al la hotelo, kie loĝis F-ino Kunegond.

Li eniras tremante pro emocio, lia koro batadas, lia voĉo plisingultas; li volas ŝovi la kurtenojn de la lito, li volas alportigi lumon.

— Vi nepre ne faru tion, diras al li la servistino, la lumo mortigus ŝin; kaj subite ŝi refermas la kurtenon.

— Mia kara Kunegond, diris Kandid plorante, kiel vi fartas? se vi ne povas vidi min, almenaŭ parolu al mi.

— Ŝi ne povas paroli, diris la servistino.

La sinjorino tiam tiras el la lito grasetan manon, kiun longe Kandid priverŝas per larmoj kaj kiun li poste plenigas per diamantoj, lasante sakon plena de oro sur la brakseĝo.

Dum Kandid estas en emociega stato, alvenas policoficiro, sekvata de la perigorda abato kaj de kvar soldatoj.

— Ĉu do estas tiuj du suspektindaj fremduloj? li diris.

Li tuj ordonas, ke oni kaptu ilin kaj konduku en malliberejon.

— Ne tiel oni traktas la vojaĝantojn en Eldorado, diris Kandid.

— Pli ol iam ajn mi estas maniĥeano, diris Marten.

— Sed kien vi kondukas nin? diris Kandid.

— En iun subteran karceracon, diris la policoficiro.

Marten retrovinte sian flegmon, juĝis, ke la sinjorino, kiu ŝajnis esti Kunegond, estis iu friponino, sinjoro la abato perigorda, iu fripono, kiu plej rapide ekspluatis la naivon de Kandid, kaj la policisto iu alia fripono, kiun oni povas facile subaĉeti.

Prefere ol riski la procedurojn de la juĝistaro, Kandid instruite de lia konsilo, kaj cetere ĉiam senpacience dezirante revidi Kunegond, proponas al la policisto tri



malgrandajn diamantojn je valoro de tri mil ormoneroj po unu.

— Ha! sinjoro, diris la homo kun la ebura bastono<sup>9</sup>, eĉ se vi estus plej granda krimulo, vi tamen fariĝas homo plej honesta el la mondo; tri diamantoj! ĉiu havanta valoron de tri mil moneroj! Sinjoro! mi oferus por vi mian vivon, anstataŭ konduki vin en karceron. Oni arestas ĉiujn fremdulojn, sed lasu min aranĝi la aferon; mi havas fraton en Diep<sup>10</sup> en Normandio, mi kondukos vin al li; kaj se vi havas iun diamanton por doni, li zorgos pri vi, kiel mi mem.

— Kaj kial oni arestas la fremdulojn? diris Kandid.

Tiam la perigorda abato ekparolis kaj diris:

»Tial ke iu sentaŭgulaĉo el Atrebatio<sup>11</sup> aŭdis stultojn: tio instigis lin fari patromortigon<sup>12</sup>, ne tian, kiel estis tiu de 1610 en la monato majo<sup>13</sup>, sed tian, kiel tiu de 1594 en la monato decembro<sup>14</sup>, kaj tian, kiaj estis pluraj aliaj farataj en aliaj jaroj kaj en aliaj monatoj de aliaj sentaŭgulaĉoj, kiuj aŭdis sensencaĵojn.«

<sup>9</sup> Policistoj Parizaj portas tian bastonon.

<sup>10</sup> France: Dieppe.

<sup>11</sup> Ĉe la epoko de la Roma imperio vivis en la norda parto de la nuna Francio popolo, kies anoj nomiĝis Atrebattoj, ilia ĉefurbo kuŝis ĉe la loko, kie nun troviĝas Araso (france: Arras). Volter fantazie uzis tiun nomon de popolo, por diri, ke Damjens (france: Damiens), la reĝatencinto estis el tiu regiono. — Trad.

<sup>12</sup> La reĝo estis konsiderata kiel la patro de la popolo. — Trad.

<sup>13</sup> Henriko la IV estis mortigata la 11-an de majo 1610.

<sup>14</sup> La 27-an de decembro, Johano Ŝatel (france: Jean Châtel) atencis kontraŭ Henrikon la IV per tranĉilbato. — Trad.

La policisto klarigis pri kio temas.

— Ha! la monstroj! ekkriis Kandid; kio! tiaj abomenindoj okazas ĉe popolo, kiu dancas kaj kantas! Ĉu mi ne povos eliri kiel eble plej baldaŭ el tiu lando, kie simioj incitas tigrojn? Mi vidis ursojn en mia lando; mi vidis homojn nur en Eldorado. Je la nomo de Dio, sinjoro policisto, konduku min al Venezio, kie mi devas atendi F-inon Kunegond.

— Mi povas konduki vin nur en Malalt-Normandion, diris la policisto.

Tuj li ordonas, ke oni demetu liajn katenojn, diras, ke li eraris, forsendas siajn subulojn, forkondukas al Diep Kandid kaj Marten kaj lasas ilin en la manoj de sia frato. Estis malgranda holanda ŝipo en la rodo. La Normando, per la helpo de tri aliaj diamantoj fariĝinte la plej servema el la homoj, enŝipigas Kandid kaj siajn servantojn, kaj la ŝipo alnaĝas al Portsmt<sup>15</sup> en Anglio. Ĝi ne estis la vojo al Venezio; sed Kandid kredis esti liberigita el la infero, kaj li nepre esperis ĉe la unua okazo sin denove direkti al Venezio.

## ĈAPITRO XXIII

### **Kandid kaj Marten iras al la bordoj de Anglio; kion ili vidas tie**

— Ha Panglos! Panglos! Ha! Marten! Marten! Ha! mia kara Kunegond! kio do estas ĉi tiu mondo? diris Kandid sur la holanda ŝipo.

— Estas io tre freneza kaj tre abomena, respondis Marten.

<sup>15</sup> Angle: Portsmouth.

— Vi konas Anglion; ĉu oni estas tie same freneza kiel en Francio?

— Estas alia speco de frenezo, diris Marten. Vi scias, ke tiuj du nacioj militas unu kontraŭ la alian pro kelkaj akroj da neĝo ĉirkaŭe de Kanado, kaj ke ili elspezas por tiu bela milito multe pli ol valoras Kanado<sup>1</sup>. Mi ne estas sufiĉe klera por diri al vi, ĉu en iu lando estas pli da frenezuloj ol en alia; mi scias nur, ke ĝenerale la homoj, kiujn ni baldaŭ vidos, estas tre nigrehumoremaj.

Tiel babilante, ili albordigis ĉe Portsmt; amasego da homoj kovris la bordon, kaj atente rigardis dikulon, kiu sur la ferdeko de unu ŝipo el la ŝiparo staris sur la genuoj, kun la okuloj vinditaj; kvar soldatoj, poste-nigitaj vid-al-vide tiu homo, tute trankvile pafis al li po tri kuglojn en la kranion; kaj la tuta kunvenintaro foriris treege kontenta.

— Kio estas ĉiö ĉi? diris Kandid, kaj kiu demono superregas ĉie?

Li demandis, kiu estas tiu dikulo, kiun oni ĵus ceremonie mortigis?

— Ĝi estas admiralo,<sup>2</sup> oni respondis al li.

— Kaj kial mortigi tiun admiralon?

— Tial ke li ne kaŭzis la morton de sufiĉe da homoj; li batalis kontraŭ francan admiralon, kaj oni opiniis, ke li ne estis sufiĉe proksime de sia kontraŭulo.

— Sed, diris Kandid, la franca admiralo estis same malproksime de la angla admiralo, kiel ĉi tiu estis de la alia!

<sup>1</sup> En 1759, la Angloj invadis Kanadon kaj Francio devis ĝin cedi per la Pariza kontrakto en 1763.

<sup>2</sup> Admiralo Bing (angle: Byng) estis ekzekutata la 14-an de marto 1757 pro sia malvenko apud Minorco.

— Tio estas nekontraŭdirebla, oni rebatis al li; sed en ĉi tiu lando estas bone mortigi de tempo al tempo iun admiralon por kuraĝigi la aliajn.

Kandid estis tiom senkonsciigita kaj ofendita de tio, kion li vidis kaj de tio, kion li aŭdis, ke li eĉ ne volis elŝipiĝi, kaj kontraktis kun la holanda ŝipmastro (je la risko, ke li ŝtelos lin, kiel tiu eĉ Surinam) por ke li veturigu lin senprokraste al Venetio.

La mastro estis preta post du tagoj. Oni randiris Francion, oni pasis ĉe vido al Lisbono, kaj Kandid tremis<sup>3</sup>. Oni eniris la markolon kaj la Mediteraneon; fine oni alboridiĝis ĉe Venetio. »Dio estu laŭdata! diris Kandid ĉirkaŭbrakante Marten; estas ĉi tie, kie mi revidos la belan Kunegond. Mi fidas al Kakambo, kiel al mi mem. Ĉio estas bona, ĉio iras bone, ĉio iras kiel eble plej bone.«

## ĈAPITRO XXIV

### Pri Paket kaj frato Levkojo

Tuj kiam li estis en Venetio, li serĉigis Kakambo en ĉiuj kafejoj, ĉe ĉiuj voluptovendistinoj, kaj ne trovis lin. Ĉiutage li sendis iun por eltrovi ĉiujn ŝipojn kaj ĉiujn barkojn: neniuj novaĵoj pri Kakambo.

»Kio! li diris al Marten, mi havis tempon transiri de Surinam al Bordo, iri de Bordo al Parizo, de Parizo al Diepo, de Diepo al Portsmuto, rondiri Portugalion kaj Hispanion, transiri la tutan Mediteraneon, pasigi kelke da monatoj en Venetio; kaj la bela Kunegond ne venis! Anstataŭ ŝin mi renkontis nur senhontulinaĉon kaj perigordan abaton! Kunegond sendube mortis; restas al

<sup>3</sup> Oni memoru pri la ĉapitroj V kaj VI.

mi nur morti. Ha! estus preferinde resti en la paradizo de Eldorado ol reveni en ĉi tiun malbenindan Eŭropon. Kiel vi pravas! mia kara Marten, ĉio estas iluzio kaj malfeliĉego.\*

Li falis en nigran melankolion, kaj ne partoprenis al la opero *alla moda*<sup>1</sup>, nek al la aliaj distroj de la karnavalo; ne eĉ unu virino vekis ĉe li tenton. Marten diris al li: »Vi estas tre naiva, en vero, imagi, ke mestiza servisto, kiu havas en poŝo kvin aŭ ses milionojn, iros serĉi vian amatinon ĝis la fino de l'tero kaj kondukos ŝin al vi en Venezion. Li prenos ŝin por si, se li trovos; se li ne trovos ŝin, li prenos alian: mi konsilas al vi forgesi pri via servisto Kakambo kaj via amatino Kunegond.« Marten ne ĉstis tre konsola. La melankolio de Kandid pligrandiĝis, kaj Marten ne ĉsis prui al li, ke ekzistas malmulte da virto kaj malmulte da feliĉo sur la tero, escepte eble en Eldorado, kien neniu povas iri.

Disputante pri tiu grava demando, kaj atendante Kunegond, Kandid ekvidis junan teatanon<sup>2</sup> sur la placo Sankta Marko, kiu tenis ĉe la brako iun junulinon. La teatano ŝajnis freŝa, graseta, fortika; liaj okuloj brilis, lia aspekto estis memfida, lia irmaniero fiera. La junulino estis beleta kaj kantis; ŝi ameme rigardis sian teatanon, kaj de tempo al tempo pinĉis al li la dikajn vangojn.

<sup>1</sup> Itala esprimo: Laŭmoda.

<sup>2</sup> La teatanoj estis ekleziuloj de la kongregacio de Latrano; ili portis nigran sutanon, nigran mantelon kaj blankajn ŝtrumpojn. Ili predikis, vizitis la malsanulojn kaj malliberulojn, apudestis la ekzekutotojn, ktp. Ili havis nek bienojn, nek rentojn. — *Trad.*

— Vi almenaŭ konsentos, diris Kandid al Marten, ke ĉi tiuj homoj estas feliĉaj. Ĝis nun mi trovis sur la tuta loĝebla tero, escepte en Eldorado, nur malfeliĉulojn; sed, koncerne ĉi tiun junulinon kaj ĉi tiun teatanton, mi vetas, ke ili estas tre feliĉaj kreitoj.

— Mi vetas, ke ne, diris Marten.

— Ni invitu ilin por vespermanĝi, diris Kandid, kaj vi vidos, ĉu mi eraras.

Tuj li proksimiĝas al ili, komplimentas kaj invitas ilin en sian gastejon por manĝi makaroniojn, perdrikojn el Lombardio, kaviaron, kaj trinki vinon el Montepulciano, vinon nomitan larmoj de Kristo<sup>3</sup>, vinon el Kipro kaj el Samos. La fraŭlino ruĝiĝis, la teatano akceptis la inviton, kaj la junulino sekvis Kandid, rigardante lin per okuloj, en kiuj kuŝis surprizo, konfuzo kaj kiuj malheliĝis de kelkaj larmoj. Apenaŭ ŝi estis enirinta la ĉambron de Kandid, ke ŝi diris:

— Nu, Sinjoro Kandid ne rekonas Paket!

Ĉe tiuj vortoj, Kandid, kiu ĝis nun ne tre atente konsideris ŝin, tial ke li pensis nur pri Kunegond, diris al ŝi:

— Ho ve! mia kara infano, ĉu do estas vi, kiu metis doktoron Panglos en la belan staton, en kiu mi vidis lin?

— Ho ve! sinjoro, estas mi mem, diris Paket; mi ja vidas, ke pri ĉio vi estas informita. Mi eksciis pri la teruraj malfeliĉoj, kiuj okazis al ĉiuj domanoj de la baronino kaj al la bela Kunegond. Mi certigas al vi, ke mia sorto ne estis malpli kompatinda. Mi estis tre senpeka, kiam vi vidis min. Iu kordeliero, kiu estis mia

<sup>3</sup> *Lacryma christi*, muskatvino el regiono ĉe la bazo de l'vulkano Vezuvo. — Trad.

konfesprenanto, facile min delogis. La sekvoj estis teruraj; mi estis devigata foriri el la kastelo kelke da tempo post kiam la barono forpelis vin per fortaj piedbatoj sur la postajon. Se fama kuracisto ne kompatus min, mi mortus. Dum kelka tempo mi estis pro dankemo la amajistino de tiu kuracisto. Lia edzino, kiu estis furioze ĵaluza, senkompate batis min ĉiutage; ŝi estis ia furio. Tiu kuracisto estis la plej malbela el ĉiuj viroj, kaj mi la plej malfeliĉa el ĉiuj virinoj, konstante ricevante batojn pro viro, kiun mi ne amas. Vi scias, sinjoro, kiom danĝeras por disputema virino esti la edzino de kuracisto. Ĉi tiu, indignigite de la farmanieroj de sia edzino, iun tagon, kiam ŝi havis malgravan malvarmumon, donis al ŝi kuracilon tiom efikan, ke ŝi mortis en la daŭro de du horoj en teruraj konvulsioj. La parencoj de la sinjorino iniciatis al la sinjoro prokriman proceson; li forkuris, kaj mi estis metata en malliberĉejon. Mia senkulpeco ne savus min, se mi ne estus iom beleta. La juĝisto liberigis min, kondiĉe, ke li anstataŭos la kuraciston. Mi baldaŭ estis trudanstataŭata de konkurantino, forpelata sen rekompenco, kaj devigata daŭrigi ĉi tiun abomenindan metion, kiu ŝajnas plaĉa al vi, viroj, kaj kiu estas por ni nur abismo el malŝatindoj. Mi iris al Venecio por praktiki la profesion. Ha! sinjoro, se vi povus imagi, kiom estas malagrabla esti devigata sendiference karesi maljunan marĉandiŝton, advokaton, monaĥon, gondoliston, abaton; esti en la risko ricevi ĉiajn insultojn, ĉiajn malagrablojn; esti alkondukata al tio, ke mi devas ofte pruntepreni jupon por atingi, ke iu naŭza viro ĝin suprenlevu; esti de iu ŝtelata el tio, kion oni gajnis kun aliu; esti perforte devigata pagi al policoficiroj, kaj havi kiel perspektivon nur teruran maljunecon, hospitalon, sterkon, vi

konkludus, ke mi estas unu el la plej malfeliĉaj kreitoj el la mondo.

Tiel Paket malfermis sian koron al la bona Kandid, en ĉambreto, en la ĉeesto de Marten, kiu diris al Kandid:

— Vi vidas, ke jam mi gajnis la duonon de mia veto.

Frato Levkojo sidis en la manĝo-ĉambro kaj trinkis, atendante la vespermanĝon.

— Sed, diris Kandid al Paket, vi aspektis tiel gaja, tiel kontenta, kiam mi renkontis vin; vi kantis, vi karesis la teatanon kun natura komplezemo; vi ŝajnis al mi tiom feliĉa, kiom vi estas malfeliĉa.

— Ha! sinjoro, respondis Paket, tio estas plia mi-zero en nia profesio. Hieraŭ mi estis ŝtelata kaj batata de oficiro, kaj necesas, ke hodiaŭ mi aspektu gaja por plaĉi al monaĥo.

Sufiĉis al Kandid; li konfesis, ke Marten pravas. Oni altabligis kun Paket kaj la teatano; dum la manĝado estis amuze, kaj ĉe la fino oni konfide interparolis.

— Mia patro, diris Kandid al la monaĥo, mi havas la impreson, ke vi ĝuas sorton, kiu estas por ĉiuj enviinda; via vizaĝo spegulas samon, via fizionomio signas feliĉon; vi havas tre beletan junulinon por via distro, kaj vi ŝajnas tre kontenta pri via metio de teatano.

— Ja vere, sinjoro, diris frato Levkojo, mi deziras, ke ĉiuj teatanoj estu ĉe la fundo de l'maro. Cent fojojn mi havis la tenton ekbruligi la monaĥejon kaj fariĝi mahometano. Miaj gepatroj devigis min, kiam mi estis dek-kvinjara, surmeti tiun ĉi malŝatindan robon, por lasi pli da riĉo al tiu malbeninda unuenaskita frato, kiun Dio malsukcesigu! Jaluzo, malkonsento, furiozo regas en la monaĥejo. Estas vere, ke mi faris kelke da



malbonaj predikoj, kiuj havigis al mi iom da mono, kies duonon ŝtelis de mi la prioro; la resto utilas al mi por aĉeti la karesojn de publikulinoj; sed, kiam mi revenas vespere en la monaĥejon, mi emas rompi al mi la kapon kontraŭ la murojn de l'dormejo; kaj ĉiuj miaj kolegoj havas saman emon.

Marten, sin turnante al Kandid kun sia kutima flegmo, diris al li:

— Nu! ĉu mi ne gajnis la tutan veton?

Kandid donis du mil piastrojn al Paket kaj mil piastrojn al frato Levkojo.

— Mi certigas al vi, li diris, ke per tio ili estos feliĉaj.

— Tion mi tute ne kredas, diris Marten; eble per tiuj piastroj vi atingos, ke ili estos eĉ pli malfeliĉaj.

— Okazos trafe-maltrafe, diris Kandid; sed unu afero konsolas min, mi vidas, ke oni ofte retrovas personojn, kiujn oni opiniis neniam trovi; povos okazi, ke retrovinte mian ruĝan ŝafon kaj Paket, mi renkontos Kunegond.

— Mi deziras, diris Marten, ke iam ŝi feliĉigu vin; sed pri tio mi tre dubas.

— Vi estas tre malmolkora, diris Kandid.

— Tial ke mi havas sperton pri la vivo, diris Marten.

— Sed rigardu ĉi tiujn gondolistojn, diris Kandid; ĉu ili ne senĉese kantas?

— Vi ne vidas ilin en ilia hejmo, kun iliaj edzinoj kaj iliaj buboj, diris Marten. La doĝo havas siajn ĉagrenojn, la gondolisto havas la siajn. Estas vere, ke ĉio konsiderite, la sorto de gondolisto estas preferinda je tiu de doĝo; sed mi opinias, ke la diferenco estas tiom malgranda, ke ne valoras la penon ekzameni la aferon.

— Oni parolas, diris Kandid, pri la senatano Pokokurant, kiu loĝas en tiu bela palaco ĉe la Brenta, kaj kiu akceptas sufiĉe bone la fremdulojn. Oni asertas, ke ĝi estas homo, kiu neniam havis ĉagrenon.

— Mi volus vidi tian maloftaĵon, diris Marten.

Kandid tuj demandigis al sinjorego Pokokurant, pri permeso viziti lin la morgaŭon.

## ĈAPITRO XXV

### Vizito ĉe la sinjorego Pokokurant, nobela Veneziano

Kandid kaj Marten gondole veturis sur la Brenta kaj alvenis ĉe la palaco de la nobela Pokokurant. La ĝardenoj estis aranĝitaj kaj ornamitaj per belaj statuoj el marmoro; la palaco estis bonstila. La mastro, sesdekjara, riĉega, akceptis tre ĝentile la du scivolemulojn, sed kun tre malmulte da fervoro, kio konfuzetis Kandid kaj ne malplaĉis al Marten.

Unue beletaj kaj pure vestitaj junulinoj prezentis ĉokoladon, kium ili tre bone ŝaŭmkirlis. Kandid ne povis sin deteni laŭdi ilian belon, ilian afablan ĉarmon kaj ilian lerton. »Ili estas sufiĉe bonaj kreitoj, diris la senatano Pokokurant; kelkafoje mi kuŝigas ilin en mian liton, ĉar mi estas tre tedita de la sinjorinoj el la urbo, de iliaj koketoj, de iliaj ĵaluzoj, de iliaj disputoj, de iliaj humoroj, de iliaj malnobletaĵoj, de ilia malhumilo, kaj de sonetoj, kiujn oni devas verki aŭ mendi por ili; sed, sume, ĉi tiuj du junulinoj komencas tre tedi min.«

Kandid post la tagmanĝo, promenante en longa galerio, estis surprizata de la belo de la pentroj. Li demandis, kiuj majstroj pentris la du unuajn. »Ili estas de Rafaelo, diris la senatano; mi aĉetis ilin tre kare pro

vanto antaŭ kelke da jaroj; oni diras, ke nenio estas pli bela en Italio, sed ili tute ne plaĉas al mi; ilia koloro estas tre malheliĝinta, la figuroj ne estas sufiĉe rondformaj kaj ne sufiĉe elstaras; la drapiraĵoj tute ne similas ŝtofon: unuvorte malgraŭ ĉia laŭdo, mi ne trovas en ili veran imiton al la naturo. Mi ŝatos pentron, nur kiam mi opinius vidi la naturon mem: da tiaj ne ekzistas. Mi havas multe da pentroj, sed mi ne plu rigardas ilin.«

Pokokurant, atendante la vespermanĝon, ludigis al si koncerton. Kandid trovis la muzikon belega. »Tiu bruo, diris Pokokurant, povas distri dum unu duona horo; sed se ĝi daŭras pli longe ĝi tedas ĉiujn, kvankam neniu kuraĝas tion konfesi. La muziko hodiaŭ estas nur la arto ludi malfacilajn aferojn, kaj tio, kio estas nur malfacila, ne plaĉas post multe da tempo.

»Eble mi pli ŝatus operon, se oni ne estus trovinta la sekreton fari el ĝi monstron, kiu vekas ĉe mi egan indignon. Tiu ĉeestu, kiu deziras, la prezentadon de malbonaj tragedioj kun muziko, en kiuj la scenoj estas verkitaj kun la nura celo okazigi tre malĝustatempe du aŭ tri ridindajn kantojn, kiuj valorigas la gorĝon de iu aktorino; tiu svenu, kiu deziras aŭ povas, vidante kastriton kanteti en la rolo de Cezar kaj de Kato kaj promeni kun ĝene mallerta mieno sur iu scenejo; koncerne min, jam de longe mi fordecidis pri tiuj banaloj, kiuj hodiaŭ konsistigas la gloron de Italio, kaj kiujn suverenoj pagas tiom kare.« Kandid iom diskutis, sed kun moderemo. Marten havis la saman opinion, kiel la senatano.

Oni altabliĝis kaj post tre bona manĝo, oni eniris en la bibliotekon. Kandid vidante lukse binditan libron de Homero, laŭdis la famegan moŝton pri lia bongusto.

— Jen estas, li diris, libro, kiu ĝuigis la grandan Panglos, la plej bonan filozofon el Germanio.

— Ĝi tute ne ĝuigas min, diris flegme Pokokurant; iam oni kredigis al mi, ke legante ĝin, mi ricevas plezuron; sed tiu senĉesa sinsekvo da bataloj, kiuj similas ĉiuj unu al la aliaj, tiuj dioj, kiuj ĉiam agas kaj ne faras ion definitivan, tiu Heleno, kiu estas la kaŭzo de la milito, kaj kiu apenaŭ estas aktorino en la teatraĵo; tiu Iljon, kiun oni sieĝas kaj kiun oni ne ekokupas, ĉio tio kaŭzis al mi mortan tedon. Mi kelkfoje demandis al kleruloj, ĉu ili tiom enuis, kiom mi ĉe tiu legado, ĉiuj sinceruloj konfesis al mi, ke la libro falas el iliaj manoj, sed ke oni devas ĉiam havi ĝin en sia biblioteko, kiel memorajon pri la antikvo, kaj kiel tiujn rustintajn medalojn, per kiuj oni komerci ne povas.

— Via ekscelenca moŝto ne pensas tiel pri Virgilo? diris Kandid.

— Mi konsentas, diris Pokokurant, ke la dua, la kvara kaj la sesa parto de lia Eneido estas bonegaj; sed koncerne lian pian Eneas, kaj la fortikan Kloant, kaj la amikon Akates, kaj la malgrandan Askanius, kaj la stultan reĝon Latinus, kaj la burĝan Amata, kaj la senspritegan Lavinia, mi ne kredas, ke ekzistas io pli serverva kaj malagrabla. Mi pli ŝatas Tason kaj la ridindajn fabelojn de Ariosto.

— Ĉu decas demandi vin, sinjoro, diris Kandid, ĉu vi ne havas grandan plezuron legante Horacon?

— Estas maksimumoj, diris Pokokurant, el kiuj bon-societulo povas profiti, kaj kiuj, dirite en formo de viglaj versoj, gravuriĝas pli facile en la memoron; sed lasas min tute indiferenta lia vojaĝo al Brindisi, kaj lia priskribo de malbona tagmanĝo, kaj de la ŝarĝportista

disputo inter mi ne scias kia Pupilus, kies paroloj, li diras, *estis pusoplenaj*, kaj alia kies paroloj *estis vina-graj*. Nur kun tre forta naŭzo mi legis tiujn maldelikatajn versojn kontraŭ maljunulinojn kaj kontraŭ sorĉistinojn; kaj mi ne vidas, kia merito estas en tio, ke li diras al sia amiko Mecenase, ke se li metas lin en la rangon de la lirikaj poetoj, li frapas la astrojn per sia noblega frunto. La stultuloj admiras ĉion ĉe ŝatata aŭtoro. Mi legas nur por mi; mi ŝatas nur tion, kio indas je mi.

Kandid, kies edukado faris, ke li juĝis nenion per si mem, estis tre mirigata de tio, kion li aŭdis; kaj Marten opiniis, ke la pensmaniero de Pokokurant estis sufiĉe saĝa.

— Ho! jen estas libro de Cicero, diris Kandid; rilate al tiu granda homo, mi pensas, ke vi ne enuas ĉe la legado de liaj verkoj?

— Neniame mi legas ilin, respondis la Veneziano. Ĉu povas interesi min, ke li pledis por Rabirius aŭ por Kluentius? Sufiĉas al mi la procesoj, kiujn mi juĝas; mi prefere estus kontentiĝinta je liaj filozofiaj verkoj; sed kiam mi vidis, ke li dubas pri ĉio, mi konkludis, ke mi estas same klera kiel li kaj ke mi bezonis nenies helpon per esti malklera.

— Ha! jen estas okdek volumoj el verkaĵoj de scienca akademio, ekkriis Marten; povas esti, ke tie troviĝas io valora.

— Ĝi estus, diris Pokokurant, se nur unu el la aŭtoroj de tiu konfuzaĉo estus elpensinta la arton fari pinglojn; sed en ĉiuj tiuj libroj troviĝas nur vanaj sistemoj kaj ne eĉ unu sola utila afero.

— Kiom da teatraĵoj mi vidas tie, diris Kandid, en itala lingvo, en hispana, en franca!

— Jes, diris la senatano, estas tri mil da ili, kaj ne eĉ tri dekduoj da bonaj. Rilate al tiuj kolektoj da predikoj, kiuj ĉiuj kune ne valoras paĝon de Seneko, kaj ĉiuj tiuj dikaj volumoj pri teologio, estu certa, ke neniam mi malfermas ilin, nek mi nek aliu.

Marten ekvidis bretaron ŝarĝitan per anglaj libroj. Li diris:

— Mi kredas, ke plaĉas al respublikano la plejparto da tiuj libroj klare verkitaj.

— Jes, respondis Pokokurant, estas bele skribi kion oni pensas; tio estas privilegio de la homo. En la tuta Italio, oni skribas nur kion oni ne pensas; kiuj loĝas en la patrio de la Cezaroj kaj de la Antonenoj, tiuj ne kuraĝas havi ideon sen la permeso de jakobeno. Mi estus kontenta pri la libero, kiu inspiras la anglajn geniulojn, se la pasio kaj la partio ne difektus ĉion, kio estas ŝatinda en tiu multvalora libero.

Kandid, ekvidante libron de Milt'n<sup>1</sup>, demandis al Pokokurant, ĉu li ne konsideras tiun aŭtoron kiel grandan homon.

— Kiun? li diris, tiun barbaron, kiu faris longan komentadon pri la unua ĉapitro de la Genezo en dek libroj<sup>2</sup> el malbelsonaj versoj? tiun maldelikatan imitanton de la Grekoj, kiu kripligas la kreadon, kaj kiu, dum Moseo reprezentas la Eternulon, produktantan la mondon per la parolo, igas la *Messiah*<sup>3</sup> elpreni cirkelon el iu ŝranko en la ĉielo por desegni sian verkon? Ĉu mi povus ŝati tiun, kiu difektis la inferon de Taso; kiu maskas Lucifer jen bufe, jen pigmee, kiu ripetigas al

<sup>1</sup> Angle: Milton.

<sup>2</sup> La »Perdita Paradizo« enhavas efektive 12 kantojn.

<sup>3</sup> Ĉi tiu angla vorto troviĝas en la franca teksto. Esperante: *Mesio*.

li centfoje la samajn paroladojn; kiu disputigas lin pri teologio; kiu, serioze imitante la komikan inventon pri eksplodpafiloj de Ariosto, igas la diablojn kanonpafadi en la ĉielon? Nek mi, nek aliu en' Italio povis ŝati tiujn bedaŭrindajn ekstravagancojn. La *edziĝo de la Peko kun la Morto* kaj la kolubroj, kiujn naskas la Peko, vomigas ĉiun homon, kiu havas guston iom delikatan, kaj lia longa priskribo de hospitalo konvenas nur por tombisto. Tiu malklara, strangeta kaj naŭza poemo estis malŝatata tuj ĉe ĝia naskiĝo; ĝin mi traktas hodiaŭ kiel en ĝia patrio ĝi estis traktata de la samtempuloj. Cetere, mi diras, kion mi pensas kaj tute ne atentis ĉu la aliaj pensas kiel mi.

Kandid estis tre ĉagrena pro tiuj paroloj; li respektis Homero, iom li ŝatis Milt'n.

— Ho, ve! li diris mallaŭte al Marten, mi tre timas, ke ĉi tiu homo havas nur malŝategon por niaj germanaj poetoj.

— Ne estus en tio granda domaĝo, diris Marten.

— Ho! kia supera homo! diris Kandid al Marten tra la dentoj, kia granda geniulo estas tiu Pokokurant! Nenio povas plaĉi al li.

Tiel revuinte ĉiujn librojn, ili malsupreniris en la ĝardenon. Kandid laŭdis ties ĉiujn belecojn.

— Mi konas nenion pli malbongustan, diris la mastro; ni havas ĉi tie nur bagatelaĵojn; sed tuj morgaŭ mi ordonos, ke oni konstruu alian laŭ pli admirinda desegno.

Kiam la du scivolemuloj estis adiaŭintaj lian ekscelecen moŝton:

— Nu, diris Kandid al Marten, vi konsentos, ke jen estas la plej feliĉa el ĉiuj homoj, ĉar li ne estas sklavo de ĉio, kion li posedas.

— Ĉu do vi ne vidas, diris Marten, ke ĉio, kion li posedas, naŭzas lin? Plato diris, jam de longe, ke la plej bonaj stomakoj ne estas tiuj, kiuj malakceptas ĉiujn nutrojn.

— Sed, diris Kandid, ĉion kritiki, konstati mankojn tie, kie aliaj homoj kredas vidi belecojn, ĉu tio ne donas plezuron?

— Tio signifas, diris Marten, ke ne havi plezuron, tio donas plezuron?

— Nu bone! diris Kandid, nur mi estos feliĉa, kiam mi revidos F-inon Kunegond.

— Estas ĉiam saĝe esperi, diris Marten.

Tamen la tagoj, la semajnoj forpasis; Kakambo ne revenis, kaj Kandid estis tiom profundiginta en sian doloron, ke li ne rimarkis, ke Paket kaj frato Leykojo eĉ ne venis por lin danki.

## ĈAPITRO XXVI

### **Pri vespermanĝo, kiun ĉeestis Kandid kaj Marten kun ses fremduloj, kaj kiaj ili estis**

Iun vesperon, kiam Kandid, akompanate de Marten, estis altablighonta kun la fremduloj, kiuj loĝis en la sama gastejo, homo kun fulgokolora vizaĝo proksimiĝis al li de malantaŭe, kaj kaptinte lin ĉe la brako, diris al li:

— Estu preta por foriri kun ni, vi ne preterlasu la okazon.

Li sin turnas kaj ekvidas Kakambo. Nur la ekvido de Kunegond povus lin pli mirigi. Li estis frenezighonta pro ĝojo. Li ĉirkaŭbrakas sian karan amikon.



— Kunegond estas ĉi tie, sendube? Kie ŝi estas? Konduku min al ŝi, ke mi mortu pro ĝojo kun ŝi.

— Kunegond ne estas ĉi tie, diris Kakambo, ŝi estas en Konstantinopolo.

— Ha, ĉielo! en Konstantinopolo! sed eĉ se ŝi estus en Ĉinio, tien mi flugus, ni foriru.

— Ni forveturos post la vespermanĝo, denove daŭrigis Kakambo; mi ne povas diri plu al vi; mi estas sklavo, mia mastro atendas min; mi devas iri por lin servi ĉetabele: ne diru vorton; vespermanĝu kaj tenu vin preta.

Ŝanceliĝante inter ĝojo kaj doloro, ravite esti revidinta sian fidelan agenton, mirigite vidi lin sklavo, tute okupite de la penso trovi sian amatinon, kun maltrankvila koro, kun konfuzita spirito, Kandid altablĝis kun Marten, kiu malvarmsange vidis ĉiujn tiujn aventurojn, kaj kun ses fremduloj, kiuj estis venintaj en Venezion por pasigi la karnavalon.

Kakambo, kiu donis por trinki al unu el tiuj fremduloj, proksimiĝis al la orelo de sia mastro, ĉe la finiĝo de l'manĝado, kaj diris al li: »Via Reĝa Moŝto foriros kiam al ĝi plaĉos, la ŝipo estas preta.« Eldirinte tiujn vortojn, li foriris. La kunmanĝantoj mirigite rigardis unuj la aliajn, ne dirante eĉ unu solan vorton, kiam alia servisto proksimiĝante al sia mastro, diris al li: »Reĝa Moŝto, la portseĝo de via Majesto estas en Padova kaj la barko estas preta.« La mastro faris signon kaj la servisto foriris. Ĉiuj kunmanĝantoj denove rigardis unuj la aliajn, kaj la komuna surprizo duobligis. Iu tria servisto, proksimiĝante al tria fremdulo, diris al li: »Reĝa Moŝto, kredu min, Via Majesto ne devas resti ĉi tie pli longe: mi ekpreparos ĉion«; kaj li tuj malaperis.

Kandid kaj Marten tiam ne plu dubis, ke tio estis karnavala maskigado. Kvara servisto diris al kvara mastro: »Via Majesto forveturos, kiam al ĝi plaĉos«, kaj li eliris, kiel la aliaj. La kvina servisto diris la samon al la kvina mastro. Sed la sesa servisto malsame parolis al la sesa fremdulo, kiu estis apud Kandid; li diris al li: »Nu, via Reĝa Moŝto, oni ne plu volas krediti al Via Majesto, nek al mi ankaŭ, kaj ni riskas esti enkarcerigataj ĉi tiun nokton, vi kaj mi; mi iras por zorgi pri miaj aferoj: adiaŭ.«

Kiam ĉiuj servistoj estis malaperintaj, la ses fremduloj, Kandid kaj Marten restis profunde silentaj. Fine Kandid ekparolis: »Sinjoroj, li diris, jen estas stranga ŝerco. Kial vi ĉiuj estas reĝoj? Koncerne min, mi konfesas, ke nek mi, nek Marten estas tiaj.«

La mastro de Kakambo seriozmiene ekparolis, kaj diris itallingve: »Mi tute ne ŝercas, mi nomiĝas Aĥmet la III<sup>1</sup>. Dum pluraj jaroj mi estis grandsultano; mi detronigis mian fraton; mia nevo detronigis min; oni fortranĉis la kolon al miaj veziroj; mi finpasigas mian vivon en la malnova palaco; mia nevo, la granda sultano Mahmud, kelkfoje permesas al mi vojaĝi pro mia sano, kaj mi venis al Venezio por pasigi la karnavalon.«

Junulo, kiu estis apud Aĥmet, parolis post li kaj diris: »Mi nomiĝas Ivan<sup>2</sup>; mi estis imperiestro de ĉiuj Rusioj; mi estis detronigata dum mi kuŝis ankoraŭ en

<sup>1</sup> Aĥmet la III, turka imperiestro, fakte reĝis de 1703 ĝis 1730.

<sup>2</sup> Ivan la VI, naskiĝis en 1740, surtroniĝis la saman jaron kaj estis detronigata de Elizabet Petrovna, filino de Petro la Granda, kaj murdata en 1764.

la lulilo; mia patro kaj mia patrino<sup>3</sup> estis malliberigitaj; oni edukis min en malliberejo; mi kelkfoje havas la permeson vojaĝi akompanate de gardantoj, kaj mi venis al Venezio por pasigi la karnavalon.«

La tria diris: »Mi estas Karl-Edvard<sup>4</sup>, reĝo de Anglio; mia patro translasis al mi siajn rajtojn je la reĝlando; mi batalis por defendi ilin; oni elŝiris la koron al ok cent el miaj amikoj kaj per ĝi oni batis iliajn vangojn. Mi estis metata en malliberejon; mi iras al Romo fari viziton al la reĝo mia patro, kiu estas kiel mi kaj mia avo detronigita, kaj mi venis al Venezio por pasigi la karnavalon.«

La kvara tiam ekparolis kaj diris: »Mi estas reĝo de la Polakoj<sup>5</sup>; la sorto de l'milito senigis min je miaj heredaj Ŝtatoj<sup>6</sup>; mia patro spertis la samajn malfeliĉojn; mi rezigne obeas la Providencon kiel la sultano Aĥmet, la imperiestro Ivan kaj la reĝo Karl-Edvard, al kiu Dio donu longan vivon; kaj mi venis al Venezio por pasigi la karnavalon.«

<sup>3</sup> Ivan estis filo de princo Antonio de Braŭnŝvajg (germane: von Braunschweig) — Volfenbütl-Bevern (germane: Wolfenbüttel-Bewern) kaj de Elizabet Katerine-Kristine de Meklenburg-Ŝverin (germane: Elisabeth-Katherine-Christine von Mecklenburg-Schwerin).

<sup>4</sup> Karl-Edvard, nomita la *Pretendanto*, naskiĝis en Romo, dum la jaro 1720, kaj mortis en Firenze dum la jaro 1788. Li estis filo de Jakobo Stjuat (angle: James Stuart) kaj nepo de Jakobo la II, li vane provis rekonkeri sian reĝlandon, kaj forpelite el Francio de Ludoviko la XV, li iris en Italion, kie li vivis sub la nomo *Grafo de Albani*.

<sup>5</sup> Poloj.

<sup>6</sup> Aŭgusto la III, elektraĵtulo de Saksio kaj reĝo de Polio, naskiĝis en 1763. Li estis senigita je Saksio de Frederiko la II, dum la Sepjara milito. — *Trad.*

La kvina diris: »Mi ankaŭ estas reĝo de la Polakoj; dufoje mi perdis mian reĝlandon<sup>7</sup>; sed la Providenco donis al mi alian Ŝtaton, en kiu mi faris pli da bono ol ĉiuj reĝoj de Sermatio kune faris ĉe la bordoj de Vistulo; mi ankaŭ rezigne obeas al la Providenco, kaj mi venis en Venezion por pasigi la karnavalon.«

Restis al la sesa monarko paroli: »Sinjoroj, li diris, mi ne estas tiom granda sinjorego kiel vi, tamen mi ankaŭ estis reĝo. Mi estas Teodor<sup>8</sup>; oni elektis min reĝo de Korsiko; oni nomis min *Via Majesto*, kaj nun oni apenaŭ nomas min *Sinjoro*. Mi fabrikigis mone-rojn, kaj mi ne posedas unu denaron; mi havis du ŝtasekretariojn, kaj mi apenaŭ havas serviston; mi sidis sur trono, kaj dum longa tempo en Londono mi sidis sur pajlo. Mi tre timas, ke ĉi tie oni same traktos min, kvankam mi venis en Venezion por pasigi la karnavalon.«

La kvin aliaj reĝoj aŭskultis tiun paroladon kun nobla kompato. Ĉiu el ili donacis orajn monerojn al la reĝo Teodor, por ke li havigu al si vestojn kaj ĉemizojn; Kandid donacis al li diamanton je valoro de du mil ormoneroj. »Kiu do estas tiu simplulo, diris la kvin reĝoj,

<sup>7</sup> Stanislas Leczinski, bopatro de Ludoviko la XV, naskiĝis en Lemberg dum la jaro 1677 kaj mortis en Lunevil (Francio) dum la jaro 1766. Pro la Viena Kontrakto (1735), farita inter Francio kaj la Imperio, li rezignis je Polio, gardante tamen la titolon de reĝo, kaj ricevis de la Aŭstria dinastio dumvivan suverenecon super la dukejoj de Bar kaj de Lotaringio, kiuj, post lia morto, devis transiri al Francio.

<sup>8</sup> Teodor, barono de Neŭhof, naskiĝis en Mes (france: Metz) ĉirkaŭ la jaro 1690; li sin proklamigis reĝo de Korsiko en 1736 kun la nomo Teodor la I. Li mortis en Londono, en granda mizero, ĉe la fino de 1756. — *Trad.*

kiu estas en stato donaci centfoje pli ol ĉiu el ni, kaj kiu ĝin donacas?»

Ĉe la momento kiam oni detabliĝis, venis en la saman gastejon kvar princaj Moŝtoj, kiuj ankaŭ estis perdintaj siajn Ŝtatojn sekve de milito, kaj kiuj venis en Venezion por pasigi la reston de l'karnavalo; sed Kandid tute ne atentis la nove venintajn. Okupis lin nur la penso iri al Konstantinopolo por trovi sian karan Kunegond.

## CAPITRO XXVII

### Vojaĝo de Kandid al Konstantinopolo

La fidela Kakambo estis jam sukcesinta atingi, ke la turka mastro, kiu estis rekondukonta la sultanon Aĥmet al Konstantinopolo, akceptos Kandid kaj Marten en sian ŝipon. Ambaŭ iris tien, respektige genufleksinte antaŭ Lia kompatinda sultana Moŝto. Irante, Kandid diris al Marten:

— Jen estas tamen ses detronigitaj reĝoj, kun kiuj ni vespermanĝis! kaj eĉ inter tiuj ses reĝoj estas unu, al kiu mi almozis. Eble estas multaj aliaj princoj pli malfeliĉaj. Koncerne min, mi perdis nur cent ŝafojn, kaj mi flugas en la brakojn de Kunegond. Mia kara Marten, unu fojon pli, Panglos estis prava, ĉio statas bone.

— Tion mi deziras, diris Marten.

— Sed, diris Kandid, jen estas tre nekredebla aventuro, kiun ni havis en Venetio. Neniam oni vidis nek aŭdis, ke ses detronigitaj reĝoj kune vespermanĝis en gastejo.

— Tio ne estas pli eksterordinara ol la plejparto el la aferoj, kiuj okazis al ni. Estas tre ordinare, ke

reĝoj estas detronigataj; kaj rilate al la honoro, kiun ni havis vespermanĝante kun ili, tio estas bagatelo ne- niel inda je nia atento.

Apenaŭ Kandid estis sur la ŝipo, ke li saltis sur la kolon de sia eks-servisto, de sia amiko Kakambo.

— Nu! li diris, kion faras Kunegond? Ĉu ŝi estas ĉiam eksterordinare bela? Ĉu ŝi min amas ankoraŭ? Kiel ŝi fartas? Ci sendube aĉetis por ŝi palacon en Konstantinopolo?

— Mia kara mastro, respondis Kakambo, Kune- gond purigas pelvetojn ĉe la bordoj de la Propontid<sup>1</sup>, ĉe princo, kiu havas tre malmulte da pelvetoj; ŝi estas sklavo en la domo de eksa suvereno, nomita Ragocki<sup>2</sup>, al kiu la Granda Turko donas tri ormonerojn potage en la azilo; sed pli bedaŭrinde estas, ke ŝi perdis sian belon kaj fariĝis terure malbela.

— Ha! ĉu bela, ĉu malbela, diris Kandid, mi estas honesta homo, kaj mia devo estas ŝin ami ĉiam. Sed kiel estas eble, ke ŝi povis fali en tian mizeregan staton malgraŭ la kvin aŭ ses milionoj, kiujn ci kunportis?

— Nu, diris Kakambo, ĉu do mi ne devis doni du milionojn al la sinjoro Fernando d'Ibara, kaj Figuerora, kaj Maskarenes, kaj Lampurdos, kaj Suza, guberniestro de Bonaero, por ricevi la permeson repreni F-inon Kune- gond? Kaj ĉu do pirato brave ne forrabis de ni ĉion ceteran? Ĉu do tiu pirato ne veturigis nin al la promontoro Matapan, al Milo, al Nikario, al Samos, al Petra, al la Dardaneloj, al Marmora, al Skutari? Kune-

<sup>1</sup> Marmara Maro.

<sup>2</sup> Francisko-Leopoldo Ragocki, naskiĝis en 1676, mortis en 1735; li estis proklamata princo de Transilvanio en 1707. Li estis venkata kaj detronigata kaj rifuĝis unue en Polion, el tie li transiris en Francion, poste en Turkion. — *Trad.*

gond kaj la maljunulino servas ĉe tiu princo, pri kiu mi parolis al vi, kaj mi, mi estas sklavo de la detronigita sultano.

— Kiom da malfeliĉoj kunigitaj unu kun la aliaj! diris Kandid. Sed, ĉio konsiderite, mi havas ankoraŭ kelkajn diamantojn; mi facile liberigos Kunegond. Estas tre domaĝe, ke ŝi fariĝis malbela.

Poste, sin turnante al Marten:

— Laŭ via opinio, kiu estas pli kompatinda, ĉu la imperiestro Aĥmet, ĉu la imperiestro Ivan, ĉu la reĝo Karl-Edvard, ĉu mi?

— Mi ne scias, diris Marten; estus necese, ke mi estu en viaj koroj por scii tion.

— Ha! diris Kandid, se Panglos ĉeestus, li sciustion kaj dirus al ni.

— Mi ne scias per kiaj pesiloj via Panglos povus pesi la malfeliĉojn de la homoj kaj taksii iliajn dolorojn. Mi tamen konjektas, ke sur la tero ekzistas milionoj da homoj, kiuj estas centfoje pli kompatindaj ol la reĝo Karl-Edvard, la imperiestro Ivan kaj la sultano Aĥmet.

— Tio povas esti, diris Kandid.

Post malmulte da tagoj oni venis en la kanalon de la Nigra Maro. Kandid unue reaĉetis Kakambo tre kare, kaj ne perdante tempon, li kaj liaj akompanantoj sin ĵetis en galeron por iri al la bordo de Propontid serĉi Kunegond, kia ajn povus esti ŝia malbela.

Inter la punlaborularo troviĝis du punuloj, kiuj tre malbone remadis kaj al kiuj la malgrandaziana mastro donis kelke da batoj per bovtendeno sur la nudajn ŝultrojn: Kandid, laŭ natura movo, pli atente rigardis ilin ol la aliajn punlaborulojn kaj kompateme proksimiĝis al ili. Kelke da kriplaj trajtoj de iliaj vizaĝoj ŝajnis al

li havi ian similon kun Panglos kaj kun tiu malfeliĉa jezuito, tiu barono, tiu frato de Kunegond. »En vero, li diris al Kakambo, se mi ne vidus pendigi majstron Panglos, kaj se mi ne havus la malfeliĉon mortigi la baronon, mi kredus, ke estas ili, kiuj remadas sur ĉi tiu galero.«

Aŭdante la nomojn barono kaj Panglos, la du punlaboruloj ekkriis, haltis sur sia benko kaj lasis fali siajn remilojn. La malgrandaziana mastro alkuris sur ilin, kaj la batoj per bovtendeno duobligis.

— Haltu! haltu! sinjoro, ekkriis Kandid; mi donos al vi tiom da mono, kiom vi postulos.

— Kio! ĝi estas Kandid! diris unu el la punuloj.

— Kio! ĝi estas Kandid! diris la alia.

— Ĉu tio estas sonĝo? diris Kandid; ĉu mi maldormas? Ĉu mi estas en ĉi tiu galero? Ĉu tio estas la barono, kiun mi mortigis? Ĉu tio estas majstro Panglos, kiun mi vidis pendigata?

— Tio estas ni mem, tio estas ni mem, ili respondis.

— Kio! tio estas tiu granda filozofa? diris Marten.

— He! sinjoro malgrandaziana mastro, diris Kandid, kiom da mono vi postulas por reaĉeti sinjoron De Thunder-ten-tronckh, unu el la unuarangaj baronoj de la Imperio, kaj sinjoron Panglos, la plej profundpensas metafizikiston el Germanio?

— Hunda kristano, respondis la malgrandaziana mastro, ĉar ĉi tiuj du hundaj kristanaj punlaboruloj estas baronoj kaj metafizikistoj, kio sendube estas altranga ofico en ilia lando, ci pagos por ili kvindek mil ormonerojn.

— Vi ricevos ilin, sinjoro; veturigu min fulmorapide al Konstantinopolo, kaj vi tuj estos pripagata. Sed, pli trafe: konduku min al F-ino Kunegond.



La malgrandaziana mastro, ĉe la unua propono de Kandid, jam turnis la antaŭkilon al la urbo, kaj li remigis tiel rapide, ke la galero kvazaŭ flugis kiel birdo en aero.

Kandid centfoje ĉirkaŭbrakis la baronon kaj Panglos.

— Kiel povas esti, ke mi ne mortigis vin, mia kara barono? kaj, mia kara Panglos, kiel vi vivas post kiam oni pendigis vin? kaj kial ambaŭ vi estas punlaboruloj sur galero en Turkio?

— Ĉu estas tute vere, ke mia kara fratino estas en ĉi tiu lando? diris la barono.

— Jes, respondis Kakambo.

— Mi do revidas mian karan Kandid! ekkriis Panglos.

Kandid prezentis al ili Marten kaj Kakambo. Ĉiuj ĉirkaŭbrakis unuj la aliajn, ili ĉiuj parolis samtempe. La galero flugis, jam ili estis en la haveno. Oni venigis judon, al kiu Kandid vendis por kvindek mil ormoneroj diamanton, kiu valoris centmil, kaj kiu ĵuris laŭ Abrahamo, ke li ne povis pagi pli kare. Kandid tuj pagis la reaĉeton de la barono kaj de Panglos. Ĉi tiu sin ĵetis al la piedoj de sia liberiganto kaj superverŝis ilin per larmoj; la alia dankis al li per kapsigno kaj promesis redoni ĉi tiun monon al li ĉe la unua okazo.

— Sed ĉu estas eble, ke mia fratino estas en Turkio? li diris.

— Nenio estas pli ebla, rediris Kakambo, ĉar ŝi frotpurigas la teleraron ĉe iu princo de Transilvanio.

Oni tuj venigis du judojn; Kandid vendis ankoraŭ diamantojn; kaj ili denove veturis per alia galero por iri liberigi Kunegond.

## ĈAPITRO XXVIII

**Kio okazis al Kandid, al Panglos, al Marten, ktp**

— Pardonon, mi denove petas, diris Kandid al la barono; pardonon, mia respektinda patro, pro tio, ke mi forte trapikis vian korpon per spado.

— Ni ne plu parolu pri tio, diris la barono; mi parollis iom tro akre, tion mi konfesas; sed, ĉar vi volas scii pro kia hazardo vi vidis min kiel pullaborulon en galero, mi diros al vi, ke post kiam la frato apotekisto de la kolegio estis kuracinta mian vundon, mi estis atakata kaj forrabata de hispana taĉmenteto; oni metis min en malliberejon ĉe Bonaero en la tempo, kiam mia fratino estis ĵus foriranta. Mi petis pri reiro al Romo por resti apud la patro generalo. Mi estis elektata por iri al Konstantinopolo kaj servi kiel kapelpastro al la ambasadoro de Francio. Mi estis enoficiĝinta apenaŭ depost ok tagoj, kiam mi renkontis en la proksimiĝo de l'vespero junan ikoglanon<sup>1</sup> tre belkorpan. Estis tre varme: la junulo volis sin bani; mi profitis la okazon por min bani ankaŭ. Mi ne sciis, ke por kristano estas gravega krimo esti trovata tute nuda en kunesto de juna mahometano. Iu kadio<sup>2</sup> ordonis, ke mi ricevu cent bastonfrapojn sur la plandojn kaj kondamnis min esti punlaborulo sur galero. Mi kredas, ke neniam okazis pli abomeninda maljustaĵo. Sed mi tre deziras ekscii, kial mia fratino estas en la kuirejo de iu suvereno de Transilvanio rifuĝinta ĉe la Turkojn.

— Kaj vi, mia kara Panglos, kiel povas esti, ke mi revidas vin.

<sup>1</sup> Oficiro de la sultano, kiu zorgas pri internaj aferoj de la palaco.

<sup>2</sup> Turka juĝisto rilate al civilaj kaj religiaj aferoj.

— Estas vere, diris Panglos, ke vi vidis min pendigata; normale mi devus esti bruligata; sed vi memoras, ke pluvegis, kiam oni estis min kuironta: la pluvego estis tiom fortega, ke oni devis rezigni, ekbruligi la fajron; mi estis pendigata, tial ke oni ne povis pli bone fari: ĥirurgo aĉetis mian korpon, kunportis min hejmen kaj min sekcis. Li unue faris krucforman entranĉon de la umbiliko ĝis la ŝlosilosto. Ne estis eble sperti pli fuŝan pendigadon ol la mian. La ekzekutisto de la sankta Inkvizicio, kiu estis sub-diakono, treege lerte bruligis la homojn, sed li estis sensperta por ilin pendigi: la ŝnuro estis malseka kaj malbone ŝoviĝis, ĝi estis fuŝe nodita; fakte mi ankoraŭ spiris: la krucforma entranĉo igis min tiom forte ekkrii, ke la ĥirurgo falis renverse, kaj, kredante, ke li sekcis la diablon, li forkuris mortante pro timo, kaj denove falis sur la ŝtuparon, forkurante. Pro la bruo lia edzino alkuris el najbara ĉambreto; ŝi vidis min sternita sur la tablo kun mia krucforma entranĉo: pli ol ŝia edzo ŝi ektimis, forkuris, kaj falis sur lin. Kiam ili iom rekonsciigis, mi aŭdis la ĥirurginon<sup>3</sup>, kiu diris al la ĥirurgo: »Mia bona, kial do vi volas sekci herezulon? Ĉu do vi ne scias, ke la diablo ĉiam estas en la korpo de tiaj homoj? Rapide mi iras serĉi pastron, por lin ekzorcizi.« Ĉe tiu parolo mi timtremegis kaj mi streĉis miajn malmultajn restantajn fortojn por ekkrii: »Kompatu min!« Fine la sekscisto plikuraĝiĝis; li kudris mian haŭton; eĉ lia edzino prizorgis min; post dek-kvin tagoj mi povis ellitiĝi. La sekscisto trovis por mi okupon, kaj mi fariĝis lakeo de Kavaliro de Malto, kiu veturis al Venecio; sed ĉar mia mastro, ne havis monon por min salajri, mi dungigis

<sup>3</sup> Ĥirurgiedzinon.

ĉe venezia komercisto, kaj mi akompanis lin al Konstantinopolo.

»Iun tagon ekkaptis min la kaprico eniri moskeon; tie estis nur maljuna pastro kaj juna tre bela bigotino, kiu preĝadis; ŝia brusto estis tute nekovrita; ŝi havis inter siaj du mamoj belan bukedon el tulipoj, el rozoj, el anemonoj, el ranunkoloj, el hiacintoj kaj el aŭrikuloj; ŝi lasis fali sian bukedon; ĝin mi levprenis kaj remetis kun tre respekta servemo. Mi estis tiom longtempe por ĝin remeti, ke la pastro ekkoleris, kaj vidante, ke mi estas kristano, li vokis por helpo. Oni kondukis min al la kadio, kiu ordonis, ke oni donu al mi cent latobatojn sur la plandojn kaj sendis min kiel punlaborulon sur galeron. Mi ĝuste estis katenita en la sama galero ĉe la sama benko kiel S-ro barono. Estis sur tiu galero kvar junuloj el Marsej<sup>4</sup>, kvin pastroj el Napoli, kaj du monaĥoj el Korfu, kiuj diris al ni, ke similaj aventuroj okazas ĉiutage. S-ro barono preterdis, ke li spertis pli grandan maljustaĵon ol mi; mi pretendis, mi, ke certe estis pli permesate remeti bukedon sur la bruston de virino ol esti tute nuda kun ikoglano. Ni senĉese disputis, kaj ni ricevis dudek batojn per bovteno ĉiutage, kiam la interligo de la okazoj el ĉi tiu universo kondukis vin en nian galeron, kaj kiam vi reĉetis nin.«

— Nu! mia kara Panglos, diris al li Kandid, kiam vi estis pendigata, sekcata, trabategata kaj remadis en galero, ĉu vi pensis, ke ĉio iris plej bone?

— Mi ĉiam restas ĉe mia unua opinio, respondis Panglos, ĉar fine mi estas filozofo: ne konvenas, ke mi malkonfirmu, kion mi diris, ĉar Lajbnic ne povis mal-

<sup>4</sup> France: Marseille.

pravi, kaj la antaŭe starigita harmonio estas cetere la plej bela afero en la mondo, same kiel la pleno kaj la subtila materio<sup>5</sup>.

## CAPITRO XXIX

### Kiel Kandid retrovis Kunegond kaj la maljunulinon

Dum Kandid, la barono, Panglos, Marten kaj Kambo rakontis siajn aventurojn, dum ili rezonadis pri malnecesaj kaj necesaj okazoj de ĉi tiu universo, dum ili disputis pri la efikoj kaj la kaŭzoj, pri la morala malbono kaj la fizika malbono, pri la libero kaj la neceso, pri la konsoloj, kiujn oni povas sperti, kiam oni estas punlaborulo sur galero en Turkio, ili atingis la bordon de la Propontid ĉe la domo de la princo de Transilvanio. La unuaj vidaĵoj estis Kunegond kaj la maljunulino, kiuj etendis sur ŝnurojn viŝtukojn, por ke ili sekigu.

Ĉe tia vido la barono paliĝis. La molkora amanto Kandid, vidante sian belan Kunegond malheliĝinta, kun okuloj ruĝandaj, kun platiĝinta brusto, kun sulketiĝintaj vangoj, kun brakoj ruĝaj kaj skvamaj, tripaŝe malantaŭen iris, kaptite de abomeno, kaj poste antaŭeniris pro bona konduto. Ŝi kisis Kandid kaj sian fraton; oni kisis la maljunulinon: Kandid reaĉetis ambaŭ.

En la najbaraĵo estis malgranda farmbieno; la maljunulino proponis al Kandid, ke li kontentiĝu per ĝi,

<sup>5</sup> La »pleno« (t. e. la neekzisto de la vakuo en la universo) kaj la »subtila materio« (t. e. materio en stato ne perceptebla al niaj sensoj) estas du hipotezoj, per kiuj la filozofo Kartezio (france: Descartes) konstruis sian fizikan sistemon, kaj pri kiuj Voltero mokas, ĉar ili estas tiel malmulte pruvitaj, kiel la Lajbnica »antaŭe starigita harmonio«.

atendante, ke la tuta trupo havu pli bonan sorton. Kunegond ne sciis, ke ŝi malbeliĝis, neniue estis ŝin aver-tinta pri tio: ŝi memorigis al Kandid pri liaj promesoj per tono tiom ordonema, ke la bona Kandid ne kur-aĝis rifuzi. Li do konigis al la barono, ke li edziĝos kun lia fratino.

— Neniue mi toleros tion, diris la barono, tian malnoblon ŝiaflanke kaj tian ofendan malrespekton viaflanke; tian malbonfamegon oni ne povos riproĉi al mi: la infanoj de mia fratino ne povus partopreni la nobelajn kunvenojn en Germanio. Ne, mia fratino nur povas edziniĝi kun barono el la Imperio.

Kunegond sin ĵetis al liaj piedoj kaj superversis ilin per larmoj; li restis malcedema.

— Majstra frenezulo, diris al li Kandid, cin mi liberigis el punlaboro, mi pagis por cia reaĉeto, mi pagis tiun de cia fratino; ŝi purigis tie ĉi pelvetojn, ŝi estas malbela, mi estas sufiĉe bonkora por konsenti, ke ŝi estu mia edzino kaj ci tamen pretendas kontraŭstari al tio! Mi denove cin mortigus, se mi obeus mian koleron.

— Ci povas denove mortigi min, diris la barono, sed dum mi vivos, ci ne edziĝos kun mia fratino.

## ĈAPITRO XXX

### Konkludo

Kandid, en la fundo de sia koro, tute ne deziris edziĝi kun Kunegond. Sed la ekstrema aroganto de la barono instigis lin plenumi la edziĝon, kaj Kunegond tiom forte insistis, ke li ne povis malkonfirmi sian promeson. Li konsultis Panglos, Marten kaj la fidelan Kakambo. Panglos verkis belan disertacion, per kiu li

pruvis, ke la barono havis neniun rajton super sia fratino, kaj ke ŝi povis, laŭ ĉiuj leĝoj de la imperio, edziniĝi kun Kandid — neleĝe. Marten konkludis, ke oni devas ĵeti la baronon en la maron. Kakambo decidis, ke oni devas redoni lin al la malgrandazia mastro, kiu traktos lin denove kiel punlaborulon; poste oni sendos lin al Romo al la patro generalo per la unua ŝipo. La propono estis aprobata; la maljunulino ankaŭ konsentis; pri tio oni diris nenion al lia fratino; la afero estis plenumata por kelka mono, kaj oni ĝuis la plezuron trompi jezuiton kaj puni la malhumilon de germana barono.

Estis tute nature imagi, ke post tiom da malfeliĉoj Kandid, edziĝinte kun sia amantino kaj vivante kun la filozofo Panglos, la filozofo Marten, la prudenta Kakambo kaj la maljunulino, kumportinte tiom da diamantoj el la patrio de la antikvaj Inkasoj<sup>1</sup>, ĝuus plej agrablan vivon; sed la judoj tiom lin friponis, ke restis al li nur lia malgranda farmbieno; lia edzino, ĉiutage pli kaj pli malbeliĝante, fariĝis disputema kaj netolerebla; la maljunulino estis invalida kaj eĉ pli malbonhumora ol Kunegond. Kakambo, kiu laboris en la ĝardeno kaj iris al Konstantinopolo, por vendi legomojn, estis trolacigata de laboro kaj malbenis sian sorton. Panglos tre bedaŭris, ke li ne estas distingiganta en iu germania universitato. Koncerne Marten, li firme estis konvinkita, ke ĉie oni statas malbone; li paciencie rilatis al la aferoj. Kandid, Marten kaj Panglos kelkfoje disputis pri metafiziko kaj moralo. Oni ofte vidis preterpasi antaŭ la fenestroj de la farmdomo ŝipojn,

<sup>1</sup> Peruvianoj.

ŝarĝitajn de efendoj<sup>2</sup>, de paŝahoj<sup>3</sup> de kadioj, kiujn oni sendis ekzile al Lemnos, al Mitilen, al Erzerum. Oni vidis, ke venas aliaj kadioj, aliaj paŝahoj, aliaj efendoj, kiuj anstataŭis la elpelitojn kaj kiuj siavice estis elpelataj. Oni vidis pajle remburitajn kapojn, kiujn oni portis por prezenti al la Noblega Pordo. Tiuj spektakloj plivigligis la diskutojn kaj kiam oni ne diskutis, la enuo estis tiom supermezura, ke la maljunulino iun tagon kuraĝis diri:

— Mi tre dezirus scii, kio estas plej malbona, ĉu esti seksperfortata centfoje de negraj piratoj, havi sidvangan fortranĉita, esti bastonfrapata ĉe la Bulgaroj, esti vipata kaj pendigata ĉe religia bruligado, esti sekcata, remadi en galero, fine sperti ĉiujn malfeliĉojn, kiujn ni ĉiuj travivis, aŭ resti ĉi tie, nenion farante?

— Tio estas grava demando, diris Kandid.

Tiu parolo naskigis novajn pripensojn, kaj precipe Marten konkludis, ke la homo naskiĝis por vivi en konvulsioj de maltrankvilo, aŭ en letargio de enuo. Kandid ne konsentis, sed li certigis nenion. Panglos konfesis, ke li ĉiam terure suferis; sed ke iun fojon estinte defendanta la opinion, ke ĉio stas mirinde bone, li ĉiam defendas tion, sed ne kredas.

Unu afero plifirmigis Marten en siaj malbonegaj principoj, pli ol iam ŝancelis Kandid kaj embarasis Panglos. Tio estis, ke iun tagon ili vidis veni en sian farmbienon Paket kaj fraton Levkojo, kiuj estis en plej ekstrema mizero; ili tre rapide elspezis la tri mil piastrojn, disiĝis, rekuniĝis, malpaciĝis, estis metitaj en malliberejon, forkuris, kaj fine frato Levkojo fariĝis

<sup>2</sup> Turka titolo por ŝtatoficistoj, pastroj kaj kleruloj.

<sup>3</sup> Turka guberniestro.



Turko.<sup>4</sup> Paket daŭrigis ĉie sian metion kaj per ĝi gajnis nenion.

— Mi ĝuste antaŭvidis tion, diris Marten al Kandid, ke viaj donacoj estos baldaŭ disperdataj kaj igos ties ricevintojn nur pli mizeraj. Vi estis superŝutata per milionoj da piastroj, vi kaj Kakambo, kaj vi ne estis pli feliĉaj ol frato Levkojo kaj Paket.

— Ha! ha, diris Panglos al Paket, ĉu do la Ĉielo rekondukas vin inter nin, mia kompatinda infano? Ĉu vi scias, ke vi kostis al mi la finon de mia nazo kaj unu orelon? Kiel vi nun aspektas! He! kia estas ĉi tiu mondo!

Tiu aventuro instigis ilin pli ol iam filozofadi.

En la najbaraĵo estis tre fama derviŝo, kiu havis la reputacion esti la plej bona filozofo el Turkio; ili iris konsulti lin; Panglos parolis kaj diris:

— Majstro, ni venas peti, ke vi diru al ni, kial tiom stranga animalo, kia estas la homo, estis kreata.

— Je kio ci okupiĝas? diris la derviŝo, ĉu tio estas cia afero?

— Sed, mia respektinda patro, diris Kandid, estas multege da terura malbono sur la tero.

— Ĉu gravas, diris la derviŝo, ke estas malbono aŭ bono? Kiam lia sultana moŝto sendas ŝipon en Egiption, ĉu li atentis, ke estu aŭ ne komforte al la musoj, kiuj estas en la ŝipo?

— Kion oni do devas fari? diris Panglos.

— Silenti, diris la derviŝo.

— Mi flatis al mi, diris Panglos, ke ni rezonados iom pri la efikoj kaj la kaŭzoj, pri la plej eble bona

<sup>4</sup> Aliĝis al la mahometana religio. — *Trad.*

mondo, pri la deveno de l'malbono, pri la naturo de la animo kaj pri la antaŭstarigita harmonio.

Ĉe tiuj vortoj la derviŝo fermis la pardonon antaŭ ilian nazon.

Dum tiu interparolado, disfamiĝis la informo, ke oni ĵus strangolis en Konstantinopolo du vezirojn de la benko<sup>5</sup> kaj la mufton,<sup>6</sup> kaj ke oni palisumis<sup>7</sup> plurajn el iliaj amikoj. Tiu revolucio kaŭzis grandan bruon dum pluraj horoj. Panglos, Kandid kaj Marten, revenante al sia farmbieneto, renkontis bonan maljunulon, kiu refreŝigis sin ĉe sia pordo sub laŭbo el orangarboj. Panglos, kiu estis tiom scivolema, kiom rezonema, demandis al li, kiel oni nomis la mufton, kiun oni ĵus strangolis.

— Mi ne scias, respondis la bonulo, neniam mi konis la nomon de iu ajn mufto nek de iu ajn veziro. Mi scias nenion pri la aventuro, kiun vi rakontas al mi; mi supozas, ke ĝenerale kiu enmiksiĝas en la publikaj aferoj, tiuj iafoje pereas mizere kaj ke tion ili meritas; sed neniam mi informiĝas pri tio, kio okazas en Konstantinopolo; mi kontentiĝas, ke oni iru tien por vendi fruktojn el la ĝardeno, kiun mi kulturas.

Dirinte tiujn vortojn, li enirigis la fremdulojn en sia hejmo: liaj du filinoj kaj liaj du filoj prezentis al ili plurajn specojn da ŝorbetoj, kiujn ili mem faris, kaimakojn<sup>8</sup>, punktitaĵojn per ŝeloj de konfita cedrato,

<sup>5</sup> Tiel oni nomis vezirojn, kies ofico estis juĝi pri diversaj ŝtataferoj.

<sup>6</sup> Mahometana ekleziulo, kiu estas komisiita zorgi pri la observado al la religia leĝo.

<sup>7</sup> *Palisumi*. Trapike mortigi, sidigante iun sur akran foston.

<sup>8</sup> Speco de ŝorbeto.

orangojn, citronojn, limonojn<sup>9</sup>, ananasojn, pistakojn, kafon el Moka, kiu ne estis miksitaj kun la malbona kafeo el Batavio kaj el la insuloj<sup>10</sup>. Poste la du filinoj de tiu bona mahometano parfumis la barbojn de Kandid, de Panglos kaj de Marten.

— Vi sendube havas, diris Kandid al la Turko, vastan kaj bonegan bienon?

— Mi havas nur dudek akrojn, respondis la Turko; mi kulturas ilin kun miaj infanoj; la laboro forigas de ni tri grandajn malbonojn: la enuon, la malvirton kaj la mizeron.

Kandid, revenante al sia farmobieno, profunde pripensis la paroladon de la Turko. Li diris al Panglos:

— Ŝajnas al mi, ke tiu bona maljunulo aranĝis al si situacion pli preferindan ol tiun de la ses reĝoj, kun kiuj ni havis la honoron vespermanĝi.

— La altrangoj, diris Panglos, estas tre danĝeraj, laŭ la raporto de ĉiuj filozofoj: ĉar fine Eglon, reĝo de la Moabitoj, estis murdita de Aod; Absalon estis pendigita je la haroj kaj trapikita per tri dardoj<sup>11</sup>; la reĝo Nadab, filo de Jeroboam, estis mortigita de Baasa; la reĝo Ela, de Zambri; Oĥosias, de Jehu; Atalia, de Joiada; la reĝoj Joaĥim, Jeĥonias, Sedecias estis sklavoj. Vi scias, kiel pereis Krezus, Astiagos, Darius, Dionizio el Sirakuze, Pirhos, Perseis, Hanibalo, Jugurta, Ariovistus, Cezaro, Pompejo, Nerono, Oton, Viteljo, Domitius, Riĉardo la II de Anglio, Mario Stjuat, Karlo la I, la tri Henrikoj de Francio, la imperiestro Henriko la IV? Vi scias...

<sup>9</sup> Frukto de limonarbo (*citrus limonium*).

<sup>10</sup> Kredeble el la Antilioj.

<sup>11</sup> Speco de pikilo.

— Mi ankaŭ scias, diris Kandid, ke ni devas kulturi nian ĝardenon.

— Vi pravas, diris Panglos: ĉar, kiam la homo estis metata en la ĝardenon de Edeno, li estis metata tien *ut operaretur eum*,<sup>12</sup> por ke li laboru; kio pruvas, ke la homo ne naskiĝis por ripozi.


— Ni laboru, ne rezonante, diris Marten, ĝi estas la sola rimedo por igi la vivon tolerebla.


La tuta malgranda societo tion alcelis; ĉiu ekaplikis siajn talentojn. La malgranda bieno multe produktis. Verdire Kunegond estis tre malbela, sed ŝi fariĝis tre bona kukistino; Paket brodis; la maljunulino prizorgis la tolaĵon. Eĉ frato Levkojo utilis; li estis tre bona liganajisto, kaj eĉ fariĝis honestulo; kaj Panglos kelkfoje diris al Kandid:

— Ĉiuj okazoj estas interligitaj en la plej eble bona el la mondoj: ĉar fine, se vi ne estus forpelita el bela kastelo per fortaj piedbatoj sur la postajon pro amo al F-ino Kunegond, se vi ne spertus la Inkvizion, se vi ne trakurus piede Amerikon, se vi ne donus fortan spadobaton al la barono, se vi ne perdus ĉiujn viajn ŝafojn el la bona lando Eldorado, vi ne mangus ĉi tie konfititajn cedratojn kaj pistakojn.

— Tio estas bele dirita, respondis Kandid, sed ni devas kulturi nian ĝardenon.

<sup>12</sup> »Por ke li prilaboradu ĝin« (*Biblio, Genezo, 2, 15*).





# ZADIG aŭ LA DESTINO

Orienta Historio

1747

*APROBO*<sup>1</sup>. — Mi, subskribinto, kiu igis sin konsideri kiel scienculo, kaj eĉ kiel saĝulo, legis tiun ĉi manuskripton, kiun mi trovis, kontraŭvole, kurioza, amuza, morala, filozofa, inda plaĉi ĝuste al tiuj, kiuj malŝatas la romanojn. Tial mi kopiis ĝin, kaj mi certigis al S-ro la Justic-ministro, ke ĝi estas verko abomeninda.

Dediĉa epistolo de Zadig  
al la Sultanino Šeraa<sup>2</sup> de Sadi  
La 18-an de l'monato de »ŝeval«  
en la jaro 837 de la Heĝiro.

---

<sup>1</sup> Tiu ĉi aprobo estas parodio je la aproboj postultitaj en tiu epoko por la publikigo de libroj.

<sup>2</sup> Temas pri Sinjorino de Pompadur, favoritino de Ludoviko XV<sup>a</sup>.

Tiu ĉi historio orienta, romano publikigita en 1748, okazas en Babilono. Zadig, virta kaj instruita homo, vera saĝulo, trapasas sennombrajn sorto-ŝanĝojn. Ĉar li defendis la amatan virinon, riske de sia vivo, li estas forlasita. Ĉar li estis tro klarvida observanto, kaj ĉar li povis diri, kiel aspektas la hundo de l'reĝo, ne vidinte ĝin, li estas kondamnita je monpuno de 900 oraj uncoj. Ĉar li faris mez-bonajn versojn, li estas palisumota, poste li ricevas la komision regi la ŝtaton kaj prononci juĝojn. Ĉar li portis pantoflojn samkolorajn kiel tiuj de l'reĝino, li devas forkuri. Ĉar li defendis Egiptinon, kiun batis ŝia amanto, li estas vendita kiel sklavo. Post multaj aventuroj Zadig fariĝas reĝo kaj regigas la justecon kaj la amon. Lia historio provas, ke homo kun spirito kaj koro povas koni en la vivo ĉiujn malfeliĉojn kaj ĉiujn feliĉojn, kaj ke, male, homo sen spirito kaj sen koro povas atendi preskaŭ la samajn aferojn; ke la hazardo regas sola la absurdan socion, kiun la homoj faris; ke cetere ĉiuj frenezaj kaj homaj mizeroj devas kontribui al ĝenerala harmonio.



## ZADIG

### aŭ la Destino

Ravo por la okuloj, turmento por la koroj, lumo por la spirito, mi ne kisas la polvon de viaj piedoj, tial ke vi marŝas malmulte, aŭ pro tio, ke vi paŝas sur tapiŝoj el Iranio, aŭ sur rozoj. Mi prezentas al vi la tradukon el libro de antikva saĝulo, kiu ĝuante la feliĉon havi nenion por fari, amuziĝis, verkante historion pri Zadig, verko, kiu diras pli ol ĝi ŝajnas diri. Mi petas, ke vi legu ĝin kaj juĝu pri tio; tial ke, kvankam vi estas en la printempo de via vivo, kvankam ĉiuj plezuroj ĉirkaŭas vin, kvankam vi estas bela kaj viaj talentoj<sup>3</sup> aldonas al via belo, kvankam oni laŭdas vin de la mateno ĝis la vespero, pro kio vi rajtas esti tute malsaĝa, tamen vi havas tre saĝan spiriton kaj tre delikatan guston, kaj mi aŭdis vin rezonanta pli bone ol tiuj maljunaj derviŝoj longbarbaj kun pinta ĉapo. Vi estas diskreta, kaj vi ne estas malfidema; vi estas milda kaj ne senvola; vi estas bonfarema kun saĝaco; vi estimas viajn amikojn kaj vi ne havigas al vi mal-amikojn. Via spirito neniam uzas la saĝojn de l'kalumnio; vi diras kaj faras nenion malbonan, malgraŭ la eksterordinara kapablo, kiun vi havus por tio. Fine, via

---

<sup>3</sup> Sinjorino de Pompadur sciis kanti kaj eĉ gravuri laŭ plaĉa maniero.

animo ĉiam ŝajnis al mi esti pura kiel via belo. Vi eĉ havas fundon de filozofio, kiu kredigis al mi, ke vi pli ŝatus ol alia persono tiun verkon de saĝulo.

Ĝi unue estis skribata en antikva ĥaldeaj lingvo, kiun nek vi nek mi komprenas. Oni tradukis ĝin arabe, por amuzi la faman sultanon Ulug-beb. Tio okazis en la tempo, kiam Araboj kaj Persoj komencis verki iajn *Mil kaj unu noktoj*, iajn *Mil kaj unu tagoj*, kpt. Ulug preferis la legadon super *Zadig*; sed la sultaninoj preferis la *Mil kaj unu*.

— Kiel vi povas preferi, diris al ili la saĝa Ulug, malsaĝajn fabelojn, kiuj havas nenian signifon?

Estas ĝuste pro tio, ke ni ŝatas ilin, respondis la sultaninoj.

Mi flatas min, ke vi ne similas ilin, kaj ke vi estos ia vera Ulug. Mi eĉ esperas, ke, kiam vi estos tedita per la ĝeneralaj konversacioj, kiuj sufiĉe similas al la *Mil kaj unu*, kun la diferenco, ke ili estas malpli amuzaj, mi povos trovi minuton, por havi la honoron paroli racie. Se vi estus estinta Talestra el la tempo de Skander, filo de Filipo; se vi estus estinta la reĝino de Sabio en la tempo de Solejman, estus tiuj reĝoj, kiuj farus la vojaĝon.

Mi petas al la ĉielo, ke viaj plezuroj estu senmiksaj, via belo longdaŭra kaj via feliĉo senfina. — *Sadi*.

## ĈAPITRO I

## La Unuokula

En la tempo de l'reĝo Moadbar estis en Babilono junulo nomita Zadig, naskiĝinta kun bona naturo, for-  
 tigita per edukado. Kvankam li estis riĉa kaj juna, li  
 tamen scipovis moderigi siajn pasiojn; li afektis nenion;  
 li ne volis esti ĉiam prava kaj scipovis respekti la homan  
 malforton. Oni miris ĉe la konstato, ke estante tre sprita  
 li neniam insultis per moko al tiuj diroj tiel malpre-  
 cizaj, tiel tedaj, tiel tumultaj, al tiuj tiel riskaj diroj  
 malicaj, al tiuj malklerulecaj decidoj, al tiuj krudaj ŝer-  
 coj, al tiu vana bruo parola, kiun oni nomis *konversacio*  
 en Babilonio. En la unua libro de Zoroastro<sup>1</sup> li lernis, ke  
 la ofendiĝemo estas balono ŝvelita per vento, el kiu eliras  
 uraganoj, kiam oni trapikas ĝin. Precipe Zadig ne fan-  
 faronis, ke li malestimas la virinojn kaj subigas ilin. Li  
 estis malavara; li ne timis fari komplezon al maldanke-  
 muloj, laŭ tiu nobla maksimumo de Zoroastro: *Kiam ci*  
*manĝas, ci donu manĝaĵon al la hundoj, eĉ se poste ili*  
*fariĝos al ci mordemaj.* Li estis tiel saĝa, kiel eblas, tial  
 ke li celis vivi kun saĝuloj. Instruite en la sciencoj de  
 la antikvaj Ĥaldeoj, li konis la fizikajn principojn de la  
 naturo, tiaj kiel ili estas hodiaŭ konataj, kaj rilate al  
 la metafiziko, li sciis tion, kio estis ĉiuepoke sciata, t. e.  
 tre malmulte. Li estis firme konvinkita, ke la jaro kon-

<sup>1</sup> Temas pri Zend-Avesta, la sankta libro de l'Ĝebroj kaj de l'Persoj. La kosmogonio, kiu tie estas disvolvita, resumigas je du principoj: unu, tiu de l'bono, Ormuzd, havas kiel simbolon la lumon; la alia, tiu de l'malbono, Ariman, havas kiel simbolon la mallumon. Super tio estas plej alta principo, la eterna senfineco, la Zervane-Akerene. Ormuzd luktas kontraŭ Ariman, kiun li fine venkos. — Eld.

sistas el tri cent sesdek kvin kaj kvarono da tagoj, malgraŭ la nova filozofio liatempa, kaj ke la suno estas en la centro de l'mondo; kaj kiam la ĉefaj pastroj diris al li, kun aroganta fierego, ke li havas malbonajn opiniojn kaj ke li malamikas al la Ŝtato, kredante, ke la suno turniĝas kaj ke la jaro konsistas el dek du monatoj, li senkolere kaj senmalŝate silentis.

Zadig, estante tre riĉa kaj sekve havante amikojn, estante bonfarta kun agrabla vizaĝo, havante justan kaj moderan spiriton, kun sincera kaj nobla koro, kredis, ke li povas esti feliĉa. Li estis edziĝonta kun Semira, kies belo, deveno kaj riĉaĵo faris el ŝi la plej profitan edziĝon en Babilono. Li havis por ŝi solidan kaj virtan koralligitecon, kaj Semira amis lin pasie. Alproksimiĝis la feliĉa momento de ilia geedziĝo, kiam, promenante kune en la direkto al iu pordo de Babilono, sub la palmoj, kiuj ornamas la bordon de la riverego Eŭfrato, ili vidis veni al si virojn, armitaj per sabroj kaj pafarkoj. Ili estis sekvuloj de l'juna Orkan, nevo de ministro, al kiu flutuloj de lia onklo kredigis, ke al li ĉio estas permesata. Li havis neniun el la afablaj plaĉoj nek el la virtoj de Zadig; sed, opiniante esti multe supera, li afliktiĝis pro tio, ke li ne estas preferata. Tiu ĵaluzo, kiun kaŭzis lia vanto, kredigis lin, ke li amas Semira. La rabantoj kaptis ŝin; kaj en la flamiĝo de sia perforto ili vundis ŝin kaj fluigis la sangon de persono, kies vidiĝo kortuŝus la tigrojn de l'monto Imaus. Ŝiaj ĝemoj atingis la ĉielon. Ŝi kriis:

— Kara edzo mia! oni rabas min for de vi, kiun mi adoras.

Ŝi ne zorgis pri si mem; ŝi pensis nur pri sia kara Zadig. Ĉi tiu, en la sama tempo, defendis ŝin per la tuta

forto, kium donas la kuraĝo kaj la mano. Helpate nur de du sklavoĵ, li forpelis la rabantojn kaj rekondukis en ŝian hejmon la svenantan kaj sangemakulitan Semira, kiu malfermante la okulojn, vidis sian liberiganton. Ŝi diris al li:

— Ho! Zadig, mi amis vin kiel edzon, mi amas vin kiel tiun, al kiu mi ŝuldas la honoron kaj la vivon.

Neniam estis pli amanta koro ol tiu de Semira; neniam pli ravanta buŝo esprimis pli kortuŝajn sentojn per tiuj fajraj paroloj, kiujn inspiras la sento pri la plej granda bonfaro kaj la plej delikata emociego pro la plej prava amo. Sia vundo estis malgrava; ŝi baldaŭ resaniĝis. Zadig estis pli danĝere vundita; pafado de sago, kiu trafis lin apud la okulo, faris al li profundan vundon. Semira petis al la dioj nur la resaniĝon de sia amato. Sij okuloj estis nokte kaj tage saturitaj per larmoj; ŝi atendis la momenton, kiam tiuj de Zadig povos ĝui ŝian rigardon; sed abceso, aperinta ĉe la vundita okulo, kaŭzis, ke la plej grandan malbonon oni povas timi. Per sendito oni mendis en Memfiso la grandan kuraciston Hermes, kiu venis kun multaj akompanantoj. Li vizitis la malsanulon kaj deklaris, ke li perdos la okulon; li eĉ antaŭdiris la tagon kaj la horon, kiam tiu fatala akcidento devas okazi.

— Se estus la dekstra okulo, li diris, mi kuracus ĝin; sed vundoj ĉe maldekstra okulo estas nekuraceblaj.

Ĉiuj Babilonanoj, bedaŭrante la sorton de Zadig, admiris la profundon de la scienco de Hermes. Du tagojn poste la absceso krevis per si mem; Zadig perfekte resaniĝis. Hermes verkis libron, en kiu li pruvis, ke li ne resaniĝis. Zadig ne legis ĝin; sed, tuj kiam li povis eliri, li prepariĝis por viziti la virinon, kiu esperigis lin pri feliĉo en sia vivo, kaj por kiu sola li volis havi okulojn.

Semira estis en la kamparo jam de du tagoj. Survoje li eksciis, ke tiu belulino, laŭte deklarinte sian malinklineton por la unuokulaj, edziniĝis kun Orkan, ĉi tiun nokton mem. Ĉe tiu novaĵo li senkonsciigis; lia sufero preskaŭ mortigis lin. Longtempe li malsanis; sed fine lia racio supervenkis lian afliktiĝon, kaj la kruelego de tio, kion li spertis, eĉ helpis lin konsoli.

— Ĉar mi spertis, li diris, tian kruelan kapricon de fraŭlino, edukita ĉe la kortego, mi devas edzinigi civitaninon. Li elektis Azora, la plej saĝan kaj la plej bondevenan el la urbo; li edziĝis kun ŝi kaj vivis kun ŝi dum unu monato en la agrablaĵoj de unuigo plej ameca. Li nur rimarkis en ŝi iom da frivolo kaj multe da emociam trovi, ke la junuloj plej belkorpaj estas la plej spritaj kaj virtaj.

## ĈAPITRO II

### La nazo

Iun tagon Azora revenis hejmen, post promenado, kolera kaj faris laŭtajn ekkriojn.

— Kio okazas al vi, mia kara edzino? diris Zadig, kio povas duonfrenezigi vin?

— Ho ve! ŝi diris, vi estus same kiel mi indignita, se vi estus vidinta la spektaklon, kiun mi ĵus vidis. Mi iris por konsoli la junan vidvinon Kosru, kiu starigis, antaŭ du tagoj, tombmonumenton al sia juna edzo apud la rivereto, kiu randas ĉi tiun herbejon. Ŝi promesis al la dioj, pro sia afliktiĝo, resti apud tiu tombo tiom longe, kiom fluos apude la akvo de la rivereto.

— Nu! diris Zadig, jen estas estiminda virino, kiu vere amis sian edzon!

— Ha! ree parolis Azo, se vi sciis pri ŝia okupo, kiam mi vizitis ŝin!

— Pri kio, bel' Azora?

— Ŝi deturnis la rivereton.

Ŝi eldiradis tiom da koleraj atakparoloj, ŝi tiel flame kaj senbride riproĉadis al la juna edzino, ke tia virto-parademo ne plaĉis al Zadig.

Li havis amikon, nomata Kador, kiu estis unu el tiuj junuloj, kiujn lia edzino opiniis pli honesta kaj pli merita ol la aliaj: li faris tiun amikon sia konfidenculo kaj certigis al si, kiel eble, lian fidelon per multvalora donaco. Post dutaga ĉeesto sur la kamparo ĉe unu el siaj amikinoj, Azora revenis hejmen la trian tagon. Plorantaj servistoj sciigis al ŝi, ke ŝia edzo subite mortis dum la nokto, ke oni ne kuraĝis iri por informi ŝin pri tiu fatala novaĵo, kaj ke oni ĵus metis Zadig en la tombon de liaj gepatroj, kiu kuŝas ĉe la fino de l'ĝardeno. Ŝi ploris, elŝiris siajn harojn kaj ĵuris sin mortigi. Vespere Kador petis al ŝi la permeson paroli al ŝi, kaj ambaŭ ploris. La sekvantan tagon ili ploris malpli kaj tagmanĝis kune. Kador konfidis al ŝi, ke lia amiko donacis al li la plej grandan parton de sia posedaĵo, kaj komprenigis al ŝi, ke li estus feliĉa profitigi ŝin je sia riĉaĵo. La sinjorino ploris, koleriĝis, kvietiĝis; la vespermanĝo daŭris pli longe ol la tagmanĝo, oni interparolis kun pli da konfido. Azora laŭde parolis pri la mortinto; sed ŝi konfesis, ke li havis mankojn, je kiuj Kador estas senigita.

Meze dum la vespermanĝo, Kador ekĝemis pro netolerebla liemalsano; la sinjorino, maltrankvila kaj servema, alportigis ĉiujn esencojn, per kiuj ŝi parfumis sin, por provi, ĉu unu el ili taŭgas kontraŭ la liemalsano; ŝi multe bedaŭris, ke la granda Hermes ne estas ankoraŭ

en Babilono; ŝi komplezis tuŝi la flankon, ĉe kiu Kador sentis tiel akrajn dolorojn.

— Ĉu vi estas ema al tiu kruela malsano? ŝi demandis komplate.

— Ĝi kelkfoje proksimigas min al la tombo, respondis al ŝi Kador, kaj estas nur unu kuracilo, kiu povas mildigi mian doloron: ĝi konsistas en la almeto sur mian flankon de la nazo de homo, kiu mortis la antaŭan tagon.

— Jen stranga kuracilo, diris Azora.

— Ne pli stranga, li respondis, ol la saketoj de l'sinjoraĉo Arnult kontraŭ apopleksio<sup>1</sup>.

Tiu motivo, aldone al la grandega merito de la junulo, decidigis fine la sinjorinon.

— Ĉion konsiderinte, ŝi diris, kiam mia edzo pasos el la hieraŭa mondo en la morgaŭan laŭ la ponto Ĉinavar<sup>2</sup>, la anĝelo Asrael certe ne rifuzos al li la transiron, tial ke lia nazo estos iom malpli longa en la dua vivo ol en la unua.

Ŝi do prenis razilon; ŝi iris al la tombo de sia edzo, superversis ĝin per larmoj kaj proksimiĝis por fortranĉi la nazon de Zadig, kiun ŝi trovis sterniganta en la tombo. Zadig levus sin tenante sian nazon per unu mano kaj per la alia haltigante la razilon —

— Sinjorino, li diris al ŝi, ne plu tiel riproĉu al la juna Kosru; la intenco fortranĉi mian nazon ne estas malpli valora ol tiu deturni rivereton.

---

<sup>1</sup> Tiam estis Babilonano, nomita Arnult, kiu kuracis, laŭ la gazetoj, ĉian ajn apopleksion per saketo pendigita ĉekole. (*Noto de Volter*).

<sup>2</sup> En la doktrino de Zoroastro la animoj pasis postmorte sur la ponto de Ĉinavar, kie ili estis juĝataj. Se ili estis kulpaĵaj, ili estis ĵetataj en la abismon de l'mallumo; se ili estis justaj, ili trapasis la ponton.



## CAPITRO III

## Hundo kaj ĉevalo

Zadig spertis, ke la unua monato post la edziĝo, kiel estas skribite en la libro de Zend, estas la mielluno, kaj la dua, la absintluno. Kelkan tempon poste li estis devigata rezigni Azoran, kiu estis fariĝinta tro malagrabra kunvivantino, kaj li serĉis feliĉon en la studo super la naturo.

— Neniu estas pli feliĉa, li diris, ol filozofo, kiu legas en tiu granda libro, kiun Dio metis sub niajn okulojn. La veroj, kiujn li eltrovas estas liaj: li nutras kaj levas sian animon; li vivas trankvile; li timas nenion de la homoj, kaj lia anema edzino ne venas fortranĉi lian nazon.

Saturite per tiuj ideoj, li retiriĝis en kampardomon ĉe la bordoj de Eŭfrato. Tie li ne okupis sin, kalkulante, kiom da coloj de akvo fluas en unu sekundo sub la arkoj de l'ponto, aŭ ĉu falas dekduoncoloj kvadrataj da pluvo pli en la musa monato ol en la ŝafa monato. Li ne imagis fari silkon el araneaĵoj, nek porcelanon el rompitaĵ boteloj<sup>1</sup>; sed li ĉefe studis la apartan kvaliton de la bestoj kaj de la plantoj, kaj li baldaŭ akiris sagacon, per kiu li eltrovis mil diferencojn, kie aliaj homoj vidis ĉion sama.

Iun tagon, promenante apud arbareto, li vidis kuri al si eŭnukon de la reĝino, sekvatan de pluraj oficuloj, kiuj ŝajnis esti en plej ega maltrankvilo, kaj kiuj kuris

<sup>1</sup> Volter mokus ĉi tie la fizikiston Reomur (Réaumur), kiu faris raporton pri la silko de l'araneoj kaj inventis la maldiafanan vitron.

dise kiel frenezetiĝintaj homoj, kiuj serĉas, kion ili perdis plej valora.

— Junulo, diris al li la ĉefeŭnuko, ĉu vi ne vidis la hundon de la reĝino?

Modeste Zadig respondis:

— Estas hundino, ne hundo.

— Vi estas prava, diris la unua eŭnuko.

— Ĝi estas hispanhundino tre malgranda, aldonis Zadig; ŝi naskis idoĵn antaŭ nelonge; ŝi lamas per la maldekstra piedo antaŭa, kaj ŝi havas tre longajn orelojn.

— Vi do vidis ŝin? diris la unua eŭnuko tute senŝpirigita.

— Ne, respondis Zadig, mi ne vidis ŝin, kaj neniam sciis, ke la reĝino havas hundinon.

Precize en la sama tempo, pro iu strangajo ordinara de l'sorto, la plej bela ĉevalo el la reĝa stalo forkuris el la manoj de stalisto en la ebenaĵojn de Babilono. La ĉefa ĉashundisto kaj aliaj oficuloj serĉkuris al ĝi kun tiom da maltrankvilo kiel tiu de la ĉefeŭnuko, rilate la hundinon. La ĉefa ĉashundisto sin turnis al Zadig kaj demandis lin, ĉu li ne vidis preterpasi la ĉevalon de l'reĝo.

— Ĝi estas, respondis Zadig, la ĉevalo, kiu plej bone galopas; ĝi estas alta je kvin futoj, ĝia hufo estas tre eta; ĝi portas voston longa je tri futoj kaj duono; la ornam-konveksajetoj de ĝia enbuŝajo estas el oro je dudek tri karatoj; ĝiaj hufoferoj estas el arĝento je dek unu denaroj.

— Laŭ kiu vojo ĝi iris? kie ĝi estas? demandis la ĉefa ĉashundisto.

— Ĝin mi ne vidis, respondis Zadig, kaj neniam mi aŭdis ion pri ĝi.

La ĉefa kundisto kaj la ĉefa eŭnuko konvinkiĝis, ke Zadig ŝtelis la ĉevalon de l'reĝo kaj la hundinon de l'reĝino; ili kondukigis lin antaŭ la kunsidantaron de l'granda »desterham«, kiu kondamnis lin je skurĝbatiĝo kaj je dumviva restado en Siberio. Apenaŭ la juĝo estis eldirita, kiam oni retrovis la ĉevalon kaj la hundinon. La juĝisoj ĉagrenite devis ŝanĝi sian decidon; sed ili kondamnis Zadig je pago de kvar cent uncoj da oro, tial ke li diris ne esti vidinta, kion li vidis. Estis necese pagi unue tiun punmonon, kaj poste estis permesite al Zadig pledi por si mem antaŭ la konsilantaro de l'granda »desterham«; li parolis jene:

»Steloj de justo, abismoj de scienco, speguloj de vero, kiuj havas la pezon de l'plombo, la malmolon de l'fero, la brilon de la diamanto kaj multe da parenceco kun la oro, ĉar estas al mi permesite paroli antaŭ tiu plej nobla kunsidantaro, mi ĵuras al vi per Orosmano<sup>2</sup>, ke neniam mi vidis la respektindan hundinon de l'reĝino, nek la sanktan ĉevalon de la reĝo de l'reĝoj. Jen kio okazis al mi: promene mi paŝis al la arbareto, kie mi renkontis la respektindan eŭnukon kaj la tre gloran ĉefhundiston. Sur la sablo mi vidis la postsignojn de besto, kaj facile mi juĝis, ke ili estas de hundeto. Longaj sulketoj premsignitaj sur sablaj altaĵetoj inter la piedsignoj, konigis al mi, ke temas pri hundino, kies mamoj pendas, kaj ke sekve ĝi naskis antaŭ malmultaj tagoj. Alidirektaj postsignoj, kiuj ŝajnis esti tuŝetintaj la supraĵon de l'sablo apud la antaŭaj piedoj, sciigis min, ke ŝi havas tre longajn orelojn; kaj tial ke mi rimarkis, ke unu el la piedoj ĉiam faris signon sur la sablo pli malprofundan ol la aliaj, mi komprenis, ke la

<sup>2</sup> Alia nomo de Ormuzd.

hundino de mia plej nobla reĝino iom lamis, se tiel mi kuraĝas paroli.

»Rilate al la ĉevalo de l'reĝo de la reĝoj, eksciu, ke promenante sur la vojoj de tiu arbareto, mi ekvidis la signojn de ĉevalaj hufoferoj; ĉiuj estis egaldistancaj — Jen estas, mi diris al mi, ĉevalo, kiu havas perfektan galopon. La polvo sur la arboj, sur vojo, kiu estas nur sep futojn larĝa, estis iom forigita dekstre kaj maldekstre ĉe tri futoj kaj duono de la mezo de l'vojo. — Jen estas, mi diris al mi, ĉevalo, kiu havas voston je tri futoj kaj duono longan, per kies movoj, dekstren kaj maldekstren, ĝi balais tiun polvon. Mi vidis sub la arboj, kiuj formis laŭbon je kvin futoj altan, nove falintajn foliojn; kaj mi juĝis, ke tiu ĉevalo tuŝis ilin, kaj sekve, ke ĝi estis alta je kvin futoj. Rilate al ĝia enbuŝaĵo, ĝi estas el oro je dudek tri karatoj, ĉar ĝi frotis ties ornam-konveksaĵetojn kontraŭ ŝtono, kiun mi rekonis kiel provilon kaj per kiu mi faris provon. Fine mi juĝis per la signoj, kiujn ĝiaj hufoferoj faris sur ŝtonoj el alia speco, ke ĝi estis ferumita per argento pura je dek unu denaroj.

Ĉiuj juĝistoj admiris la profundan kaj subtilan sagon de Zadig; sciigo pri tio venis al la gereĝoj. Oni parolis nur pri Zadig en la vestibloj, en la ĉambroj kaj en la sekretariejo; kaj malgraŭ tio, ke pluraj pastroj opiniis, ke oni devas mortbruligi lin kiel sorĉiston, la reĝo ordonis, ke oni redonu al li la punmonon sume de kvarcent uncoj da oro, per kiu oni kondamnis lin.

La juĝoregistristo, la persekutistoj, la prokuroroj venis al li en granda pompo por alporti tiujn kvarcent uncojn, el kiuj ili fortendis nur tri cent kvardek ok, por pagi la juĝkostojn; kaj ĉiuj lakeoj petis salajron.

Zadig vidis, kiel danĝere estas iafoje esti tro klera, kaj li firme decidis, ĉe la unua okazo, ne diri kion li vidis.

Tiu okazo baldaŭ prezentigis. Iu ŝtatmalliberulo forkuris; li preterpasis la fenestrojn de lia domo. Oni demandis al Zadig pri tio; nenion li respondis; sed oni pruvis, ke li rigardis tra fenestro. Li estis pro tiu krimo kondamnita je kvin cent uncoj da oro, kaj li dankis al siaj juĝintoj pro ilia malsevero, laŭ la Babilona kutimo.

— Granda Dio! li diris al si, kiel kompatinda oni estas, promenante en arbareto, kie pasis la hundino de la reĝino kaj la ĉevalo de l'reĝo! kiel danĝere estas rigardi tra fenestro! kaj kiel malfacile estas vivi feliĉa!

## ĈAPITRO IV

### Enviulo

Zadig volis sin konsoli, per la filozofio kaj per la amikeco, pri la malbonaĵoj, kiujn havigis al li la sorto. Li havis en iu antaŭurbo de Babilono domon plaĉe ornamitan, en kiu li kolektis ĉiujn artaĵojn kaj distriilojn, indaj de klerulo. Matene lia biblioteko estis malfermita al ĉiuj kleruloj; vespere li gastigis bonedukitaron; sed baldaŭ li spertis, kiel danĝeraj estas la kleruloj; okazis granda disputo pri leĝo de Zoroastro, kiu malpermesis manĝi grifajon.

— Kial malpermesi grifon, iuj diris, se tiu besto ne ekzistas?

— Necesas, ke ĝi ekzistu, diris aliaj, ĉar Zoroastro malpermesas ĝin manĝi.

Zadig volis interkonsentigi ilin, dirante:

— Se grifoj ekzistas, ni manĝu neniun; se ili ne ekzistas, ni eĉ malpli riskas havi tian manĝaĵon, kaj sekve ni ĉiuj obeos al Zoroastro.

Klerulo, kiu verkis dek tri volumojn pri la ecoj de l'grifo, kaj kiu plie estis eminenta teurgo<sup>1</sup>, rapidis denunci Zadig al iu ĉefmagiisto, nomita Jebor<sup>2</sup>, la plej stulta el la Ĥaldeoj, kaj sekve fanatika. Tiu homo volonte palisumus Zadig, por la plej granda gloro de l'suno, kaj tiaokaze recitus la brevieron de Zoroastro kun kontenta mieno. La amiko Kador (amiko pli valoras ol cent pastroj) vizitis la maljunan Jebor kaj diris al li:

— Vivu la suno kaj la grifoj! Gardu vin puni Zadig: li estas sanktulo; li havis grifojn en sia birdkorto kaj neniun el ili manĝas; kaj lia kulpiganto estas herezulo, kiu kuraĝas aserti, ke la kunikloj kavas fenditajn piedojn kaj ne estas malpuregaj.

— Nu bone! diris Jebor, skuetante sian kalvan kapon, oni devas palisumi Zadig, pro tio ke li malbone pensis pri la grifoj, kaj krome pro tio ke li kalumniis la kuniklojn. Kador aranĝis la aferon pere de honora edziĝ-akompanantino, kiun li gravedigis kaj kiu havis multe da influo inter la elektantaro de l'pastroj. Neniu estis palisumita, pro kio pluraj doktoroj murmuris kaj el tio konjektis la dekadencan de Babilono. Zadig ekkriis:

— De kio dependas la feliĉo! ĉio kaŭzas al mi persekuton en ĉi tiu mondo, eĉ neekzistantaj estuloj.

Li malbenis la klerulojn kaj de nun volis vivi nur en bonsocieto. Li kunvenigis en sian hejmon la plej

<sup>1</sup> Specialisto pri *teurgio*, magio, laŭ kiu oni havas rilatojn kun la spiritoj el la ĉielo. — *Trad.*

<sup>2</sup> Anagramo de Bojer (Boyer), monaĥo, gubernisto de la kronprinco, intrigulo, kiu estis malamiko de Volter kaj persekutis lin. — *Trad.*

honestajn homojn el Babilono kaj la plej amindajn virinojn; li regalis per bongustaj vespermanĝoj, ofte kun koncertoj antaŭe, kaj vivigitaj per ĉarmaj konversacioj, el kiuj li sukcesis forigi la malpacienca deziron montri spriton, kio estas la plej certa maniero esti nesprita, kaj malbonigi la plej brilan societon. Neniel la vanto efikis en la elekto de liaj amikoj nek de iu el la manĝaĵoj, tial ke pri ĉio li preferis la eston al la ŝajno, kaj per tio li tiris al si la veran estimon, al kiu li ne pretendis.

Fronte al sia domo loĝis Arimaze, individuo, kies malica animo speguliĝis sur lia maldelikata fizionomio. Li konsumiĝis per envio kaj estis malhumilega, kaj kompletige al tio, li estis teda spritemulo. Tial ke li neniam sukcesis en la mondumo, li sin venĝis, malice parolante pri ĝi. Kvankam li estis riĉa, tamen malfacile li povis venigi flatulojn en sian hejmon. Ĝenis lin la bruo de la ĉaroj, kiuj vespere portis vizitantojn al Zadig; la famo pri laŭdoj, kiujn ĝuis lia najbaro, incitis lin eĉ pli forte. Li kelkfoje iris ĉe Zadig kaj neinvitite altablĝis; tiam li difektis la ĝojon de la ĉeestantaro, kiel, laŭdire, la harpioj haladzigas la viandojn, kiujn ili tuŝas. Iun tagon okazis, ke li volis feste gastigi virinon, kiu, anstataŭ akcepti la inviton, iris vespermanĝi en la hejmon de Zadig. Alian tagon, parolante kun li en la palaco, ili renkontis ministron, kiu invitis Zadig por vespermanĝi kaj ne invitis Arimaze. La plej malparodonemaj malamoj ofte ne havas pli gravajn fundamentojn. Tiu viro, kiun oni nomis *Enviulo* en Babilono, volis tute malbonfamigi Zadig, tial ke oni nomis lin *Feliculo*. Okazo malbonfari prezentigis centfoje en tago, kaj tiu fari bonon, unufoje en jaro, kiel diris Zoroastro.

Enviulo iris ĉe Zadig, kiu promenis en siaj ĝardenoj kun du amikoj kaj unu sinjorino, al kiu li ofte diris koketaĵojn sen alia intenco ol diri ilin. La konversacio havis kiel temon iun militon, kiun la reĝo faris al la princo de Hirkanio,<sup>3</sup> lia vasalo, kaj kiun li venke ĵus finis. Zadig, kiu rimarkis lian kuraĝon dum tiu mallonga milito, tre laŭdis la reĝon kaj eĉ pli la sinjorinon. Li prenis sian skribilon kaj verkis kvar versojn, kiujn li donis por legi al tiu belino. Liaj amikoj petis la permeson ankaŭ legi ilin: modesto, aŭ pli ĝuste saĝa digno, kaŭzis, ke li ne konsentis. Li sciis, ke improvizitaj versoj neniam estas bonaj, krom por la virino, al kiu ili estas destinitaj; li ŝire duonigis la folion, sur kiu li ĵus skribis, kaj ĵetis la du duonaĵojn en tufon el rozarbustoj, kie oni vane serĉis ilin. Ekpluветis; oni revenis en la domon. Enviulo, kiu restis en la ĝardeno, tiel diligente serĉadis, ke li trovis unu pecon de l'folio. Ĝia ŝiriĝo estis tia, ke ĉiu duono de verso, formante linion, havis sencon kaj eĉ konsistigis verseton; sed, laŭ pli stranga hazardo, tiuj versetoj havis sencon de plej abomenindaj insultoj al la reĝo; estis legeble:

Per ega krimaro  
 Ja venkis la reĝo  
 En paco publika  
 Nura malamiko

La unuan fojon en sia vivo feliĉon sentis Enviulo. Li havis enmane tion, kio povas pereigi viron virtan kaj afablan. Saturite per tiu kruela ĝojo, li havigis al la reĝo tiun satiron, skribitan per la mano de Zadig: li estis malliberigita, ankaŭ liaj du amikoj kaj la sinjo-

<sup>3</sup> Hirkanio, regiono de l'antikva Azio laŭlonge de l'sud-orienta bordo de l'Kaspia maro.



rino. Rapide li estis juĝita kaj ne havis la eblon sin pravigi. Kiam li venis por aŭdi la verdikton, Enviulo troviĝis sur lia irejo kaj laŭte diris al li, ke liaj versoj estas senvaloraj. Zadig ne pretendis esti bona poeto; sed li tre bedaŭris esti kondamnita pro majest-ofendo kaj vidi, ke oni tenis en malliberejo belan sinjorinon kaj du amikojn pro krimo, kiun li ne faris. Oni ne permesis al li paroli, tial ke lia skribaĵo pravas lian kulpon. Tia estis la leĝo en Babilono. Oni do kondukis lin al la ekzekutejo tra amaso da videmuloj, el kiuj neniu kuraĝis kompati lin, kaj kiuj ekkuregis, por rigardadi lian vizaĝon kaj por vidi, ĉu li mortos volonte. Nur liaj parencoj ĉagreniĝis, tial ke ili ne heredos. La tri kvaronoj de lia havo estis konfiskitaj profite al la reĝo kaj la alia kvarono profite el Enviulo.

En la tempo, kiam li prepariĝis por morti, la papago de l'reĝo forflugis de sia balkono kaj venis en la ĝardenon de Zadig rekte al tufo de rozarbustoj. La vento estis forblovinta persikon de proksima arbo; ĝi estis falinta sur unu pecon de la surskribita folio, al kiu la persiko estis algluita. La birdo forportis la persikon kaj la folion, kaj portis ilin sur la genuojn de l'reĝo. La scivola princo legis vortojn, kies kuniĝo ne formis senchavan frazon, kaj kiuj ŝajnis esti versofinoj. Li ŝatis la poezion, kaj ĉe versoŝatantaj princoj oni ĉiam povas trovi helpon; la aventuro de lia papago pensigis lin. La reĝino, kiu memoris pri tio, kio estis skribita sur la koncerna folio de Zadig, ordonis, ke oni alportu ĝin.

Oni kontraŭmetis la du pecojn, kiuj perfekte alĝustiĝis kune; oni tiam legis la versojn de Zadig laŭ ilia ĝusta formo:

Per ega krimaro skuiĝis la tero,  
 Sed venkis la reĝo super ribelado,  
 En paco publika nur amo militas:  
 Nura malamiko timinda ĝi estas.

La reĝo ordonis, ke oni venigu Zadig antaŭ lin, kaj ke oni liberigu liajn du amikojn kaj la belan sinjorinon. Zadig sin ĵetis vizaĝaltere ĉe la piedoj de l'gereĝoj; tre humile li petis al ili pardonon, pro tio ke li faris malbonajn versojn; li parolis tiel plaĉe, tiel sprite, tiel saĝe, ke la gereĝoj volis revidi lin. Li revenis kaj plaĉis eĉ pli. Oni donis al li ĉiujn havaĵojn de Enviulo, kiu maljuste kulpigis lin; Zadig redonis ilin ĉiujn, kaj Enviulo estis tuŝita nur de tio, ke li perdis nenion. La estimo de l'reĝo por Zadig kreskis, tagon post tago. Li partoprenigis lin en ĉiuj siaj distroj, konsultis lin pri ĉiuj siaj aferoj. De tiam la reĝino rilatis al li kun flatkomplezo, kiu povus fariĝi danĝera por ŝi, por sia plej nobla edzo, por Zadig kaj por la reĝlando. Zadig ekkriis, ke ne estas tiel malfacile esti feliĉa.

## ĈAPITRO V

### Grandanimuloj

Alvenis la tempo, kiam oni celebris grandan feston, kiu okazis ĉiukvinjare. Estis kutimo en Babilono, ĉiun jarkvinon, solene sciigi, kiu el la civitanoj agis plej grandanime. Altnobelaj kaj pastroj estis la juĝantoj. La ĉefsatrapo, administranto de la urbo, raportis pri la plej noblaj agoj faritaj dum sia regado. Oni voĉdonis: la reĝo eldiris la juĝon. Por ĉeesti tiun solenaĵon oni venis el la ekstremaĵoj de l'tero. La venkinto ricevis

el la manoj de l'monarko oran pokalon, garnitan per gemoj, kaj la reĝo diris al li jenajn parolojn: »Ricevu tiun premion pri grandanimeco, kaj la dioj favoru min donante al mi multajn regatojn, kiuj similas vin!«

Kiam alvenis tiu memorinda tago, la reĝo montriĝis sidanta surtrone, ĉirkaŭita de altnobeloj, de pastroj kaj de ĉiunaciaj delegitoj, kiuj venis al tiuj konkursoj, ĉe kiuj gloro akiriĝis, ne per rapidmoveco de ĉevaloj, ne per korpa forto, sed per virto. La ĉefsatrapo laŭte raportis pri la agoj, kies aŭtoroj povas meriti tiun ne-takseblan premion. Li ne parolis pri la grandanimeco, kun kiu Zadig redonis al Enviulo lian tutan riĉaĵon: ĝi ne estis ago, kiu indas je la premio.

Unue li prezentis juĝiston, kiu, pro eraro, pri kiu li eĉ ne estis respondeca, perdigis gravan proceson al iu civitano, kaj donacis al li sian tutan havon, kiu valoris la perdataĵon de l'juĝito.

Li poste montris junulon, kiu, estante treege enamiĝinta al iu fraŭlino, kiun li estis edzinigonta, cedis ŝin al amiko, preskaŭ mortiĝanta pro amo al ŝi, kaj plie pagis la doton, cedante la junulinon.

Poste li venigis soldaton, kiu, dum la milito en Hirkanio, donis eĉ pli grandan ekzemplon pri grandanimeco. Soldatoj el la malamika kampo estis forrabantaj lian amatinon, kaj li defendis ŝin. Oni venis por sciigi lin, ke aliaj Hirkanoj estis forrabantaj lian patrinon ĉe kelkpaŝa distanco de tie; plorante li forlasis sian amatinon kaj kuris, por liberigi sian patrinon; li poste revenis al sia amatino kaj trovis ŝin agonianta. Li volis ŝin mortigi; lia patrino diris al li admone, ke li estas ŝia sola subtenanto, kaj li kuraĝis elporti la vivon.

La juĝistoj emis decidi favore al tiu soldato. La reĝo ekparolis kaj diris:

— Lia ago kaj tiu de la aliaj estas belaj; sed ili ne mirigas min. Hieraŭ Zadig faris unu, kiu mirigas min. Antaŭ kelkaj tagoj mi eksigis mian ministron kaj favoriton Koreb. Mi eldiris pri li kolerajn riproĉojn kaj ĉiuj miaj korteganoj certigis, ke mi estas tro malkora; ĉiuj konkuris en mallaŭdaj paroloj pri Koreb.

Mi demandis al Zadig lian opinion, kaj li kuraĝis paroli pri li favore. Mi konfesas, ke mi vidis, en niaj historioj, ekzemplojn laŭ kiuj oni kompensis eraron per sia havo, ke oni cedis sian amatinon, ke oni preferis patrinon al la amatino; sed neniam mi legis, ke kortegano parolis favore al malfavorigita ministro, kontraŭ kiu koleras lia suvereno. Mi donacas dudek mil ormonoerojn al ĉiu el tiuj, pri kiuj oni menciis la grandanimajn agojn; sed mi donacas la pokalon al Zadig.

— Reĝa moŝto, li diris, nur via majesto meritas ricevi la pokalon; ĝi mem faris la plej eksterordinaran agon, ĉar estante reĝo vi ne koleriĝis kontraŭ via sklavo, kiam li kontraŭis al via pasio.

Oni admiris la reĝon kaj Zadig. La juĝisto, kiu donacis sian havon, la amanto, kiu edzinigis sian amatinon per sia amiko, la soldato, kiu preferis savi sian patrinon ol sian amatinon, ricevis la donacojn de l'monarko; iliaj nomoj enskribiĝis en la libro pri la grandanimuloj: Zadig ricevis la pokalon. La reĝo akiris la reputacion esti bona princo, kiun li ne konservis longe. Tiu tago estis dediĉita por festoj, pli longdaŭraj ol laŭleĝe. Pri ili oni ankoraŭ memoras en Azio. Zadig diris:

— Fine mi estas feliĉa! Sed li eraris.

## ĈAPITRO VI

## Ministro

La reĝo estis perdinta sian ĉefministron. Li elektis Zadig por okupi tiun postenon. Ĉiuj belaj sinjorinoj el Babilono ĝojis pro tiu elekto, tial ke, post la fondiĝo de la imperio, neniam estis tiel juna ministro. Ĉiuj korteganoj bedaŭris; Enviulo sputis sangon pro tio, kaj lia nazo eksterordinare ŝvelis. Post kiam Zadig estis dankinta al la gereĝoj, li iris danki la papagon.

— Bela birdo, li diris al ĝi, estas vi, kiu savis mian vivon kaj kaŭzis, ke mi estas ĉefministro; la hundino kaj la ĉevalo de iliaj gereĝaj moŝtoj faris al mi multan malbonon, sed vi faris al mi bonon. Jen do, de kio dependas la sorto de l'homoj! Sed, li aldiris, tia tiel stranga feliĉo eble baldaŭ disneniigos.

La birdo respondis: jes.

Tiu vorto forte impresis Zadig. Tamen, tial ke li estis bona fizikisto, li ne kredis, ke papagoj estas profetoj, li baldaŭ trankviliĝis; li komencis plenumi kiel eble plej bone sian ministran taskon.

Li sentigis al ĉiuj la sanktan povon de la leĝoj, al neniuj li sentigis la pezon de sia altofico. Li ne ĝenis la voĉojn de l'konsilantaro, kaj ĉiu veziro povis senĝene peti al li konsilon. Kiam li juĝis proceson, la leĝo mem juĝis; sed kiam ĝi estis tro severa, li mildigis ĝin, kaj kiam mankis leĝoj, tiam lia natura justo elpensis da ili, kiuj similis al tiuj de Zoroastro.

De li la nacioj ricevis jenan noblan principon: estas preferinde riski savi kulpulon, ol kondamni senkulpulon. Li opiniis, ke la leĝoj ekzistas same por helpi al la civitanoj, kiel por timigi ilin. Lia ĉefa talento estis

eltrovi la veron, kiun ĉiuj homoj provas kaŝi. Tuj en la unuaj tagoj de sia administrado, li utiligis tiun grandan talenton. Iu fama negocisto el Babilono mortis en Hindio; li testamentis egalparte sian havon al siaj du filoj, post kiam li estis edziniginta ilian fratinton, kaj li lasis donacon je tridek mil ormoneroj al tiu el siaj du filoj, kiu laŭjuĝe pli amas lin. La pli aĝa konstruis por li tombomonumenton; la dua pligrandigis la doton de sia fratino per parto de sia heredaĵo; ĉiuj diris:

— Estas la pli aĝulo, kiu plej amas sian patron; la duanaskito pli amas sian fratinton; al la pli aĝulo apartenas la tridek mil ormoneroj.

Zadig venigis ilin al si unu post la alia. Li diris al la pli aĝulo:

— Via patro ne mortis; li resaniĝis; li revenas al Babilono.

— Estu Dio laŭdata! respondis la junulo; sed jen tombo, kiu kostis al mi tre kare.

Zadig diris la samon al la duanaskito.

— Dio estu laŭdata! li respondis; mi redonos al mia patro ĉion, kion mi havas; sed mi ŝatus, ke li lasu al mia fratino, kion al ŝi mi donacis.

— Nenion vi redonos, diris Zadig, kaj vi ricevos la tridek mil ormonerojn; estas vi, kiu plej multe amas vian patron.

Iu tre riĉa junulino promesis edziniĝon al du pastroj, kaj, post kelkmonata instruado ricevita de ambaŭ, okazis, ke ŝi gravediĝis. Ambaŭ volis edziĝi kun ŝi.

— Mi akceptos kiel edzon, ŝi diris, tiun, kiu metis min en la staton doni civitanon al la imperio.

— Estas mi, kiu plenumis tiun bonan agon, diris unu.

— Mi mem havas tiun meriton, diris la alia.

— Nu! ŝi respondis, mi agnoskos kiel patron de la infano tiun, kiu donos al ĝi la plej bonan edukadon.

Ŝi naskis filon. Ĉiu el la pastroj volas eduki lin. La afero estis metita antaŭ Zadig. Li venigis la du pastrojn.

— Kion ci instruos al cia zorgato? li demandis al la unua.

— Mi instruos al li, diris la doktoro, la ok partojn de la oracio, la dialektikon, la astrologion, la demonomanion, tion, kio estas la substanco kaj la malneceso, la abstrakton kaj la konkreton, la monadojn kaj la antaŭstarigitan harmonion.

— Mi, diris la dua, mi povos atingi, ke li estu justa kaj inda havi amikojn.

Zadig eldiris:

— Ĉu ci estas aŭ ne lia patro, ci edzinigos lian patrinon.

Ĉiutage venis al la kortego plendoj kontraŭ la »itimadulet« de Nedio, nomita Iraks. Li estis grandsinjoro, kies naturo ne estis malbona, sed kiu estis koruptita per vant- kaj voluptemo. Malofte li toleris, ke oni alparolu lin, kaj neniam, ke oni kontraŭdiru al li. La pavoj ne estas pli vantemaj, nek la kolomboj pli voluptemaj, la testudoj estas malpli maldiligentaj; li elmontris nur vantan gloron kaj ŝajnajn plezurojn: Zadig entreprenis plibonigi lin.

Li sendis al li en la nomo de l'reĝo ĉefmuzikiston kun dek du kantistoj kaj dudek kvar violonistoj, ĉefserviston kun ses kuiristoj kaj kvar ĉambelanoj, kiuj neniam devis esti for de li. La ordono de l'reĝo entenis,

ke nepre estu obeata la sekvanta etiketo, kaj jen kiel okazis la aferoj.

La unuan tagon, tuj kiam vekigis la voluptema Iraks, la ĉefmuzikisto eniris, sekvite de la kantistoj kaj violonistoj; oni kantis kantaton dum du horoj, kaj, ĉiutriminite, la rekantaĵo estis jena:

Kiel lia merit' estas ekstremega!  
kiom da afablo kaj da grandiozo!  
Ha! tutcerte lia sinjorega moŝto  
Ĉiel devas esti nepre memkontenta!

Post la ludado de la kantato, ĉambelano faris al li tri kvaronhoran alparoladon, en kiu li estis precize laŭdata pro la bonaj kvalitoj, kiuj mankis al li. Kiam la alparolado estis finita, oni kondukis lin en la manĝoĉambron ĉe la sono de l'muzikiloj. La tagmanĝo daŭris dum horoj; tuj kiam li malfermis la buŝon parolcele, la ĉefĉambelano diris:

— Li estos prava.

Apenaŭ li estis eldirinta kvar vortojn, alia ĉambelano ekkriis:

— Li pravas.

La du aliaj ĉambelanoj ekridegis ĉe la spritaĵoj, kiujn Iraks diris aŭ devus diri. Post la tagmanĝo oni reaŭdigis al li la kantaton.

Tiu unua tago ŝajnis al li tre agrabla; li kredis, ke la reĝo honoras lin laŭ liaj meritoj; la dua ŝajnis al li malpli agrabla; la tria estis ĝena; la kvara estis netolerebla; la kvina estis turmenta; fine, indignite pro la ĉiama kantado:

— Ha! tutcerte lia sinjorega moŝto ĉiel devas esti memkontenta! pro la ĉiama aprobado kaj pro la ĉiutaga kaj samhora alparolado, li skribis al la kortego, pete-



gante la reĝon, ke li bonvolu revenigi siajn ĉambelanojn, muzikistojn, sian ĉefserviston; li promesis esti de nun malpli vantema kaj pli diligenta; li malpli deziris laŭdojn, havis malpli da festoj kaj estis pli feliĉa: ĉar, kiel diras la Saldero<sup>1</sup>, ĉiama plezuro ne estas plezura.

## ĈAPITRO VII

### Disputoj kaj aŭdiencoj

Tiele Zadig montris ĉiutage la subtilon de sia genio kaj sian bonanimecon; oni admiris lin, kaj tamen oni amis lin. Li famiĝis kiel la plej bonŝanca el ĉiuj viroj; lia nomo aŭdiĝis tra la tuta imperio. Ĉiuj virinoj avide rigardis al li; ĉiuj civitanoj laŭdis lin pro lia justo; la kleruloj rilatis al li kiel al orakolo; la pastroj mem konfesis, ke li estas pli klera ol la maljuna ĉefpastro Jebor. For estis la tempo, kiam oni procesis kontraŭ li pri la grifoj; oni kredis nur tion, kio ŝajnis al li kredebla.

Estis en Babilono granda disputo, kiu daŭris jam de mil kvin cent jaroj kaj kiu dividis la imperion je du obstinegaj sektoj: unu pretendis, ke por eniri la templon de Mitras oni ĉiam devas paŝi unue per la maldekstra piedo; la alia abomenis tiun kutimon kaj ĉiam paŝis internen per la dekstra piedo. Oni atendis la solenan feston pri la sankta fajro, por ekscii, kiun sekton favoros Zadig. Ĉies okuloj rigardis al liaj du piedoj, kaj la tuta urbo maltrankvile atendis. Zadig eniris la templon, saltante per la piedoj kunigitaj, kaj poste li pruvis per elokventa parolado, ke la Dio de la ĉielo kaj de l'tero, antaŭ kiu ĉiuj estas egalaj, ne faras

<sup>1</sup> Resumo de la *Zend*, sankta libro de l'bramanoj.

diferencon inter la maldekstra kruro kaj la dekstra. Enviulo kaj lia edzino asertis, ke en lia parolado ne estis sufiĉe da metaforoj, ke li ne sufiĉe dancigis la montojn kaj montetojn.

— Li estas seka kaj sengenia, ili diris; li ne vidigas la maron forflui, nek la stelojn fali, nek la sunon fandi kiel vakso: li ne havas la bonan stilon orientan.

Zadig kontentiĝis per tio, ke li havas racian stilon. Ĉiuj aprobis lin, ne pro tio, ke li montris la ĝustan vojon, ne pro tio, ke li pravas, ne tial ke li estas afabla, sed ĉar li estas la ĉefveziro.

Same oportune li metis finon al la grava proceso inter la blanke vestitaj pastroj kaj la nigre vestitaj. La blankuloj asertis, ke estas malpiaĵo sin turni, por preĝi Dion, al la vintra oriento; la nigruloj certigis, ke Dio abomenas la preĝojn de l'homoj, kiuj sin turnas al la somera okcidento. Zadig ordonis, ke oni sin turnu laŭplaĉe.

Tiel li sukcesis matene prizorgi la apartajn kaj ĝeneralajn aferojn; dum la cetera tempo de l'tago li okupiĝis pri plibeligoj al Babilono: li prezentigis tragediojn, ĉe kiuj oni ploris kaj komediojn, ĉe kiuj oni ridis, kio jam delonge ne plu estis kutima, kaj kion li restarigis, tial ke li estis bongustulo. Li ne pretendis esti pli sperta ol la artistoj; li rekompencis ilin per bonfaroj kaj meritsignoj, kaj li ne ĵaluzis ilin sekrete pro iliaj talentoj. Vespere li tre amuzis la reĝon kaj precipe la reĝinon. La reĝo diris:

— Eminentia ministro!

La reĝino diris:

— Aminda ministro!

Kaj ambaŭ aldonis:

— Estus tre domaĝe, se li estus pendigita.

Neniam homo okupanta postenon estis devigata doni tiom da aŭdiencoj al sinjorinoj. La plimulto venis al li por paroli pri neekzistantaj aferoj, kun la celo iun okazigi kun li. Inter la unuaj prezentis sin la edzino de Enviulo; ŝi ĵuris al li per Mitras, per la Zend-Avesta kaj per la sankta fajro, ke ŝi tute malaprobas la konduton de sia edzo; ŝi konfesis al li, ke ŝia edzo estas ĵaluza, bruteca; ŝi komprenigis al li, ke la dioj punas ŝin, rifuzante al ŝi la grandvalorajn efikojn de tiu sankta fajro, per kiu sola la homo similas al la senmortuloj. Fine ŝi faligis sian ŝtrumpligilon; Zadig levis ĝin kun sia kutima afablo; sed li ne ligis ĝin al la genuo de la sinjorino, kaj tiu manketo, se tiel estas, estis la kaŭzo de plej teruraj malfeliĉaĵoj. Zadig ne pensis pri la afero, kaj la edzino de Enviulo pri ĝi multe pensis.

Aliaj sinjorinoj sin prezentis ĉiutage. La sekreta historio pri Babilono mencias, ke iun fojon li estis delogita, sed mirigite konstatis, ke li ĝuas sen volupto kaj distre kisas sian amantinon. La virino, al kiu preskaŭ senatente li donis sian protekton, estis iu ĉambristino de la reĝino Astarta. Tiu amema Babilonanino diris al si konsole:

— Evidente tiu ĉi viro cerbumadas pri eksterordinara nombro da aferoj, ĉar li pensas pri ili amorante. En la momento, kiam multaj personoj kutime silentas aŭ aliaj eldiras nur sanktajn parolojn, okazis, ke subite li ekkriis: »La reĝino«. La Babilonanino kredis, ke finfine li ekkonscias pri sia faro kaj ke al ŝi li diris: »Mia reĝino«. Sed Zadig, daŭre distrite, eldiris la nomon Astarta. La virino, kiu en tiu feliĉa okazo interpretis ĉion siaprofite, pensis, ke tio signifas: Vi estas pli bela

ol la reĝino Astarta. Ŝi foriris el la serajlo de Zadig kun tre belaj donacoj. Ŝi iris por rakonti sian aventuron al Enviulino, kiu estis ŝia intima amikino; ĉi tiu sentis sin kruele pikita pro la prefero.

— Li eĉ ne favoris min, ŝi diris, per religo de ĉi tiu ŝtrumpiligilo, kiun mi ne plu volas uzi.

— Ho! ho! diris la bonŝanculino al Enviulino, vi uzas ŝtrumpiligilojn similajn al tiuj de l'reĝino! Ĉu vi aĉetas ilin ĉe la sama farantino?

Enviulino profunde revis, nenion respondis kaj iris konsulti sian edzon Enviulo.

Dume Zadig konstatis, ke ĉiam li estas distrita, kiam li donas aŭdiencojn kaj kiam li juĝas; li ne sciis la kaŭzon de tia stato; tio estis lia sola ĉagreno.

Li havis songon: ŝajnis al li, ke li unue estis kuŝigita sur sekaj herboj, inter kiuj kelkaj havis pikilojn, kiuj ĝenis lin, kaj ke poste li mole ripozas sur lito el rozoj, el kiu eliras serpento, kiu vundis lin ĉe la koro per sia akra kaj venena lango.

— Ho ve! li diris, dum longa tempo mi kuŝis sur tiuj sekaj kaj pikaj herboj; nun mi estas sur lito el rozoj; sed kiu estos la serpento?

## ĈAPITRO VIII

### Jaluzo

La malfeliĉon de Zadig kaŭzis lia feliĉo mem, kaj ĉefe lia merito. Ĉiutage li havis interparoladojn kun la reĝo kaj kun Astarta, lia nobelega edzino. La ĉarmo de lia konversacio estis pliigitaj per tiu plaĉodeziro, kiu, rilate al la spirito, similas al la ornamo, rilate al la belo; lia juno kaj liaj ĉarmoj gradete faris sur Astartan

impreson, pri kiu ŝi ne konsciis komence. Ŝia pasio kreskis en la sino de la senkulpeco. Astarta senskru-pule kaj sentime fordonis sin al la plezuro vidi kaj aŭdi viron, kara al ŝia edzo kaj al la Ŝtato; senĉese ŝi laŭdis lin al la reĝo; pri li ŝi parolis al siaj ĉambristinoj, kiuj eĉ pligrandigis ŝiajn laŭdojn: ĉio konkuris por penetrigi en ŝian koron la sagon, kiun ŝi ne sentis. Ŝi faris al Zadig donacojn, per kiuj montriĝis pli da koketo ol ŝi pensis; ŝi kredis paroli al li kiel reĝino kontenta pro liaj servoj, kaj iafoje ŝiaj esprimoj similis tiujn de amema virino.

Astarta estis multe pli bela ol tiu Semira, kiu tiom malamamis la unuokululojn, kaj ol tiu alia virino, kiu volis fortranĉi la nazon de sia edzo. La familiaro de Astarta, ŝiaj amemaj paroloj, pri kiuj ŝi ekruĝigis, ŝiaj rigardoj, kiujn ŝi volis deturni, kaj kiuj fiksigis sur tiujn de Zadig, ekbruligis en lia koro fajron, pri kiu li miris. Li kontraŭstaris; li vokis por helpo al la filozofio, kiu ĉiam helpis lin: de ĝi li ricevis lumon, sed neniun faciligon. La devo, la dankemo, la suverena majesto perfidita, prezentigis antaŭ liaj okuloj kiel venĝemaj dioj: li luk-tis, li venkis; sed tia venko, kiun ĉiumomente li devis gajni, kostis al li ĝemojn kaj larmojn. Li ne plu kura-ĝis paroli al la reĝino kun tiu milda senĝeneco, kiu estis tiel ĉarma por ambaŭ; liaj okuloj nube malsere-niĝis; liaj paroladoj estis ĝenecaj kaj seninterligaj: li mallevis la palpebrojn; kaj kiam, kontraŭvole, liaj ri-gardoj sin turnis al Astarta, ili renkontis tiujn de la reĝino larmantaj kaj eligantaj flamerojn; ambaŭ aspek-tis, kvazaŭ unu diras al la alia:

— Ni adoras unu la alian, kaj ni timas reciprokan amon; ambaŭ ni ardas per fajro, kiun ni malaprobas.

Deliretante, konfuziĝinte, Zadig deiris de ŝi kun la koro troŝarĝita per penigaĵo, kiun li ne plu povis porti; en la intensego de sia eksciteco li lasis al sia amiko Kador diveni sian sekreton, kiel homo, kiu, elportante dum longa tempo akran doloron, konigas sian suferon per krio, kiun dolora duobligo elaŭdigas, kaj per la malvarma ŝvito, kiu fluas sur lia frunto.

Kador diris al li:

— Mi jam divenis la sentojn, kiujn vi mem volis kaŝi al vi; la pasioj vidigas signojn, pri kiuj oni ne povas erari. Vi juĝu, mia kara Zadig, ĉar mi povis vidi en vian koron, se la reĝo tie ne eltrovos senton, kiu ofendas lin. Li ne havas alian mankon ol tiun, ke li estas la plej ĵaluza el la viroj. Vi kontraŭstaras vian pasion pli forte ol la reĝino kontraŭstaras la sian, tial ke vi estas filozofo, kaj tial ke vi estas Zadig. Astarta estas virino; ŝiaj rigardoj montras amon kun tiom pli da senprudento, ke ŝi ne ankoraŭ konscias pri sia kulpo. Trankviligite de sia senkulpeco ŝi bedaŭrinde malatentas la necesajn eksteraĵojn. Pri ŝi mi timos, tiom longe, kiom ŝi havos nenion por riproĉi al si. Se ambaŭ vi interkonsentus, vi kapablus trompi ĉies okulojn: naskiĝanta kaj kontraŭstarata pasio elmontriĝas; kontentiĝita amo scias sin kaŝi.

Zadig tremis ĉe la propono perfidi la reĝon, sian bonfarinton, kaj neniam li estis pli fidela al sia princo, ol kiam li kulpis al li pro nevoĝa krimo. Dume la reĝino elparolis tiom ofte la nomon Zadig, ŝia frunto tiel ruĝiĝis, elparolante ĝin, ŝi jen estis tiel ekscitita, jen tiel konfuzita, kiam ŝi parolis al li en la ĉeesto de l'reĝo; tiel profunda revado kaptis ŝin, kiam li estis for, ke la reĝo maltrankviliĝis. Li kredis ĉion, kion li vidis; li imagis ĉion, kion li ne vidis. Li precipe rimarkis, ke

la pantofloj de sia edzino estas bluaj, kaj ke la pantofloj de Zadig estas bluaj; ke la rubandoj de sia edzino estas flavaj, kaj ke la ĉapo de Zadig estas flava: tio konsistigis terurajn duonpruvojn por facile ofendigebla princo. La suspektoj aliĝis en certon en lia incitita spirito.

Ĉiuj sklavoj de gereĝoj estas plie spionoj pri iliaj sentoj. Oni baldaŭ komprenis, ke Astarta estas amema kaj Moabdar ĵaluza. Enviulo konsilis al Enviulino, ke ŝi sendu al la reĝo sian ŝtrumpligilon, kiu similis tiun de l'reĝino. Kiel plia malbonŝanco, tiu ŝtrumpligilo estis blua. La monarko tiam cerbumadis nur pri la maniero sin venĝi. Iun nokton li decidis veneni la reĝinon kaj pendigi Zadig ĉe la sunleviĝo. Ordonon pri tio estis donita al iu senkompata eŭnuko, plenumanto de l'reĝaj venĝoj. Tiam estis en la ĉambro de l'reĝo eta nano, kiu estis muta, sed ne surda. Oni ĉion permesis al li: en la plej sekretaj aferoj li estis ĉeestanto, kvazaŭ dombesto. Tiu mutuleto tre simpatiis al la reĝino kaj al Zadig. Li aŭdis kun tiom da surprizo, kiom da abomeno, prononci la ordonon pri ilia mortigo. Sed kiel fari, por averti pri tiu terura ordono, kiu estos plenumota post kelkaj horoj? Li ne sciis skribi; sed li lernis pentri kaj ĉefe kapablis similigi. Parton de la nokto li pasigis por krajone skizi, kion li volis komprenigi al la reĝino. Lia desegno montris, en iu angulo de la bildo, la reĝon, ekscitita pro kolerego, ordonantan al sia eŭnuko; bluan ŝnuron kaj vazon sur tablo, kun bluaj ŝtrumpligiloj kaj flavaj rubandoj; la reĝinon, en la mezo de la bildo, agoniantan en la brakoj de ĉambristinoj, kaj Zadig, strangolatan ĉe ŝiaj piedoj. La horizonto montris leviĝantan sunon, por komprenigi, ke tiu abomeninda

ekzekuto estas okazonta ĉe la unuaj sunradioj. Tuj kiam li estis fininta sian verkon, li kuris al iu ĉambristino de Astarta, vekis kaj komprenigis al ŝi, ke tiu desegno devas tuj esti liverata al la reĝino.

Dume, en la meznokto, oni frapas kontraŭ la pordon de Zadig; oni vekas lin; oni donas al li leteron de P'reĝino; li dube kredas, ke temas pri sonĝo; per tremanta mano li malfermas la leteron. Kia estis lia surprizo, kaj kiu povus priskribi la konsternon kaj la malesperon, per kiuj li estis dispremita, kiam li legis jenajn parolojn:

»Vi tuj fuĝu, aŭ oni mortigos vin! Fuĝu, Zadig, tion mi ordonas al vi en la nomo de nia amo kaj de miaj flavaj rubandoj. Mi ne kulpigis; sed mi sentas, ke mi mortos krime.«

Zadig povis apenaŭ paroli. Li ordonis, ke oni venigu Kador, kaj nenion dirante, donis al li la letereton. Kador devigis lin obei kaj senprokraste voji al Memfiso:

— Se vi riskas iri al la reĝino, li diris al Zadig, vi akcelas ŝian morton; se vi parolas al la reĝo, vi ankaŭ pereigas ŝin. Mi prizorgos ŝian destinton; sekvu la vian. Mi diskonigos, ke vi vojas al Hindio. Baldaŭ mi venos al vi, kaj mi sciigos vin pri tio, kio okazis en Babilono.

Samtempe Kador lokigis du kamelojn el la plej rapidpaŝaj apud sekreta pordo de la palaco; li suprenlevigis Zadig, kiun oni devis porti kaj kiu estis preskaŭ agonianta. Nur unu servisto akompanis lin, kaj baldaŭ Kador, dronante en miro kaj doloro, ne plu vidis sian amikon.

Tiu famega fuĝanto, alveninte ĉe la bordo de monteto, de kie oni vidis Babilonon, turnis la rigardon al la palaco de P'reĝino kaj svenis; li rekonsciigis nur por



plori kaj deziri morton. Fine, post kiam li pripensis la destinon de la plej aminda el la virinoj kaj de la unuaranga reĝino en la mondo, li rememoris pri si mem kaj ekkriis:

— Kio estas do la homa vivo! Ho virto! por kio vi utilas al mi? Du virinoj malinde trompis min; la tria, kiu ne estas kulpa kaj kiu estas pli bela ol la aliaj, estas mortonta! Ĉio, kion mi posedas, estis ĉiam por mi nur fonto el malfeliĉaĵoj, kaj mi estis levita ĝis la plej alta rango nur por fali en la plej teruregan abismon el malbonsorto. Se mi estus malbonulo, kiel tiom da aliaj homoj, mi estus kiel ili feliĉa. Dispremite per tiuj malfeliĉaj pripensoj, kun okuloj kovritaj per vualo de doloro, kun morta palo sur la vizaĝo kaj kun la animo enabismigita en la profundo el malserena malespero, li daŭrigis sian vojaĝon al Egiptio.

## ĈAPITRO IX

### Batita virino

Zadig sin orientis per la steloj. La konstelacio de Orion kaj la brila astro Sirius gvidis lin al la poluso de Kanopus. Li admiris tiujn vastajn globojn el lumo, kiuj en niaj okuloj aspektas nur kiel malfortaj fajreroj, dum la tero, kiu ja estas nur nevidebla punkto en la naturo, aspektas al nia akiremo io tiom granda kaj tiel nobla. Tiam li prezentis al si la homojn, kiaj ili efektive estas, insektoj buĉantaj unuj la aliajn sur eta atomo da koto. Tiu bildo vera ŝajnis neniigi liajn malfeliĉaĵojn vere priskribante la neniecon de lia esteco kaj tiun de Babilono. Lia animo antaŭensaltis ĝis en la

senlimeco kaj, liberigita el siaj sentumoj, rigardadis la senŝanĝan ordon de la universo. Sed, kiam poste, pro spirita kaj kora rekonsciigo, li pensis, ke Astarta eble mortis pro li, la universo malaperis for de liaj okuloj; li vidis en la tuta naturo la mortantan Astartan kaj la malbonŝancon Zadig.

Dum li estis okupata per tiu alterneco de noblega filozofio kaj de dispremega sufero, li antaŭeniris al la landlimo de Egiptio, kaj jam lia servisto estis en la unua urbeto, kie li serĉis loĝejon. Dume Zadig promenis al la ĝardenoj, kiuj kuŝis rande ĉe tiu vilaĝo. Proksime de l'granda vojo li vidis plorantan virinon, kiu porhelpe vokis al la ĉielo kaj al la tero, kaj furiozan viron, kiu postsekvis ŝin. Jam li atingis ŝin; ŝi kisis liajn genuojn. Tiu viro superŝutis ŝin per batoj kaj riproĉoj. Laŭ la kolerego de la Egipto kaj laŭ la pardonpetado de l'sinjorino li juĝis, ke unu estas ĵaluza kaj la alia estis malfidela; sed post observo al tiu virino, kiu estis kortuŝe bela, kaj kiu similis iom al Astarta, li sentis por ŝi kompatemon kaj abomenon por la Egipto.

— Helpu min, ŝi ekkriis kun plorsingultoj kaj sin turnante al Zadig; forprenu min el la manoj de la plej barbara el la viroj; savu mian vivon.

Ĉe tiuj krioj Zadig kuris, por apartigi ŝin de tiu barbaro. La egiptan lingvon li konis iom. Tiulingve li diris:

— Se vi havas iom da humano, mi petegas, ke vi respektu la belon kaj la malforton. Kiel vi povas tiel difekti ĉefverkon de la naturo, kiu genuas ĉe viaj piedoj kaj havas por sia defendo nur larmojn?

— Ha! diris al li tiu koleregulo, ci ankaŭ amas ŝin! kaj je ci mi devas venĝi min.

Dirante tiujn vortojn, li lasas la sinjorinon, kiun li tenis per unu mano ĉe la haroj, kaj, prenante sian lancon, li celas trapiki la fremdulon. Ĉi tiu, kiu estis malvarmasanga, facile evitis la baton de l'furiozulo. Li kaptis la lancon ĉe la mantenilo, per kiu ĝi estis provizita. Unu volas ĝin retiri, la alia ĝin forpreni. Ĝi rompiĝas inter iliaj manoj. La Egipto elingigas sian spadon; Zadig armas sin per la sia. Ili atakas unu la alian. Tiu donas cent batojn tro rapidajn; ĉi tiu lerte ilin evitas. La sinjorino, sidante sur razeno, rearanĝas siajn harojn kaj rigardas ilin. La Egipto estis pli fortika ol lia kontraŭulo; Zadig estis pli lerta. Ĉi tiu batalis kiel homo, kies kapo gvidas la brakon, kaj tiu kiel furiozulo, kies blinda kolero gvidas sencele la movojn. Zadig proksimiĝas al li kaj lin senarmigas; kaj dum la Egipto, iĝinta pli furioza, volas sin ĵeti sur lin, li kaptas lin, premas lin, faligas lin, tenante sian spadon kontraŭ lia brusto; li proponas indulgi lian vivon. Duonfreneziginte la Egipto elingigas sian ponardon; per ĝi li vundas Zadig en la momento mem, kiam la venkanto pardonis lin. Indignite, Zadig trapikas lian bruston per sia spado. La Egipto aŭdigas teruran krion kaj mortas baraktante. Tiam Zadig antaŭeniras al la sinjorino kaj per obeema voĉo diras al ŝi:

— Li devigis min mortigi lin: mi venĝis vin; vi estas liberigita el la plej kolerema viro, kiun iam mi vidis. Kion vi deziras de mi nun, sinjorino?

— Ke ci mortu, krimegulo, ŝi respondis al li, ke ci mortu; ci mortigis mian amanton; mi volus povi disŝirician koron.

— Vere, sinjorino, vi havis strangan viron kiel amanton; ĉiuforte li batis vin, kaj li volis mortigi min, tial ke vi petegis min, ke mi savu vin.

— Mi volus, ke li batu min ankoraŭ, ree parolis la sinjorino kriante. Tion mi tre meritis, ĉar mi kaŭzis, ke li fariĝu ĵaluza. Bedaŭrinde la ĉielo ne permesis, ke li min ankoraŭ batu, kaj ke ci mem estu kadavro!

Zadig, pli surprizite kaj pli koleriĝinte ol iam ajn en sia vivo, diris al ŝi:

— Sinjorino, kvankam vi estas bela, tamen vi meritis, ke miavice mi batu vin, tiel ekstravaganca vi estas; sed mi ne penos tion fari.

Ĉe tiuj paroloj li reiris sur sian kamelon kaj antaŭeniris al la urbeto. Apenaŭ li estis for je kelkaj paŝoj, kiam li rigardis malantaŭen pro la bruo, kiun faris kvar kurieroj el Babilono. Ili rajdis galopege. Unu el ili, vidante tiun virinon, ekkriis:

— Estas ŝi mem; ŝi similas al la portreto, kiun oni priskribis al mi.

Ili ne atentis la mortinton kaj tuj kaptis la sinjorinon. Senĉese ŝi kriis al Zadig.

— Bonkora fremdulo, helpu min ankoraŭ unu fojon: mi petas pardonon pro tio, ke mi plendis pri vi. Helpu min, kaj mi estos via ĝis la morto.

Lia emo batali de nun por ŝi estis forpasinta.

— Turnu vin al aliaj, li respondis; vi ne plu trompos min.

Cetere li estis vundita, lia sango fluis; li bezonis helpon, kaj la vido al la kvar Babilonanoj, verŝajne senditaj de l'reĝo Moabdar, naskis en li egan maltrankvilon. Li antaŭeniras rapide al la vilaĝo, ne komprenante, kial kvar kurieroj el Babilono venis por kapti tiun Egiptinon, sed estante eĉ pli mirigita pro la karaktero de tiu sinjorino.

## ĈAPITRO X

## Sklaveco

Dum li eniris egiptan urbeton, li estis ĉirkaŭita de l'popolo. Ĉiu kriis:

— Jen tiu, kiu forrabis la belan Misufa kaj kiu ĵus murdis Kletofis.

— Sinjoroj, li diris, Dio gardu min kontraŭ tio, ke iam mi forrabu vian belan Misufa; ŝi estas tro kaprica; kaj, rilate al Kletofis, mi ne murdis lin; mi nur defendis min kontraŭ li. Li volis mortigi min, tial ke tre humile mi petis al li pardonon por la bel' misufa, kiun senkomplete li batis. Mi estas fremdulo, kiu venas por serĉi azilon en Egiptio; k sekve ne povas esti, ke venante por peti vian protekton, mi komencus forrabi virinon kaj murdi viron.

Tiutempe la Egiptoj estis justaj kaj humanaj. La popolo kondukis Zadig al la urbdomo. Unue oni bandagis lian vundon, kaj poste oni explore demandis lin kaj lian serviston, aparte, por ekscii la veron. Oni ekkonis, ke Zadig ne estas murdinto; sed li kulpis pro la morto de homo: la leĝo kondamnis lin esti sklavo. Profite al la urbeto oni vendis liajn du kamelojn; oni disdonis al la loĝantoj la tutan oron, kiun li kunportis; li kaj lia kunvojaĝanto estis vendecele ekspoziciataj sur publika placo. Araba komercisto, nomita Setok, aŭkcie pliproponis; sed la servisto, pli taŭga por pena laboro, estis vendita pli kare ol lia mastro. Ambaŭ viroj estis inter si nekomparindaj. Zadig estis do subigita al sia lakeo: oni ligis ilin kune per ĉeno ĉirkaŭ la kruroj, kaj en tiu stato ili sekvis la araban komerciston ĝis lia

domo. Zadig, survoje, konsolis sian serviston kaj admonis lin esti pacienca; sed laŭkutime, li faris rimarkojn pri la homa vivo.

— Mi vidas, li diris al si, ke la malfeliĉaĵoj de mia destino disŝutiĝas sur la cian. Ĝis nun ĉio okazis al mi laŭ tre stranga maniero. Mi estas monpunita, tial ke mi vidis preterpasi hundinon, mi preskaŭ estis palisumita pro iu grifo; mi estis mortkondamnita pro tio, ke mi faris versojn, laŭdantaj la reĝon; mi preskaŭ estis strangolita, tial ke la reĝino havis flavajn rubandojn, kaj jen mi estas kun ci sklavo, tial ke malbonulo batis sian amatinon. Nu, ni ne malkuraĝiĝu; ĉio tio eble havos finon; necesas, ke la arabaj komercistoj havu sklavojn, kaj kial mi ne estus unu el ili? Tiu komercisto ne estos senkompata; necesas, ke li bontraktu siajn sklavojn, se li deziras ricevi servojn de ili.

Tiel li parolis kaj en la fundo de sia koro svarmis pensoj pri la sorto de la Babilona reĝino.

Setok, la komercisto, du tagojn poste foriris al la Dezerta Arabio kun siaj sklavoj kaj siaj kameloj. Lia tribo loĝis en la ĉirkaŭo de la dezerto Horeb<sup>1</sup>. La vojaĝo estis longa kaj peniga. Survoje, Setok pli ŝatis la serviston ol la mastron, tial ke la unua pli bone ŝarĝis la kamelojn, kaj ĉiujn etajn favoraĵojn li ricevis.

Du tagojn antaŭ ol alveni ĉe Horeb, mortis kamelo: ĝia ŝarĝo interdividite estis metita sur la dorson de ĉiu el la servistoj; Zadig ricevis sian parton. Setok ekridis, vidante ĉiujn siajn sklavojn kurbigite marŝi. Zadig kuraĝis klarigi ties motivon kaj instruis lin pri la leĝoj

<sup>1</sup> La monto Horeb, apud kies piedo etendiĝas tiu dezerto, situas nord-okcidente de l'Sinajo.

de ekvilibro. Mirigite la komercisto komencis havi por li alian konsideron. Vidante, ke li naskis scivolemon en sia mastro, Zadig plifortigis ĝin, instruante al li multajn aferojn, kiuj rilatis al lia komerco: pri la specifa pezo de l'metaloj kaj de l'varoj en egala volumeno; pri la kvalitoj de pluraj bestoj utilaj, pri la rimedo por bredi bestojn utiligcele; fine li ŝajnis esti saĝulo en la okuloj de l'komercisto. Setok preferis lin je lia kamarado, kiun li tiel ŝatis. Li traktis Zadig bone kaj ne havis motivon por bedaŭri tion.

Alveninte en sian tribon, Setok denove petis la kvin cent uncojn da arĝento, kiujn li estis pruntedoninta al iu Hebreo en la ĉeesto de du atestantoj; sed intertempe la du atestantoj mortis, kaj la Hebreo sciante, ke oni ne povas liveri pruvon pri la prunto, proprigis al si la arĝenton de l'komercisto, dankante al Dio pro tio, ke ĝi donis al li rimedon por trompi Arabon. Setok konfidis sian ĉagrenon al Zadig, kiu estis fariĝinta lia konsilanto.

— En kiu loko, demandis Zadig, vi pruntedonis viajn kvin cent uncojn al tiu idolano?

— Sur larĝa ŝtono, respondis la komercisto, kiu kuŝas apud la monto Horeb.

— Kia estas la karaktero de via ŝuldanto? diris Zadig.

— Tiu fripono, ree parolis Setok.

— Sed mi demandas al vi, ĉu li estas incitiĝema aŭ flegma, sagaca aŭ malprudenta?

— El ĉiuj ŝuldemuloj, kiujn mi konas, diris Setok, li estas la plej incitiĝema.

— Nu, bone! insistis Zadig, permesu, ke mi pledu vian aferon antaŭ la juĝisto.

Efektive, li venigis ordone la Hebreon antaŭ la juĝiston kaj tiam li pledis jene:

— Apogante al la trono de justo, en la nomo de mia mastro, mi venas por postuli, ke tiu viro redonu la kvin cent uncojn da arĝento, kiujn li volas proprigi al si.

— Ĉu vi havas atestantojn? diris la juĝisto.

— Ne, ili mortis; sed restas larĝa ŝtono, sur kiu la mono estis kalkulata; kaj se plaĉas al Via Juĝista Moŝto ordoni, ke oni venigu la ŝtonon, mi esperas, ke ĝi atestos; mi kaj la Hebreo restos ĉi tie, ĝis la ŝtono estos alveninta; mi venigos ĝin je la kosto de Setok, mia mastro.

— Tre volonte, diris la juĝisto. Kaj li komencis prizorgi aliajn aferojn. Ĉe la fino de la kunsido;

— Nu! li diris al Zadig, ĉu alvenis via ŝtono?

La Hebreo ridante respondis:

— Via Moŝto restus ĉi tie ĝis morgaŭ, kaj la ŝtono ne ankoraŭ estus alveninta; ĝi kuŝas je pli ol ses mejlojn de ĉi tie, kaj necesus dek kvin homoj por movi ĝin.

— Nu! ekkriis Zadig, ĉu mi ne prave diris, ke la ŝtono atestos; ĉar tiu viro scias, kie ĝi estas, li do konfesas, ke sur ĝi la mono estis kalkulata.

Konfuzetite la Hebreo baldaŭ estis devigata konfesi ĉion. La juĝisto ordonis, ke li estu ligota al la ŝtono kaj ne ricevu ion por manĝi aŭ por trinki, ĝis li estos redoninta la kvin cent uncojn da arĝento, kio tre baldaŭ okazis.

La sklavo Zadig kaj la ŝtono ĝuis egan ŝatatecon en Arabio.



## ĈAPITRO XI

## Brulejo

Ravite, Setok faris el sia sklavo sian amikon intiman. Same kiel la reĝo de Babilono, li ĉiam bezonis lin, kaj Zadig estis bonŝanca pro tio, ke Setok estis senedzina. Li ektrovis en sia mastro naturan bonfaremon, multe da justemo kaj da simpla saĝo. Li estis ĉagrenita konstati, ke li adoras la ĉielan armeon, t. e. la sunon, la lunon kaj la stelojn, laŭ la malnova kutimo el Arabio. Pri tio li kelkfoje parolis al li tre diskrete. Fine li diris al li, ke ili estas korpoj kiel la aliaj, kiuj ne pli meritas lian respekton ol arbo aŭ roko.

— Sed, diris Setok, ili estas eternaj estaĵoj, el kiuj ni tiras ĉiujn niajn profitojn; ili animas la naturon, ili reguligas la sezonojn; ili cetere estas tiom malproksimaj de ni, ke oni nepre respektegas ilin.

— Vi ricevas pli da profito, respondis Zadig, el la akvaro de l'Ruĝa Maro, kiu portas viajn varojn al Hindio. Kial ĝi ne estus tiel malnova kiel la steloj? Kaj se vi adoras tion, kio estas for de vi, vi devas adori Gangaridion<sup>1</sup>, kiu estas ĉe la ekstremaĵo de l'mondo.

— Ne, diris Setok, la steloj estas tiel brilegaj, ke mi ne povas ne adori ilin.

Kiam noktiĝis, Zadig lumigis grandan nombron da torĉoj en la tendo, kie li estis vespermanĝonta kun Setok; kaj tuj kiam alvenis la mastro, li ekgenuis antaŭ la lumigiloj kaj diris: »Eternaj kaj brilaj lumoj, ĉiam favoru min!« Eldirinte tiujn vortojn, li altablighis, ne rigardante al Setok.

<sup>1</sup> La Gangaridoj, antikva hindia popolo, okupis la nunan Bengalion.

— Kion vi do faras? diris Setok mirigite.

— Mi imitas vin, respondis Zadig; mi adoras tiujn kandelojn kaj malatentas ilian mastron kaj la mian.

Setok komprenis la profundan signifon de tiu apologo. La saĝo de lia sklavo penetris en lian animon; li ne plu malavaris sian incenson al la kreitaĵoj kaj adoris la Eternulon, kiu faris ilin.

Tiam en Arabio ekzistis terura moro, origine veninta el Scitio, kaj kiu, post establiĝo en Hindio per la aŭtoritato de l'bramanoj, tendencis disvastiĝi tra tuta Oriento. Kiam edzo mortis kaj lia karega edzino, volis esti sankta, tiam ŝi bruligis sin publike sur la kadavro de sia edzo. Ĝi estis solena festo, kiun oni nomis *vidvina brulado*. La tribo, en kiu plej da virinoj sin bruligis, estis la plej estimata. Iu Arabo el la tribo de Setok mortis; lia edzino, nomita Almona, kiu estis tre pia, sciigis pri la tago kaj horo, en kiu ŝi sin jetos en la fajron ĉe la sono de tamburoj kaj trumpetoj.

Zadig admone klarigis al Setok, ke tiu abomeninda moro tute kontraŭas la bonstaton de l'homaro; kaj ĉiutage oni konsentis al la bruligado je vidvinoj junaj, kiuj povus naski civitanojn por la Ŝtato, aŭ almenaŭ eduki la jam naskitajn infanojn; kaj li sukcesis konvinki lin, ke oni devas, se eble, aboli tiel barbaran kutimon. Setok respondis:

— Jam de pli ol mil jaroj la virinoj povas siadezire sin bruligi. Kiu el ni kuraĝos ŝanĝi leĝon, kiun la tempo konfirmis? Ĉu estas io pli respektinda ol malnova kutimo eĉ maljusta?

— La racio estas pli malnova, rebatis Zadig. Vi parolu al la estroj de l'triboj, kaj mi iros por viziti la junan vidvinon.

Li prezentigis sin al ŝi; kaj post kiam li lerte akiris ŝian simpatian per laŭdoj al ŝia belo, post kiam li diris al ŝi, kiel damaĝe estas meti en fajron tiom da ĉarmoj, li plie laŭdis ŝin pro ŝia konstanto kaj ŝia kuraĝo, tiam li diris demande:

— Vi eksterordinare amis vian edzon?

— Mi? tute ne, respondis la Arabino. Li estis brutala, ĵaluza, ne tolerebla; sed mi firme decidis min ĵeti en la brulejon.

— Kredeble, diris Zadig, esti vive bruligita, tio kaŭzas tre delikatan plezuron.

— Ha! tio tremigas la naturon, diris la sinjorino; sed oni devas tion elsuferi. Mi estas pia; mi perdis mian bonan reputacion, kaj ĉiuj mokas min, se mi ne bruligus min.

Post kiam Zadig konsentigis ŝin pri tio, ke ŝi sin bruligos pro alies opinio kaj pro vento, li longe parolis al ŝi laŭ maniero, kiu estis vivinstiga, kaj li eĉ atingis vekti amemon por tiu, kiu al ŝi parolis.

— Kion vi do farus, li diris al ŝi, se vi estus liberigita je via vanta sinbruligemo?

— Ho ve! diris la sinjorino, mi kredas, ke mi petus, ke vi edzinigu min.

Zadig estis tro saturita per amo al Astarta por ne lerte kontraŭi al tiu propono; sed li tuj iris renkonte al la tribestroj, raportis al ili tion, kio okazis, kaj konsilis, ke ili faru leĝon, laŭ kiu estos permesate al vidvino sin bruligi nur post unuhora interparolado duopa kun junulo. De tiu tempo neniu sinjorino sin bruligis en Arabio. Nur al la sola Zadig oni estis danksulda pro tio, ke en unu tago li abolis tian kruelan moron, kiu daŭris jam de multaj jarcentoj. Li do estis la bonfaranto de Arabio.

## ĈAPITRO XII

## Vespermanĝo

Setok, kiu ne povis disiĝi de tiu homo, en kiu sidis saĝo, kunvenigis lin al foirego en Basora<sup>1</sup>, kien devis iri la plej grandaj negocistoj el la loĝeblaj lokoj surtere. Tio estis por Zadig impresa konsolo vidi tiom da homoj el diversaj regionoj, kunvenintaj en saman lokon. Ŝajnis al li, ke la universo estas granda familio, kiu kunvenas en Basora. Tuj, la duan tagon, li renkontigis ĉetabile kun Egipto, gangarida Hindo, Ĉino, Greko, Kelto kaj pluraj aliaj fremduloj, kiuj, dum siaj oftaj vojaĝoj al la golfo de Arabio, lernis sufiĉe da araba lingvo por komprenigi sin. La Egipto ŝajnis tre kolera.

— Kia abomena loko estas Basora! li diris; tie oni rifuzas pruntedoni mil uncojn da oro al mi kontraŭ la plej valora garantiaĵo el la mondo.

— Kiel do! diris Setok, kiu estas la garantiaĵo, pri kiu oni rifuzis al vi tiun sumon?

— Ĝi estas la kadavro de mia onklino, respondis la Egipto; ŝi estis la plej bonkora virino el Egiptio. Ĉiam ŝi akompanis min; ŝi mortis survoje; el ŝia korpo mi faris unu el la plej belaj mumioj, kiujn ni havas, kaj en mia lando mi povus ricevi ĉion ajn, kion mi deziras, donante ĝin kiel garantiaĵon. Estas tre strange, ke oni ne volas ĉi tie doni al mi nur mil uncojn da oro kontraŭ tiom solida garantiaĵo.

Koleregante li estis ekmanĝonta pecon da bonega bolita kokino, kiam la Hindo, kaptante lian manon, ekkriis ĉagrene:

<sup>1</sup> Urbo de azia Turkio, apud Sat-el-Arab, ne malproksime de la Persa golfo. Komerca centro.

— Ha! kion vi estas faronta?

— Manĝi da ĉi tiu kokino, diris la mumiposedanto.

— Gardu vin kontraŭ tio, diris la Hindo; povas esti, ke la animo de l'mortantino transiris en la korpon de ĉi tiu kokino, kaj vi ne volus riski manĝi vian onklinon. Kuiru kokinojn, tio evidente estas ofendi la naturon.

— Kion signifas via naturo kaj viaj kokinoj? ree parolis la kolerema Egipto; ni adoras bovon<sup>2</sup> kaj tamen manĝas bovaĵon.

— Vi adoras bovon! ĉu vere? diris la Gangesano<sup>3</sup>.

— Neniu estas pli certa, rapide respondis la demandito; jam de cent tridek kvin mil jaroj ni tion faras, kaj ĉe ni neniuj kontraŭas al tio.

— Ha! cent tridek kvin mil jaroj! diris la Hindo; tiu kalkulo estas iom troa; Hindio estas loĝata nur de okdek mil jaroj, kaj certe ni estas viaj prauloj; kaj Bramo malpermesis al ni manĝi bovojn, antaŭ ol vi pensis pri la maniero suraltarigi ilin kaj rosti.

— Via Bramo estas stranga besto, neniel komparinda al Apis, diris la Egipto; kion do bela faris via Bramo?

La bramano respondis:

— Estas li, kiu instruis la homojn legi kaj skribi, kaj al li ĉiuj teranoj devas danki pro la invento de la ŝako.

<sup>2</sup> Temas pri Apis, dio adorita en antikva Egiptio sub formo de nigra bovo, kun blanka, kvadrata makulo sur la frunto kaj marko simila al duonluno sur la dekstra flanko. Ĝi estis nutrita en Memfiso, havis du templojn kaj orakolis tie. Fine de sia 25-a jaro ĝi estis dronigata kaj pompe enterigata en la Serapeo.

<sup>3</sup> De Gangeso, hinda riverego.

— Vi eraras, diris iu Ĥaldeo apudsidanta; al la fiŝo Oanes<sup>4</sup> oni ŝuldas tiujn tiom egajn bonfarojn, kaj konvenas respektive komplimenti nur al ĝi. Estas ĉies konsento, ke ĝi estis dia estulo, kiu havis orumitan voston, kun bela homa kapo, kaj ke ĝi elakviĝis ĉiutage por predikadi surtere dum tri horoj. Ĝi havis plurajn idojn, kiuj fariĝis reĝoj, kiel estas bone konate. Ĝian portreton mi havas hejme, kaj ĝin mi respektegas laŭdeve. Oni povas manĝi bovaĵon laŭplaĉe, sed estas certe tre granda malpiaĵo kuiri fiŝaĵon; cetere vi ambaŭ havas ne sufiĉe da nobeleco kaj ĝi estas tro freŝdata por konkuri kun mi. La egipta nacio estas nur cent, tridek kvin mil jarojn malnova, kaj la Hindoj fanfaronas nur je okdek mil, dum ni havas almanakojn pri kvar mil jarcentoj. KREDU MIN, forlasu viajn malsaĝaĵojn, kaj mi donacos al ĉiu el vi belan portreton pri Oanes.

La Ĉino ekparolante diris:

— Mi havas grandan respekton por la, Egiptoj, la Ĥaldeoj, la Grekoj, la Keltoj, por Bramo, la bovo Apis, la bela fiŝo Oanes; sed eble Li aŭ Tien<sup>5</sup>, ne gravas la nomo, ne estas malpli valora ol la bovoj kaj la fiŝoj. Nenion mi diros pri mia lando; ĝi estas tiom granda, kiom Egiptio, Ĥaldeio kaj Hindio kune. Pri malnovo mi ne disputos, tial ke sufiĉas esti feliĉa, kaj tial ke esti malnova, tio estas malgrava; sed rilate almanakojn, mi volonte diros, ke tuta Azio utiligas la niajn, kaj da ili ni havis tre bonajn, antaŭ ol la aritmetiko estis konata en Ĥaldeio.

<sup>4</sup> Ĥaldea dio, duon-homo, duon-fiŝo, kiu eliris el la Eritrea maro por instrui al la homoj artojn, terkulturon kaj leĝojn.

<sup>5</sup> Ĉinaj vortoj kun signifo: li=la natura lumo, tien==la ĉielo; ili signifas ankaŭ *Dio* (*Noto de Volter*).

— Vi ĉiuj senescepte estas tre malkleraj! ekkriis la Greko: ĉu do vi ne scias, ke la kaoso estas ĉion kreinta, kaj ke la formo kaj la materio metis la mondon en ĝian nunan staton?

Longe parolis la Greko; sed fine haltigis lin la Kelto, kiu, multe trinkinte dum la disputado, opiniis, ke li estas pli klera ol ĉiuj aliaj, kaj diris blasfemante, ke nur Teŭtaĥ<sup>6</sup> kaj la kverka visko indas priparoladon; ke, siaprotekte, li ĉiam havas viskon en sia poŝo; ke la Scitoj, liaj prauloj, estis la solaj bonuloj iam ajn ekzistintaj en la mondo; ke, verdire, ili kelkfoje manĝis homojn, sed ke tio ne malhelpas, ke oni devas havi respekton por lia nacio.

Tiam akriĝis la disputo, kaj Setok komprenis, ke la tablo baldaŭ estos sange makulita. Zadig, kiu silentis dum la tuta disputado, fine ekstaris: unue li sin turnis al la Kelto, kiel al la plej furioza; li diris, ke li estas prava, kaj petis al li viskon; li laŭdis la Grekon pri lia elokvento, kaj kvietigis ĉiujn ekscititajn spiritojn. Malmulton li diris al la Ĉino, tial ke li estis la plej saĝa el ĉiuj. Fine li diris al ili:

— Amikoj miaj, vi senmotive disputas, ĉar vi samopinias.

Ĉe tiu diro ili ĉiuj protestis.

— Ĉu ne estas vere, li diris al la Kelto, ke vi ne adoras la viskon, sed tiun, kiu faris la viskon kaj la kverkon?

— Certe, respondis la Kelto.

<sup>6</sup> Dio galla, malluma kaj terura, la dio de l'nokto, kiu kondukis la animojn de l'mortintoj kaj estis ankaŭ la dio de l'inteligento kaj de l'milito. Oni adoris lin sub formo de kverko kaj oferbuĉis al li homojn.

— Kaj vi, sinjoro Egipto, ĉu vi ne respektegas en iu bovo tiun, kiu donis la bovojn?

— Jes, diris la Egipto.

— La fiŝo Oanes, li daŭrigis, certe malsuperas tiun, kiu faris la maron kaj la fiŝojn.

— Konsentite, diris la Ĥaldeo.

— La Hindo, li aldonis, kaj la Ĉino agnoskas kiel vi la ekziston de iu unua principo; mi ne tre bone komprenis la mirindan rezonadon de la Greko; sed mi estas certa, ke li ankaŭ konsentas pri la ekzisto de Superulo, de kiu dependas la materio kaj la formo.

La Greko, kiun oni admiris, diris, ke Zadig ĝuste komprenis lian penson.

— Vi do ĉiuj samopinias, ree parolis Zadig, kaj sekve ne ekzistas motivo por disputi.

Ĉiuj enbrakigis lin. Setok, vendinte siajn varojn tre kare, rekondukis sian amikon Zadig en sian tribon. Alveninte Zadig eksciis, ke dum lia foresto oni procese kondamnis lin je malrapida bruligado.



## ĈAPITRO XIII

## Rendevuo

Dum lia vojaĝo al Basora la pastroj de la steloj decidis puni lin. La juveloj kaj la ornamoj de la junaj vidvinoj, al kiuj ili predikis sinbruligon, apartenis al ili laŭleĝe; li sekve ne povis trovi indulgon ĉe tiuj pastroj. Ili do akuzis Zadig, ke li havas erarajn sentojn pri la ĉiela armeo; ili atestis kontraŭ lin kaj ĵuris, ke ili aŭdis lin diri, ke la steloj ne kuŝiĝas en la maron. Tiu terurega blafemo kolere tremigis la juĝistojn; ili emis disŝiri siajn vestojn, kiam ili aŭdis tiujn malpiajn parolojn, kaj tion ili farus, sendube, se Zadig povus pagi ties koston; sed en sia troa doloro ili kontentiĝis, kondamnante lin esti malrapide forbruligota. Malesperigite, Setok vane uzis sian aŭtoritaton por savi sian amikon; li baldaŭ estis devigata silenti.

Dume la juna vidvino, kiu nun tre ŝatis la vivon, kaj pri tio estis ŝulda al Zadig, decidis savi lin el la brulejo, pri kiu li komprenigis al ŝi ties troan uzon. Ŝi cerbumis sian projekton kaj pri ĝi parolis al neniu. Zadig estis ekzekutota la postan tagon; nur la nokton ŝi disponis por savi lin; kiel kompatema kaj prudenta virino, jen kiel ŝi procedis. Ŝi parfumis sin; ŝi plibeligis sin per la plej grandvalora kaj plaĉe eleganta kostumo kaj iris por peti sekretan aŭdiencon al la ĉefpastro de la steloj. Kiam ŝi estis antaŭ tiu respektinda maljunulo, ŝi parolis al li jene:

— Unuenaskita filo de l'granda Urso, frato de la Virbovo, kuzo de l'granda hundo (ĝi estis la titoloj de tiu pontifiko), mi venas konfesi al vi miajn skrupulojn. Mi tre timas esti farinta grandegan pekon, ne bruli-

gante min en la brulejo de mia kara edzo. Efektive, kion mi havis por konservi? Pereontan korpon, kaj kiu jam estos tute velkinta (dirante tion, ŝi suprentiris siajn longajn manikojn silkajn kaj vidigis siajn nudajn brakojn, mirinde belformaj kaj forloge blankaj). Vi vidas, ŝi diris, kiom malmulte valoras ĉi tio.

La pontifiko sentis, ke tio estas multvalora. Liaj okuloj faris tian konfeson, kaj lia buŝo konfirmis ĝin; li ĵuris, ke neniam li vidis tiel belajn brakojn.

— Ho ve! diris al li la vidvino, eble miaj brakoj ne tiel difektiĝis kiel la cetero; sed vi konsentos, ke mia brusto ne indus mian zorgemon.

Tiam ŝi vidigis la plej belan mamon, kiun iam ajn la naturo formis. Kompare al ĝi rozburĝono sur ebura pomo aspektus nur kiel rubio<sup>1</sup> sur bukso, kaj ŝafidoj, elirantaj el lavujo ŝajnus flavbrunaj. Ŝiaj mamoj, ŝiaj grandaj okuloj nigraj, kiuj sopire rigardis milde brilante per amema fajro, ŝiaj vangoj kolorigitaj per la plej bela purpuro, miksitaj kun la blankaĵo el la plej pura lakto; ŝia plej belforma nazo; ŝiaj lipoj, kiuj similis al du borderaĵoj el koralo, entenantaj la plej belajn perlojn el la maro de Arabio, ĉio ĉi tio kredigis al la maljunulo, ke li estas dudekjaraĝa. Balbutante li faris amdeklaron. Almona, vidante lin ardanta, petis al li pardonon por Zadig.

— Ho ve! li diris, bela sinjorino, se mi konsentus al vi lian pardonon, mia malsevero neniel utilis; necesas, ke tri aliaj kolegoj miaj ankaŭ subskribu tiun pardonpeton.

— Nu, jam vi mem subskribu, diris Almona.

<sup>1</sup> Planto el fam. rubiacoj, kies radikoj liveras specialan ruĝon. — Trad.

— Volonte, diris la pastro, kondiĉe, ke via amfavo estos la prezo de mia konsentemo.

— Vi tre honoras min, diris Almona; mi petas nur, ke vi bonvolu veni en mian ĉambron post la sunsubiro, kaj tuj kiam la brila stelo *Seat*<sup>2</sup> kuŝos ĉe la horizonto, vi trovos min sur rozkolora sofo kaj vi agos laŭpove kun via servantino.

Si tiam foriris, kunportante la subskribon kaj lasis la maljunulon amplena kaj duba pri sia amorkapablo. Li pasigis la reston de l'tago sin banante; li trinkis likvoron, konsistantan el cinamo el Cejlono, kaj el multvaloraĵoj spicoj el Tidor kaj el Ternate,<sup>3</sup> kaj kun malpacienca atendis, ke la stelo *Seat* ekaperu.

Dume la bel'Almona iris viziti la duan pontifikon. Ĉi tiu asertis al ŝi, ke la suno, la luno kaj ĉiuj steloj sur la firmamento estas nur erarlumoj, kompare kun ŝiaj logaĵoj. Si faris al li la saman pardonpeton kaj por akiri ĝin konsentis pagi la saman prezon. Si donis al la dua pontifiko rendezvuon je la apero de la stelo *Algenib*. Poste ŝi vizitis la trian kaj kvaran pastrojn, ĉiam akirinte subskribon kaj donante rendezvuon de stelo al stelo. Tiam ŝi petis al la juĝistoj, ke ili venu en ŝian hejmon pro grava afero.

Ili venis tien; ŝi montris al ili la kvar subskribojn kaj diris al ili, je kia prezo la pastroj vendis la pardonon por Zadig. Ĉiu el ili alvenis je la difinita horo; ĉiu tre miris vidante tie siajn kolegojn kaj eĉ pli, trovante la juĝistojn, antaŭ kiuj ilia hontindaĵo estis malkaŝita. Zadig estis savita. Setok estis tiel ravita pri la lerto de Almona, ke li edzinigis ŝin al si.

<sup>2</sup> *Seat* kaj *Algenib* estas steloj el la Pegazo-Kvadrato.

<sup>3</sup> *Tidor* kaj *Ternate*, insuletoj de l'Moluka arkipelago, ne malproksime de l'Filipinoj.

## ĈAPITRO XIV

## Danco

Pro siaj negocaj aferoj Setok devis iri en la insulon Serendib<sup>1</sup>; sed dum la unua monato de sia edziĝo, kiu estas, kiel sciante, la miela tempo de la geedza vivo, ne eblis al li forlasi sian edzinon, nek kredi, ke iam ajn li povus ŝin forlasi. Li petis al sia amiko Zadig, ke li bonvolu anstataŭi lin en tiu vojaĝo.

— Ho ve! diris Zadig, ĉu do mi devas ankoraŭ plilongigi la distancon inter la bel' Astarta kaj mi? Sed mi devas servi al miaj gebonfarintoj. Li diris, li ploris, kaj li foriris.

Li ne estis de longe sur la insulo Serendib, kiam baldaŭ oni konsideris lin kiel eksterordinarulon. Li fariĝis inter la negocistoj la arbitracianto pri ĉiuj iliaj malkonsentoj, la amiko de l'saĝuloj, la konsilanto de la malmultaj homoj, kiuj petas konsilon. La reĝo volis vidi kaj aŭdi lin. Li baldaŭ povis sperti la valoron de Zadig; li fidis lian saĝon kaj amikiĝis kun li. La familiaro kaj la estimo de l'reĝo timigis Zadig. Nokte kaj tage saturis lin la malfeliĉo, kiun kaŭzis al li la afablaĵoj de Moabdar.

— Mi plaĉas al la reĝo, li diris; ĉu oni ne pendigos min? Tamen li ne povis eviti la karesojn de Lia Majeŝto, ĉar oni devas konfesi, ke Nabusan, reĝo de Serendib, filo de Nusanab, filo de Nabasun, filo de Sabunas, estis unu el la plej bonaj princoj el Azio; kiam oni parolis kun li, estis malfacile ne ami lin.

Tiu bona princo estis ĉiam laŭdata, trompata kaj priŝtelata: ĉiuj konkuris por ŝteli liajn trezorojn. La

<sup>1</sup> Insulo fama en la raportoĵoj de arabaj geografoj (eble Cejlono, Sumatro aŭ Madagaskaro).

ĉefa spezestro de la insulo Serendib ĉiam donis tiun ekzemplon, kiun fidele sekvis la aliaj. Tion la reĝo sciis; jam plurfoje li ŝanĝis spezestron; sed neniam li sukcesis ŝanĝi la kutimon dividi la enspezojn de l'reĝo en du neegalajn partojn, el kiuj la pli malgrandan ĉiam ricevis la reĝo kaj la pli grandan la administrantoj.

La reĝo Nabusan konfidis sian ĉagrenon al la saĝa Zadig.

— Vi, kiu scias tiom da belaj aferoj, li diris al li, ĉu vi konas rimedon, per kiu mi povus trovi spezestron, kiu ne priŝtelus min?

— Certe, respondis Zadig, mi konas nepre certan manieron, laŭ kiu mi havigos al vi honestulon.

Ravite, la reĝo kisis lin kaj demandis, kiel li devas fari.

— Sufiĉas, diris Zadig, ke vi dancigu ĉiujn, kiuj sin prezentos por kandidati la postenon da spezestro, kaj kiu plej facilmove dancos, tiu nepre estas la plej honesta.

— Vi ŝercas, diris la reĝo; jen estas amuza maniero por elekti spezestron. Kiel do! vi pretendas, ke kiu faros plej lertan dancosalton, tiu estas la plej honesta kaj kapabla financisto!

— Mi ne garantias, ke li estos la plej lerta, rapide respondis Zadig; sed mi certigas, ke li estos sen ia dubo la plej honesta.

Zadig parolis kun tiom da memfido, ke la reĝo kredis, ke li posedas kelkan supernaturan sekreton por ekkoni financistojn.

— Mi ne ŝatas la supernaturon, diris Zadig; la homoj kaj libroj kun miregindaĵoj ĉiam malplaĉis al mi. Se Via Reĝa Moŝto konsentas, ke mi faru la provon,

kiun al li mi proponas, ĝi certe konvinkigōs, ke mia sekreto estas la plej simpla kaj facila afero.

Nabusan, reĝo de Serendib, estis pli mirigita ĉe la ekscio, ke tiu sekreto estas simpla, ol se oni prezentus ĝin al li kiel miraklon.

— Nu, bone, li diris, agu laŭ via plaĉo.

— Estu trankvila, diris Zadig; vi profitos je tiu provo, pli ol vi povas supozi.

La saman tagon, en la nomo de la reĝo, li disvastigis la sciigon, ke ĉiuj, kiuj celas akiri la oficon de ĉefa spezestro de l'financoj de lia gracia majesto Nabusan, filo de Nusanab, devas veni, en vestoj el maldika silko, la unuan tagon de la luno de l'Krokodilo, en la antaŭĉambron de l'reĝo. Venis sesdek kvar kandidatoj. Oni venigis violonludistojn en apudan ŝalono; ĉio estis preparita por balo; sed la pordo de tiu salono estis ŝlosita, kaj por eniri ĝin oni devis laŭiri galerieton iom malluman. Pedelo venigis kaj enkondukis ĉiun kandidaton, unu post la alia, laŭ tiu trairejo, en kiu oni lasis lin sola dum kelkaj minutoj. La reĝo, kiu konis la artifikon, elmetis ĉiujn siajn trezorojn en tiu galerio. Kiam ĉiuj kandidatoj estis en la salono, Lia Reĝa Moŝto ordonis, ke oni dancigu ilin. Neniam oni dancis tiom peze kaj tiel malgracie; ili ĉiuj mallevigis la kapon, kurbigis la dorson, kun la manoj almetitaj kontraŭ iliaj flankoj.

— Kiaj friponoj! diris Zadig mallaŭte.

Nur unu paŝis facilmove, kun levita kapo, kun maltima rigardo, kun la brakoj etenditaj, kun rekta korpo, kun firma poplito.

— Ha! jen honestulo! bonulo! diris Zadig.

La reĝo enbrakigis tiun lertan danciston kaj elektis lin kiel spezestron, kaj ĉiuj aliaj estis plej juste punitaj

kaj riproĉitaj laŭmerite, tial ke ĉiu el ili, dum sia ĉeesto en la galerio, plenigis siajn poŝojn kaj povis apenaŭ marŝi. La reĝo bedaŭris konstati la friponemon de l'homoj per la fakto, ke el sesdek kvar dancistoj sesdek tri estas friponoj. La malluma galeĝio estis nomita *la koridoro de la Tonto*.

En Persio oni palisumus tiujn sesdek tri sinjorojn; en aliaj landoj, oni starigus specialan tribunalon por juĝi ilin kaj tio kostus trioble pli ol la ŝtelita mono kaj rehavigus neniom al la suvereno; en alia reĝlando, ili sukcesus pravigi sin kaj senfavorigi tiun facilmovan danciston: en Serendib ili estis kondamnitaj nur je pli-grandigo al la publika trezoro, tial ke Nabusan estis tre malsevera.

Li ankaŭ estis tre dankema; li donacis al Zadig sumon pli grandan ol tiun, kiun iu ajn spezestro iam ajn ŝtelis al sia mastro, la reĝo. Zadig utiligis ĝin por sendi kurierojn al Babilono, por akiri informojn pri la sorto de Astarta. Lia voĉo tremis, donante tiun ordonon, lia sango refluis al lia koro; liaj okuloj ne plu vidis la lumon, lia animo estis preta por lin forlasi. La kuriero foriris. Zadig vidis lin ensipiĝi; li revenis ĉe la reĝon, vidante nenium, kredante esti en sia ĉambro, kaj eldirante la nomon amo.

— Ha! la amo, diris la reĝo; ĝuste pri tio temas; vi divenis la kaŭzon de mia ĉagreno. Kia granda homo vi estas! mi esperas, ke vi instruos min pri la maniero ekkoni nepre fidelan virinon, same kiel vi havigis al mi honestan spezestron.

Zadig, rekonsciiĝinte, promesis al li servi lin rilate amon kiel rilate al financo, kvankam la afero ŝajnis eĉ pli malfacila.

## CAPITRO XV

## Bluaj Okuloj

La korpo kaj la koro, diris la reĝo al Zadig... Ĉe tiuj vortoj la Babilonano ne povis deteni sin intermeti al Lia Reĝa Moŝto.

— Kiel danka, li diris, mi estas al vi pro tio, ke vi ne diris: *la spirito kaj la koro!* ĉar oni aŭdas nur tiujn vortojn en la konversacioj el Babilono: oni vidas nur librojn, en kiuj temas pri la koro kaj la spirito<sup>1</sup>, verkitajn de senkoraj kaj senspritaĵaj personoj; sed, via reĝa moŝto, daŭrigu, mi petegas.

Nabusan daŭrigis jene:

— La korpo kaj la koro estas en mi destinitaj por ami; la unua el tiuj du kapabloj ĉiel estas kontenta. Ĉi tie mi havas je mia dispono cent virinojn; ĉiuj estas belaj, servemaj, eĉ voluptemaj, aŭ ŝajnigante esti tiaj kun mi. Sed mia koro tute ne ĝuas similan feliĉon. Mi jam tro spertis, ke oni multe karesas la reĝon de Serendib, kaj ke tre malmulte oni atentis al Nabusan. Vendire, mi ne kredas, ke miaj virinoj estas al mi fide-laj; sed mi volus trovi animon, kiu estus mia; por havi tian trezoron, mi donus la cent belulinojn, kies loga-fojn mi posedas. Vi bonvolu esplori, ĉu inter tiuj cent sultaninoj estas unu, kiu certe amas min.

Zadig respondis al li sammaniere kiel li faris pri la financistoj:

— Via Reĝa Moŝto, fidu min, sed unue permesu, ke mi disponu tion, kio estis elmetita en la galerio de

<sup>1</sup> Sago kontraŭ *Rollin*, la granda pedagogo de l'18-a jarc., kiu ofte uzas tiun esprimon en sia *Traktato de Studoj: la spirito kaj la koro*.



la Tendo; mi raportos al vi zorge pri tio, kaj nenion vi perdos.

La reĝo donis al li plenan rajton. Zadiĝ elektis en Serendib tridek tri ĝibuletojn el la plej malbelaj, kiujn li povis trovi, tridek tri paĝiojn el la plej belaj, kaj tridek tri bonzojn el la plej elokventaj kaj fortikaj. Al ĉiuj li lasis la liberon eniri en la ĉeloj de la sultaninoj, ĉiu ĝibuleto havis kvar mil ormonerojn por donaci; kaj tuj, en la unua tago, la ĝibuletoj estis kontentigitaj. La paĝioj, kiuj havis nenion por doni krom si mem, venkis nur post du aŭ tri tagoj. La bonzoj devis iom pli longe penadi; sed fine tridek tri piulinoj cedis. Tra latkurtenoj, kiuj ebligis vidon en ĉiujn ĉelojn, mirigite la reĝo vidis ĉiujn scenojn. El siaj cent virinoj naŭdek naŭ pekis antaŭ liaj okuloj. Restis nur unu tute juna, tute nova, kun kiu la reĝo neniam rilatis. Oni sendis al ŝi unu, du, tri ĝibulojn, kiuj proponis al ŝi eĉ dudek mil ormonerojn; ŝi ne cedis kaj eĉ ne povis defeni sin ridi ĉe la konstato, ke tiuj ĝibuloj povus pensi, ke mono povus fari, ke oni vidu ŝin malpli malbelaj. Oni prezentis al ŝi la du plej belajn paĝiojn; ŝi diris al ili, ke ŝia opinie la reĝo estas pli belstatura. Oni delegis al ŝi la plej elokventan el la bonzoj, kaj poste la plej aplombegan: ŝi trovis, ke la unua estas babilemulo kaj eĉ ne atentis la meriton de la dua.

— Nur la koro decidu, ŝi diris; neniam mi cedos al la oro de ĝibulo, nek al la ĉarmoj de junulo, nek al la forlogoj de bonzo; mi amos nur Nabusan, filon de Nusabab, kaj mi atentos, ke li konsentu min ami. La reĝo estis ravita pro ĝojo, miro kaj amemo. Li reprezentis la tutan monon, kiun li estis doninta al la ĝibuloj,

kaj donacis ĝin al la bel' Falida: tiel oni nomis tiun junan personon. Li donis al ŝi sian koron, kiun ŝi certe tre meritis. Neniam la junco floris pli brile; neniam la ĉarmoj de la belo estis tiel ravaj. Por ke la historio estu tute vera, necesas diri, ke ŝi mallerte riverencis; sed ŝi dancis kiel la feinoj, kantis kiel la sirenoj kaj parolis kiel la Gracioj: ŝi estis saturita je talentoj kaj virtoj.

La amata Nabusan adoris ŝin; sed ŝi havis blujajn okulojn, kaj el tio fontis plej grandaj malfeliĉaĵoj. Ekzistis malnova leĝo, kiu malpermesis al la reĝoj ami virinon el tiuj, kiujn la Grekoj poste nomis »bovokulaj«. Ĉefbonzo starigis tiun leĝon antaŭ pli ol kvin mil jaroj; ĝi estis por proprigi al si la amatinon de la unua reĝo de la insulo Serendib, ke tiu bonzo anatemis la blujajn okulojn per leĝo en la fundamenta konstitucio de la Ŝtato. Reprezentantoj de ĉiuj societoj el la imperio venis kaj faris admonojn al Nabusan. Oni publike diris, ke tre baldaŭ falos la reĝa regno; ke plejforta estas la abomeno; ke la tuta naturo estas minacata per malbonsigna evento; ke, unuvorte, Nabusan, filo de Nasanab, amas du grandajn okulojn blujajn. La ĝibuloj, la financistoj, la bonzoj kaj la brunokulinoj plenigis la reĝlandon per siaj ĝemoj. La sovaĝaj popoloj, kiuj loĝas en la sudo de Serendib, profitis tiun ĝeneralan malkontenton. Ili invadis la Ŝtatojn de l'bona Nabusan. Li petis helpmonon al siaj regatoj; la bonzoj, kiuj posedis la duonon de la ŝtataj rentoj, nur levis la manojn al la ĉielo kaj rifuzis mallevi ilin por ĉerpi el siaj kofroj kaj helpi al la reĝo. Ili faris kun muziko belajn preĝojn kaj lasis la ŝtaton suferi la atakon de l'barbaroj.

— Ho, mia kara Zadig, ĉu ci savos min el tiu terura embaraso? dolore ekkriis Nabusan.

— Tre volonte, respondis Zadig; vi ricevos monon de la bonzoj tiom, kiom vi volos. Vi tute malzorgu pri la bienoj, kie situas iliaj kasteloj, kaj defendu nur la viajn.

Tiel faris Nabusan; la bonzoj venis ĵeti sin al liaj piedoj kaj petegis lin pri helpo. La reĝo respondis al ili per bela muziko kun preĝoj al la ĉielo, por ke ili konservu siajn bienojn. Fine la bonzoj donis monon, kaj la reĝo venke finis la militon. Tial Zadig, per siaj saĝaj konsiloj oportunaj, kaj per la plej grandaj servoj, aliris sur sin la nerepacigeblan malamikecon de la plej potencaj homoj en la ŝtato. La bonzoj kaj la brunokulinoj ĵure decidis pereigi lin; la financistoj kaj la ĝibuloj ne indulgis al li; oni atingis, ke la bona Nabusan suspektu lin. La faritaj servoj ofte restas en la antaŭĉambro, kaj la suspektoj eniras la skribĉambron, laŭ la antaŭĉambro, kaj la suspektoj eniras la skribĉambron, laŭ la sentenco de Zoroastro: ĉiutage okazis novaj akuzoj; la unua estas forpuŝita; la dua tuŝetas, la tria vundas, la kvara mortigas.

Timigite Zadig, kiu bone prizorgis la aferojn de sia amiko Setok, kaj kiu havigis al li lian monon, pensis nur pri sia foriro el la insulo, kaj decidis iri mem por akiri informojn pri Astarta; tial ke, li diris, se mi restas en Serendib, la bonzoj palisumos min; sed kien iri? Mi estas sklavo en Egiptio, tre verŝajne bruligita en Arabio, strangolita en Babilono. Tamen necesas ekscii, kio okazis al Astarta: mi do foriru kaj spertu kion al mi rezervas mia malfeliĉa sorto.

## ĈAPITRO XVI

## Rabisto

Alvenante ĉe la limo, kiu apartigas Arabion de Sirio, dum li preterpasis relative fortikan kastelon, el ĝi venis armitaj Araboj. Tuj ili ĉirkaŭis lin kaj kriis:

— Ĉio, kion vi havas, apartenas al ni, kaj vi apartenas al nia mastro.

Responde Zadig clingigas sian spadon; lia servisto, kiu estis kuraĝa, faris same. Ili mortigis la unuajn Arabojn, kiuj volis kapti ilin; la nombro de atakantoj duobliĝis; ili ne miris pri tio kaj decidis morti batalante. Oni vidis du virojn, kiuj sin defendis kontraŭ arego; tia batalo ne povis esti longdaŭra. La mastro de la kastelo, nomita Arbogad, vidinte el unu fenestro la miregindan lerton kaj bravon de Zadig, eksentis estimon por li. Rapide li malsupreniris kaj venis mem por forpuŝi siajn servistojn kaj liberigi la du vojaĝantojn.

— Ĉio, kio pasas sur mia bieno apartenas al mi, li diris, same kiel tio, kion mi trovas sur alies bieno; mi rekrutis kamaradojn; mi kapabliĝis por povi ŝteli karavanetojn; tiel, iom post iom, mi fariĝis egala kun aliaj homoj. Mi havis mian parton de l'riĉaĵoj el ĉi tiu mondo, kaj mi eĉ estis pocentage kompensita. Oni multe ŝatis min; mi fariĝis sinjoro rabisto; mi akiris perforte ĉi tiun kastelon. La satrapo el Sirio volis senposedigi min je ĝi; sed mi jam estis tro riĉa por timi ion ajn; mi donis monon al la satrapo kaj tial konservis ĉi tiun kastelon, kaj mi plivastigis mian bienaron; li eĉ nomis min spezestro por la tributoj, kiujn Arabio-Petreo pagis al la reĝo de l'reĝoj. Mi plenumis mian oficon de enspezisto, kaj tute ne tiun de elspezisto.

La granda »desterham« de Babilono sendis ĉi tien, en la nomo de la reĝo Moabdar, iun satrapeton por strangoligi min. Tiu viro alvenis por plenumi la ordonon; pri ĉio mi estis informita; mi strangoligis en lia ĉeesto la kvar personojn, kiujn li estis kondukinta kun si por streĉi la laĉon, kaj poste mi demandis lin, kiom li enspezos por la komisio strangoli min. Li respondis al mi, ke lia honorario sumos proksimume tri cent ormonoerojn. Mi klare komprenigis al li, ke pli granda estus lia profito, se li laborus kun mi. El li mi faris subrabiston; li nun estas unu el miaj plej bonaj oficiroj, kaj inter la plej riĉaj. KREDU min, vi same sukcesos kiel li. NENIAM la sezono por rabadi estis pli bona ol de kiam Moabdar estiĝis mortigita, kaj de kiam ĉio estas konfuza en Babilono.

— Moabdar estas mortigita! diris Zadig; kaj kio okazis al la reĝino Astarta?

— Mi ne scias, ree parolis Arbogad; mi nur scias, ke Moabdar freneziĝis, ke oni mortigis lin, ke Babilono estas granda rabmortigejo, ke la tuta imperio estas funebraspekta, ke ekzistas ŝancoj por profitaj raboj, ke koncerne min, admirinde mi profitis la okazon.

— Sed la reĝino? diris Zadig; mi petegas vin, ĉu vi scias nenion pri la sorto de l'reĝino.

— Mi aŭdis pri iu princo el Hirkanio, li ree parolis; verŝajne ŝi estas unu el liaj kromedzinoj, se ŝi ne estis mortigita en la tumulto; sed mi estas pli scivolema pri rabaĵo ol pri novaĵoj. Dum miaj kaperadoj mi kaptis plurajn virinojn; neniun mi konservis; mi vendas ilin kare, kiam ili estas belaj, kaj mi ne petas informon pri ilia deveno. Oni ne aĉetas rangon; reĝino, kiu estus malbela, ne trovas aĉetanton; eble mi vendis la reĝinon

Astarta; eble ŝi mortis; sed ne gravas al mi, kaj mi pensas, ke vi mem ne devas pli ol mi zorgi pri ŝi.

Tiel parolante, Arbogad trinkis tiel diligente, li tiom intermiksitis ĉiujn siajn ideojn, ke Zadig povis ricevi neniun plian klarigon. Li estis konsternita, deprimita, senmova; la rabisto daŭre trinkis, fantazie rakontis, senĉese ripetis, ke li estas la plej feliĉa el ĉiuj homoj, admonante al Zadig, ke li same fariĝu feliĉa. Fine, duondorma pro ebriiĝo, li iris dormi tute trankvile. Zadig pasigis la nokton en plej intenca eksciteco.

Kiel do, li diris, la reĝo frenezigis! li estas mortigita! Mi ne povas deteni min kompati lin. La imperio estas disŝirita, kaj tiu rabisto estas feliĉa. Ho sorto! ho destino! ŝtelisto estas feliĉa kaj tiu, kiun la naturo faris plej aminda, eble pereis laŭ terura maniero aŭ vivas en stato pli malbona ol la morto. Ho Astarta! kio okazis al vi?

Tuj ĉe la mateniĝo li demandis al ĉiuj, kiujn li renkontis en la kastelo; sed ĉiuj estis okupataj; neniun respondis al li. Dum la nokto oni faris novajn konkerojn; oni dispartigis la rabaĵojn. En tiu tumulto konfuzo li povis ricevi nur la permeson foriri. Ĝin li senprokraste profitis, estante pli ol iam enprofundiĝinta en siaj doloraj pripensoj.

Dum sia marŝado Zadig estis maltrankvila, incitita, kun la spirito tute okupita per la penso pri la malfeliĉa Astarta, pri la reĝo de Babilono, pri sia fidela Kador, pri la feliĉa rabisto Arbogad, pri tiu tiel kaprica virino, kiun Babilonanoj forportis el la rando de Egiptio, fine pri ĉiuj malhelpaĵoj kaj ĉiuj malfeliĉaĵoj, kiujn li spertis.

## ĈAPITRO XVII

## Fiŝĉasisto

Kelkajn mejlojn for de l'kastelo de Arbogad, li troviĝis ĉe randeto de rivereto, kaj daŭre bedaŭregis pri sia sorto, kaj konsiderante sin kiel modelon pri malfeliĉo. Li ekvidis fiŝĉasiston, kuŝanta sur la bordo, kaj apenaŭ tenanta sian reton, kiun li ŝajnis forlasi, kaj levanta la okulojn al la ĉielo.

— Mi certe estas la plej malfeliĉa el ĉiuj homoj, diris la fiŝĉasisto. Mi estis, laŭ ĉies aserto, la plej fama vendisto de kremfromaĝoj en Babilono, kaj mi ruiniĝis. Mi havis la plej beletan edzinon, kiun viro povus posedi, kaj ŝi perfidis min. Restis al mi malfortika domo; mi vidis ĝin rabita kaj detruita. Rifuĝinte en kabanon, mi ne havas alian vivrimedon ol fiŝĉasadon, kaj mi kaptas nenium fiŝon. Ho mia reto! mi ne plu ĵetos cin en la akvon; min mem mi devas ĵeti tien. Dirante tiujn vortojn, li stariĝas kaj antaŭeniras kun la sinteno de homo, kiu estas sin ĵetonta kaj finonta sian vivon.

— He kio! diris al si Zadig, estas do homoj same malfeliĉaj kiel mi! La fervorego por savi la vivon de tiu fiŝĉasisto estis tiom rapida, kiom tiu pripenso. Li kuras al li, haltigas lin, demandas lin kun mieno kompatema kaj konsola. Laŭdire oni ne estas tiom malfeliĉa, kiam oni estas tia ne sola; sed, laŭ Zoroastro, tiel ne estas pro malico, sed pro bezono. Tiam oni sentas sin tirata al malfeliĉulo, kiel al sia samulo. La ĝojo de feliĉulo estus insulta; sed du malfeliĉuloj similas al du malfortaj arbitoj, kiuj, apogante sin reciproke, fortigas sin kontraŭ la ventego.

— Kial vi mortas pro viaj malfeliĉaĵoj? Zadig diris al la fiŝĉasisto.

— Tial ke, li respondis, mankas al mi vivrimedoj. Mi ĝuis plej grandan ŝatatecon en la vilaĝo Derlbak, apud Babilono, kaj mi faris, helpite de mia edzino, la plej bonajn kremfromaĝojn el la imperio. La reĝino Astarta kaj la fama ministro Zadig pasie ŝatis ilin. Mi liveris al iliaj hejmoj ses cent fromaĝojn. Iun tagon mi iris al la urbo por esti pagata; mi eksciis, alvenante en Babilono, ke la reĝino kaj Zadig malaperis. Mi kuris ĉe la sinjoron Zadig, kiun mi neniam vidis; mi trovis la pafarkistojn de la granda »desterham«, kiuj, provizite de reĝa legitimaĵo, lojale kaj orde prirabis lian domon. Mi flugis al la kuirejoj de la reĝino; kelkaj el la sinjoroj kuiristoj diris al mi, ke ŝi mortis; aliaj diris, ke ŝi estas en malliberejo; aliaj asertis, ke ŝi forkuris; sed ĉiuj certigis, ke miaj fromaĝoj ne estos pagataj al mi. Mi iris kun mia edzino viziti la sinjoron Orkan, kiu estis unu el miaj klientoj; mi petis al li lian protekton en mia malfeliĉo. Li konsentis ĝin al mia edzino kaj rifuzis ĝin al mi. Ŝi estis pli blanka ol tiuj kremfromaĝoj, per kiuj komenciĝis mia malfeliĉo, kaj la brilo de l'purpuro el Tiro ne superis la karnokoloron, kiu animis tiun blankaĵon. Pro tio Orkan retenis ŝin kaj forpelis min el sia domo. Mi skribis al mia kara edzino malesperulan leteron. Ŝi diris al la portinto: »Ha! ha! jes! mi scias, kiu estas la viro, kiu skribas al mi; pri li mi aŭdis. Oni diras, ke li faras bonegajn kremfromaĝojn; da ili oni havigu al mi, kaj oni pagu ilin al li«.

En mia malfeliĉo, mi volis min turni al juĝejo. Restis al mi ses uncoj da oro: mi devis doni du uncojn al la leĝisto, kiun mi konsultis, du al la prokuroro, kiu



entreprenis la aferon, du al la sekretario de la ĉefjuĝisto. Post tiuj klopodoj mia proceso ne estis ankoraŭ komencita, kaj mi estis elspezinta pli da mono ol miaj fromaĝoj kaj mia virino valoris. Mi revenis en mian vilaĝon kun la intenco vendi mian domon, por rehavi mian edzinon.

Mia domo valoris almenaŭ sesdek uncojn da oro; sed oni vidis, ke mi estas senmona kaj dezireganta vendi. La unua persono, al kiu mi turnis min, proponis al mi tridek uncojn; la dua, dudek; la tria, dek. Mi estis baldaŭ kontraktonta, tiel malsagaca mi estis, kiam princo el Hirkanio venis al Babilono kaj detruis ĉion survoje. Mia domo estis unue disrabita kaj poste bruligita.

Perdinte tiel mian monon, mian edzinon kaj mian domon, mi fortiriĝis en ĉi tiun landon, kie vi min vidas; mi provis vivteni min per la metio de fiŝisto. La fiŝoj mokas min kiel la homoj; nenian mi kaptas; mi mortmalsatas, kaj sen via interveno, plej nobela konsolanto, mi estus mortinta en la rivero.

La fiŝisto ne tuj faris tiun rakonton, tial ke ĉiumomente Zadig kun emocio kaj afekcio diris al li:

— Kiel do! ĉu vi scias nenion pri la sorto de la reĝino?

— Ne, nobela moŝto, respondis la fiŝisto; sed mi scias, ke la reĝino kaj Zadig ne pagis al mi miajn kremfromaĝojn, ke oni rabis mian edzinon kaj ke mi malesperas.

— Mi flatas al mi, diris Zadig, ke vi ne perdos ĉion. Mi aŭdis pri tiu Zadig; li estas honestulo, kaj se li revenos en Babilonon, kiel tion li esperas, li pagos al vi pli ol li ŝuldas al vi; sed rilate al via edzino, kiu ne estas tiel honesta, mi konsilas, ke vi ne reprenu ŝin.

Vi kredu min, iru al Babilono; tie mi estos pli frue ol vi, tial ke mi rajdas kaj ke vi piediras. Turnu vin al la fama Kador; diru al li, ke vi renkontis lian amikon; atendu min ĉe lia hejmo; vi iru; eble vi ne estos ĉiam malfeliĉa.

— Ho potenca Orosmad! li pluparolis, vi uzas min por konsoli tiun viron; kiun vi uzus por konsoli min?

Tiel parolante, li donis al la fiŝisto la duonon de la tuta mono, kiun li kunportis el Arabio, kaj la fiŝisto, konfuzite kaj mirigite, kisis la piedojn de la amiko de Kador kaj diris:

— Vi estas savanĝelo.

Dume Zadig ĉiam petis informojn kaj ploris.

— Kiel do! nobela moŝto, ekkriis la fiŝisto, ĉu vi ankaŭ estas malfeliĉa, vi bonfaranto?

— Centfoje pli malfeliĉa ol ci, respondis Zadig.

— Sed kiel povas okazi, diris la simplulo, ke donacanto estas pli kompatinda ol ricevanto?

— Tiel estas, tial ke cia plej granda malfeliĉo, ree parolis Zadig, estis la mizero, dum mi estas malfeliĉa en la koro.

— Ĉu Orkan rabis vian edzinon? diris la fiŝisto.

Tiu vorto memorigis al Zadig ĉiujn liajn aventurojn; li ripetis la liston de siaj malfeliĉaĵoj, komence de la hundino de la reĝino ĝis sia alveno ĉe la rabisto Arbogad.

— Ha! li diris al la fiŝisto, Orkan meritas esti punata. Sed ordinare tiaulojn favoras la sorto. Kio ajn okazu, ci iru al lia nobela moŝto Kador, kaj atendu min ĉe li.

Ili disiĝis: la fiŝisto marŝis, dankante sian sorton, kaj Zadig kuris ĉiam riproĉante la sian.

## ĈAPITRO XVIII

## Bazilisko

Alveninte en bela herbejo, li vidis plurajn virinojn, kiuj tre diligente serĉis ion. Li permesis al si proksimiĝi al unu el ili kaj demandi al ŝi, ĉu li povas havi la honoron helpi ilin en iliaj serĉadoj.

— Nepre ne faru tion, respondis la Sirino; tio, kion ni serĉas, povas esti tuŝata nur de virinoj.

— Jen trea strangajo, diris Zadig; ĉu mi povas riski demandi vin pri la nomo de tio, kion nur virinoj rajtas tuŝi?

— Ĝi estas bazilisko, ŝi diris.

— Bazilisko, sinjorino! kaj kial, favoru min, vi serĉas baziliskon?

Ĝi estas por nia sinjoro kaj mastro Ogul, kies kastelon vi vidas apud la bordo de tiu rivero, ĉe la ekstremaĵo de la herbejo. Ni estas liaj tre humilaj sklavinaj; lia nobela moŝto Ogul estas malsana; lia kuracisto ordonis al li manĝi baziliskon kuiritan en rozakvo; kaj tial ke ĝi estas tre rara besto, kiu lasas sin kapti nur de virinoj, lia nobela moŝto Ogul promesis preni kiel tre amatan edzinon tiun el ni, kiu portos al li baziliskon. Favoru min, ne ĝenante mian serĉadon, ĉar vi nun scias kion mi perdus, se unu el miaj kunulinoj sukcesus pli frue ol mi.

Zadig lasis tiun Sirinon kaj la aliajn serĉi baziliskon, kaj daŭrigis marŝi en la herbejo. Kiam li estis ĉe la bordo de rivereto, li trovis alian sinjorinon, kuŝanta sur herbetaro, kaj kiu nenion serĉis. Ŝia staturo aspektis majeste, sed ŝia vizaĝo estis vuale kovrita. Ŝi estis klinita al la rivereto; egaj ĝemoj eliris el ŝia buŝo. Ŝi tenis

en la mano vergeton, per kiu ŝi desegnis skribsignojn sur iu subtila sablo, kiu kuŝis inter la herbetaro kaj la rivereto. Zadig havis la sciivolon vidi, kion skribis tiu virino; li proksimiĝis: li vidis la literon Z, poste unu A; li miris, poste aperis D; li ekskuiĝis. Neniam surprizo egalas la sian, kiam li vidis la du lastajn literojn de sia nomo. Li restis senmova dum kelka tempo; fine, li ekparolis kun interrompita voĉo:

— Ho nobla sinjorino! pardonu al iu fremdulo, al iu malfeliĉulo, se li kuraĝas demandi vin, pro kia miriga aventuro mi trovas ĉi tie la nomon Zadig skribita de via dieca mano.

Aŭdante tiun voĉon, ĉe tiuj paroloj, la sinjorino levis sian vualon per tremanta mano, rigardis al Zadig, ekaŭdigis kortuŝecan krion, pro surprizo kaj ĝojo, kaj, venkite de ĉiuj diversaj emocioj, kiuj atakis samtempe ŝian animon, ŝi svene falis en liajn brakojn. Estis Astarta mem, estis la reĝino de Babilono, estis tiu, kiun Zadig adoris kaj pri kiu li riproĉis al si adori; estis tiu, kiun li tiom priploris kaj ties sorton tiom timis. Dum momento li estis senigita je uzo de siaj sentumoj; kaj kiam li estis fikse rigardinta la okulojn de Astarta, kiuj malrefermiĝis kun amsopireco, miksitaj kun konfuziteco kaj amemo:

— Ho senmortaj potencoj! li ekkriis, kiuj direktas la sortojn de l'malfortaj homoj, ĉu vi rehavigas al mi Astartan? En kia tempo, en kia loko, en kia stato mi revidas ŝin! Li ĵetiĝis surgenuen antaŭ Astarta, kaj li metis sian frunton sur la polvon de ŝiaj piedoj. La reĝino de Babilono restarigis lin kaj sidigis apud si sur la bordo de tiu rivereto; plurfoje ŝi viŝis liajn okulojn, kiuj ĉiam denove larmis. Ŝi dudekfoje rekomencis paro-

ladojn, kiujn ŝiaj ĝemoj interrompis; ŝi demandis lin pri la bonŝanco, kiu kunigis ilin, kaj subite antaŭhaltigis liajn respondojn per aliaj demandoj. Ŝi komencis rakonton pri siaj malfeliĉaĵoj kaj volis ekscii pri tiuj de Zadig. Fine, post kiam ambaŭ iom kvietigis la tumulton de siaj animoj, Zadig rakontis iom al ŝi per kiu aventuro li troviĝas en tiu herbejo.

— Sed, ho malfeliĉa kaj respektinda reĝino! kiel povas esti, ke mi retrovas vin en tiu ĉi izola loko kun vestoj de sklavino, kaj akompanata de aliaj sklavininoj, kiuj serĉas baziliskon por kuiri ĝin en rozakvo, laŭ recepto de kuracisto?

— Dum ili serĉas baziliskon, diris la bel' Astarta, mi sciigos al vi ĉion, kion mi suferis kaj ĉion, kion mi pardonas al la ĉielo, de kiam mi revidas vin. Vi scias, ke la reĝo, mia edzo, trovis malplaĉe, ke vi estas la plej aminda el ĉiuj viroj, kaj ke tio estas la motivo, pro kiu li decidis iun nokton ordoni, ke vi estu strangolota kaj mi venenota. Vi scias, kiel la ĉielo permesis, ke mia eta mutulo avertis min pri la ordono de lia noblega Majesto. Apenaŭ la fidela Kador estis deviginta vin obei al mi forkuri, ke li kuraĝis eniri en mia ĉambro en la mezo de la nokto tra sekreta irejo. Li forprenis min kaj kondukis en la templon de Orosmado, kie la pastro, lia frato, internigis min en iu kolosa statuo, kies bazo tuŝas la fundamenton de l'templo, kaj kies kapo atingas la volbon. Mi estis tie kvazaŭ entombigita, sed servata de l'pastro, kaj havanta ĉion necesan. Dume la farmaciisto de Lia Reĝa Moŝto eniris mian ĉambron kun miksitaj trinkaĵoj el hiskiamo, opio, cikuto, nigra heleboro kaj akonito, kaj alia oficulo iris en vian hejmon kun laĉo el blua silko. Oni trovis nenion. Kador, por pli bone erarigi la reĝon, ŝajnigis veni, por kulpigi nin ambaŭ.

Li diris, ke vi forkuris voje al Hindio, kaj mi al Memfiso; oni sendis armitajn ulojn postkuri vin kaj min.

La kurieroj, kiuj serĉis min, ne konis min. Mi preskaŭ neniam montris mian vizaĝon, krom al vi sola, en la ĉeesto de mia edzo. Ili postkuris min kaj serĉis laŭ la priskribo, kiun oni faris al ili pri mia persono. Iu virino kun sama staturo kiel la mia, kaj kiu eble havis pli da ĉarmoj ol mi, prezentiĝis al iliaj okuloj ĉe la limo de Egiptio. Ŝi estis enlarmiginta, vaganta. Ili ne dubis, ke tiu virino estas la reĝino de Babilono; ili kondukis ŝin al Moabdar. Ilia eraro unue kolerigis terure la reĝon; sed baldaŭ post kiam li pli atente estis rigardinta tiun virinon, li trovis ŝin tre bela kaj estis konsolata. Oni nomis ŝin Misufa. Oni diris al mi poste, ke tiu nomo egiptolingve signifas: *la bela kapriculino*. Ŝi efektive estis tia; sed ŝi estis tiel ruza kiel kaprica. Ŝi plaĉis al Moabdar. Ŝi subigis lin al si tigrade, ke li edzinigis ŝin al si. Tiam ŝia karaktero tute elvolviĝis: ŝi sentime sin fordonis al ĉiuj malsaĝaĵoj de sia imago. Ŝi volis devigi la ĉefpastron, kiu estis maljuna kaj podagra, ke li dancu antaŭ ŝi; kaj pro lia rifuzo ŝi senbride persekutis lin. Ŝi ordonis al sia ĉevalestro, ke li faru por ŝi konfitaĵtorton. La ĉevalestro vane avertis, ke li ne estas kuiristo; li devis fari la torton, kaj oni forpelis lin, tial ke ĝi estis tro karbe rostita. Ŝi donis la oficon de ĉevalestro al sia nano kaj tiun de ĉambelano al iu paĝio. Tiele ŝi regadis Babilonon. Ĉiuj ĉagreniĝis pro mia formalapero. La reĝo, kiu estis sufiĉe honesta, ĝis la momento, kiam li volis veneni min kaj strangoligi vin, ŝajnis esti droniginta siajn virtojn en la eksterordinaran amon, kiun li havis por la bela kapriculino. Li venis en la templon en la tago de l'sankta fajro. Mi vidis lin petegi la diojn favore al Misufa ĉe la piedoj de

la statuo, en kiu mi estis internigita. Mi laŭtigis mian voĉon; mi kriis al li;

— La dioj rifuzas la ĵurojn de reĝo, fariĝinta tirano, kiu volis mortigi prudentan virinon, por edziĝi kun ekstravaganculino.

Moabdar estis konfuzita de tiuj paroloj tiagrade, ke lia spirito malklariĝis. La orakolo, kiun mi eldiris, kaj la tiraneco de Misufa, sufiĉis por perdigi al li juĝkapablon. Li freneziĝis post kelkaj tagoj.

Lia frenezo, kiu aspektis kiel puno de la ĉielo, estis signalo por ribelo. Oni ribelis, oni rapide sin armis. Babilono, kiu estis tiel longe enprofundiĝinta en voluptema nenifareco, fariĝis la ejo de civila milito terura. Oni tiris min el la malplenaĵo de la statuo, kaj oni faris el mi la gvidanton de iu partio. Kador kuris al Memfiso, por revenigi vin en Babilonon. La princo de Hirkanio, ekscianta pri tiuj malfeliĝaj novaĵoj, revenis kun sia armeo kaj konsistigis trian partion en Ĥaldio. Li atakis la reĝon, kiu kuris al li akompanate de sia ekstravaganca Egiptino. Moabdar mortis bate trapikita. Misufa estis kaptita de l'venkinto. Malfeliĉe mi mem estis kaptita de hirkana taĉmenteto, kaj oni kondukis min al la princo, precize en la tempo, kiam Mizufa estis ankaŭ kondukita al li. Sendube plaĉos al vi ekscii, ke la princo opiniis min pli bela ol la Egiptino; sed vi bedaŭros, ekscianta, ke li destinis min por sia serajlo. Li tre decide diris al mi, ke, tuj kiam li estos fininta iun militan ekspedicion, kiun li estis entreprenonta, li venos al mi. Vi juĝu pri mia ĉagreno. Miaj ligiloj kun Moabdar estis rompitaĵ; mi povis aparteni al Zadig, kaj mi falis en la katenojn de tiu barbaro! Mi respondis al li kun la tuta fiero, kiu kongruis kun mia rango kaj miaj sentoj. Ĉiam

mi aŭdis, ke la ĉielo ligis al la personoj de mia situacio iun karakteron el noblo, (kiu per unu vorto kaj per unu rigardo faligas en submetiĝon el plej profunda respekto la impertinentulojn, kiuj de ĝi riskis flankeniĝi. Mi parolis kiel reĝino, sed oni traktis min kiel fraŭlinan servistinon. La Hirkanio, ne favorante min eĉ per unu alparolo, diris al sia negra eŭnuko, ke mi estas impertinenta, sed ke li trovas min beleta. Li ordonis, ke mi ĝuu la dieton de l'preferatinoj, por ke mia vizaĝkoloro refreŝiĝu kaj ke mi fariĝu pli inda je liaj amfavoroj por la tago, kiam li havos la oportunon honori min per ili. Mi diris al li, ke mi mortigos min; ridante li rebate diris, ke tiel ne povas okazi, ke li kutimiĝis al tia sintenado, kaj li foriris kiel viro, kiu ĵus metis papagon en sian bestojn. Kia stato por la unua reĝino el la universo kaj, emfaze, por la amantino de Zadig!

Ĉe tiuj vortoj li sin ĵetis al ŝiaj genuoj kaj superverŝis ilin per larmoj. Kareseme Astarta relevis lin, kaj ŝi daŭrigis jene:

— Mi vidis min sub la disono de barbaro kaj konkurantino de frenezulino, kun kiu mi estis enfermita. Ŝi rakontis al mi sian aventuron el Egiptio. Per la priskribo, kiun ŝi faris je vi, per la tempo, per la kamelo, sur kiu vi rajdis, per ĉiuj cirkonstancoj, mi akiris la konvinkon, ke estis Zadig, kiu batalis por ŝi. Mi ne dubis, ke vi estas en Memfiso; mi decidis rifuĝi tien.

— Bel'Mizufa, mi diris al ŝi, vi estas multe pli plaĉa ol mi; vi pli bone ol mi distros la princon el Hirkanio. Faciligu al mi la rimedojn por forkuri: vi regos sola; vi feliĉigos min, liberigante vin je konkurantino.

Misufa interkonsente kun mi antaŭaranĝis mian fuĝon. Mi do sekrete foriris kun egiptia sklavinino. Mi



apudeŝtis Arabion, kiam fama rabisto, nomita Arbogad, kaptis min kaj vendis al komercistoj, kiuj kondukis min en ĉi tiun kastelon, kie loĝas sinjorego Ogul. Li aĉetis min, ne sciante, kiu mi estas. Li estas voluptema viro, kiu celas nur multe manĝadi, kaj kiu kredas, ke Dio kreis lin por sidi ĉetabele. Li havas grasdikon, pro kiu li ĉiam pretas sufokiĝi. Lia kuracisto, kiu havas malmulte da influo, kiam Ogul bone digestas, despote regas lin, kiam li tro manĝis. Li kredigis lin, ke per bazilisko, kuirita en rozakvo, li resaniĝos. Lia nobela Moŝto promesis edziĝi kun la sklavino, kiu portos al li baziliskon. Vi vidas, ke mi lasas ilin diligenti, por meriti tiun honorigon, kaj neniam mi malpli deziras trovi baziliskon, de kiam la ĉielo permesis, ke mi revidu vin.

Tiam Astarta kaj Zadig diris unu al la alia ĉion, kion sentoj longe briditaj, ĉion, kion iliaj malfeliĉaĵoj kaj ilia reciproka amo povis sentigi al la plej noblaj kaj pasiaj koroj; kaj la feoj, kiuj prezidas ĉe la amo, aŭdigis iliajn parolojn ĝis la sfero de Venuso.

Vane serĉinte, la virinoj revenis en la domon de Ogul. Zadig prezentigis sin al li kaj parolis jene:

— La eterna sano malsupreniru el la ĉielo profite al via ĉiutaga vivo! Mi estas kuracisto; kure mi venis al vi ĉe ekscio pri via malbonfarto, kaj mi kunportas al vi baziliskon kuiritan en rozakvo. Tion mi faras ne kun la celo edziĝi je vi: mi nur petas al vi la liberigon de juna sklavino, kiun vi posedas ekde kelkaj tagoj, kaj mi konsentas anstataŭi ŝin en sklaveco, se mi ne havos la feliĉon kuraci la noble malavaran sinjoregon Ogul.

La propono estis akceptita. Astarta foriris al Babilono kun la servisto de Zadig, promesante sendi al

li baldaŭ kurieron, por informi lin pri ĉio, kio okazos. Ila disiĝo estis tiel amema, kiel estis ilia renkontiĝo. La momento, kiam oni retroviĝas kaj tiu, kiam oni disiĝas, estas la plej gravaj epokoj el la vivo, kiel estas dirite en la grandvalora libro Zend<sup>1</sup>. Zadig amis la reĝinon tiom, kiom li tion ĵuris, kaj la reĝino amis Zadig pli ol ŝi diris al li.

Dume Zadig jene parolis al Ogul:

— Via nobela Moŝto, oni ne manĝas mian baziliskon; ĝia tuta efiko devas eniri en vi tra la poroj. Mi metis ĝin en etan felsakon, bone ŝvelita kaj kovrita per delikata haŭto: necesas, ke vi puŝu tiun felsakon per via tuta forto, kaj ke mi resendu ĝin al vi plurfoje, kaj post kelkaj tagoj je tiu dieto vi ekkonos la valoron de mia kuracarto.

La unuan tagon, Ogul estis tute senspirigita kaj kredis, ke li mortos pro laciĝo. La duan, li estis malpli laciĝita kaj pli bone dormis. Post ok tagoj li reakiris la tutan forton, sanon, facilmovecon kaj la gajon el siaj plej brilaj jaroj.

— Vi ludis per pilkego kaj vi estis sobra, diris al li Zadig. Eksciu, ke ne ekzistas bazilisko en la naturo, ke oni ĉiam bonfartas per sobro kaj ekzerco, kaj ke la arto daŭrigi samtempe la malsobron kaj la sanon, estas arto same ĥimera kiel la orfara ŝtono, la juĝa astrologio kaj la teologio de l'pastroj.

La ĉefkuracisto de Ogul, komprenante kiel danĝera por la medicino estas tiu homo, unuigis kun la drogisto por sendi Zadig en la transmondon, kaj tie serĉi baziliskojn. Oni invitis lin al bonega tagmanĝo.

<sup>1</sup> Zend-Avesta. Sanktaj skriboj de la antikvaj persoj, kies aŭtoreco estas atribuata al Zoroastro. — *Trad.*

Li devis esti venenata ĉe la dua antaŭmeto de manĝaĵoj; sed, ĉe la unua, alvenis kuriero de la bel'Astarta. Li detabligis kaj foriris. Kiam oni estas amata de bela virino, diris la granda Zoroastro, oni ĉiam elturniĝas en ĉi tiu mondo.

## ĈAPITRO XIX

### Bataloj

La reĝino estis akceptata en Babilono kun la pasia ekscitiĝo, kiun oni ĉiam sentas por bela princino, kiu estis malfeliĉa. Babilono tiam ŝajnis esti pli kvietaj. La princo de Hirkanio estis mortigita en batalo. La venkintaj Babilonanoj deklaris, ke Astarta edziniĝos kun tiu, kiun oni elektas kiel suverenon. Oni ne volis, ke la plej alta ofico el la mondo, kiu estos tiu de la edzo de Astarta, dependu de intrigoj kaj superstiĉoj. Oni ĵuris akcepti kiel reĝon la plej bravan kaj plej saĝan viron. Granda areno, borderita de riĉe ornamitaj amfiteatroj, estis starigitaj je kelkaj mejloj for de la urbo. La batalontoj devis iri tien komplete armitaj. Ĉiu el ili havis, malantaŭ la amfiteatroj, apartan ĉambron, kie li devis esti de neniu konata kaj vidata. Ili devis konkuri kvarfoje; kiuj estos sufiĉe bonŝancaj por venki kvar kavalirojn, tiuj poste devis batali unuj kontraŭ la aliaj, tiel ke la finvenkinto estos deklarita ĉampiono. Li devis reveni kvar tagojn poste kun la samaj armiloj kaj klarigi la enigmojn starigitajn de l'pastroj. Se li ne klarigus la enigmojn, li ne estos reĝo; kaj oni devis rekomenci la batalkonkuron, ĝis troviĝos viro, kiu estos venkinta en la duspecaj konkuroj, tial ke oni nepre volis havi kiel reĝon la plej bravan kaj la plej saĝan.

Dum tiu tuta tempo la reĝino devis esti rigore gardata. Oni nur permesis, ke ŝi ĉeestu la konkuron, kovrite per vualo; sed oni ne toleris, ke ŝi parolu al iu ajn el la konkurantoj, por eviti favoraĵon aŭ maljustaĵon.

Tion Astarta sciigis al sia amanto, esperante, ke li montros por ŝi pli da kuraĝo kaj lerto ol iu ajn alia. Li foriris, kaj preĝis Venuson por ke ŝi igu lian kuraĝon forta kaj lian spiriton vigla. Li alvenis ĉe la bordo de Eŭfrato la antaŭtagon de tiu grava okazantaĵo. Li enskribigis sian devizon inter tiuj de la batalontoj, kaŝante siajn vizaĝon kaj nomon, kiel ordonis la leĝo, kaj iris ripozi en la ĉambron, kiun loto difinis al li. Lia amiko Kador, kiu revenis al Babilono, post kiam li serĉis lin en Egiptio, portigis en lian loĝion kompletan armaĵon, kiun la reĝino sendis al li. Li ankaŭ ŝianome kondukigis al li la plej belan ĉevalon el Persio. Zadig vidis la intervenon de Astarta en tiuj donacoj; lia kuraĝo kaj lia amo ĉerpis el ĝi novajn fortojn kaj esperojn.

La postan tagon, post kiam la reĝino venis loĝi sin sub baldakenon el gemoj, kaj post kiam la amfiteatroj pleniĝis de ĉiuj sinjorinoj kaj de ĉiuj ordenitoj el Babilono, la batalontoj aperis en la cirko. Ĉiu el ili venis deponi sian devizon ĉe la piedoj de l'ĉefpastro. Oni lotis la devizojn; tiu de Zadig ricevis la lastan vicon. La unua, kiu antaŭeniris, estis tre riĉa nobelo, nomita Itobad, tre vanta, ne tre brava, tre mallerta kaj malsprita. Liaj servistoj konvinkis lin, ke tia viro, kia li estas, devas esti reĝo; li respondis al ili:

— Tia viro, kia mi estas, devas regi.

Li estis ekĉipita de la piedoj ĝis la kapo. Li surhavis armaĵon el oro verde emajlita, verdan plumtufegon, lancon ornamitan per verdaj rubandoj. Oni tuj

ekvidis, per la maniero laŭ kiu li direktis sian ĉevalon, ke ne al *tia viro, kia li estas*, la ĉielo rezervis la scep-tron de Babilono. La unua kavaliro, kiu kuris al li, elseligis lin; la dua, renversis lin sur la postajon de lia ĉevalo, tiel ke la renversito havis la kruojn supre kaj la brakojn etenditaj. Itobad relokis sin, sed kun tia malplaĉo, ke ĉiuj rigardantoj ekridis. Iu tria eĉ ne komplezis uzi sian lancon; sed per antaŭeniro li kaptis lian dekstran kruron, kaj, duonturnante lin, li faligis lin teren. La armilpaĝioj de l'konkuro kuris al li ridante kaj remetis lin sur la selon. La kvara batalanto kaptis lian maldekstran kruron kaj faligis lin aliflanken. Kun mokaj krioj oni kondukis lin en lian loĝion, kie li devis laŭleĝe pasigi la nokton, kaj li diris, povante apenaŭ marŝi:

— Kia aventuro por viro tia, kia mi estas!

La aliaj kavaliroj plenumis pli bone sian taskon. Kelkaj vice venkis du batalantojn; kelkaj, eĉ ĝis tri. Nur la princo Otame venkis kvar. Fine Zadig siavice batalis; li elseligis vice kvar kavalirojn kun la kiel eble plej eleganta facilo. Restis decidote, ĉu Otame aŭ Zadig estos la finvenkinto. La unua portis orbluan blazonon kun samkolora plumtufego; tiu de Zadig estis blanka. Ĉiuj sukcesdeziroj divide sin turnis al la blua kavaliro kaj al la blanka. La reĝino, kies koro tremetis, preĝis al la ĉielo por la blanka koloro.

Ambaŭ ĉampionoj faris pasojn kaj returnpasojn kun tiom da facilmoveco, ili interŝanĝis tiom da lertaj lancobatoj, ili estis tiel firmaj sur sia selo, ke ĉiuj rigardantoj, krom la reĝino, deziris, ke estu du reĝoj en Babilono. Fine, ĉar iliaj ĉevaloj estis lacaj kaj iliaj lancoj rompitaĵoj, Zadig lerte agis jene: Li pasas malantaŭ la blua princo, ekŝetas sin sur la postajon de lia

ĉevalo, kaptas lin ĉe la mezo de l'korpo, ĵetas lin teren, anstataŭas lin sur la selo kaj karakolas ĉirkaŭ Otame sterniĝanta sur la loko. Estis ĉies krio: Venkis la blanka kavaliro! Indignite Otame restariĝis, elingigas sian spandon; Zadig elseliĝas kun sabro ĉemane. Jen ambaŭ staras en la areno, riskante novan batalon, en kiu la forto kaj la facilmoveco triumfas laŭvice. La plumoj de ilia kasko, la najlo de iliaj brakŝirmiloj, la maŝoj de ilia armaĵo elsaltas for per mil rapidegaj batoj. Ili frapas per la pinto kaj la tranĉrando, dekstren, maldekstren, sur la kapon, sur la bruston; ili malantaŭeniras, ili antaŭeniras, ili taksas unu la alian, ili rekontaktiĝas, ili kaptas sin reciproke, ili refaldiĝas kiel serpentoj, ili atakas sin unu la alian kiel leonoj; ĉiumomente ŝprucas fajro per la batoj, kiujn ili interŝanĝas. Fine Zadig, rekonsciiĝinte dum momento, haltas, faras ŝajnatakon, pasas sur Otame, faligas lin, senarmigas lin, kaj Otame ekkrias:

— Ho! blanka kavaliro! estas vi, kiu devas reĝi super Babilono.

La reĝino estis en plejo de ĝojo. Oni rekondukis la bluan kavaliroon kaj la blankan kavaliroon en ilian respektivan loĝion, same kiel ĉiujn aliajn, laŭ tio, kion ordonis la leĝo. Mutuloj venis servi al ili kaj portis al ili manĝaĵon. Estas facile kompreni, ke la eta mutulo de la reĝino estis tiu, kiu servis al Zadig. Poste oni lasis ilin dormi solaj ĝis la sekvanta tago matene, tempo, kiam la venkinto devis porti sian devizon al la ĉefpastro, por kompari ĝin kaj tiel esti identigita.

Kvankam li estis enamiĝinta, tamen Zadig dormadis pro granda laciĝo. Itobad, kiu kuŝis apude, ne dormis. Dum la nokto li ellitiĝis, eniris lian loĝion, prenis la blankan insignon de Zadig kun lia devizo, kaj ansta-

taŭe metis sian verdan armaĵon. Kiam tagiĝis, li fiere iris al la ĉefpastro deklari, ke homo tia, kia li, estas la venkinto. Estis granda surprizo. Sed li estis proklamita, dum Zadig ankoraŭ dormis. Surprizite Astarta kun malespero en la koro revenis en Babilonon. La tuta amfiteatro estis preskaŭ senhoma, kiam Zadig vekigis; li serĉis siajn armilojn kaj trovis nur tiun verdan armaĵon. Li estis devigata surmeti ĝin, ĉar nenio alia estis apud li. Mirigite kaj indignite, li sin vestas kun furiozo; kun tia tualetarangō li antaŭeniras.

Ĉiuj personoj, kiuj ankoraŭ ĉeestis sur la amfiteatro kaj en la cirko, akceptis lin per malestimaj krioj. Oni ĉirkaŭis lin; oni insultis al li en la vizaĝon. Neniam homo suferis tiajn hontigajn ofendojn. Li ekkoleris; per sabrotoj li forpuŝis la popolaĉon, kiu ne timis insulti lin; sed li ne sciis, kion decidi. Li ne povis vidi la reĝinon; li ne povis postuli la blankan armaĵon, kiun ŝi sendis al li; per tio li povus kompromiti ŝin. Tiel, dum ŝi dronis en sufero, li estis saturita de furiozo kaj maltrankvilo. Li promenis sur la bordoj de Eŭfrato, konvinkite, ke lia sorto destinis lin esti nehelpeble malfeliĉa, rememorante ĉiujn siajn malfeliĉaĵojn, depost la aventuro kun la virino, kiu malŝatis la unuokulajn, ĝis tiu pri sia armaĵo.

— Jen la rezulto, li diris, de tio, ke mi vekigis tro malfrue; se mi dormus pli mallonge, mi estus reĝo de Babilono, mia estus Astarta. Klero, bonkonduco, kuraĝo kaŭzis nur mian malbonsorton.

Okazis fine, ke li murmuris kontraŭ la Providenco, kaj li emis kredi, ke ĉio estas regata de kruela fatalo, kiu subpremas la bonulojn kaj prosperigas la verdajn kavalirojn. Unu el liaj ĉagrenoj estis la surhavo de tiu verda armaĵo, kiu havigis al li tiom da malestimaj

krioj. Komercisto pasis; li malkarege vendis ĝin al li kaj aĉetis al la komercisto robon kaj longan ĉapon. En tia tualetaranĝo li randiris Eŭfraton, saturite je mal-espero kaj kaŝe kulpigante la Providencon, kiu ĉiam persekutis lin.

## ĈAPITRO XX

### Ermito

Marŝante li renkontis ermiton, kies blanka kaj respektiginda barbo malaltiĝis ĝis lia talio. Ĉemane li tenis libron, kiun li legis atente. Zadig haltis kaj profunde riverencis al li. La ermito salutis lin per tiel nobla kaj milda mieno, ke Zadig scivoleme volis interparoli kun li. Lin li demandis, kiun libron li legas.

— Ĝi estas la libro pri la destinoj, diris la ermito; ĉu vi volas legi ion en ĝi?

Li metis la libron en la manojn de Zadig, kiu kvankam lerninte plurajn lingvojn, ne povis deĉifri unu solan skribsignon de la libro. Tio ankoraŭ plifortigis lian scivolemon.

— Vi ŝajnas esti tre ĉagrenita, diris al li tiu bona patro.

— Ho ve! kaj ne senmotive! diris Zadig.

— Se vi konsentas, ke mi akompanu vin, rapide respondis la maljunulo, eble mi povos esti utila al vi; kelkfoje mi disŝutis sentojn de konsolo en la animon de malfeliĉuloj.

Zadig eksentis respekton por la aspekto, por la barbo kaj por la libro de la ermito. Dum la konversacio, li rimarkis lian superan kleron. La ermito parolis pri la destino, pri la justo, pri la moralo, pri la



suverena bono, pri la homa pekemo, pri la virtoj kaj la malvirtoj, kun tiel viva kaj kortuŝa elokvento, ke Zadig sentis sin tirata al li per nekontraŭstarebla logo. Li insiste petis, ke li ne forlasu lin, ĝis ili estos revenintaj en Babilonon.

— Mi mem petas al vi tiun favoron, diris al li la maljunulo; ĵuru al mi, laŭ Orosmad, ke vi ne disiĝos de mi ĝis post kelkaj tagoj, kion ajn mi faros.

Zadig ĵuris, kaj ambaŭ foriris kune.

Vespere la du vojaĝantoj alvenis ĉe belega kastelo. La ermito petis pri gastigo por li kaj por la junulo, kiu akompanis lin. La pordisto, kiu aspektis kiel nobela moŝto, enkondukis ilin kun ia malestima komplezo. Oni prezentis ilin al iu ĉefservisto, kiu montris al ili la lukse belajn apartamentojn de l'mastro. Ili estis akceptitaj ĉe lia manĝotablo en ties plej malproksima ekstremaĵo, kaj la kastelmastro ne honoris ilin eĉ per unu rigardo; sed ili estis servataj, kiel la aliaj gastoj, kun delikato kaj abundego. Lavcele oni prezentis al ili oran pelvon ornamitan per smeraldoj kaj rubenoj. Oni kondukis ilin por enlitiĝi en belan ĉambron, kaj la postan tagon servisto portis al ili po unu ormonero, poste oni forsendis ilin.

— La mastro de la domo, diris Zadig survoje, ŝajnis malavara homo, kvankam iom fiero; noble li praktikas gastigadon.

Dirante tiuj parolojn, li ekvidis, ke ia poŝo tre larga, kiun surhavis la ermito, ŝajnis streĉita kaj ŝvelinta. En ĝi li ekvidis la oran kaj geme garnituritan pelvon, kiun ĉi tiu ŝtelis. Unue li ne kuraĝis ion diri pri tio; sed li estis strange surprizita.

Ĉirkaŭ tagmezo la ermito sin prezentis ĉe la pordo de tre malgranda domo, kie loĝis riĉa avarulo; tie li

petis gastigon por kelkaj horoj. Maljuna servisto malbone vestita akceptis lin kun malmilda tono, kaj enirigis la ermiton kaj Zadig en la stalon, kie oni donis al ili kelkajn putrajn olivojn, malbonan panon kaj difektitan bieron. La ermito manĝis kaj trinkis kun same kontenta mieno kiel en la antaŭa tago; poste, sin turnante al la maljuna servisto, kiu observis, por vidi, ĉu ili nenion ŝtelis, kaj kiu insiste petis ke ili foriru kiel eble plej baldaŭ, li donacis al li la du ormonerojn, kiujn li estis ricevinta matene, kaj dankis lin pro liaj afaĵoj.

— Mi petas vin, li aldonis, aranĝi, ke mi parolu al via mastro.

Mirigite la servisto enkondukis la du vojaĝantojn.

— Noble malavara sinjorego, diris la ermito, mi povas nur dankegi vin tre humile pro la nobla maniero, laŭ kiu vi gastigis nin; vi favore konsentu akcepti ĉi tiun oran pelvon kiel etan ateston de mia dankemo.

La avarulo preskaŭ falis renverse. La ermito ne donis al li tempon rekonsciiĝi je sia subita surprizego; rapide li foriris kun sia juna vojaĝanto.

— Mia patro, diris al li Zadig, kion signifas ĉio, kion vi faras? Vi ŝajnas neniel simili al la aliaj homoj: vi ŝtelas oran, geme garnituritan pelvon ĉe homo, kiu malavare gastigas vin, kaj vi donacas ĝin al avarulo, kiu malinde traktas vin.

— Mia filo, respondis la maljunulo, tiu malavarulo, kiu gastigas fremdulojn, nur pro vantemo kaj por ke oni admiru liajn riĉaĵojn, fariĝos pli saĝa; la avarulo lernas praktiki gastigadon. Miru pri nenio kaj sekvu min.

Zadig jam ne sciis, ĉu temas pri la plej freneza aŭ la plej saĝa el la homoj; sed la ermito tiel aŭtoritate

parolis, ke Zadig, kiu cetere estis ligita per sia ĵuro, ne povis deteni sin lin sekvi.

Ili alvenis ĉe agrabla sed simpla domo, en kiu nenio signis ĉu malŝparemon aŭ avaremon. Ties mastro estis izoliginta filozofa, kiu pace praktikis saĝon kaj virton, kaj kiu tamen ne enuis. Plaĉis al li konstrui tiun rifuĝejon, en kiu li akceptis fremdulojn kun noblo senigita je parademo. Li mem paŝis renkonte al la du vojaĝantoj, kiujn li ripozigis en oportuna apartamento. Kelkan tempon poste, li venis mem inviti ilin al taŭga kaj bonordigita manĝo, dum kiu diskrete li parolis pri la lastaj revolucioj el Babilono. Li ŝajnis esti sincere amika al la reĝino, kaj eldiris sian deziron, ke Zadig aperu en la areno, por konkuri pri la reĝeco. Ĉi tiu ruĝiĝis kaj sentis pli akre sian suferadon. Dum la konversacio oni interkonsentis pri tio, ke la aferoj de ĉi tiu mondo ne ĉiam aranĝiĝas laŭ la deziro de la plej saĝaj homoj. La ermito ĉiam argumentis, ke oni ne konas la planojn de la Providenco, kaj ke la homoj malprave juĝas pri tutaĵo, kies plej etan parton ili nur vidas.

Oni parolis pri la pasioj.

— Ha! kiel pereigaj ili estas! diris Zadig.

— Ili estas la ventoj, kiuj blovas kontraŭ la velojn de l'ŝipo, rapide diris la ermito: iafaje ili subakvigas ĝin; sed sen ili ĝi ne povus alnaĝi. La galo kaŭzas koleron kaj malsanon; sed sen galo la homo ne povus vivi. Ĉio estas danĝera surtere, kaj ĉio estas necesa.

Oni parolis pri plezuro, kaj la ermito pruvis, ke ĝi estas dia donaco; ĉar, li diris, la homo ne povas doni al si sentaĵojn nek ideojn; li ĉion ricevas: la aflikto kaj la plezuro venas el alie, same kiel ĝia esteco.

Zadig admiris, ke homo, kiu agis tiel ekstravagance, povis tiel bone rezonadi. Fine, post interparolado tiel instrua, kiel agrabla, la gastiganto rekondukis la du vojaĝantojn en ilian apartamenton, gloriante la ĉielon, kiu sendis al li du homojn tiel saĝajn kaj virtajn. Li proponis al ili monon laŭ tiel facila kaj nobla maniero, ke ĝi ne povis malplaĉi. La ermito rifuze respondis al li kaj diris adiaŭon, intencante foriri al Babilono antaŭ la sunleviĝo. Ilia disiĝo estis karese amikeca. Ĉefe Zadig sentis sin plena je estimo kaj korinklino por tiel aminda homo.

Kiam la ermito kaj li estis en sia apartamento, ili longe eldiris laŭdojn pri sia gastiganto. Ĉe la sunleviĝo la maljunulo vekis sian kamaradon.

— Ni devas foriri, li diris; sed dum ĉiuj ankoraŭ dormas, mi volas lasi al tiu homo ateston pri estimo kaj amo. Eldirante tiujn vortojn, li prenis torĉon kaj ekbruligis la domon. Ekterurite Zadig ekkriadis kaj volis malhelpi, ke li agu tiel malbonege. La ermito fortiris lin per supera forto; la domo brulis. La ermito, kiu jam estis sufiĉe malproksime kun sia kunulo, trankvile rigardis ĝin bruli.

— Dank' al Dio, li diris, jen estas forbruligita la domo de mia gastiginto! Feliĉa homo!

Ĉe tiuj vortoj Zadig emis samtempe ekridi, insulti la respektindan patron, bati lin kaj forkuri; sed neniel li faris, kiel li intencis, kaj, estante ĉiam subigita per la aŭtoritato de la ermito, malgraŭvole li sekvis lin al la lasta gastigejo.

Ĝi estis ĉe bonkora kaj virta vidvino, kiu havis dek-kvarjaran nevon, agrabloriĉa kaj ŝia sola espero. Ŝia gastigado estis kiel eble plej honora. La postan tagon ŝi ordonis al sia nevo akompani la vojaĝantojn

ĝis ponto, kiu, rompiĝinte antaŭ mallonga tempo, fariĝis danĝera trairejo. Serveme la junulo marŝis unuavice. Kiam ili estis sur la ponto:

— Venu, diris la ermito al la junulo; necesas, ke mi montru mian dankemon al via onklino. Tiam li prenas lin ĉe la haroj kaj ŝetas lin en la riveron. La knabo falas, reaperas dum momento sur la akvon kaj estas enabismigita de la torento.

— Ho monstro! ho plej krimega el ĉiuj homoj! ekkriis Zadig.

— Vi promesis al mi pli da pacienco, intermete diris la ermito. Eksciu do, ke sub la ruinoj de tiu domo, kiun bruligis la Providenco, ties mastro trovis grandegan trezoron; eksciu, ke tiu junulo, kies vivon forprenis la Providenco, murdus sian onklinon, post unu jaro, kaj vin, post du.

— Kiu diris tion al ci, barbaro? kriis Zadig; kaj eĉ se ci estus leginta tiun okazontaĵon en cia libro pri la destinoj, ĉu ci rajtas dronigi infanon, kiu nenion malbonan faris al ci?

Dum parolis la Babilonano, li ekvidis, ke la maljunulo ne plu havis barbon, ke lia vizaĝo aliiĝis laŭ junulecaj trajtoj. Lia ermita vestaĵo malaperis; kvar belaj flugiloj kovris majestan korpon lume brilegantan.

— Ho, sendito de la ĉielo! ho dia anĝelo! ekkriis Zadig, adorkliniĝante, ĉu do ci malsupreniris el la firmamento por instrui al iu malfortanima mortemulo submetiĝon al la eternaj ordonoj?

— La homoj, diris la anĝelo Jesrad, juĝas pri ĉio, nenion konante: el ĉiuj homoj ci estis la plej kleriginda.

Zadig petis al li permeson paroli.

— Mi ne fidus al mi mem, li diris; sed ĉu mi kuraĝu peti, ke ci klerigu min pri iu dubo: ĉu ne estus

preferinde plibonigi tiun infanon, kaj igi virta, ol dronigi lin?

Ĵesrad respondis:

— Se li estus virta kaj vivus, lia sorto volis, ke li estu mem murdita kune kun la virino, kiun li edzinigus kaj la filo, kiu naskiĝus post la geedziĝo<sup>1</sup>

— Kiel do! diris Zadig, ĉu do estas necese, ke estu krimoj kaj malfeliĉaĵoj? Kaj la malfeliĉaĵoj falas sur bonulojn!

— La malbonuloj, respondis Ĵesrad, estas ĉiam malfeliĉaj; ili utilas por provi al iu malgranda nombro da justuloj, dislokitaj surtere, ke ne ekzistas malbono, el kiu ne estiĝas bono.

— Sed, diris Zadig, kial ne estas nur bono kaj nenia malbono?

— Tiam, ree parolis Ĵesrad, ĉi tiu tero estus alia tero; la interligo de la okazoj estus iu alia speco de saĝo, kaj tiu speco, kiu estus perfekta, povas ekzisti nur en la eterna restadejo de la superega Estulo, kiun ne povas tuŝi malbono<sup>2</sup>. Li kreis milionojn da mondoj, el kiuj neniu similas aliu. Tiu grandega vario estas eco

<sup>1</sup> Jen bela ekzemplo de sofisma — mi diru: paralogisma — argumentado: la demando, kiun faris Zadig pri la unua kazo, ankaŭ valoris pri la dua kaj ĉiuj ceteraj. — *Trad.*

<sup>2</sup> Sed la deistoj ĉiaokaze kaj seriozmiene asertas, ke Dio estas ĉie, vidas kaj scias ĉion okazint-, ... ant-, ... ontan, kaj plie estas ĉiopova kaj senlime bona. Tia estuo ne povus toleri malbonon, maljuston, suferon...

Fakte la mondo estas fuŝa, kaosa, kaj ĝi povos iom plibonigi, nur se malvolviĝos la racio en la homa cerbo kaj la kompatio en la homa koro. Mi ne scias, ĉu tio estas esperebla, sed ne dubas pri ties dezirinda, kaj tio estas, mia opinio, sufiĉa, por instigi nin labori tiucele. — *Trad.*

de lia senlima potenco. Ne ekzistas surtere du arbofolioj, nek du globoj en la senlima spaco ĉiela, kiuj estas samaj, kaj ĉio, kion ci vidas sur ĉi tiu eta atomo, kie ci naskiĝis, devis esti en sia loko en difinita tempo, laŭ la neŝanĝeblaj ordonoj de tiu, kiu ampleksas ĉion. La homoj pensas, ke tiu infano, kiu ĵus pereis, falis hazarde en akvon, ke same laŭ hazardo brulis tiu domo; sed hazardo ne ekzistas: ĉio estas provo, aŭ puno, aŭ rekompenco, aŭ antaŭzorgo. Memoru pri tiu fiŝisto, kiu opiniis esti la plej malfeliĉa el ĉiuj homoj. Orosmad sendis cin por aliigi lian sorton. Malforta mortemulo! Ĉesu diskuti pri tio, kion oni devas adori.

— Sed, diris Zadig...

Kiam li diris *sed*, la anĝelo jam ekflugis al la deka sfero. Zadig surgenuie adoris la Providencon kaj submetiĝis. La anĝelo el la supro enaera kriis al li:

— Ci vojiru al Babilono.

## ĈAPITRO XXI

### Enigmoj

Duonfrenezigiĝinte, kvazaŭ homo apud kiu frapis fulmo, Zadig marŝis blinde. Li eniris Babilonon en la tago, kiam la enarenaj batalintoj estis kunvenintaj en la grandan vestiblon de l'palaco, por klarigi la enigmojn kaj respondi al la demandoj de l'ĉefpastro. Ĉiuj kavaliroj jam alvenis, krom tiu kun la verda armaĵo. Tuj kiam Zadig estis videbla en la urbo, la popolo kunvenis ĉirkaŭ li; la okuloj ne satiĝis rigardante lin, la buŝoj, benante lin, la koroj, dezirante, ke li havu la imperion. Enviulo vidis lin preterpasi, tremis kaj for-

tiriĝis; la popolo portis lin ĝis la kunvenejo. La reĝino, al kiu oni sciigis pri lia alveno, suferis de tima kaj espera eksciteco; maltrankvilo forkonsumis ŝin: ŝi ne povis kompreni, kial Zadig estas sen armaĵo, nek kial Itobad portas la blankan armaĵon. Konfuza murmuro aŭdigis ĉe la apero de Zadig. Oni estis surprizita kaj ravita revidi lin; sed nur al la kavaliroj, kiuj batalis en la areno, estis permesite ĉeesti la kunvenon.

— Mi batalis kiel la aliaj, li diris; sed iu ĉi tie surhavas mian armaĵon; kaj atendente, ke mi havu la honoron tion pruvi, mi petas la permeson prezenti min, por klarigi la enigmojn. Oni voĉdonis: lia prohonesta reputacio estis ankoraŭ tiel forte stampita en la spiritoj, ke oni ne hezitis akcepti lin.

La ĉefpastro unue starigis jenan demandon:

— El ĉiuj aferoj en la mondo, kiu estas la plej longa kaj la plej mallonga, la plej rapida kaj la plej malrapida, la plej dividebla kaj la plej ampleksa, la plej malatentata kaj la plej bedaŭrinda, sen kiu nenio povus okazi, kiu formanĝas ĉion, kio estas malgranda kaj kiu vivigas ĉion, kio estas granda?

Estis la vico de Itobad paroli. Li respondis, ke homotia, kia li estas, komprenas nenion pri enigmoj, kaj ke sufiĉas al li esti venkinta per fortaj lancobatoj. Iuj diris, ke ĝi estas la riĉo, aliaj, la tero, aliaj, la lumo. Zadig diris, ke ĝi estas la tempo.

— Nenio estas pli longa, li aldonis, ĉar ĝi estas la mezuro de la eterno; nenio estas pli mallonga, ĉar ĝi mankas por efektiviĝi ĉiujn miajn projektojn; nenio estas pli malrapida por tiu, kiu atendas, nenio estas pli rapida por la ĝuanto; kiel tuto ĝi ampleksas la senlimecon; kiel ero, ĝi dividiĝas senfine; ĉiuj homoj malatentas ĝin; ĉiuj bedaŭras ĝian perdon; sen ĝi nenio



estas farata; ĝi forgesigas ĉion, kio ne indas je la postularo, kaj ĝi eternigas la grandajn aferojn. -

La kunvenintaro konsentis, ke Zadig estas prava. Oni poste demandis:

— Kio estas la afero, kium oni ricevas sendanke, kium oni senkonscie ĝuas, kium oni donas al aliaj personoj, kiam oni ne scias, kie oni estas, kaj kium oni senrimarke perdas?

Ĉiu eldiris nomon: nur Zadig divenis, ke ĝi estas la vivo. Same facile li klarigis ĉiujn aliajn enigmojn. Itobad ĉiam diris, ke nenio estas pli facila, kaj ke li ankaŭ sukcesus diveni same facile, se li volus peni tiucele. Oni starigis demandojn pri justo, pri la suverena bono, pri la arto regadi. La respondoj de Zadig estis juĝataj la plej solidaj.

— Domaĝe estas, oni diris, ke tia saĝulo estas tiel malbona kavaliro.

— Gloraj nobelaj moŝtoj, diris Zadig, mi havis la honoron venki en la areno. La blanka armaĵo apartenas al mi. Sinjorego Itobad ekkaptis ĝin dum mia dormo; ŝajne li opiniis, ke ĝi pli konvenas al li ol la verda. Mi estas preta por pruvi al li antaŭ vi, kun mia spado kaj mia robo kontraŭ tiu bela armaĵo blanka, kium li forprenis de mi, ke mi mem havis la honoron venki la bravan Otame.

-Itobad akceptis la batalinviton kun la plej granda fido. Li ne dubis, ke, havante la korpon kirase ŝirmita, li sukcesos facile venki ĉampionon kun noktoĉapo kaj ĉambrorobo. Zadig elingigis sian spadon, salutante la reĝinon, kiu rigardis lin, saturita de ĝojo kaj timo. Itobad elingigis la sian, salutante nenion. Li antaŭeniris al Zadig, kiel homo, kiu bezonas nenion timi. Li estis preta, por fendi lian kapon; Zadig sciis eviti la frapon,

kontraŭstarigante, kion oni nomas la forton de la spado, al la mallerto de sia kontraŭulo, tiele ke la spado de Itobad rompiĝis. Tiam Zadig, kaptante sian malamikon ĉe la korpo, faligis lin teren, kaj metante la pinton de sia spado en interspaco ĉe lia kiraso:

— Lasu vin senarmiĝi, li diris, aŭ mi mortigas vin.

Itobad, ĉiam surprizite de la malfeliĉaĵoj, kiuj okazis al tia homo, kia li estas, ne kontraŭstaris al Zadig, kiu trankvile formetis lian lukse belan kaskon, lian imponan kirason, liajn brakŝirmilojn, liajn brilajn femurringojn, sin vestis per ili, kaj kuris en tiu vestarango sin ĵeti ĉe la genuoj de Astarta. Kador facile pruvis, ke la armaĵo apartenis al Zadig. Li estis akceptata kiel reĝo per unuanima konsento, kaj ĉefe per tiu de Astarta, kiu ĝuis, post tiom da malfeliĉaĵoj, la mildan senton vidi sian amaton inda esti ŝia edzo laŭ ĉiesa jeso. Itobad iris en sian domon, por tie esti nomata sinjorega moŝto. Zadig estis reĝo kaj estis feliĉa. Li memoris la dirojn de la anĝelo Jesrad. Li eĉ pensis pri la diamantiginta sablero. La reĝino kaj li adoris la Providencon. Zadig permesis, ke la kaprica bel'Misufa migru tra la mondo. Li venigis la rabiston Arbogad<sup>1</sup>, al kiu li donis honoran rangon en sia armeo, kun promeso lin promocii ĝis la plej altaj oficoj, se li kondutos kiel vera militisto, kaj pendigi lin, se li praktikos la rabmetion.

El la malproksima Arabio oni venigis Setok, kun la bel'Almona, por ke li estu la ĉefgvidisto de l'komerca fako en Babilono. Kador estis postenigita kaj amata laŭ

<sup>1</sup> Oni memoru, ke la anĝelo Jesrad diris al Zadig, ke »la malbonuloj estas ĉiam malfeliĉaj«. Malgraŭ sia subtilo Volter ne sukcesis kaŝi la sofismon, kiu konsistas en tio, ke *ĉiopova kaj senlime bona* Dio estus kreinta mondon, en kiu malbono ekzistas. — Trad.


siaj servoj; li estis la amiko de la reĝo kaj la reĝo estis sur la tuta tero la sola monarko, kiu havis amikon. La eta mutulo ne estis forgesita. Oni donacis belan domon al la fiŝisto. Orkan estis kondamnita pagi al li grandan sumon kaj redoni lian edzinon; sed la fiŝisto iĝinte saĝa, akceptis nur la monon.

Nek la bel'Semira povis konsoliĝi pri tio, ke ŝi kredis, ke Zadig unuokuliĝos, nek Azora povis senlarmiĝi pro tio, ke ŝi volis fortranĉi lian nazon. Li mildigis ilian ĉagrenon per donacoj. Enviulo mortis pro furiozo kaj honto. La imperio ĝuis pacon, gloron kaj abundon. Tiam estis la plej bela epoko de la tero; ĝi estis regata de justo kaj de amo. Oni benis al Zadig, kaj Zadig benis la ĉielon.<sup>2</sup>

---

<sup>2</sup> Ci tie finiĝas la manuskripto, kiun oni trovis por la historio pri Zadig. Oni scias, ke li spertis multajn aliajn aventurojn, kiuj estis fidele notitaj. Oni petas al la sinjoroj interpretistoj je orientaj lingvoj, ke ili bonvolu komuniki tiujn skribaĵojn, se ili venos en iliajn manojn. (*Nota de Volter.*)

## FINO



# SENARTIFIKULO

Rakonto tute vera  
Cerpita el manuskriptoj de patro Kenel<sup>1</sup>

1767

---

<sup>1</sup> Kenel (Quesnel) estis hereza teologo Pariza, samideano kun la Holanda teologo Jansen, kies ideoj estis kondamnitaj de l'papo per la buleo *Unigenitus* (1713). En tiu epoko la jansenismo havis multajn adeptojn.

Volter publikigis tiun ĉi rakonton en la jaro 1767 kiel »veran historion ekstraktitan el manuskriptoj de l'Patro Kenel«.

Herkulo de KERKABON tute freŝdate revenis el la lando de l'Huronoj. Ĉar »li diras ĉiam naive tion, kion li pensas kaj faras tion, kion li volas«, li elmetas sin al serio da malbonaj travivaĵoj, puŝigante kontraŭ la kutimoj kaj la antaŭjuĝoj. Kuraĝe rebatinte la Anglojn en Bas-Bretonio, li iras al Versajo por ricevi sian rekompencan; sed li estas enfermata en la Bastijo ĉar li malplaĉis al komizo, kaj lia fianĉino, Fraŭlino de Sankta-Ivo, liverita al la brutecoj de subministro, mortas tial pro doloro. Dume la Senartifikulo, instruita per la sperto kaj fariĝinta filozofo, akceptas de Luvua oficiran postenon. Tiel estas en la mondo: oni devas ĝin akcepti, kia ĝi estas.

## SENARTIFIKULO

### ĈAPITRO I

#### **Kiel la prioro de Nia-SinJORINO-de-la-Monto kaj fraŭlino lia fratino konatiĝis kun iu Hurono**

Iun tagon, sankta Dunstan, laŭnacie Irlandano kaj laŭprofesie sanktulo, foriris el Irlando sur monteto, kiu flosis al bordoj de Francio, kaj per tia veturilo alvenis en la golfeto Sankta-Malo. Albordiĝinte, li benis sian monteton, kiu profunde riverencis al li, kaj samvoje ĝi revenis en Irlandon.

Dunstan fondis etan monaĥejon en la regiono, kie li albordiĝis, kaj nomis ĝin monaĥejo de la Monto; kiel ĉiu scias, tiun nomon ĝi ankoraŭ havas.

En la jaro 1689-a, la 15-an de julio vespere, abato Kerkabon, prioro de Nia-SinJORINO-de-la-Monto, promenis ĉe la marbordo kun F-ino Kerkabon, lia fratino, por ĝui malvarmetan aeron. La prioro, jam maljuniĝanta, estis tre bona ekleziulo, estimata de siaj najbaroj, post kiam li estis amata de siaj najbarinoj. Li ĝuis grandan estimon, precipe pro tio, ke li estis la sola prebendulo, kiun oni ne devis porti en sian liton, post kiam li estis vespermanĝinta kun siaj kolegoj. Li sufiĉe sciis la teologion; kaj kiam la legado super la verkaro de sankta Aŭgusteno lacigis lin, tiam li sin distris per tiu de Rabelezo: tial ĉiuj parolis laŭde pri li.

F-ino Kerkabon, kiu neniam edziniĝis, kvankam ŝi multe deziris tion, estis ankoraŭ freŝa en sia kvardek-kvinjareco; ŝia karaktero estis bona kaj sentema; ŝi estis ĝuema kaj pia.

La prioro diris al sia fratino, rigardante la maron:

— Ho ve! estas ĉi tie, ke enŝipiĝis nia kompatinda frato kun nia kara bofratino, S-ino Kerkabon, lia edzino, sur la fregaton *Hirundo*, en 1669, por militservi en Kanadio. Se li ne estus mortigita, ni povus ankoraŭ esperi lin revidi.

— Ĉu vi kredas, diris F-ino Kerkabon, ke nia bofratino estis manĝita de la Irokuoj, kiel oni raportis al ni?

— Se ŝi ne estus manĝita, certe ŝi revenus en la landon. Mi priploros ŝin dum mia tuta vivo; ŝi estis ĉarma virino, kaj mia frato, kiu estis tre sprita, certe fariĝus riĉegulo.

Dum ambaŭ kompatis ĉe tiu rememoro, ili vidis eniri en la golfeto Rans ŝipeton, kiu alvenis kun la marafluo; estis Angloj, kiuj venis por vendi kelkajn nutrokomercaĵojn el sia lando. Ili saltis teren, neniel atentante al la S-o prioro nek al F-ino lia fratino, kiu estis ofendita pro manko de afablo al ŝi.

Sed tiel ne okazis fare de belaspekta junulo, kiu transsaltis la kapon de siaj kunuloj kaj troviĝis fronte al la fraŭlino. Li kapsignis al ŝi, pro nekutimo riverenci. Lia vizaĝo kaj lia vestaraĝo altiris la rigardon de la gefratoj. Li estis nudkapa kaj nudkrura, liaj piedoj estis vestitaj per etaj sandaloj, lia kapo estis ornamita per longaj haroj plektitaj kaj li surhavis etan jakon, kiu prenis delikatan kaj facilmovan talion; li havis batableman kaj mildan aspekton. Li tenis en unu mano boteleton da akvo el Barbado, kaj en la alia pokaletan



kaj tre bonan marbiskvito. Li parolis la francan lingvon sufiĉe kompreneble. Li proponis de sia akvo el Barbado al F-ino Kerkabon kaj al S-o ŝia frato; li trinkis kun ili; denove li trinkigis ilin, kaj ĉiel kondukis laŭ tiel simpla kaj ĉarma maniero, ke la gefratoj estis ĉarmitaj. Ili proponis al li siajn servojn kaj demandis, kiu li estas kaj kien li iras. La junulo respondis, ke li tute ne scias, ke li estis scivolema, ke li volis vidi la aspekton de la marbordoj de Francio; ke li venis kaj baldaŭ reiros.

La S-o prioro, juĝante laŭ lia akcento, ke li ne estas Anglo, kuraĝis demandi lin pri lia nacieco.

— Mi estas Hurono, respondis la junulo.

Mirigite kaj ravite de la ĝentilaĵoj de la Hurono, F-ino Kerkabon invitis lin vespermanĝi; li tuj akceptis kaj triope ili iris al la monaĥejo de Nia-Sinjorino-de-la-Monto.

La malaltkreska kaj rondecra fraŭlino insiste rigardadis lin per siaj okuletoj, kaj de tempo al tempo diris al la prioro:

— Tiu altkreska junulo havas lili-rozkoloran vizaĝon! kia bela haŭto ĉe Hurono!

— Vi pravas, fratino mia, diris la prioro.

Ŝi seninterrompe faris demandojn, kiujn la vojaĝanto respondis ĉiam tute ĝuste.

Baldaŭ disvastiĝis la famo, ke en la monaĥejo estis Hurono. La bonedukitaro el la kantono venis tien por vespermanĝi. Abato Sankta-Ivo kaj lia fratino, juna Bretonino tre bela kaj bone edukita, ankaŭ ĉeestis. La prefekto, la impostkolektisto kaj iliaj edzinoj partoprenis la vespermanĝon. Oni lokis la fremdulon inter F-ino Kerkabon kaj F-ino Sankta-Ivo. Ĉiuj admire rigardis lin; ĉiuj parolis al li samtempe kaj demandis lin; la Hurono

ne malkvietiĝis pro tio. Ŝajnis, ke li estis alpreninta la devizon de lordo Bolinbruk: *Nihil admirari*. Sed finfine li estis tedata per tiom da bruo kaj diris al ili firmtone:

— Sinjoroj, en mia lando oni parolas unu post alia; kiel mi povus respondi al vi, se vi malebligas, ke vin mi aŭdu?

La saĝo ĉiam igas homojn enpensiĝi dum mallonga tempo; fariĝis granda silento. La S-o prefekto, kiu ĉiam altiris al si la fremdulojn, kie ajn ili loĝis, kaj kiu estis la plej granda demandemulo el la provinco, diris al li, malfermegante la buŝon;

— Sinjoro, kiel oni nomas vin?

— Oni ĉiam nomis min Senartifikulo, respondis la Hurono, kaj en Anglio oni konfirmis al mi tiun nomon, tial ke mi ĉiam diras naive, kion mi pensas, same kiel mi agas laŭ mia deziro.

— Ĉar vi estas Hurono, kiel vi povis, sinjoro, veni en Anglion?

— Tial ke oni kondukis min tien; en iu batalo, mi estis kaptita de Angloj, post kiam mi kuraĝe min estis defendinta, kaj la Angloj, kiuj ŝatas la bravon, ĉar ili mem estas bravaj kaj same honestaj kiel ni, petis ke mi elektu inter du proponoj: ĉu esti resendota al miaj gepatroj, ĉu veni en Anglion? Mi akceptis ĉi tiun lastan proponon, tial ke pasie mi emas migradi.

— Sed, sinjoro diris la prefekto kun impona tono, kiel vi povis forlasi viajn gepatrojn?

— Nu, tial ke mi neniam konis mian patron nek mian patrinon, diris la fremdulo.

La ĉeestantaro estis kortuŝita, kaj ĉiu ripetis: *Nek patron, nek patrinon!*

— Ni anstataŭos ilin, diris la dommastrino al sia frato la prioro. Kiom interesa estas tiu Hurona sinjoro!

Senartifikulo dankis al ŝi kun nobla kaj fiera afablo, kaj komprenigis al ŝi, ke li bezonas nenion.

— Mi ekrimarkas, sinjoro Senartifikulo, diris la serioza prefekto, ke vi pli bone parolas la francan lingvon ol konvenas al Huroño.

— Iu franco, li diris, kiun en Huronio oni kaptis, kiam mi estis tute juna, kaj por kiu mi sentis grandan amikecon, instruis al mi sian lingvon; tre rapide mi lernas, kion mi deziras lerni. Alveninte en Plimuto mi renkontis unu el la Francoj, kiujn, mi ne scias kial, vi nomas *kalvinanoj*; li helpis min progresi en la scio de via lingvo, kaj tuj kiam mi scipovis min esprimi kompreneble, mi venis por vidi vian landon, tial ke mi ŝatas sufiĉe la Francojn, kiam ili ne faras tro da demandoj.

Abato Sankta-Ivo, malgraŭ tiu averto, demandis, kiu el la tri lingvoj, la hurona, la angla, la franca, plej plaĉas al li.

— Nediskuteble estas la hurona, respondis Senartifikulo.

— Ĉu eblas? ekkriis F-ino Kerkabon; mi ĉiam kredis, ke la franca lingvo estas la plej bela el ĉiuj, post la bretona.

Tiam ĉiuj konkuris por demandi lin, kiel hurone oni diras: tabako, kaj li respondis: *taja*; kiel oni diras: manĝi, li respondis: *essenten*. F-ino Kerkabon volis nepre scii, kiel oni diras: amindumi; li respondis al ŝi: *trovander*,<sup>2</sup> kaj persiste asertis, ne senmotive ŝajnas, ke tiuj vortoj egalvaloras la francajn kaj anglajn, kiuj respondas al ili. *Trovander* ŝajnis tre bela al ĉiuj gastoj.

<sup>2</sup> Tiuj nomoj ja estas huronaj.

La Sinjoro prioro, kiu havis en sia biblioteko huronan gramatikon, kiun donacis al li la respektinda patro Sagar Teoda, rekoleta,<sup>3</sup> fama misiisto, detablĝis momente por iri konsulti ĝin. Li revenis spiregante pro amikemo kaj ĝojo; li ekkonis, ke Senartifikulo estas vera Hurono. Oni disputis iom pri la lingvo-multo, kaj oni interkonsentis, ke sen la epizodo de la Babelturo sur la tuta tero oni parolus france.

La demandema prefekto, kiu ĝis tiam iom malfidis la Huronon, eksentis por li profundan respekton; li parolis kun li kun pli da ĝentilo ol antaŭe, kaj Senartifikulo tion ne rimarkis.

F-ino Sankta-Ivo tre scivolis ekscii, kiel oni amin-dumas en Huronio.

— Farante delikatajn afablaĵojn, li respondis, por plaĉi al la personoj, kiuj similas vin.

Mirigite ĉiuj gastoj aplaŭdis. F-ino Sankta-Ivo ruĝiĝis kaj estis tre kontenta. F-ino Kerkabon ankaŭ ruĝiĝis sed ne sentis tiel plaĉe. Ŝi estis iom ofendita pro tio, ke la amindumo ne celis al ŝi; sed ŝi estis tiel bonkora, ke ŝia amemo por la Hurono ne aliĝis. Ŝi demandis al li, kun bonkoreĉo, kiom da amatinoj li havis en Huronio:

— Mi havis nur unu, diris Senartifikulo; ŝi nomiĝis F-ino Abakaba kaj estis la bona amikino de mia kara mamnutristino; junkoj ne estas pli rektaj, ermino ne estas pli blanka, la ŝafoj estas malpli mildaj, la agloj malpli fieraj, kaj la cervoj ne estas tiel facilmovaj kiel estis Abakaba. Foje ŝi persekutis leporon en mia ĉirkaŭaĵo, proksimume kvindek mejlojn for de mia loĝejo; iu malbonedukita Algonkino, kiu loĝis cent mejlojn pli

<sup>3</sup> Ano de l'monaĥa ordeno »recollects« (preĝemuloj).

malproksime, venis kapti ŝian leporon. Tion mi eksciis kaj tien kuris; mi terenbatis la Algonkinon per klaboro, ligis liajn piedojn kaj portis lin ĝis la piedoj de mia amatino. La parencoj de Abakaba volis manĝi lin; sed neniam plaĉis al mi tiaj festenoj. Mi liberigis lin kaj li fariĝis mia amiko. Abakaba estis tiel kortuŝita de mia konduto, ke mi fariĝis la preferato el ĉiuj ŝiaj amantoj. Ŝi ankoraŭ amus min, se urso ne manĝus ŝin. Mi punis la urson: dum longa tempo mi veste portis ĝian haŭton; sed tio ne konsolis min.

Ĉe tiu rakonto F-ino Sankta-Ivo sentis sekretan plezuron, eksciante, ke Senartifikulo havis nur unu amatinon, kaj ke ŝi ne plu ekzistas; sed ŝi ne komprenis la kaŭzon de sia plezuro. Ĉiuj fikse rigardadis al Senartifikulo; oni multe laŭdis lin pro tio, ke li malhelpis, ke liaj kamaradoj manĝu iun Algonkinon.

La senkompata prefekto, kiu ne povis bridi sian demandpasiegon, fine elmontris tian scivolon, ke li eĉ demandis, kiun religion havas la S-ro Hurono; ĉu li elektis la anglikanan religion, aŭ la galikan, aŭ la kalvinan.

— Mi havas mian propran religion, li diris, same kiel vi la vian.

— Ho ve! ekkriis la Kerkabon-ino, mi bedaŭrinde komprenas, ke tiuj punindaj Angloj eĉ ne pensis bapti lin.

— He! Dio mia! diris F-ino Sankta-Ivo, ĉu povas esti, ke la Huronoj ne estas katolikoj? Ĉu do la respektindaj patroj jezuitaj ne konvertis ilin ĉiujn?

Senartifikulo certigis al ŝi, ke en lia lando oni konvertas neniun; ke neniam vera Hurono ŝanĝis sian opinion, kaj ke eĉ en lia lingvo la termino *malkonstanto*

ne ekzistas. Tiuj lastaj vortoj treege plaĉis al F-ino Sankta-Ivo.

— Ni baptos lin, ni baptos lin, diris la Kerkabonino al la S-o prioro; tiun honoron vi havos, mia frato. Mi volas nepre esti ŝia baptopatrino; S-ro abato Sankta-Ivo prezentos lin sur la baptokuvon. Estos tre brila ceremonio; pri ĝi oni parolos tra la tuta Bas-Bretonio, kaj tio havigos al ni grandegan honoron.

La tuta ĉeestantaro konsentis kun la dommastrino; ĉiuj gastoj kriis: Ni baptos lin.

Senartifikulo respondis, ke en Anglio oni lasas la homojn vivi laŭplaĉe. Li asertis, ke la propono tute ne plaĉas al li, kaj ke la leĝo de la Huronoj certe ne estas malpli valora ol tiu de la Bas-Bretonoj! fine li diris, ke la postan tagon li foriros. Oni finis malplenigi lian botelon da akvo de Barbadoj, kaj ĉiu iris enlitiĝi.

Kiam Senartifikulo estis rekondukita en sian ĉambron, F-ino Kerkabon kaj ŝia amikino, F-ino Sankta-Ivo, ne povis deteni sin rigandi tra la truo de larĝa seruro, por vidi kiel Hurono dormas. Ili vidis, ke li estis sterninta surplanke la litkovrilon kaj ke li ripozas en plej bela sinteno.

## ĈAPITRO II

### **La Hurono, nomita Senartifikulo, estas rekonita de siaj parencoj**

Laŭ sia kutimo. Senartifikulo vekigis ĉe la sunleviĝo, ĉe la kokokrio, kion oni nomas, en Anglio k Huronio, *la tagtrumpeto*. Li ne similis al la bonedukitaro, kiu konsumiĝas en senutila lito, ĝis la suno estas farinta duonon de sia ĉirkaŭiro, kiu ne povas dormi nek ellitiĝi,

kiu perdas tiom da valoraj horoj en ia stato komuna al la vivo kaj al la morto, kaj kiu plie plendas, ke la vivo estas tro mallonga.

Li jam estis piedirinta du aŭ tri mejlojn; li jam estis kugle mortiginta tridek pecojn da ĉasaĵo, kiam, revenante, li trovis lian sinjoran moŝton la prioron de Nia-SinJORINO-de-la-Monto kaj lian diskretan fratinton, kiuj promenis kun dormoĉapo sur la kapo en la ĝardeno. Li prezentis al ili sian tutan ĉasaĵon, kaj tirante el sia ĉemizo ian talismaneton, kiun ĉiam li havis ĉe la kolo, li petis, ke ili akceptu ĝin kiel dankosignon pro ilia bonakcepto.

— Nenion pli valoran mi posedas, li diris; oni certigis min, ke ĉiam mi estos feliĉa, tiom longe, kiom mi surhavas tiun aĵeton, kaj ĝin mi donacas al vi, por ke vi ĉiam estu feliĉaj.

La prioro kaj la fraŭlino kortuŝite ridetis pro la naivo de Senartifikulo. Tiu donacaĵo konsistis el du senartaj portretoj, kunigitaj per rimeno grase tre makulita.

F-ino Kerkabon demandis lin, ĉu estas pentristoj en Huronio.

— Ne, diris Senartifikulo; tiun maloftaĵon donis al mi mia mamnutristino; ŝia edzo konkere akiris ĝin, senvestigante kelkajn Francojn el Kanadio, kiuj militis kontraŭ ni; nenion pli ni scias pri la afero.

La prioro atente rigardis tiujn portretojn; li alikoloriĝis; li emociiĝis; liaj manoj tremis.

— Pro Nia-SinJORINO-de-la-Monto, li ekkriis, mi kredas, ke jen estas la vizaĝo de mia frato, la kapitano, kaj de lia edzino!

Fraŭlino Kerkabon, kun sama emocio, rigardinte la portretojn, samopiniis. La gefratoj estis atakitaj de

miro kaj de ĝojo, miksitaj kun doloro; ambaŭ estis kortuŝitaj; ambaŭ ploris; ilia koro forte batis. Eke ili kriis; ili forprenis de si reciproke la portretojn; ĉiu prenis ilin kaj redonis dudekfoje en unu sekundo; ili glutis per la okuloj la portretojn kaj la Huronon; unu post la alia demandis lin, kaj ambaŭ samtempe, kie, kiam, kiel tiuj miniaturoj trafis en la manojn de lia mamnutrintino; ili komparis, kalkulis pri la datoj depost la foriro de l' kapitano. Ili ekmemoris esti ricevintaj informon, ke li iris en Huronion, kaj ke de tiam ili ne plu aŭdis pri li.

Senartifikulo estis dirinta, ke li neniam konis siajn gepatrojn. La prioro, kiu estis observokapabla, rimarkis, ke Senartifikulo havis iom da barbo; li sciis bone, ke da ĝi la Huronoj ne havas.

— Lia mentono estas lanuga; li do estas filo de Eŭropano; mia frato kaj mia bofratino ne plu aperis post la ekspedicio kontraŭ la Huronoj, en 1669; mia nevo tiam estis suĉinfano. La hurona nutrintino savis al li la vivon kaj anstataŭis lian patrinon.

Fine, post cent demandoj kaj cent respondoj, la prioro kaj lia fratino konkludis, ke la Hurono estas ilia propra nevo. Ili kisadis lin plorante, kaj Senartifikulo ridis, ne povante imagi, ke Hurono povas esti nepo de bas-bretona prioro.

La tuta kunestantaro kolektiĝis. S-ro Sankta-Ivo, kiu estis tre lerta por juĝi laŭ fizionomio, komparis la du portretojn kun la vizaĝo de Senartifikulo; li tre lerte rimarkis, ke liaj okuloj similas tiujn de lia patrino, ke liaj frunto kaj nazo similas tiujn de l' mortinta kapitano, S-ro Kerkabon, kaj liaj vangoj laŭparte similas al ambaŭ.



F-ino Sankta-Ivo, kiu neniam vidis la patron, nek la patrinon, certigis, ke Senartifikulo perfekte similas ilin. Ĉiuj admiris la Providencon kaj la interligon de la eventoj en ĉi tiu mondo. Fine oni tiel konvinkigis, tiel kredis pri la deveno de Senartifikulo, ke li mem konsentis esti la nevo de lia priora moŝto, dirante, ke ĉu ĉi tiu aŭ alia, tio restas al li indiferenta.

Oni iris en la preĝejon de Nia-Sinjorino-de-la-Monto por danki al Dio, dum la Hurono, tute indiferenta pri la afero, sin distris en la domo trinkante.

La Angloj, kiuj veturigis lin, kaj kiuj estis pretaj por malferli la velojn, venis por averti lin, ke estis tempo por foriri.

— Sajnas, li diris al ili, ke vi ne retrovis viajn geonklojn; mi restas ĉi tie; vi reiru al Plimuto; mi donacas al vi ĉiujn miajn vestaĉojn; nenion ajn mi bezonas, ĉar mi estas la nevo de prioro.

La Angloj malferlis la velojn kaj tute ne okupiĝis, ĉu Senartifikulo havis aŭ ne parencojn en Bas-Bretonio.

Post kiam la onklo, la onklino kaj la ĉeestantaro estis kantintaj la *Te Deum*; post kiam la prefekto estis denove supersutinta Senartifikulon per demandoj; post kiam elĉerpiĝis ĉio, kion miro, ĝojo, amemo povas inspiri, tiam la prioro de la Monto kaj abato Sankta-Ivo konkludis, ke oni devas bapti Senartifikulon kiel eble plej baldaŭ. Sed ne eblis rilati al altkreska Hurono dudek-dujara kiel al infano, kiun oni rekreas sen ĝia scio. Necesis instrui lin, kaj tio ŝajnis malfacila, tial ke abato Sankta-Ivo supozis, ke homo, kiu ne naskiĝis en Francio, estas tute malsaĝa.

La prioro rimarkigis al la ĉeestantaro, ke se efektive, S-ro Senartifikulo, lia nevo, ne havis la feliĉon

naskiĝi en Bas-Bretonio, li tamen estas inteligenta; ke pri tio oni povas juĝi per ĉiuj liaj respondoj, kaj ke certe la naturo favoris lin multe, same de l'patra flanko, kiel de l'patrina.

Oni unue demandis lin, ĉu li legis iam kelkajn librojn. Li diris, ke li legis verkojn de Rabelezo angle tradukitajn kaj parkeris kelkajn partojn el tiuj de Ŝekspir; ke li trovis tiujn librojn ĉe la kapitano de l'ŝipo, kiu portis lin el Ameriko al Plimuto, kaj ke ili tre plaĉis al li.

— Mi konfesas al vi, diris Senartifikulo, ke mi kredible divenis parton, sed ne komprenis la ceteron.

Ĉe tiu diro, abato Sankta-Ivo rimarkigis, ke tiel li mem ĉiam legis, kaj ke preskaŭ ĉiuj homoj aliel ne legas.

— Sendube vi legis la *Biblion*? li diris al la Hurono.

— Tute ne, sinjoro abato; ĝi ne estis inter la libroj de la kapitano; neniam mi aŭdis pri ĝi.

— Tiaj estas tiuj malbenindaj Angloj, ekkriis F-ino Kerkabon; ili pli alte taksas teatraĵon de Ŝekspir, pudingon kaj botelon da rumo ol la Pentateŭkon.<sup>1</sup> Tial ili neniam konvertis iun en Ameriko. Certe ili estas malbenitaj de Dio, kaj ni konkeros super ili Jamaikon kaj Virginion, antaŭ ol forpasos longa tempo.

Malgraŭ ĉio oni venigis el Sankta Malo la plej lertan tajloron, por vesti Senartifikulon de la piedoj ĝis la kapo. La ĉeestantaro disigis; la prefekto iris alien fari demandojn. F-ino Sankta-Ivo, forirante, sin turnis posten plurfoje por rigardi Senartifikulon, kiu faris al ŝi pli profundajn riverencojn ol al iu ajn en ŝia vivo.

<sup>1</sup> Apenaŭ ekzistas domo en Anglio, en kiu ne troviĝas la *Biblio*; tiel ne estas en Francio.

La prefekto, antaŭ ol adiaŭi, prezentis al F-ino Sankta-Ivo iun tre stultan filon sian, kiu estis finstudinta; sed apenaŭ ŝi rigardis lin, tial ke logis ŝin la ĝentilo de la Hurono.

### ĈAPITRO III

#### La Hurono, nomita Senartifikulo, estas konvertita

La sinjoro prioro, pensante, ke li jam estas maljuna, kaj ke Dio konsole sendis al li nevon, cerbumis pri transdonaco al li de sia prebendo, se li sukcesos bapti lin kaj atingi, ke li pastrigu.

Senartifikulo havis tre bonan memorkapablon. La nemolo de organoj el Bas-Bretonio, pliigita per la klimato de Kanadio, faris lian kapon tiel vigla, ke se oni batis ĝin, apenaŭ li sentis tion, kaj kiam oni gravuris en ĝi, nenio foriĝis; neniam li forgesis ion. Lia koncepto estis tiom pli viva kaj neta, ke junaĝe lia cerbo ne estis supersŭtata per balasto kaj stultaĵoj, kiuj dispremas la nian; la ideoj eniris lian cerbon sen iu nuboj. La prioro fine decidis doni al li por legi la novan *Testamenton*. Senartifikulo rapidege legis ĝin kun ega plezuro; sed ne sciante kiam kaj kie okazis la aventuroj raportitaj en tiu libro, li ne dubis, ke la scenejo estas en Bas-Bretonio. Li ĵuris, ke li fortranĉos la nazon kaj la orelojn al Kajafas kaj al Pilato, se iam li renkontus tiujn malestimindulojn.

Lia onklo, ravite de tia bona intenco, klarigis al li la aferon dum mallonga tempo; li laŭdis lian fervoron; sed li sciigis lin, ke ĝi estas senutila, tial ke tiuj homoj mortis proksimume antaŭ mil sescent naŭdek jaroj. Senartifikulo baldaŭ sciis parkere la tutan libron. Iajoje

li faris demandojn, kiuj tre embarasis la prioron. Li ofte estis devigata konsulti la abaton Sankta-Ivo, kiu, ne sciante, kion respondi, venigis bas-bretonan jezuiton por finkonverti la Huronon.

Fine efikis la graco; Senartifikulo promesis kristanigi; li ne havis dubon pri tio, ke unue li devas esti cirkumcidita; en la libro, kiun vi donis al mi por legi, li diris, mi vidis, ke ĉiuj personoj havis la prepucon fortranĉita; tion oni faru al mi kiel eble plej baldaŭ. Li ne ŝanceliĝis kaj ordonis, ke oni venigu la vilaĝan kirurgon kaj petis, ke li faru la operacion, opiniante per tio tre ĝojigi F-inon Kerkabon kaj ĉiujn gekunulojn, kiam la afero estos finita. La barbisto,<sup>1</sup> kiu neniam faris tian operacion, avertis la familion, kiu ekkriegis. La bona Kerkabon tremis, ke ŝia nevo, kiu ŝajnis decidkaj rapidema, mallerte operaciu sin mem, kio povus havi bedaŭrindajn konsekvencojn, pri kiuj la virinoj ĉiam interesiĝas pro bonanimeco.

La prioro korektis la ideojn de la Hurono, klarigante al li, ke la cirkumcido ne plu estas laŭmoda; ke la bapto estas multe pli milda kaj utila; ke la leĝo de graco ne similas la leĝon de severo. Senartifikulo, kiu havis multe da simpla saĝo kaj da honesto, diskutis, sed konfesis sian eraron, kio estas tre malofta en Eŭropo inter homoj, kiuj diskutas; fine li promesis konsenti bapton, kiam oni deziros.

Necesis unue, ke li konfesu siajn pekojn, kaj tio estis la plej malfacila afero. Senartifikulo ĉiam havis enpoŝe la libron, kiun lia onklo donacis al li. En ĝi li ne legis, ke iu ajn apostolo sin konfesis, kaj tio igis lin

<sup>1</sup> En tiu epoko barbistoj faris malgravajn operaciojn kaj tial oni nomis ilin iafoje »kirurgoj«. — *Trad.*

tre malobeema. La prioro venke rebatis al li montrante, en la epistolo de sankta Jakobo, ĉi tiujn vortojn, kiuj tiom ĉagrenas la herezulojn: *Konfesu do viajn pekojn unu al la alia*. La Hurono eksilentis kaj sin konfesis al iu rekoletito. Fininte, li tiris la rekoleton el la konfesejo, kaj, kaptante lin per fortika brako, li sin ŝovis en lian lokon kaj devigis lin genuiĝi antaŭ li:

— Nu, mia amiko, estas dirite: *Konfesu do viajn pekojn unu al la alia*; mi rakontis al ci miajn pekojn; ci ne foriros el ĉi tie, antaŭ ol ci estos rakontinta al mi pri la CIAJ. Tiel parolante, li premis per sia genuo la bruston de sia kontraŭulo. La rekoletito plenigis la preĝejon per siaj kriegoj. Pro la bruo oni alkuras; oni vidas la instruaton, kiu pugnobatas la monaĥon je la nomo de sankta Jakobo. La plezuro bapti huron-anglan Bas-Bretonon estis tiel granda, ke oni indulgis tiujn strangaĵojn. Estis eĉ multaj teologoj, kiuj opiniis, ke konfeso ne estas necesa, ĉar la bapto anstataŭas ĉion.

Oni interkonsentis pri dato kun la episkopo de Sankta-Malo. Estas evidente, ke li estis tre flatita per la propono bapti Huronon; tial li alvenis en pompa veturilo, akompanate de sia pastraro. Dankante al Dio, F-ino Sankta-Ivo surmetis sian plej belan robon, kaj, por brili dum la ceremonio, ŝi eĉ venigis frizistinon el Sankta-Malo, por aranĝi ŝiajn harojn. La demandema prefekto alkuris kun ĉiuj regionanoj. La preĝejo estis lukse ornamita; sed kiam oni devis konduki la Huronon al la bapto, oni ne trovis lin.

La geonkloj serĉis lin ĉie. Oni kredis, ke li foriris por ĉasi, laŭ sia kutimo. Ĉiuj invititoj al la festo traserĉis en la najbaraj arbaroj kaj vilaĝoj: la Hurono estis netrovebla.

Oni komencis timi, ke li estis reirinta en Anglion. Oni memoris liajn dirojn pri amo al tiu lando. La prioro kaj lia fratino estis konvinkitaj, ke tie oni baptas neniun, kaj ili timtremis pri la animo de sia nevo. La episkopo estis konfuzita kaj preta foriri; la prioro kaj abato Sankta-Ivo malesperis; la prefekto demandis al ĉiuj preterpasantoj kun sia kutima seriozo; F-ino Kerkabon ploris; F-ino Sankta-Ivo ne ploris sed profunde ĝemetadis, kio ŝajne atestis pri ŝato al la sakramentoj. Ambaŭ malgaje promenis laŭlonge de la vicoj el salikoj kaj kanoj, kiuj borderas la rivereton Rans, kiam ili ekvidis meze en la akvo sufiĉe blankan kaj grandan figuron, kun la manoj interplektitaj sur la brusto. Ili ekkriegis kaj sin deturnis. Sed ĉar la scivolo baldaŭ venkis ĉiun alian konsideron, ili zorge sin ŝovis inter la kanojn; kaj akirinte la certon ne esti vidataj, ili volis ekvidi pri kio temas.

## ĈAPITRO IV

### Senartifikulo estas baptita

Alkurinte, la prioro kaj la abato demandis al Senartifikulo, kion li faras tie.

— Pro Dio! sinjoroj, mi atendas bapton; jam de unu horo mi estas en la akvo ĝis la kolo, kaj ne estas ĝentile lasi min malvarmiĝi.

— Mia kara nevo, ameme diris al li la prioro, ne tiele oni baptas en Bas-Bretonio; vestu vin kaj venu kun ni. F-ino Sankta-Ivo, aŭdante tiujn vortojn, diris mallaŭte al sia akompanantino:

— F-ino, ĉu vi kredas, ke li tuj sin vestos?

Tamen la Hurono rebatis al la prioro:

— Ĉi-foje vi ne trompos min kiel alifoje; de tiam mi bone studis, kaj mi estas tute certa, ke aliel oni ne baptas. La eŭnuko de l' reĝino Kandake estis baptita en rivereto; mi defias, ke vi povu montri per la libro, kiun vi donacis al mi, ke iam ajn oni aliel baptis. Mi tute ne estos baptita, aŭ on baptos min en rivero. Vane oni provis klarigi al li, ke aliĝis la kutimoj; Senartifikulo estis obstina, tial ke li estis Bretono kaj Hurono. Li ĉiam menciis la eŭnukon de l' reĝino Kandake; kaj kvankam F-ino lia onklino kaj F-ino Sankta-Ivo, kiuj observis lin de inter la salikoj, povus diri, ke neniel li similas al tia viro, tamen tion ili ne faris, tiom granda estis ilia diskreto. Eĉ la episkopo venis paroli kun li, sed sensukcese: la Hurono disputis kontraŭ la episkopo.

— Montru al mi, li diris, en la libro, kiun al mi donacis mia onklo, unu solan homon, kiu ne estis enrivero baptita, kaj mi ĉiel obeos al vi.

Kun malespero lia onklino estis rimarkinta, ke la unuan fojon, kiam ŝia nevo faris riverencon, li faris unu pli profundan al F-ino Sankta-Ivo ol al iu ajn alia persono el la ĉeestantaro; ke li eĉ ne salutis la episkopon kun tiu respekto, miksitita kun bonkoreco, kiun li montris al la bela fraŭlino. Ŝi decidis sin turni al ŝi en tia granda embaraso; ŝi petis, ke ŝi uzu sian influon por atingi, ke la Hurono baptiĝu laŭ la bretona maniero, kredante, ke neniam ŝia nevo fariĝos kristano, se li persistos en sia volo esti baptita en fluanta akvo.

F-ino Sankta-Ivo ruĝiĝis pro la sekreta plezuro, kiun ŝi eksentis, ĉe la ricevo de tiel grava komisio. Modeste ŝi proksimiĝis al Senartifikulo, kaj premante al li la manon laŭ tute nobla maniero:

— Ĉu vi ne faros al mi komplezon? ŝi diris al li. Kaj eldirante tiujn vortojn ŝi mallevis la okulojn kaj levis ilin kun ĉarmo kortuŝa.

— Ha! mi faros ĉion, kion vi volos, fraŭlino, ĉion, kion vi ordonos: akvobaptiĝo, fajrobaptiĝo, sangobaptiĝo; nenion mi povus rifuzi al vi.

F-ino Sankta-Ivo havis la gloron sukcesi per multaj vortoj en tio, pri kio fiaskis la fervoro de l' prioro, la reaj demandoj de l'prefekto kaj eĉ la rezonado de la episkopo. Ŝi sentis sian triumfon; sed ne ties konsekvencojn.

La bapto estis donata kaj ricevata kun la tuta deco, la tuta luksa belo, la tuta plaĉo eblaj. La geonkloj cedis al S-ro abato Sankta-Ivo kaj al lia fratino la honoron teni Senartifikulon sur la baptokuvo. F-ino Sankta-Ivo radiis pro ĝojo esti baptopatrino. Ŝi ne sciis, al kio tiu granda titolo submetos ŝin; ŝi akceptis tiun honoron, ne konante ties fatalajn konsekvencojn.

Ĉar neniam okazis ceremonio, kiu ne estis sekvata de festeno, oni altabligis tuj post la bapto. La rikane-muloj el Bas-Bretonio diris, ke oni ne devas bapti sian vinon.<sup>1</sup> Lia priora moŝto diris, ke la vino, laŭ Salomono, gajigas la homan koron. Lia episkopa moŝto aldonis, ke la patriarko Judas kredeble ligis sian azeneton al vito kaj trempis sian mantelon en la sangon de vinberoj, kaj ke estas tre bedaŭrinde, ke oni ne povas fari same en Bas-Bretonio.<sup>2</sup> Ĉiu provis eldiri spritaĵon pri la bapto de Senartifikulo kaj amindumaĵojn al la baptopatrino. La ĉiam demandema prefekto demandis, ĉu li plenumos siajn promesojn.

<sup>1</sup> Almiksi akvon. — *Trad.*

<sup>2</sup> Vitoj ja ne kreskas tie. — *Trad.*



— Kiel mi povus perfidi miajn promesojn, ĉar ilin mi faris al F-ino Sankta-Ivo?

La Hurono ekscitiĝis; li multe trinkis je la sano de sia baptopatrino.

— Se mi estus baptata per via mano, li diris, mi sentas, ke la malvarma akvo, kiun oni verŝis sur mian hararon, bruligus min.

La prefekto opiniis, ke tio estas tro fantazia, ĉar li ne sciis, ke tiu alegorio estas tre kutima en Kanadio. Sed ĝi tre kontentigis la baptopatrinon.

La baptito estis ricevinta la nomon Herkulo. La episkopo de Sankta-Malo demandadis pri tiu patrono, kies nomon neniam li aŭdis antaŭe. La jezuito, kiu estis tre klera, diris, ke estis sanktulo, kiu faris dekdu miraklojn. Estis iu dektria, kiu valoris la dekdu aliajn, sed ne decis, ke pri ĝi jezuito parolu; ĝi estis jena: en unu sola nokto Herkulo gravedigis kvindek virinojn. Iu ŝercemulo, kiu ĉeestis, energie emfazis tiun miraklon. Ĉiuj virinoj mallevis la palpebrojn, kaj juĝis laŭ la fizionomio de Senartifikulo, ke li estas inda je la sanktulo, kies nomon li ricevis.

## CAPITRO V

### Senartifikulo enamiĝas

Oni devas konfesi, ke, depost tiu baptiĝo kaj tiu festeno, F-ino Sankta-Ivo pasie deziris, ke la S-ro episkopo partoprenigu ŝin denove al iu bela sakramento kun S-ro Herkul-Senartifikulo. Tamen, ĉar ŝi estis bone edukita kaj tre modesta, ŝi ne tute kuraĝis konsenti kun si mem pri siaj amemaj sentoj; sed, se ŝi ellasis

rigardon, vorton, penson, ŝi kovris la tuton per vualo el hontemo treege ĉarma. Ŝi estis amema, arda kaj saĝa.

Tuj kiam la S-ro episkopo estis foririnta, Senartifikulo kaj F-ino Sankta-Ivo renkontiĝis, nepripensinte, ke ili serĉis unu la alian. Ili interparolis, ne cerbuminte pri tio, kion ili diros. Senartifikulo unue diris, ke li amas ŝin per sia tuta koro kaj ke la bela Abakaba, kiun li amegis en sia lando, ne estis al ŝi komparinda. La Fraŭlino respondis al li, kun sia kutima modesto, ke pri tio li devas kiel eble plej baldaŭ paroli al la S-ro prioro, lia onklo, kaj al F-ino lia onklino, kaj ke siaflanke ŝi ankaŭ diros kelkajn vortojn al sia kara frato, la abato Sankta-Ivo, kaj ke ŝi forte esperas pri komuna interkonsento.

Senartifikulo respondis, ke li bezonas nenies konsenton; ke ŝajnas al li tute ridinde demandi al aliaj pri tio, kion oni devas mem fari; ke kiam du personoj akordiĝas, oni ne bezonas kroman por ilin interkonsentigi.

— Neniun mi konsultas, li diris, kiam mi deziras tagmanĝi aŭ ĉasi aŭ dormi. Mi scias, ke rilate amon estas preferinde havi la konsenton de la persono, kiun oni amindumas; sed, ĉar mi enamiĝis nek al mia onklo, nek al mia onklino, ne al ili mi devas min turni tiurilate, kaj se vi samopinias kiel mi, vi ankaŭ nenion demandos al la S-ro abato Sankta-Ivo pri tiu afero.

Oni povas imagi, ke la bela Bretonino uzis la tutan subtilon de sia spirito por atingi, ke ŝia Hurono cedu al la decreguloj. Ŝi eĉ koleriĝis kaj baldaŭ kvietiĝis. Nu, oni ne scias, kiel finiĝus tiu konversacio, se, ĉe noktigo, la S-ro abato ne rekondukus sian fratinton en sian abatejon. Senartifikulo lasis enlitiĝi siajn geonklojn, kiuj estis iom lacaj de la ceremonio kaj de la longa

festeno. Li pasigis parton de la nokto, farante versojn en Hurona lingvo por sia amatino, ĉar oni devas scii, ke sur la tero ekzistas neniŭ lando, kie la amo ne poetigis amantojn.

La postan tagon, post la tagmanĝo, lia onklo, en la ĉeesto de F-ino Kerkabon, kiu estis tute kortuŝita, parolis al li jene:

— Dio estu laŭdata pro tio, ke vi havas la honoron, mia nevo, esti kristano kaj Bas-Bretono! sed tio ne sufiĉas. Mi ekmaljuniĝas; de mia frato mi heredis malgrandan bienon, kiu estas ne multvalora; mi havas bonan monaĥejon; se vi nur volas esti subdiakono, kiel mi esperas, mi cedos ĝin al vi, kaj tiam vi tre komforte vivos, post kiam vi estos estinta mia konsolo dum mia maljuna aĝo.

Senartifikulo respondis:

— Onklo mia, favoron al vi! vivu tiom longe, kiom vi povos. Mi scias neniom pri subdiakoneco, nek pri rezigno; sed ĉio al mi estos bona, kondiĉe, ke mi disponu je F-ino Sankta-Ivo.

— He! Dio mia, kian sciigon vi faras? mia nevo. Ĉu do vi freneze amas tiun belan fraŭlinon?

— Jes, mia onklo.

— Ho ve! mia nevo, neblas, ke vi edziĝu kun ŝi.

— Tio estas tre ebla, mia onklo, tial ke ne nur ŝi premis mian manon, kiam ni disiĝis, sed ŝi promesis svati min, kaj tre certe mi edzinigos ŝin.

— Tio estas tute neebla, mi diras al vi; ŝi estas via baptopatrino: baptopatrino faras teruran pekon, premante la manon al sia baptofilo; estas malpermesite edziĝi kun sia baptopatrino; la diaj kaj homaj leĝoj malpermesas tion.

— Tondre! mia onklo, vi mokas min: kial do estus malpermesite edziĝi kun sia baptopatrino, kiam ŝi estas juna kaj bela? En la libro, kiun vi donacis al mi, ne estas parolite pri malbono edzinigi filinojn, kiuj helpis homojn dum ilia baptiĝo. Mi ĉiutage konstatas, ke oni faras ĉi tie multajn aferojn, kiujn ne mencias via libro, kaj ke oni faras nenion el tio, kion ĝi rekomendas: mi konfesas al vi, ke tio mirigas kaj ĉagrenas min. Se oni senigas min je la bela Sankta-Ivo, pretekste de mia baptiĝo, mi avertas vin, ke mi forrabos ŝin kaj malbaptos min.

La prioro estis konfuzita; lia fratino ploris.

— Mia kara frato, ŝi diris, ni evitu, ke nia nevo damniĝu; nia sankta patro la papo povas doni al li eksterregulan permeson, kaj tiam li povos esti kristane feliĉa kun sia amatino.

Senartifikulo kisis sian onklinon.

— Kiu estas do, li diris, tiu ĉarma homo, kiu tiel bonkore favoras al la gejunuloj en iliaj amrilatoj? Mi volas baldaŭ iri por paroli kun li.

Oni klarigis al Senartifikulo, kia kaj kiu estas la papo, kaj li estis eĉ pli mirigita ol antaŭe.

— Ne eĉ unu solan vorton pri tio mi trovis en via libro, mia kara onklo; mi vojaĝis, mi konas la maron; ni estas ĉi tie ĉe la oceana bordo, kaj mi forlasus F-inon Sankta-Ivo por iri peti la permeson ami ŝin al viro, kiu loĝas proksime de la Mediteraneo, kvar cent mejlojn for de ĉi tie, kaj kies lingvon mi eĉ ne konas! Tio estas ridinda kaj nekomprenebla. Mi tuj iros al la S-ro abato Sankta-Ivo, kiu loĝas je nur unu mejlo de ĉi tie, kaj mi certigas al vi, ke mi edzinigos mian amatinon hodiaŭ mem.

Li ankoraŭ parolis, kiam envenis la prefekto, kiu, laŭkutime, demandis, kien li iras.

— Mi iras por edziĝi, diris Senartifikulo, kurante.

Post kvaronhoro li jam estis ĉe sia bela kaj kara Bas--Bretonino, kiu ankoraŭ dormis.

— Ha! mia kara frato, diris F-ino Kerkabon al la prioro, neniam vi sukcesos fari subdiakonon el nia nevo.

La prefekto estis tre malkontenta pro tiu alvizio, tial ke li pretendis edziĝi sian filon al la Sankta-Ivo, kaj tiu filo estis eĉ pli stulta kaj teda ol sia patro.

## Ĉapitro VI

### Senartifikulo kuras al sia amatino kaj furioziĝas

Tuj kiam Senartifikulo estis alveninta, li demandis al maljuna servistino, kie estas la ĉambro de sia amatino, li puŝis ties pordon, kiu ne estis zorge fermita kaj antaŭensaltis al la lito. F-ino Sankta-Ivo abrupte vekiĝis kaj demande ekkriis:

— Nu! ĉu estas vi? Ha! ĉu vere estas vi? haltu! kion vi faras?

Li respondis:

— Mi edzinigas vin.

Kaj fakte tiel okazus, se ŝi ne baraktus laŭ la tuta deco de bonedukita persono.

Senartifikulo ne komprenis ŝercon; li opiniis, ke ĉiuj tiuj farmanieroj estas impertinentaj.

— Ne tiel kondukis F-ino Abakaba, mia unua amatino; vi ne estas honesta; vi promesis al mi edziĝon, kaj vi ne volas edziniĝi; tio signifas malobei la elementajn leĝojn de la honorsento; mi lernigos al vi kiel

plenumi vian promeson, kaj mi rekondukos vin laŭ la vojo de l' virto.

Senartifikulo havis virecan kaj bravegan virton, inda je lia patrono Herkulo, kies nomon oni donis al li ĉe lia baptiĝo; li estis preta praktiki ĝin laŭ ĝia tuta amplekso, kiam ĉe la akraj krioj de la fraŭlino, kiu estis pli diskrete virta, alkuris la saĝa abato Sankta-Ivo, kun sia mastrumistino kaj maljuna servistino pia kaj iu pastro de l'paroĥo. Tia vidaĵo moderigis la kuraĝon de la atakanto.

— He! Dio mia! kara najbaro, diris al li la abato, kion vi faras?

— Mian devon, rebatis la junulo; mi plenumas miajn promesojn, kiuj estas sanktaj.

F-ino Sankta-Ivo sin rearangis ruĝigante. Oni kondukis Senartifikulon en alian ĉambron. La abato admonis lin pro lia gravega kulpo. Senartifikulo sin defendis, menciante la rajtojn de la natura leĝo, kiun li perfekte konis. La abato volis pruvi, ke la pozitiva leĝo devas esti preferata, kaj ke, sen kontraktoj inter la homoj, la natura leĝo estus preskaŭ ĉiam nur ia natura tiraneco.

— Necesas, li diris, notarioj, pastroj, atestantoj, kontraktoj, eksterregulaj permesoj.

— Ĉu do vi estas tiel malhonestaj, ke vi bezonas en viaj interrilatoj tiom da antaŭzorgoj?

La abato respondis iom malfacile al tiu demando.

— Mi konfesas, li diris, ke inter ni estas multaj malkonstantuloj kaj friponoj, kaj estus same ĉe la Huronoj, se ili estus kolektiĝintaj en grandan urbon; sed estas ankaŭ saĝaj, honestaj, kleraj homoj, kaj estas tiuj, kiuj faris la leĝojn. Ju pli oni estas honesta, des pli oni devas ilin obei; oni donas ekzemplon al la

malvirtuloj, kiuj respektas bridon, kiun la virtuloj donis al si mem.

Tiu respondo impresis Senartifikulon. Oni jam povis ja rimarki, ke li estis justema. Oni kvietigis lin per flataj paroloj; oni esperigis lin: estas la du kaptiloj, en kiujn falas la homoj el ambaŭ hemisferoj; oni eĉ prezentis al li F-inon Sankta-Ivo, kiam ŝi estis farinta sian tualeton. Ĉio okazis laŭ la plej rigoraj decreguloj; sed, malgraŭ tiu deco, la brilegaj rigardoj de Senartifikulo-Herkulo ĉiam mallevigis la palpebrojn de sia amatino kaj tremigis la ĉeestantaron.

Malfacile oni sukcesis forsendi lin al liaj parencoj. Necesis denove uzi la influon de la bela Sankta-Ivo; ju pli ŝi sentis sian povon super li, des pli ŝi amis lin. Ŝi atingis, ke li foriru kaj pro tio ĉagreniĝis; fine kiam li estis for, la abato, kiu ne nur estis la tre multe pli aĝa frato de F-ino Sankta-Ivo, sed ankaŭ ŝia kuratoro, decidis savi sian zorgatinon for de l'malpaciencaj deziroj de sia terura amanto. Li iris konsulti la prefekton, kiu, daŭre destinante la fratinton de la abato al sia filo, konsilis al li meti ŝin en monaĥinejon. Estis terura frapo: indiferentulino, kiun oni metus tien, ekĝemus; sed amantino, kaj amantino tiel saĝa, kiel amema! tio estis por ŝi malesperiga.

Senartifikulo, reveninte ĉe la prioro, rakontis ĉion laŭ sia kutima malkaŝemo. Li spertis la samajn admonojn, kiuj iom efikis sur lian spiriton, kaj neniom sur liajn sentumojn; sed la postan tagon, kiam li volis reiri al sia bela amatino, por rezonadi kun ŝi pri la natura leĝo kaj pri la kontrakta leĝo, la S-ro prefekto sciigis lin kun insulta ĝojo, ke ŝi estas en monaĥinejo.

— Nu, bone! li diris, mi iros tien.

— Tio ne eblas, diris la prefekto.

Longe li klarigis pri tio, kio estas monaĥinejo aŭ »convent«; ke tiu vorto devenis de la latina *conventus*, kiu signifas kunvenantaro; kaj la Hurono ne povis kompreni, kial li ne povas esti akceptata en tiun kunvenantaron. Tuj kiam li eksciis, ke monaĥinejo estas ia malliberejo, kie fraŭlinoj estas enŝlositaj, abomenindaĵo nekonata ĉe la Huronoj kaj ĉe la Angloj, li fariĝis same furioza kiel lia patrono Herkulo, kiam Eŭrito, reĝo de Eĉalio, ne malpli kruela ol la abato Sankta-Ivo, rifuzis al li la belan Jolan, sian filinon, ne malpli belan ol la fratino de la abato. Li volis iri, por bruligi la monaĥinejon, forporti sian amatinon aŭ bruli sin kun ŝi. F-ino Kerkabon, ekterurite, pli ol iam ajn rezignis ĉiujn esperojn vidi sian nevon subĉiako, kaj plorante ŝi diris, ke li havas enkorpe la diablon, de kiam li estis baptita.

## ĈAPITRO VII

### Senartifikulo forpelas la Anglojn

Senartifikulo enprofundigita en malgaja kaj ega melankolio, promenis al la marbordo, kun sia dutuba fusilo ĉe ŝultro, sia granda tranĉilego ĉe flanko, de tempo al tempo pafante al kelkaj birdoj, kaj ofte emante pafi al si mem; sed li ankoraŭ ŝatis la vivon, pro F-ino Sankta-Ivo. Jen li malbenis sian onklon, sian onklinon, la tutan Bas-Bretonion kaj sian baptiĝon; jen li benis ilin, tial ke per ili li konatiĝis kun tiu, kiun li amas. Li decidis iri por bruligi la monaĥinejon, kaj tuj rezignis, pro timo bruligi sian amatinon. La ondoj de l'maro ne estas pli skuataj de l'vento ol lia koro estis per tiom da malaj movoj.



Li marŝis grandpaŝe, ne sciante kien, kiam li aŭdis tamburfrapojn. De malproksime li vidis homamason, kies duono kuris al la marbordo kaj la alia forkuris.

Mil krioj aŭdiĝas ĉiuflanke; scivolemo kaj kuraĝo rapidege puŝas lin tuj al la loko, de kie venis la tumulto bruado; tien li flugas per kvar saltoj. La milicokomandanto, kun kiu li vespermanĝis ĉe la prioro, tuj rekonis lin; li alkuras al li kun malfermaj brakoj:

— Ha! ĝi estas Senartifikulo; li batalos por ni. Kaj la milicanoĵoj, kiuj tremis pro timo rekuraĝiĝis kaj ankaŭ kriis:

— Ĝi estas Senartifikulo! ĝi estas Senartifikulo!

— Sinjoroj, li diris, pri kio temas? kial vi estas tiel frenezete konsternitaj? Ĉu oni metis viajn amatinojn en monaĥinejon?

Tiam cent konfuzaj voĉoj ekkriis:

— Ĉu vi ne vidas la Anglojn, kiuj albordiĝas?

— Nu, bone! rebatis la Hurono, ili estas bonuloj; ili ne forrabis mian amatinon.

La komandanto komprenigis al li, ke tiuj Angloj venis por rabadi en la abatejo de la Monto, por eltrinki la vinon de lia onklo, kaj eble forporti F-inon Sankta-Ivo; ke la ŝipeto, per kiu li venis en Bretonion, havis kiel celon esplori la bordon; ke ili faris militaĵojn, ne deklarinte la militon al la reĝo de Francio, kaj ke la provinco estas en danĝero.

— Ha! se tiel estas, ili malobeas la naturan leĝon. Lasu min klopodi; mi vivis longe inter ili; mi scipovas ilian lingvon; mi parolos al ili; mi ne kredas, ke ili povas havi malbonan celon.

Dum tiu interparolo la angla eskadro alproksimiĝis; jen la Hurono kuras al ĝi, li ĵetas sin en ŝipeton, alvenas, supreniras sur la ŝipon de la admiralo kaj

demandas, ĉu estas vere, ke ili venas por prirabi la landon, ne deklarinte la militon honeste. La admiralo kaj ĉiuj ŝipanoj ekridegis, donis al li punĉon por trinki kaj forsendis lin.

Ofendite, Senartifikulo pensis nur kuraĝe kontraŭbatali siajn malnovajn amikojn, defende al siaj sampatrianoj kaj al la S-ro prioro. La nobeloj de l' najbaraĵo alkuris el ĉiuj flankoj; li ariĝis kun ili. Oni havis kelkajn kanonojn; li ŝargas ilin, celdirektas ilin, li pafas per ili unu post la alia. La Angloj elŝipiĝas; li kuras al ili; li propramane mortigas tri el ili; li eĉ vundas la admiralon, kiu mokis lin. Lia bravo plivigliĝas la kuraĝon de la tuta milico; la Angloj reenŝipiĝas kaj ĉe la tuta marbordo aŭdiĝas venkokrioj: Vivu la reĝo! Vivu Senartifikulo! Ĉiu diligentis, por haltigi la sangon ĉe kelkaj el la vundoj, kiujn li ricevis.

— Ha! li diris, se F-ino Sankta-Ivo ĉeestus, ŝi metus al mi kompreson.

La prefekto, kiu sin kaŝis en sia kelo, kiam okazis la batalo, venis, kiel aliaj, por lin komplimenti. Sed li estis tre surprizita, kiam li aŭdis Herkul-Senartifikulon diri al iu dekduo da junaj bonvoluloj, kiuj ĉirkaŭis lin:

— Amikoj miaj, estas malgrave, ke ni liberigis je danĝero la abatejon de l'Monto; mi devas liberigi junulilon. Tiu aro da vivegaj junuloj ekflamiĝis ĉe tiuj solaj vortoj. Are oni jam sekvis lin, oni kuris al la monaĥinejo. Se la prefekto ne tuj avertus la komandanton, se oni ne postkurus tiun gajan trupon, la projekto efektiviĝus. Oni rekondukis Senartifikulon al liaj geonkloj, kiuj superverŝis lin per amemaj larmoj.

— Mi konvinkiĝas, ke neniam vi estos subdiakono nek prioro, diris al li lia onklo; vi estos oficiro eĉ pli brava ol estis mia frato la kapitano, kaj verŝajne same

malriĉa. Kaj F-ino Kerkabon daŭre ploris, kisante lin, kaj dirante:

— Li estos mortigita kiel mia frato; estus preferinde, ke li estu subdiakono.

Dum la batalo Senartifikulo trovis dikan monsakon plenan je gineoj kiun verŝajne lasis fali la admiralo. Li ne dubis, ke per tioma mono li povas aĉeti la tutan Bas-Bretonion, kaj ĉefe fari el F-ino Sankta-Ivo nobelinon. Ĉiu admone instigis lin iri al Versajo,<sup>1</sup> por tie ricevi rekompenccon por liaj servoj. La komandanto, la ĉefaj oficiroj superŝutis lin per skribaj atestoj. La geonkloj aprobis la vojaĝon de la nevo. Ili ne dubis, ke sen malfacilo li povos esti prezentata al la reĝo: tio donos al ili eksterordinaran reliefon en la provinco. Tiuj du bonaj homoj aldonis al la angla mono konsiderindan donacon el siaj ŝparaĵoj. Senartifikulo diris al si:

— Kiam mi vidos la reĝon, mi petos, ke li konsentu al mia edziĝo kun F-ino Sankta-Ivo kaj certe li ne rifuzos.

Li do foriris kun la aklamado de l'tuta kantono sufokite per enbrakigoj, superverŝite per la larmoj de sia onklino, benite de sia onklo, kaj rekomendante sin al la bela Sankta-Ivo.

## ĈAPITRO VIII

### Senartifikulo iras al la kortego. Survoje li vespermanĝas kun kalvinanoj

Senartifikulo ekvojis al Somuro per la publika veturilego, tial ke li tiam ne havis alian oportunaĵon. Kiam li estis en Somuro, li miris, trovante la urbon

<sup>1</sup> Versailles, kie vivis la franca reĝo.

preskaŭ senhoma kaj vidante plurajn familiojn, kiuj foriris. Oni diris al li, ke ses jarojn antaŭe, Somuro entenis pli ol dekkvin mil loĝantojn, kaj ke nun restas ne eĉ ses mil. Li ne preterlasis la okazon paroli pri tio, dum li vespermanĝis en gastejo. Pluraj protestantoj estis ĉetable; iuj amare plendis; aliaj tremegis pro kolerio; aliaj plorante diris: *Nos dulcia linguimus arva, nos patriam fugimus*. Senartifikulo, kiu ne sciis latinon petis klarigon pri tiuj vortoj, kiuj signifas:

— Ni forlasis niajn mildajn kamparojn; ni fuĝas el nia patrio.

— Kaj kial do, sinjoroj, vi fuĝas el via patrio?

— Tial ke oni volas devigi nin agnoski la papon.

— Kaj kial ne agnoski lin? Ĉu do vi ne havas baptopatrinojn, kun kiu vi volas edziĝi? Oni ja diris al mi, ke nur li povas doni tiun permeson.

— Ha! sinjoro, tiu papo diras, ke li estas la mastro super la ŝtatbienaro de la reĝoj.

— Nu, sinjoroj, kiu estas via profesio?

— Sinjoro, la plimulto el ni estas drapovendistoj aŭ fabrikistoj.

— Se tiu papo diras, ke li estas la mastro super viaj drapoj kaj fabrikoj, vi prave ne volas agnoski lin; sed rilate al la reĝoj, tio estas ilia propra afero; kial vi okupigas pri ĝi?

Tiam malaltkreska viro nigre vestita ekparolis kaj tre klare konigis la plendomotivojn de la ĉeestantaro. Li parolis pri la nuligo al la Nanta edikto<sup>1</sup> kun tiom da energio; li bedaŭregis laŭ tiel kortuŝa maniero la sorton de la kvindek mil fuĝintaj familioj kaj tiun de la

<sup>1</sup> Ĝi estis donita de Henriko la Kvara, en 1598, kaj nuligita de Ludoviko la Dekkvara en 1685. — *Trad.*

kvindek mil aliaj, konvertitaj de dragonoj, ke Senartifikulo ankaŭ ekploris.

— Kial povas okazi, li diris, ke tiel granda reĝo, kies gloro etendiĝas ĝis ĉe la Huronoj, senigas sin je tiom da koroj, kiuj amus lin, je tiom da brakoj, kiuj servus al li?

— Tial ke oni trompis lin, kiel la aliajn grandajn reĝojn, respondis la nigrevestita viro. Oni kredigis al li, ke tuj kiam li estos dirinta vorton, ĉiuj homoj samopiniis kiel li, kaj ke li igos nin ŝanĝi religion, kiel lia muzikisto Luli ŝanĝigas dum unu minuto la deko-raciojn de siaj operoj. Ne nur li jam perdas kvin ĝis ses mil tre utilajn regatojn, sed el ili li faras malamikojn, kaj la reĝo Vilhelmo, kiu nuntempe estas la mastro super Anglio, konsistigis plurajn regimentojn el tiuj Francoj, kiuj estus batalintaj por sia monarko. Tia malfeliĉego estas tiom pli miriga, ke la reganta papo, al kiu Ludoviko la Dekkvara ofertas parton de sia popolo, estas lia malamikego. Jam de naŭ jaroj ili havas inter si fortegan disputon. Ĝi atingis tian gradon, ke Francio eĉ esperis, ke fine rompiĝos la jugo, kiu submetas ĝin ekde tiom da jarcentoj al tiu fremdulo, kaj ĉefe, ke ĝi ne plu donos al li monon, kio estas la unua instigilo en la aferoj de ĉi tiu mondo. Sajnas do evidente, ke oni trompis tiun grandan reĝon pri liaj intereso- j kaj pri la amplekso de lia potenco, kaj ke oni difektis lian grandanimecon.

Pli kaj pli kortuŝite, Senartifikulo demandis, kiuj estas la Francoj, kiuj tiel trompis monarkon, kiun amas la Huronoj.

— Estas la jezuitoj, oni respondis al li; estas ĉefe Patro Laŝez, la konfesprenanto de Lia Reĝa Moŝto. Oni devas esperi, ke Dio iam punos ilin, kaj ke ili estos

forpelataj, kiel oni forpelas nin. Ĉu ekzistas tiel granda malfeliĉo, kiel la nia? Sinjor' Luvua el ĉiuj flankoj sendas al ni jezuitojn kaj dragonojn.

— Nu bone! sinjoroj, respondis Senartifikulo, kiu ne plu povis sin regi, mi iras al Versajo por ricevi la rekompencan, kiun meritas miaj servoj; mi parolos al tiu sinjor' Luvua: oni diris al mi, ke estas li, kiu militas el sia laborĉambro. Mi vidos la reĝon; al li mi konigos la veron; estas neeble, ke oni ne cedu al tiu vero, kiam oni sentas ĝin. Mi baldaŭ revenos por edziĝi kun F-ino Sankta-Ivo, kaj mi invitas vin al la edziĝfestoj.

Tiuj bonuloj opiniis ke li estas altnobelo, kiu vojaĝis inkognite per la publika veturilego. Kelkaj pensis, ke li estas kortegana burleskulo.

Ĉetable estis iu maskita jezuito, kiu spionis serve al la respektinda Patro Laŝez. Li raportis al li pri ĉio, kaj Patro Laŝez informis al sinjor' Luvua. La spiono sendis leteron. Ĝi alvenis en Versajo preskaŭ samtempe kiel Senartifikulo.

## ĈAPITRO IX

### Alveno de Senartifikulo en Versajo; lia akcepto ĉe la kortego

Senartifikulo alvenas per noktovojo<sup>1</sup> en la korto de l' kuirejoj. Li demandas al la portoseĝistoj, je la kioma horo oni povas vidi la reĝon. Ili ridis al li en la vizaĝon, kiel jam faris la angla admiralo. Li traktis ilin same, li batis ilin; ili volis sin defendi kaj la sceno fariĝus sanga, se iu reĝa korpogardisto, bretona nobelo, ne alvenus kaj forpuŝus la kanajlaron.

<sup>1</sup> Tiel oni nomis veturilon, kiu ruliĝadis inter Parizo kaj Versajo kaj kiu similis al eta ŝarĝoĉaro kovrita.

— Sinjoro, diris al li la vojaĝanto, vi ŝajnas esti bonulo; mi estas la nevo de la S-ro prioro de Nia-Sinjorino-de-la-Monto; mi mortigis Anglojn; mi venas por paroli al la reĝo; mi petas, ke vi konduku min en lian ĉambron.

La gardisto, ravite renkonti bravulon el sia provinco, kiu ne ŝajnas koni la kutimojn de la kortego, klarigis al li, ke oni ne povas tiel paroli al la reĝo kaj ke oni devas esti prezentata de lia Sinjorega moŝto Luvua.

— Nu bone! konduku min al tiu Sinjorego Luvua, kiu sendube kondukos min al Lia reĝa Moŝto.

— Estas eĉ pli malfacile, rebatis la gardisto, paroli al Sinjorego Luvua ol al Lia reĝa Moŝto; sed mi kondukos vin ĉe S-ron Aleksandro, la unua militkomisiito; estos same, kiel se vi parolus al la ministro.

Ili do iras al S-ro Aleksandro, unua komisiito, sed ne povis esti enkondukataj; li prizorgis aferon kun iu korteganino kaj ordonis, ke oni lasu neniun eniri.

— Nu bone! diris la gardisto, ne gravas, ni iru al la unua komisiito de S-ro Aleksandro; estos same, kiel se vi parolus al S-ro Aleksandro mem.

Tre mirigite, la Hurono sekvis lin; ili restas kune dum duonhoron en malgranda antaŭĉambro.

— Kion signifas ĉio ĉi tio? diris Senartifikulo; ĉu do ĉiuj estas nevideblaj en ĉi tiu lando? Estas pli facile batali en Bas-Bretonio kontraŭ Angloj ol renkonti en Versajo la homojn, kun kiuj oni bezonas paroli.

Li distris sin, rakontante pri siaj amaferoj al sia samprovincano. Sed horo sonis kaj tio vokis la gardiston al lia posteno. Ili interpromesis renkontiĝi la sekyantan tagon, kaj Senartifikulo restis ankoraŭ duonhoron en

la antaŭĉambro, revante pri F-ino Sankta-Ivo, pri la malfacilo paroli kun reĝoj kaj kun unuaj komisiitoj. Fine aperis la mastro.

— Sinjoro, diris al li Senartifikulo, se mi atendus tiom longe por forpeli la Anglojn, kiom vi atendigis min, ili nun prirabus Bas-Bretonion tute senĝene.

Tiuj paroloj impresis la komisiiton. Li diris al la Bretono:

— Kion vi volas?

— Rekompencon, diris la demandito; jen estas miaj dokumentoj.

Senartifikulo elmetis al la komisiito ĉiujn siajn skribatestojn. La komisiito legis ilin kaj diris, ke verŝajne oni permesos al li aĉeti rangon de leŭtenanto.

— Kia ŝerco! ĉu mi donu monon, tial ke mi forpelis la Anglojn? ĉu mi pagu, por havi la rajton oferi mian vivon por vi, dum ĉi tie vi donas trankvile viajn aŭdiencojn? Mi kredas, ke vi mokas min. Mi volas kavalieran roton senpage; mi volas, ke la reĝo liberigu F-inon Sankta-Ivo el la monaĥinejo kaj ke li donu ŝin al mi kiel edzinon; mi volas pledi antaŭ la reĝo por la kvindek mil familioj, kiujn mi pretendas rehavigi al li: unuvorte, mi volas esti utila; ke oni servigu min kaj ke oni promociu min.

— Kiu estas via nomo, sinjoro, kiu parolas tiel arogante?

— Ho! ho! rebatis Senartifikulo, ĉu do vi ne legis miajn skribatestojn? Ĉu tiel vi rilatas al la afero? Mi nomiĝas Herkul-Kerkabon; mi estas baptita; mi loĝas ĉe la gastejo Blua Ciferplato kaj plendos pri vi al la reĝo.

La komisiito opiniis, kiel la homoj el Somuro, ke li estas frenezeta, kaj ne multe atentis la aferon.



Samtage la respektinda Patro Laŝcz, konfesprenanto de Ludoviko la Dekkvara, ricevis la leteron de sia spiono, kiu kulpigis la Bretonon Kerkabon esti korfavora al la kalvinanoj, kaj kondamni la konduton de l' jezuitoj. S-ro Luvua, siaflanke, estis ricevinta leteron de la demandema prefekto, kiu priskribis Senartifikulon kiel sentaŭgulon, kiu volas bruligi monaĥinejojn kaj forrabi junulinojn.

Senartifikulo, promeninte en la parkoj de Versajo, kie li enuis, vespermanĝinte laŭ la Huron-Bas-Bretona maniero, enlitigis kun la agrabla espero vidi la reĝon en la posta tago, ricevi la permeson edziĝi kun F-ino Sankta-Ivo, havi almenaŭ kavalerian roton, kaj ĉesigi la persekutadon kontraŭ la kalvinanoj. Li lulis sin per tiuj iluzie ĉarmaj ideoj, kiam ĝendarmoj eniris lian ĉambbron. Ili unue kaptis lian dutuban fusilon kaj lian grandan sabron.

Oni inventaris lian kontantan monon, kaj oni kondukis lin en la kastelon, kiun konstruigis la reĝo Karlo la Kvina, filo de Johano la Dua, apud la strato Sankta Antonio, ĉe la urbenirejo de la Turetoj.<sup>2</sup>

Kiom granda estis survoje la surprizo de Senartifikulo! pri tio vi mem imagu. Unue li kredis, ke temas pri sonĝo. Momenton li statis malvigle; sed li subite ekfuriozigis tiagrade, ke lia forto duobligis; tiam li kaptis ĉe la kolo du el la kondukantoj, kiuj estis kun li en la kaleŝego kaj ĵetas ilin tra la pordoklapo, sin ĵetas mem post ili kaj kuntrenas la trian, kiu provis teni lin. Pro la provpeno li falas; oni ligas lin; oni remetas lin en la veturilon.

<sup>2</sup> Tiu »kastelo« estis tiam parto de fortikaĵo; en la tempo de Volter ĝi servis kiel malliberejo kaj estas konata per la nomo Bastij (Bastille). — *Trad.*

— Jen estas do, li diras, la rekompenco, kiun oni ricevas, por esti forpelinta la Anglojn el Bas-Bretonio! Kion ci dirus, bela Sankta-Ivo, se ci vidus min tiastate?

Fine oni atingas la loĝejon, kiu estis al li destinita. Oni silente portas lin en la ĉambron, kie li devas esti enfermita, kiel oni portas kadavron al tombejo. Tiu ĉambro jam estis okupata de maljuna solulo el Port-Royal,<sup>3</sup> nomita Gordon, kiu tie konsumiĝis jam de du jaroj.

— Jen, diris al li la ĉefpolicisto, ni kondukas al vi kunulon.

Kaj tuj oni ferme repuŝis la egajn riglilojn de la dika pordo, kovrita per larĝaj stangoj. La du kaptitoj restis apartigitaj de la tuta universo.

## ĈAPITRO X

### Senartifikulo estas internigita en la Bastij kun jansenano

Sinjoro Gordon estis freŝa kaj serena maljunulo, kiu scipovis du grandajn aferojn: elteni malfeliĉon kaj konsoli malfeliĉulojn. Kun komprenema kaj kompaktema mieno li antaŭenpaŝis al sia kunulo kaj, enbra-kigante lin, li diris:

— Kiu ajn vi estas, vi, kiu venas kunloĝi en mia tombo, estu certa, ke mi forgesos pri mi mem, por mildigi viajn turmentojn en la infera abismo, en kiun ni estas falintaj. Ni adoru la Providencon, kiu kondukis nin tien; ni pace suferu, kaj ni esperu.

<sup>3</sup> Abatejo, kie vivis famaj jansenanoj.

Tiuj paroloj efikis sur la animon de Senartifikulo, kiel gutoj el Anglio, kiuj revivigas mortinton kaj malfermigas liajn okulojn mirigitajn.

Post la unuaj komplimentoj, Gordon, sen ia trudo por instigi lin rakonti pri la kaŭzo de lia malfeliĉo, inspiris al li, per la agrablo de sia konversacio, kaj per la reciproka intereso, kiun havas du malfeliĉuloj, malfirmi sian koron kaj elmeti la ŝarĝon, kiu ĝin premegeas; sed Senartifikulo ne povis diveni la objekton de sia malfeliĉo; ĝi ŝajnis al li efiko sen kaŭzo, kaj la bonanima Gordon estis same mirigita kiel li mem.

— Necesas, diris la jansenano al la Hurono, ke Dio havu super vi grandajn projektojn, tial ke li kondukis vin el la lago Ontario en Anglion kaj en Francion, ke li baptigis vin en Bas-Bretonio, kaj ke li metis vin ĉi tien, por via saviĝo.

— Ja vere, respondis Senartifikulo, mi kredas, ke nur la diablo prizorgis mian sorton. Miaj samlandanoj el Ameriko neniam traktus min laŭ la barbareco, kiun mi spertas; ili eĉ ne povus ĝin imagi. Oni nomas ilin *sovaĝuloj*; ili estas krudaj bonuloj, kaj la homoj el ĉi tiu lando estas rafinitaj friponoj. Verdire, mi estas tre surprizita esti veninta el alia mondparto, por esti ŝlosita en ĉi tiu per kvar rigliloj kun pastro; sed mi pensas pri la grandega nombro da homoj, kiuj foriras el iu hemisfero, por iri kadavriĝi en alian, aŭ kiuj spertas ŝiprompon survoje kaj kiuj estas manĝitaj de fiŝoj: mi ne vidas la favorajn projektojn de Dio, rilate al tiuj homoj.

Oni portis al ili manĝaĵon tra ĝiceto. La temoj de la konversacio rilatis al la Providenco, al la arestordonaj leteroj, al la arto ne mortfali pro la malfeliĉaĵoj al kiuj ĉiu homo estas elmetita en ĉi tiu mondo.

— Jam de du jaroj mi estas ĉi tie, diris la maljunulo, sen alia konsolo ol mi mem kaj libroj: ne eĉ dum momento mi estis malbonhumora.

— Ha! sinjoro Gordon, ekkriis Senartifikulo, ĉu do vi ne amas vian baptopatrinon? Se vi konus, kiel mi, F-inon Sankta-Ivo, vi malesperus.

Ĉe tiuj vortoj, li ekploris kaj tiam sentis sin iom malpli spirĝenita.

— Sed kial do, li diris, la larmoj havas mildigan efikon? Ŝajnas al mi, ke ili devus efiki male.

— Mia filo, ĉio estas fizika en ni, diris la bonkora maljunulo; ĉiu sekrecio faras bonon al la korpo, kaj ĉio, kio mildigas, bonefikas sur la animon; ni estas maŝinoj de la Providenco.

Senartifikulo, kiu kiel ni jam diris kelkfoje, havis firman bazon spiritan, profunde pripensis tiun ideon, pri kiu ŝajnis, ke li havis ties semon en si mem. Poste li demandis al sia kunulo, kial lia maŝino estis deposedu jaroj enŝlosita per kvar rigliloj.

— Pro la efika graco,<sup>1</sup> respondis Gordon; mi estas konsiderata kiel jansenisto; mi interrilatis kun Arno<sup>2</sup> kaj Nikol;<sup>2</sup> la jezuitoj persekutis nin. Ni kredas, ke la papo estas nur iu episkopo kiel la aliaj, kaj estas pro tio, ke patro Laŝez elpetis de la reĝo, lia konfesanto, ordonon forrabi al mi, sen ia juĝa formalajo, la plej valoran posedaĵon homan, la liberon.

— Jen estas afero tre stranga, diris Senartifikulo: ĉiuj malfeliĉuloj, kiujn mi renkontis, estas tiaj nur pro la papo. Rilate al via efika graco, mi konfesas al vi, ke

<sup>1</sup> Necesas kompreni, ke tiu »efika graco« iel limigas la *libervolon* ĉe la homo; tial la papo kondamnis la jansenan vidpunkton. — *Trad.*

<sup>2</sup> Ambaŭ jansenistaj teologoj. — *Trad.*

nenion mi komprenas pri ĝi; sed mi konsideras kiel grandan gracon de Dio, ke en mia malfeliĉo li renkontigis min kun bona homo, kiu en mian koron verŝas konsolojn, kiuj ŝajnis al mi nesperteblaj.

Kun ĉiu tago la konversacio fariĝis pli interesa kaj instrua. La animoj de la du malliberuloj kunligiĝis. La maljunulo sciis multon, kaj la junulo volis multon lerni.

Post unu monato li eklernis geometrion; avidege li studis ĝin. Gordon donis al li por legi libron de Roĥault pri fiziko, kiu tiutempe estis ankoraŭ laŭmoda, kaj li estis sufiĉe saĝa por trovi en ĝi nur malcertojn.

Poste li legis la unuan volumon de *Esplorado pri la vero*.<sup>3</sup> Tiu nova lumo igis lin klarvida.

— Kiel do! li diris, mia imago kaj miaj sentumoj erarigas min tiagrade! Kiel do! la objektoj ne kreas niajn ideojn, kaj ni mem ne povas akiri ilin!

Kiam li estis leginta la duan volumon, li ne plu estis tiel kontenta, kaj li konkludis, ke estas pli facile detruiri ol konstrui.

Lia kunulo, mirigite, ke juna malklerulo faras tiun rimarkon, kiu indas je spertulo, akiris tre favoran opinion pri lia inteligento kaj pli forte sin ligis al li.

— Via Malbransĝ, iun tagon diris Senartifikulo, ŝajne verkis la duonon de sia libro per sia racio, kaj la ceteron per sia fantazio kaj siaj antaŭjuĝoj.

Kelkajn tagojn poste, Gordon demandis lin:

— Kion do vi pensas pri la animo, pri la maniero laŭ kiu ni ricevas niajn ideojn, pri nia volo, pri la graco, pri la libervolo?

<sup>3</sup> Verko de la metafizikulo Malbransĝ (Malbranche). — Trad.

— Nenion, respondis Senartifikulo: se mi pensus ion, tio estus, ke ni estas sub la potenco de la Eternulo, kiel la astroj kaj la elementoj; ke li faras ĉion en ni; ke ni estas radetoj de la senlima maŝino, kies animo li estas; ke li agas laŭ ĝeneralaj leĝoj, kaj ne laŭ apartaj vidpunktoj; ĉio cetera estas por mi abismo el mallumo.

— Sed, mia filo, se tiel estus, oni devus konkludi, ke Dio estas la kaŭzo de l'pektoj.

— Sed, mia patro, via efika graco kondukas ankaŭ al sama konkludo, tial ke estas certe, ke tiuj pekus, al kiuj tia graco estus rifuzita; kaj kiu forlasas nin al malbono, ĉu tiu ne estas kaŭzanto de malbono?

Tia naivaĵo tre embarasis la bonulon; li sentis, ke vane li baraktas por elturniĝi, kaj li eldiris tiom da vortoj, kiuj ŝajnis havi signifon kaj fakte ne havis, ke Senartifikulo kompatis lin.

Evidente tiu demando rilatis al la origino pri la bono kaj malbono; kaj tial necesis, ke la kompatinda Gordon rakontu pri la skatolo de Pandora, pri la ovo de Orosmad, trapikita de Arismane, pri la malamikeco inter Tifono kaj Oziris, kaj fine pri la origina peko; kaj ambaŭ kuris en tiu profunda mallumo, neniam renkontante unu la alian. Sed almenaŭ tiu romano pri la animo deturnis ilian atenton pri ilia propra mizero, kaj per ia stranga sorĉo, la amasego da malfeliĉaĵoj disŝutitaj sur la universon, malpliigis la senton pri iliaj ĉagrenoj; ili ne kuraĝis plendi, ĉar ĉiu suferas.

Sed dum la nokta ripozo, la bildo de la bela Sankta-Ivo forpelis el la spirito de sia amanto ĉiujn ideojn pri metafiziko kaj moralato. Li vekigis kun larmoj en la okuloj; kaj la maljuna jansenisto forgesis pri sia efika gra-

co, pri la abato Sankta-Ciran<sup>4</sup> kaj pri Jansen,<sup>5</sup> por konsoli junulon, kiu liakrede estis en danĝero perdi la gracon de Dio.

Post sia legado, post sia rezonado, ili parolis ankoraŭ pri siaj aventuroj, kaj, post kiam ili senutile parolis, ili legis kune aŭ aparte. La intelekto de la junulo pli kaj pli vigliĝis. Li fariĝus tre klera, rilate matematikon, se F-ino Sankta-Ivo ne okupus lian spiriton.

Li legis historiojn; ili ĉagrenis lin. La mondo ŝajnis al li tro malica kaj tro mizera. Efektive, la historio estas nur ia bildo pri krimoj kaj malfeliĉaĵoj. La amaso de la senkulpaj kaj pacemaj homoj ĉiam malaperas el tiuj vastaj scenoj. La roluloj estas nur malvirtaj ambiĉuloj. Ŝajnas, ke la historio similas al la tragedio, kiu fariĝas teda, se ne animas ĝin pasioj, krimoj kaj grandaj malfeliĉaĵoj. Necesas armi Klian per ponardo, kiel Melpomenan.

Kvankam la historio pri Francio estas plena je abomenindaĵoj, same kiel ĉiuj aliaj, tamen ĝi ŝajnis al li tiel naŭza en sia komenciĝo, tiel seka en sia mezo, fine tiel malgrava eĉ en la tempo de Henriko la Kvara, ĉiam senigita je grandaj memoraĵoj, tiel fremda je tiuj belaj eltrovaĵoj, kiuj ilustris aliajn naciojn, ke li devis batali kontraŭ la enuo por legi ĉiujn detalojn pri sengloraj malfeliĉegoj premlokitaj en iu loketo de l'mondo.

---

<sup>4</sup> Saint-Cyran (1581—1643) enkondukis en Francion la doktrinon de Jansen, kun kiu li studis en Luveno la teologion. — *Eld.*

<sup>5</sup> Jansenius (1585—1638), episkopo en Ipro, adoptis la filozofion de Sankta-Aŭgusteno, kiun li priskribis en *Augustinus* (1640). Tie Jansen disvolvas sian teorion pri la graco. — *Eld.*

Gordon samopiniis kiel li. Ambaŭ kompateme ridis, kiam temis pri la suverenoj de Fezensakio, de Fesan-saguetio kaj de Astarakio.<sup>5</sup> Se ili havus heredantojn, tiu studo, efektive, povus interesi ilin, sed nur ilin. La belaj jarcentoj de la romana respubliko kaŭzis, ke dum kelka tempo li fariĝis indiferenta pri la cetera mondo. La spektaklo pri la venkinta kaj leĝodoninta Romio okupis lian tutan animon. Li entuziasmiĝis kun admiro, prezentante al si tiun popolon, kiu dum sep cent jaroj estis regata per la entuziasmo de la libero kaj de la gloro.

Tiel pasadis tagoj, semajnoj, monatoj, kaj Senartifikulo kredus esti feliĉa, se li ne amus.

Lia bona naturo kompatis la prioron de Nia-Sinjorino-de-la-Monto kaj la senteman Kerkabon.

— Kion ili pensos, li ofte diris, kiam ili restos sen novaĵoj pri mi? Ili kredos, ke mi estas maldankema.

Tiu ĉi ideo turmentis lin; li kompatis al tiuj, kiuj amis lin, multe pli ol li ĝemis pri si mem.

## ĈAPITRO XI

### Kiel Senartifikulo plivastigas sian spiriton

La legado pligrandigas la animon, kaj klera amiko ĝin konsolas. Nia malliberulo ĝuis tiujn du avantaĝojn, kiujn li ne konjektetis antaŭe.

— Mi emas, li diris, kredi je metamorfozoj, ĉar el bruto mi aliiĝis en homon.

<sup>5</sup> Pri tiu antikva regneto mi trovis mencion en iu enciklopedia vortaro, sed ne pri la du unuaj. Mi sekve nun ne scias, ĉu Volter elpensis ilin. Sed la demando tute ne gravas: en nia epoko ankoraŭ ekzistas regnetoj, pri kiuj oni tute ne scios, post kelkaj jarcentoj. — *Trad.*



Li konsistigis al si bibliotekon per parto el la mono, kiun oni permesis al li disponi. Lia amiko instigis lin skribi siajn pripensojn. Jenon li skribis pri la antikva historio:

»Mi imagas, ke la nacioj similis al mi dum longa tempo; ke ili instruiĝis tre malfrue; ke ili estis okupataj dum jarcentoj nur per la fluanta estanto, tre malmulte pri la pasinto kaj neniam pri la estonto. Mi travojaĝis kvin aŭ sescent mejlojn en Kanadio; tie mi ne trovis unu solan monumenton; neniu tie scias pri tio, kion faris lia praavo. Ĉu tio ne estas la natura stato de l'homo? La homa speco el ĉi tiu kontinento ŝajnas al mi supera al tiu el la alia. Ĝi plialtigis sian estecon jam de pluraj jarcentoj per la artoj kaj sciok. Ĉu pro tio, ke ties viroj havas harojn ĉe la mentono, kaj ke Dio rifuzis barbon al la Amerikanoj? Tion mi ne kredas, tial ke la Ĉinoj havas preskaŭ neniom da barbo kaj tamen kulturas la artojn, jam de kvar mil jaroj. Efektive, se ili havas historion pri kvarmiljara tempo, necesas, ke la nacio estas formiĝinta kaj prospera de pli ol kvindek jarcentoj.

»Ĉefe iu afero frapas min en tiu historio pri la antikva Ĉinio: ĝi estas, ke tie preskaŭ ĉio estas verŝajna kaj natura. Ĝin mi admiras, pro manko de ĉio mirinda.

»Kial ĉiuj aliaj nacioj donis al si legendan originon? La antikvaj kronikistoj de la historio pri Francio, kiuj eĉ ne estas tre antikvaj, devenigas la Francojn el iu Franko, filo de Hektor; la Romanoj diris, ke ili originas el iu Frigo, kvankam en ilia lingvo ne troviĝas unu sola vorto, rilatanta al Frigio; la dioj estis loĝantaj dek mil jarojn en Egiptio kaj la diabloj en Scitio, kie ili generis la Hunojn. Antaŭ la tempo de Tucidido, oni

verkis nur romanojn, similajn al la Amadisoj,<sup>1</sup> kaj multe malpli amuzajn. Ĉie temas pri fantomoj, orakoloj, miregindaĵoj, sorĉaĵoj, metamorfozoj, klarigitaj songoj, kaj kiuj estigas la destinon de la plej grandaj Imperioj kaj de la plej etaj Ŝtatoj: ĉi tie estas bestoj, kiuj parolas, tie, bestoj, kiujn oni adoras, dioj, kiuj homiĝas kaj homoj, kiuj diiĝas. Ha! se ni bezonas fabelojn, ke ili almenaŭ estu la emblemo de l'vero! Mi ŝatas la fabelojn de l'filozofoj; mi ridas pri tiuj de la infanoj, kaj mi malŝatas tiujn de la trompantoj.«

Iun tagon trafis en liajn manojn iu historio pri la imperiestro Justino. En ĝi estis rakontite, ke apedeŭtoj<sup>2</sup> el Konstantinoplo eldonis, en tre malbona lingvo greka, edikton kontraŭ la plej eminenta militestro<sup>3</sup> el la epoko, tial ke tiu heroo eldiris dum la flameco de konversacio: »La vero brilas per sia propra lumo, kaj oni ne klerigas la spiritojn per la flamoj de la punbrulejoj.«

La apedeŭtoj asertis, ke tiu opinio estas hereza, odoras hereze, kaj ke la mala aksiomo estas katolika, universala kaj greka: »Oni klerigas la spiritojn nur per la flamo de la punbrulejoj, kaj la vero ne povas brili per sia propra lumo.« Tiuj linostoloj<sup>4</sup> kondamnis ankaŭ plurajn paroladojn de la militestro kaj eldonis edikton.

— Kio! ekkriis Senartifikulo, ediktoj produktitaj de tiaj uloj!

<sup>1</sup> Prikavaliraj rakontoj. — *Trad.*

<sup>2</sup> Malkleruloj. — *Trad.*

<sup>3</sup> Aludo al la generalo *Belisario* (france: *Belisaire*; angle: *Belisarius*; hispane: *Belisario*).

<sup>4</sup> Homoj vestitaj per longaj roboj el lino. Ĉi tie estas aludite pri la cenzuristoj el la teologia fakultato en la Sorbono (Parizo), kiuj malpermesis la prezentadon de teatraĵo kun la titolo »*Belisaire*«. *Trad.*

— Ĝi ne estas ediktoj, respondis Gordon, sed kontraŭediktoj, pri kiuj ĉiuj mokis en Konstantinoplo, kaj eĉ la imperiestro unuavice; li estis saĝa princo, kiu sukcesis atingi, ke la apedeŭto-linostoloj povis nur bonfari. Li sciis, ke tiuj sinjoroj kaj pluraj aliaj pastoroj<sup>5</sup> senpaciencigis liajn antaŭulojn per eldono de kontraŭediktoj rilate al pli grava objekto.

— Li estis tute prava, diris Senartifikulo; oni devas subteni la pastorojn kaj bridati ilin.

Li skribis multe da aliaj pripensoj, kiuj ekstimigis la maljunan Gordon.

— Nu! li diris al si, mi pasigis kvindek jarojn el mia vivo por klerigi min, kaj mi timas, ke mi ne povas atingi ĝis la simpla saĝo natura de tiu preskaŭ sovaĝa knabo! Mi timtremas ĉe la penso, ke laboreme mi plifortigis antaŭjuĝojn; li obeas nur al la simpla naturo.

La bonulo havis kelke da malgrandaj kritiklibroj, kelke da periodaj broŝuroj, en kiuj neverkokapablaj homoj mallaŭde kritikis alies verkojn, en kiuj la Vizeoj insultas al la Rasinoj, kaj la Feditoj al la Fenelonoj.<sup>6</sup> Senartifikulo legis kelkajn el ili.

— Mi komparas ilin, li diris, al iaj pikmuŝoj, kiuj deponas siajn ovojn ĉe la postaĵon de la plej belaj ĉevaloj: tio ne malhelpas ilin kuri.

Apenaŭ la du filozofoj kompleksis ekrigardi al tiuj ekskrementoj de la literaturo. Kune ili baldaŭ legis la elementojn pri astronomio; Senartifikulo venigis sferojn: tiu granda spektaklo savis lin.

— Kiel aflikte estas, li diris, ekkoni la ĉielon nur kiam oni senigis min je la rajto ĝin admire rigardadi!

<sup>5</sup> Longrobuloj.

<sup>6</sup> Tio signifas: Sentalentaj aŭtoroj insultas al la vere famaj verkistoj. — *Eld.*

Jupitero kaj Saturno turniĝas en tiu senlima spaco; milionoj da sunoj lumigas miliardojn da aliaj mondoj; kaj en la loketo de l'tero, kie mi troviĝas, ekzistas estuloj, kiuj senigas min, kiu vidas kaj pensas, je ĉiuj tiuj mondoj, kien mia rigardo povus trafi, kaj je tiu, kie Dio naskigis min! La lumo, farita por la tuta universo, ne ekzistas por mi. Oni ne kaŝis ĝin al mi ĉe la norda horizonto, kie mi pasigis miajn infan- kaj junulajn jarojn. Sen vi, mia kara Gordon, mi estus ĉi tie en la nenieco.

## ĈAPITRO XII

### Tio, kion opinias Senartifikulo pri teatraĵoj

La juna Senartifikulo similis al iu el tiuj viglaj arboj, kiuj naskiĝinte en senprodukta grundo, dum mallonga tempo etendas siajn radikojn kaj branĉojn, kiam ili estas transplantitaj en favoran grundon, kaj estis tre eksterordinare, ke malliberejo estis tia grundo.

Inter la libroj, per kiuj la du malliberuloj okupis sian tempon, troviĝis poeziaĵoj, tradukaĵoj el grekaj tragedioj, kelkaj francaj teatraĵoj. La versoj, kiuj parolis pri amo metis en la koron de Senartifikulo plezuron kaj doloron. Ili ĉiuj memorigis lin pri lia kara Sankta-Ivo. La fablo pri la du kolomboj trapikis al li la koron; for de li ja estis la eblo reveni al sia kolombejo.<sup>1</sup>

Moljer<sup>2</sup> ravis lin. Li konigis al li la morojn de Parizo kaj de la homaro.

— Al kiu el liaj komedioj vi donas vian preferon?

<sup>1</sup> Hejmo. — *Trad.*

<sup>2</sup> Molière.

— Al *Hipokritulo*, sen iu ŝanceliĝo.

— Mi samopinias kiel vi, diris Gordon; ĝi estas hipokritulo, kiu ĵetis min en tiun karceron, kaj eble ĝi estas hipokrituloj, kiuj kaŭzis vian malfeliĉon. Kion vi opinias pri la grekaj tragedioj?

— Ili estas bonaj por Grekoj, diris Senartifikulo.

Sed kiam li legis la modernan *Ifigenion*, *Fedron*, *Andromakon*, *Atalion*, li estis en ekstazo, li sopiris, li ploris; li parkere memoris ilin sen ia lerndeziro.

— Legu *Rodogunon*, diris al li Gordon; oni diras, ke ĝi estas la ĉefverko inter la teatraĵoj; la aliaj, kiuj plezurigas vin, estas kompare malgravaj. Tuj ĉe la unua paĝo la junulo diris:

— Ĝi ne estas de la sama aŭtoro.

— Per kio vi rimarkis tion?

— Mi ankoraŭ ne scias; sed tiuj versoj ne tuŝas mian aŭdsenton nek mian koron.

— Ho! la versoj estas flanka afero, rebatis Gordon.

— Kial do versumadi? respondis Senartifikulo.

Post kiam li estis tre atente leginta la teatraĵon, sen iu alia celo ol ricevi plezuron, li rigardis al sia amiko kun senlarmaj kaj mirigitaj okuloj, kaj ne sciis kion diri. Trudpetite konigi, kion li sentis, fine li respondis jene:

— La komencon mi apenaŭ komprenis; en la mezo mi forte indignis; la lasta sceno tre emociis min, kvankam ĝi ŝajnas al mi neverŝajna; mi interesiĝis pri neniuj, kaj mi ne memoras dudek versojn, ja mi, kiu parkeras ĉiujn, kiam ili plaĉas al mi.

— Tiu teatraĵo tamen estas konsiderata kiel la plej bona el ĉiuj niaj.

— Se tiel estas, li rerespondis, ĝi eble similas al la homoj, kiuj ne meritas la rangon, kiun ili tenas. Cetere,

ĉi tio estas afero de gusto; la mia eble ne ankoraŭ edukiĝis: mi povas erari; sed vi scias, ke mi kutimas eldiri, kion mi pensas, aŭ, preferu, kion mi sentas. Mi konjektas, ke ofte la prijuĝon de homoj influas modo, kaprico. Mi parolis laŭnature; povas esti, ke ĉe mi la naturo estas neperfekta; sed povas ankaŭ okazi, ke ĝin ne atentis la plimulto de l'homoj.

Tiam li recitis versojn el *Ifigenio*, per kiuj li estis saturita; kaj kvankam li ne bele deklamis, tamen li tion faris kun tiom da veremo kaj da mildo, ke li plorigis la maljunan janseniston. Li poste legis je *Cinna*; li ne ploris, sed admiris.

### ĈAPITRO XIII

#### La bela Sankta-Ivo iras al Versajo

Dum nia malfeliĉulo kleriĝis pli ol li konsoliĝis; dum lia spirito, sufokite dum tiom longa tempo, malvolviĝis kun tiom da rapido kaj forto; dum la naturo, kiu perfektigis en li, venĝis lin je la domaĝoj de l'sorto, kio okazis al lia priora moŝto kaj al lia bona fratino, kaj al la bela enfermitino Sankta-Ivo? Dum la unua monato, oni estis maltrankvila; ĉe la tria, oni estis tute enprofundigita en doloro; la eraraj konjektoj, la senbazaj onidiroj timigis; post ses monatoj, oni kredis, ke li estas mortinta. Fine S-ro kaj F-ino Kerkabon eksciis, per malnova letero, kiun estis skribinta reĝa gvardiano al iu en Bretonio, ke junulo, simila al Senartifikulo, estis alveninta iun vesperon en Versajo, sed ke dum la nokto oni forportis lin, kaj ke poste neniu aŭdis pri li.

— Ho ve! diris F-ino Kerkabon, nia nevo verŝajne faris kelkajn malsaĝaĵojn, kiuj havigis al li bedaŭrin-

daĵojn. Li estas juna, li estas Bas-Bretono; li ne povas scii, kiel konduĵi ĉe la kortego. Mia kara frato, neniam mi vidis Versaĵon nek Parizon; jen estas bona okazo. Eble ni retrovos nian kompatindan nevon: li estas filo de nia frato; estas nia devo helpi lin. Kiu scias, ĉu finfine ni ne sukcesos fari el li subdiakonon, kiam la arda impeto de l'junaĝo estos moderigita? Li havis fortan inklinon por la sciencoj. Ĉu vi memoras, kiel li rezonis pri la malnova kaj pri la nova *Testamento*? Ni havas respondecon pri lia animo; estas ni, kiuj baptigis lin: lia kara amatino Sankta-Ivo pasigas la tagojn plorante. Vere, ni devas iri al Parizo. Se li estas kaŝita en iu el tiuj aĉaj plezurdomoj, pri kiuj oni multe rakontis al mi, ni forkondukos lin el ĝi.

La prioro estis kortuŝita de l'paroloj de sia fratino. Li iris al Sankta Malo, por viziti la episkopon, kiu baptis la Huronon, kaj petis lian protekton kaj liajn konsilojn. La prelato aprobis la vojaĝon. Li donis al la prioro rekomendajn leterojn por patro Laŝez, la konfesprenanto de l'reĝo, kiu havis la plej altan oficon el la lando; por la ĉefepiskopo de Parizo, Harle, kaj por la episkopo de Meldovo,<sup>1</sup> Bosue.

Fine la gefratoj forveturis; sed kiam ili estis en Parizo, ili troviĝis sendirektaj kvazaŭ en vasta labirinto, sen fadeno<sup>2</sup> kaj sen elirejo. Ilia monhavo estis mezgranda, kaj ĉiutage ili devis lupreni veturilojn por siaj esploroj, kiuj estis senrezultaj.

<sup>1</sup> Meaux.

<sup>2</sup> Aludo al la fadeno de Ariadna, filino de Minos, kiu donis al Tezeo fadenon, per kies helpo li povis foriri el la Labirinto, post kiam li estis mortiginta la Minotaŭron (Mitologio). — *Trad.*

La prioro sin prezentis ĉe la respektinda patro Laŝez; li estis kun F-ino Du Tron kaj ne povis doni aŭdiencon al prioroj. Li iris al la pordo de la ĉefepiskopo; la prelato estis enfermita kun la bela S-ino Lesdiger pro ekleziaj aferoj. Li kuris al la kampardomo de la episkopo de Meldovo; tiu ĉi esploris, kun F-ino Moleon, la mistikan amon de S-ino Gujon. Tamen li sukcesis aŭdigi sin de tiuj du prelatoj; ambaŭ deklaris al li, ke ili ne povus okupiĝi pri lia nevo, tial ke li ne estas subdiakono.

Fine li vizitis jezuiton; ĉi tiu akceptis lin kun malfermaj brakoj, certigis, ke ĉiam li havis apartan estimon por li, kvankam neniam li konis lin. Li ĵuris, ke la Jezuita Asocio ĉiam estis servopreta al la Bas-Bretonoj.

— Sed li diris, ĉu via nevo ne havus la malbonŝancon esti kalvinano?

— Certe ne, mia respektinda patro.

— Ĉu li ne estas jansenisto!

— Mi povas certigi al via respektinda moŝto, ke li apenaŭ estas kristano: forpasis proksimume dekunu monatoj, de kiam ni baptis lin.

— Bone, estas bone; ni okupiĝos pri li. Ĉu via prebendo estas granda?

— Ho! tute ne, kaj nia nevo elspezigas nin multe.

— Ĉu estas kelkaj jansenistoj najbare al vi? Estu tre atenta, mia kara sinjoro prioro, ili estas pli danĝeraj ol la kalvinanoj kaj la ateistoj.

— Mia respektinda patro, da ili ni tute ne havas; oni ne scias, kio estas jansenismo ĉe Nia-Sinjinoro-de-la-Monto.

— Tiom pli bone; nu, ĉion eblan mi faros helpe al vi.



Amikeme li adiaŭis la prioron kaj kaj ne plu pensis pri ili.

Tempo forpasis; la prioro kaj lia bona fratino malesperis.

Dume la malbeninda prefekto rapidigis la arangojn por la edziĝo de lia altkreska naivulaĉo fila kun la bela Sankta-Ivo, kiun oni irigis el la monaĥinejo. Ŝi daŭre amis sian baptofilon, tiom, kiom ŝi abomenis la edzon, kiun oni prezentis al ŝi. La hontego, kiun ŝi spertis per la enmonaĥinejigo plifortigis ŝian pasion; la ordono edziniĝi kun la filo de la prefekto levis ĝin al la plej alta grado. La bedaŭroj, la amemo kaj la abomeno skuegis ŝian animon. Kiel oni scias, la amo estas pli lerte elturniĝema en junulino ol la amikeco en maljuna prioro kaj en onklino pli ol kvardek-kvinjara. Plie, en la monaĥinejo ŝi bone lertiĝis per la romanoj, kiujn kaŝe ŝi legis.

La bela Sankta-Ivo memoris pri la letero, kiun iu reĝa gvardiano sendis en Bas-Bretonion, kaj pri kiu oni parolis en la provinco. Ŝi decidis iri mem al Versajo, por informiĝi; por sin ĵeti al la piedoj de l'ministroj, se ŝia fianĉo estas en malliberejo, kiel oni diris, kaj atingi, ke oni traktu lin laŭmerite. Mi ne scias, kio sekrete informis ŝin, ke ĉe la kortego oni rifuzas nenion al belulino; sed ŝi ne sciis, kiel ŝi devus pagi por tio.

Post sia decido ŝi sentis sin konsolita, trankvila, ŝi ne forpuŝas sian stultan svatiĝanton; ŝi bonakceptas la abomenindan bopatron, karesas sian fraton kaj saturas la domon per ĝojego; poste, la tagon difinitan por la geedziĝa ceremonio, ŝi sekrete foriras je la kvara matene kun siaj edziĝaj donacetoj kaj ĉio, kion ŝi povis

kolekti. Ŝiaj aranĝoj estis tiel zorge faritaj, ke jam ŝi estis for je dek mejloj, kiam oni eniris ŝian ĉambron ĉirkaŭ tagmeze. La surprizo kaj konsterno estis grandaj. La demandema prefekto faris tiun tagon pli da demandoj ol dum tuta semajno; la edziĝonto restis pli stulta ol iam ajn antaŭe. La abato Sankta-Ivo, koleriĝinte, decidis postkuri sian fratinton. La prefekto kaj lia filo volis akompani lin. Tiel la sorto kondukis al Parizo preskaŭ ĉiujn loĝantojn el tiu kantono de Bas-Bretonio.

La bela Sankta-Ivo ne dubis, ke oni postsekvos ŝin. Ŝi rajdis; ŝi lerte demandis al kurieroj, ĉu ili ne renkontis dikkorpan abaton, dikegan prefekton kaj junan naivulaĉon, kurantaj survoje al Parizo. La trian tagon, eksciinte, ke ili ne estis malproksime, ŝi iris laŭ tute alia vojo, kaj estis sufiĉe lerta kaj bonŝanca por alveni en Versajo, dum vane oni serĉis ŝin en Parizo.

Sed kiel konduki en Versajo? Estante juna, bela, senkonsila, senapoga, nekonata, ĉion riskanta, kiel kuragi trovi gvardianon de l'reĝo? Ŝi pensis, ke estus bone sin turni al iu malaltranga jezuito; da ili ekzistis por ĉiuj situacioj el la vivo: kiel Dio, ili diris, donis malsamajn nutraĵojn al la diversaj specoj de bestoj, li donis al la reĝo konfesprenanton, kiun la prebendopetantoj nomis *la ĉefon de la galikana Eklezio*; poste estis la konfesprenantoj de la prinĉinoj; la ministroj ne havis konfesprenanton: tiel stultaj ili ja ne estis. Por la vulgularo estis jezuitoj, kaj ĉefe tiuj de la ĉambristinoj, per kiuj oni eksciis pri la sekretoj de l'mastrinoj, kaj tio donis grandan okupon. La bela Sankta-Ivo sin turnis al iu el tiuj lastaj jezuitoj, kies nomo estis Ĉio-por-Ĉiuj. Ŝi sin konfesis al li, rakontis pri siaj aventuroj, pri sia stato, pri la danĝero, en kiu ŝi troviĝas, kaj

petegis, ke li havigu al ŝi ĉambron ĉe iu bona piulino, kiu ŝirmu ŝin kontraŭ tentoj.

La patro Ĉio-por-Ĉiuj enkondukis ŝin ĉe la edzino de kortega oficiro, unu el liaj plej konfidataj konfesantinoj. Tuj kiam ŝi estis ĉe tiu gastigantino, ŝi penadis per ĝentilaĵoj por akiri ŝian fidon kaj amikecon; ŝi demandis pri la bretona gvardiano kaj petis, ke li venu al ŝi. Eksciinte de li, ke ŝia amato estis forportita, post lia interparolo kun iu ĉefa komisiito, ŝi kuris al tiu komisiito; vidante belan virinon, li mildiĝis, ĉar oni devas konsenti, ke Dio kreis la virinojn nur por malsovaĝigi la virojn.

Kortuŝite la skribistaĉo konfesis ĉion al ŝi.

— Via amato estas en la Bastijo jam de preskaŭ unu jaro, kaj sen via helpo li eble restus tie dum sia tuta vivo.

La facile impresebla Sankta-Ivo svenis. Kiam ŝi rekonsciiĝis, la skribistaĉo diris al ŝi:

— Mi estas senpova por fari bonon; per mia tuta povo mi povas nur malbonfari kelkfoje. KREDU min, vi iru al S-ro Sankta-Puanĵ, kiu faras bonon kaj malbonon, kuzo kaj favorato de S-rego Luvua. Tiu ministro havas du animojn: S-ro Sankta-Puanĵ estas unu el ili; S-ino Dufrenua estas la alia; sed ŝi nun estas for el Versajo; restas al vi nur kompatigi la protektanton, kiun mi konigas al vi.

La bela Sankta-Ivo, dividite inter iom da ĝojo kaj ekstremaj doloroj, inter kelka espero kaj malgajigaj timoj; persekutite de sia frato, adorante sian amaton, forviŝante larmojn kaj daŭre plorante, senfortigite kaj rekuraĝiĝinte, kuris rapide al S-ro Sankta-Puanĵ.

## ĈAPITRO XIV

## Progresoj de la spirito de Senartifikulo

Senartifikulo rapide progresis en la sciencoj, kaj ĉefe en la scienco pri la homo. La kaŭzo de l'rapida plivastiĝo de lia spirito kuŝis en lia sovaĝa edukigo preskaŭ samgrade kiel en hardeco de lia animo, tial ke, lerninte nenion dum sia infanaĝo, li ne akiris antaŭjuĝojn. Lia intelekto, ne estante fleksita per eraroj, restis tute rekta. Li vidis la aferojn tiaj, kiaj ili estas, dum la ideoj, kiujn oni donas al ni dum la infanaĝo, kaŭzas, ke ni vidas ilin tiaj, kiaj ili ne estas.

— Viaj persekutantoj estas abomenindaj, li diris iun tagon al sia amiko Gordon. Mi kompatas vin, pro tio, ke vi estas perskutata, sed mi ankaŭ kompatas vin, tial ke vi estas jansenisto. Ŝajnas al mi, ke ĉiu sekto signas kuniĝon de eraroj. Diru al mi, ĉu estas sektoj rilate geometrion?

— Ne, mia kara infano, respondis ĝemetante la bona Gordon; ĉiuj homoj interkonsentas pri vero, kiam ĝi estas elpruvita, sed ili malsamopinias pri la malklaraj veroj.

— Prefere, diru pri la malklaraj malveroj. Se estus unu sola vero, kaŝita sub la amaso da argumentoj, kiujn oni kolektas de post tiom da jarcentoj, oni sendube eltrovus ĝin kaj ĉiuj homoj interkonsentus almenaŭ pri tiu punkto. Se tiu vero estus necesa, kiel la suno al la tero, ĝi brulus kiel la suno. Ĝi estas absurdaĵo, insultego al la homaro; ĝi estas atenco kontraŭ la senlima kaj superrega Estulo diri: »Ekzistas vero nepre necesa al la homo, kaj Dio kaŝis ĝin.«

Ĉio, kion diris tiu juna malklerulo, instruita de l'naturu, forte impresis la spiriton de l'maljuna klerulo malfeliĉa.

— Ĉu estus vere, li ekkriis, ke mi malfeliĉigis min pro ĥimeroj? Mi estas multe pli certa pri la realo de mia malfeliĉo ol pri la efika graco. Mi pasigis mian vivon, rezonante pri la libero de Dio kaj de la homaro; sed mi perdis la mian; nek sankta Aŭgusteno, nek sankta Prosper tiros min el la abismo, kie mi estas.

Senartifikulo, parolante laŭ sia karaktero, fine diris:

— Ĉu vi volas, ke mi parolu kun sentima fido? Kiuj konsentas esti persekutataj pro tiaj vanaj disputoj skolaj, tiuj ŝajnas al mi malmulte saĝaj; kiuj persekutas, tiuj estas monstroj.

La du malliberuloj tute interkonsentis pri la maljusto de ilia kaptiteco.

— Mi estas centfoje pli kompatinda ol vi, diris Senartifikulo; mi naskiĝis libera kiel la aero; mi havis du vivmotivojn, la liberon kaj la amon; oni forprenas ilin de mi. Jen ni ambaŭ estas en malliberejo, ne sciante pro kiu motivo kaj pri ĝi ne povante demandi. Mi vivis kiel Hurono dum dudek jaroj; oni diras, ke ili estas barbaroj, tial ke ili venĝe rebatas al siaj malamikoj. Apenaŭ mi estis en Francio, kiam mi batalis por ĝi; eble mi savis provincon, kaj kiel rekompenco mi estas enabismigita en tiu tombo por vivantoj, kie mi mortus pro furiozo, se mi ne havus vian helpon. Ĉu do ne ekzistas leĝoj en ĉi tiu lando? Oni kondamnas homojn, ne donante al ili la eblon sin pravigi! Ne tiel okazas en Anglio! Ha! ne kontraŭ la Angloj mi devus batali.

Tiel lia naskiĝanta saĝo ne povis obeigi la naturon, insultegatan en la unua el ĝiaj rajtoj, kaj li lasis senbrida sian koleron.

Lia kunulo ne kontraŭdiris lin. La foresto ĉiam kreskigas la nekontentigitan amon, kaj la saĝo ne malfortigas ĝin. Li parolis tiom ofte pri sia kara Sankta-Ivo, kiom pri moralo kaj metafiziko. Ju pli liaj sentoj elpuriĝis, des pli li amis. Li legis kelkajn novajn romanojn; li trovis malmultajn, kiuj priskribis lian animstaton. Li sentis, ke lia koro ĉiam iris transen je tio, kion li legis.

— Ha! li diris, preskaŭ ĉiuj tiuj aŭtoroj havas nur spriton kaj arton.

Fine la bona pastro jansenisto nepercepteble fariĝis la konfidenculo de lia amemo. Antaŭe li sciis pri amo nur, kion oni konfesas kiel pekon. Li lernis koni ĝin kiel senton tiel nobla, kiel delikata, kiu povas plialtigi la animon, same kiel ĝin malhardi, kaj eĉ produkti kelkajn virtojn. Fine, kiel lasta mirindaĵo, Hurono estis konvertanta janseniston.

## ĈAPITRO XV

### **La bela Sankta-Ivo ne cedas al subtile embarasaj proponoj**

La bela Sankta-Ivo, pli amema eĉ ol ŝia amato, iris do al S-ro Sankta-Puanĵ; akompanis ŝin la amikino, ĉe kiu ŝi loĝis, kaj ambaŭ estis kaŝe kovritaj per siaj kufoj. Ĉe sia alveno la unua rimarko, kiun ŝi faris, estis, ke ŝia frato, la abato Sankta-Ivo ĵus eliris. Ŝi estis timigita; sed la piulino trankviligis ŝin.

— Ĝuste pro tio, ke oni kulpigis vin, necesas, ke vi parolu. Estu certa, ke en ĉi tiu lando la kulpigantoj ĉiam sukcesas, se oni rapide ne kontraŭdiras ilin. Via

ĉeesto, tre certe, estos pli efika ol la paroloj de via frato.

Sufiĉas nur kuraĝigi pasian amatinon, por ke ŝi fariĝu bravega. F-ino Sankta-Ivo sin prezentas por aŭdienco. Ŝia junco, ŝiaj logejoj, ŝiaj amemaj okuloj iom larmantaj altiris ĉies rigardojn. Ĉiu flatemulo de la subministro forgesis momente la potencidolon por admire rigardi la idolon de la belo. Sankta-Puanj enirigis ŝin en skriboĉambro; ŝi parolis kortuŝe kaj gracie. Sankta-Puanj sentis sin tuŝata. Ŝi tremis; li trankviligis ŝin.

— Vi revenu ĉi tiun vesperon, li diris al ŝi; viaj aferoj indas, ke oni pripensu ilin kaj ke oni parolu pri ili ne rapide; ĉi tie estas tro da personoj; oni tro rapide finas la aŭdiencojn; necesas, ke mi detale priparolu kun vi pri ĉio, kio koncernas vin. Poste, laŭdante ŝin pri ŝia belo kaj pri ŝiaj sentoj, li rekomendis, ke ŝi revenu je la sepa horo vespere.

Ŝi akurate ĉeestis; la amikina piulino ankoraŭ akompanis ŝin; sed ŝi restis en la salono kaj legis en la *Kristana pedagogo*, dum Sankta-Puanj kaj la bela Sankta-Ivo estis en la malantaŭa skribĉambro.

— Ĉu ŝajnas al vi kredeble, fraŭlino, li unue diris al ŝi, ke via frato venis por peti arestordonon kontraŭ vi? Verdire, mi pli volonte eldonus unu, por lin resendi en Bas-Bretonjon.

— Ho ve! sinjoro, oni do estas en viaj oficejoj tre malavara je tiaj ordonoj, ĉar oni venas peti ilin el la limo de l'reĝlando, kiel pensiojn! For de mi estas la ideo peti unu kontraŭ mia frato. Mi havas multon por riproĉi al li, sed mi respektas la liberon de la homoj; mi petas tiun de homo, kun kiu mi volas edziniĝi, de viro al kiu la reĝo ŝuldas la konservon de provinco,

viro, kiu povas utile servadi, kaj kiu estas filo de oficiro, kiu estis mortigita je lia servo. Pro kio li estas kulpigata? kiel oni povis tiel kruele trakti lin, ne aŭdinte lian sinpravignon?

Tiam la subministro montris al ŝi la leteron de la jezuita spiono kaj tiun de l'perfida prefekto.

— Kiel do! ekzistas tiaj monstroj sur la tero! kaj oni volas devigi min edziniĝi kun la ridinda filo de ridinda kaj malbonfara homo! kaj estas laŭ tiaj sciigoj, ke oni decidis pri la sorto de la civitanoj!

Ŝi ĵete surgenuiĝis; plorsingulte ŝi petis la liberigon de la bravulo, kiun ŝi amegas. En tia stato ŝiaj logejoj elmontriĝis en sia plej granda efiko. Ŝi estis tiel bela, ke Sankta-Puanĵ, senhontiĝante, komprenigis al ŝi, ke por atingi sian celon, estus trafe, se ŝi konsentus doni al li la komencaĵon de tio, kion ŝi rezervis por sia amato. La bela Sankta-Ivo, timigite kaj konfuzite, ŝajnis kvazaŭ ŝi ne komprenus; pli preciza klarigo estis necesa. Vorto, unue eldirita deteneme, venigis pli fortan, kiun sekvis alia pli signifa. Oni ne nur proponis la nuligon de la malliberiga ordono, sed rekompencojn, monon, distingajojn, establaĵojn; kaj ju pli oni promesis, des pli la deziro ricevi konsenton plifortiĝis.

Sankta-Ivo ploris; ŝi estis konsternita, duonrenversita sur sofo, apenaŭ kredanta, kion ŝi vidas kaj aŭdas. Sankta-Puanĵ, stavece, sin ĵetis al ŝiaj genuoj. Li ne estis malbela kaj povus ne tedi personon, kies koro ne estus jam konkerita; sed Sankta-Ivo adoris sian amaton kaj kredis, ke estas abomeninda krimo trompi lin por lia utilo. Sankta-Puanĵ ripetis la petojn kaj la promesojn; fine li senprudentiĝis tiagrade, ke li deklaris al ŝi, ke ne ekzistas alia rimedo por liberigi la homon, por kiu ŝi havis tiel intensegan kaj ameman intereson.



Tiu stranga interparolado plilongiĝis. La piulino el la antaŭĉambro, legante en sia *Kristana pedagogo*, diris:

— Dio mia! kion do ili faras tie jam de du horoj? Neniam lia sinjorega moŝto Sankta-Puanĵ donis tiom longan aŭdiencon; eble li ĉion rifuzis al ĉiu kompatinda junulino, ĉar ŝi ankoraŭ petas lin.

Fine ŝia kunulino eliris el la malantaŭa skribĉambro, estante duonfreneza, ne povante paroli, profunde pripensante la karakteron de la altnobeloj kaj de la duon-altnobeloj, kiuj tiel facilanime oferas la liberon de la viroj kaj la ĉaston de l'virinoj.

Dum la tuta irado ŝi ne eldiris unu vorton. Alveninte ĉe la amikino, ŝi ekploreĝis kaj ĉion rakontis. La piulino faris grandajn kruccsignojn.

— Mia kara amikino, tuj morgaŭ vi konsultu patron Ĉio-por-Ĉiuj, nian direktanton; li havas multe da influo ĉe S-ro Sankta-Puanĵ; li estas la konfesoricevanto de pluraj servistinoj de lia domo; li estas pia kaj akordiĝema homo, kiu ankaŭ direktas kelkajn nobelinojn: allasu vin al li, tiel mi mem faras; ĉiam tio profitis al mi. Ni, kompatindaj virinoj, bezonas esti gvidataj de viro.

— Nu bone! mia kara amikino, mi do iros morgaŭ al patro Ĉio-por-Ĉiuj.

## ĈAPITRO XVI

### Ŝi konsultas jezuiton

Tuj kiam la bela kaj afliktita Sankta-Ivo estis kun sia konfesprenanto, ŝi diris al li, ke potenca kaj voluptema homo proponis al ŝi liberigi tiun, kun kiu ŝi devas laŭleĝe edziniĝi, kaj ke por tia servo li postulas tre altan prezon; ke ŝi sentis abomenon ĉe la penso pri tia

malfidelaĵo, kaj ke, se temus pri ŝia propra vivo, ŝi preferus, oferi ĝin ol fali.

— Jen estas abomeninda pekulo, diris patro Ĉio-por-ĉiuj. Bonvolu diri al mi la nomon de tiu malnoblulo; certe estas iu jansenisto; mi denuncos lin al Lia Respektinda Moŝto patro Laŝez, kiu lokigos lin en ejon, kie nun estas la karulo, kun kiu vi devas edziniĝi.

Post longa embaraso kaj fortaj ŝanceliĝoj la kompatindulino fine eldiris la nomon: Sankta-Puanĵ.

— S-ro Sankta-Puanĵ! ekkriis la jezuito; ha! mia filino! estas tute alia afero; li estas la kuzo de la plej eminenta ministro, kiun iam ajn ni havis, bonulo, protektanto de la bona partio, bona kristano; neblas, ke li havis tian penson; kredeble vi malĝuste komprenis.

— Ha! mia patro, mi tro bone komprenis; mi estas nesavebla, kion ajn mi faru; mi povas elekti nur inter malfeliĉo kaj honto; necesas, ke mia amato restu entombigita tute viva, aŭ ke mi fariĝu malinda je la vivo. Mi ne povas lasi lin pereĵ, kaj mi ne povas lin savi.

Patro Ĉio-por-Ĉiuj penis trankviligi ŝin per jenaj mildaj paroloj:

— Unue, mia filino, neniam diru tiujn vortojn: *mia amato*; ili entenas ian mondumecon, kiu povas ofendi Dion; diru: *mia edzo*, tial ke, kvankam li ankoraŭ ne estas tia, tamen vi rigardas lin tia, kaj nenio estas pli deca.

Due, kvankam li estas pense, espere via edzo, tamen li efektive ne estas tia: do, vi ne adultus, kio estas grandega peko, kiun oni ĉiam devas eviti, kiom eble.

Trie, la agoj ne estas pekpunindaj, kiam la intenco estas pura, kaj nenio estas pli pura ol via intenco liberigi vian edzon.

Kvare, ekzistas ekzemploj en la antikvaj tempoj sanktaj, kiuj mirinde povas pravigi vian konduton. Sankta Aŭgusteno raportas, ke dum la prokonsulregado de Septimio Acidino, en la jaro 340-a de nia saviĝo,<sup>1</sup> iu malriĉulo, kiu ne povis pagi al Cezaro tion, kio apartenis al Cezaro, estis mortkondamnita, kiel estas juste, malgraŭ la maksimo: *Kie estas nenio, tie la reĝo estas senrajta*. Temis pri unu funto da oro; la kondamnito havis edzinon, kiun Dio provizis per belo kaj saĝo. Maljuna riĉulo promesis doni la funton da oro kaj eĉ pli al la sinjorino, kondiĉe, ke ŝi faru kun li la abomenindan pekon. La sinjorino opiniis, ke ŝi ne pekos, savante sian edzon. Sankta Aŭgusteno tute aprobas tiun bonkoran submetiĝon. Estas vere, ke la maljuna riĉulo trompis ŝin, kaj ke eble ŝia edzo estis pendigita; sed ŝi faris ĉion, kion ŝi povis por savi lian vivon.

Estu certa, miá filino, ke kiam jezuito citas al vi el Sankta Aŭgusteno, necesas, ke tiu sanktulo estu tute prava. Nenion al vi mi konsilas: vi estas saĝa; estas konjektinde, ke vi utilos al via edzo. Lia sinjorega moŝto Sankta-Puanĵ estas honesta homo; li ne trompos vin; nenion alian mi povas diri al vi. Mi preĝos al Dio por vi, kaj mi esperas, ke ĉio okazos je lia plej granda gloro.

La bela Sankta-Ivo, ne malpli timigita per la paroloj de l'jezuito ol per la proponoj de la subministro, revenis duonfreneza ĉe sian amikininon. Ŝi emis, per sinmortigo, liberigi sin je la abomeninda penso lasi en terura mallibero la viron, kiun ŝi adoras, kaj je la honto liberigi lin je la prezo de tio, kio estas al ŝi plej kara, kaj kio devas aparteni al tiu malfeliĉa amato.

<sup>1</sup> T. e. la epoko de Jezuo-Kristo, la savanto. — Trad.

## ĈAPITRO XVII

## Ŝi falas pro virto

Ŝi petis sian amikinson mortigi ŝin; sed tiu virino, ne pli severmora ol la jezuito, parolis al ŝi eĉ pli klare.

— Ho ve! ŝi diris, ne aliel okazas en tiu kortego tiel ĝentila, tiel plaĉe eleganta, tiel fama. La plej mezbonaj oficoj kaj la plej gravaj ofte estis akiritaj laŭ la prezo, kiun oni postulas de vi. Aŭskultu, vi inspiris al mi amikecon kaj fidon; mi konfesos al vi, ke se mi estus tiel malcedema kiel vi, mia edzo ne ĝuus la malgravan postenon, per kiu li vivas; li scias pri la afero, kaj anstataŭ esti malkontenta, li viĝas en mi sian bonfarantaron. Ĉu vi kredas, ke ĉiuj estroj de provincoj, aŭ eĉ de armeoj ricevis honoraĵojn kaj ilian riĉaĵon nur pro siaj servoj? Inter ili estas kelkaj, kiuj ŝuldas ilin al siaj sinjorinaj edzinoj. La altoficoj en la armeo estis petataj de virinoj, kaj la plej alta posteno estis donita al la edzo de la plej bela.

Vi estas en multe pli interesa situacio: temas liberigi vian amaton kaj edziniĝi kun li; ĝi estas sankta devo, kiun vi devas plenumi. Oni ne mallaŭdis la belajn kaj altrangajn sinjorinojn, pri kiuj mi parolis; oni aplaudos al vi, dirante, ke vi pekis nur pro troa virto.

— Ha! kia virto! ekkriis la bela Sankta-Ivo; kia labirinto el maljustaĵoj! Kaj kiel mi lernas ekkoni la homojn! Iu patro Laŝez kaj iu ridinda prefekto lokigas mian amaton en malliberejon; mia familio persekutas min; oni proponas al mi helpon en mia malfeliĉego nur por malvirtigi min. Iu jezuito kaŭzis la malfeliĉon de brava homo, alia jezuito volas malfeliĉigi min; mi estas ĉirkaŭita nur per kaptiloj, kaj alvenas la momento fali

en mizeron! Mi volas mortigi min, aŭ paroli al la reĝo; mi ĵetos min al liaj piedoj, kiam li estos survoje por iri al preĝejo aŭ al teatro.

— Oni ne lasos vin alproksimiĝi, diris al ŝi ŝia bona amikino; kaj se malbonokaze vi parolus, sinjor' Luvua kaj la respektinda patro Laŝez povus entombigi vin en la fundon de monaĥinejo ĝis via morto.

Dum tiu bonulino pliigis tiele la hezitojn de tiu malesperantino kaj puŝis ponardon en ŝian koron, alvenas kuriero de S-ro Sankta-Puanĵ kun letero kaj du belaj orelingoj. Sankta-Ivo forpuŝis ĉion plorante, sed la amikino prenis sur sin ties akcepton.

Tuj kiam la kuriero estis for, la konfidenculino legis la leteron, en kiu oni proponas al la du amikinoj manĝeton en la vespero. Sankta-Ivo ĵuras, ke ŝi ne iros. La piulino volas ornami ŝin per la du orelingoj kun diamantoj. Sankta-Ivo ne povas toleri tion; dum la tuta tago ŝi luktis. Fine, pensante nur pri sia amato, venkite, delogite, ne sciante kien oni veturigas ŝin, ŝi lasas sin konduki al la fatala vespermanĝo. Nenial ŝi konsentis ornami sin per la du orelingoj; la konfidenculino kunportis ilin; malgraŭ ŝia kontraŭstaro ŝi alĝustigis ilin al ŝi antaŭ ol altabliĝi. Sankta-Ivo estis tiel konfuzita kaj tiel perturbita, ke ŝi lasis sin turmenti, kaj la mastro bonaŭguris pri tio. Ĉirkaŭ la fino de l'manĝo, la konfidenculino elŝteliĝis. Tiam la mastro montris la dokumenton, kiu nuligas la malliberig-ordonon, la ateston por granda gratifiko, tiun por unu roto, kaj li ne ŝparis promesojn.

— Ha! diris al li Sankta-Ivo, kiel mi amus vin, se vi ne volus esti tiele amata!

Fine, post longa kontraŭstaro, post singultoj, krioj, larmoj, malfortigite de la lukto, konfuzegite, konsumite,

ŝi devis cedi. Ŝi ne havis alian rimedon ol promesi al si, ke ŝi pensos nur pri Senartifikulo, dum la kruelulo ĝuos senkompate je la neceso, kiu cedigas ŝin.

## ĈAPITRO XVIII

### Ŝi liberigas sian amaton kaj unu janseniston

Frumatene ŝi flugis al Parizo, kunportante la ordonon de l' ministro. Estas malfacile priskribi tion, kio okazis en ŝia koro dum tiu vojaĝo. Oni prezentu al si virtan kaj noblan animon, kiu sentas malfierigon pro sia hontegaĵo, kiu estas ekzaltita de amemo, akre dolorigita pro perfido al sia amato, penetrita de la deziro liberigi sian adoraton. Ŝiaj disreviĝoj, ŝiaj bataloj, ŝia sukceso estis la temoj de ŝiaj pripensoj. Ŝi ne plu estis tiu simplanima fraŭlino, kies provinca edukado malvastigis la ideojn. La amo kaj la malfeliĉo edukis ŝin. La sento same progresis en ŝi, kiel la racio en la spirito de ŝia malfeliĉa amato. La fraŭlinoj lernas senti pli facile ol la viroj lernas pensi. Ŝia aventuro estis pli instrua ol kvarjara ĉeesto en monaĥinejo.

Ŝiaj vestoj estis treege simplaj, Kun abomeno ŝi pensis pri la vestaraĝoj, sub kiuj ŝi aperis antaŭ sia fatala bonfaranto! ŝi lasis al sia kunulino la orelingojn kun diamantoj sen iu rigardo al ili. Konfuzite kaj ravite, adorante Senartifikulon, kaj malamante sin mem, ŝi fine alvenis ĉe la pordo

*De tiu malbel-kastelo, palac' de l' venĝo  
En kiu ofte sidas krim' kaj senkulpeco.*

Kiam ŝi devis elkaleŝiĝi, forto mankis al ŝi; oni helpis ŝin; ŝi eniris kun batanta koro, kun malsekaj

okuloj, kun konsternita frunto. Oni prezentas ŝin al la direktoro; ŝi volas paroli kaj ne povas; ŝi montras la ordonan dokumenton, eldirante apenaŭ kelkajn vortojn. La direktoro estimis, sian malliberigiton; li estis tre kontenta pro lia liberigo. Lia koro ne estis hardita kiel tiu de kelkaj provosoj, liaj kolegoj, kiuj pensas nur pri la salajro ricevata pro la gardo super siaj malliberuloj, tirante profiton el siaj viktimoj kaj vivante per alies malfeliĉo, sekrete sentante abomenindan ĝojon pro la larmoj de la malfeliĉuloj.

Li venigas la malliberulon en sian ĉambron. La geamantoj ekvidas sin reciproke, kaj ambaŭ svenas. La bela Sankta-Ivo restas dum longa tempo senmova kaj senviva; Senartifikulo baldaŭ rekuraĝiĝis.

— Verŝajne ĉi tiu sinjorino estas via edzino, diris al li la direktoro; vi ne diris al mi, ke vi estas edzo. Oni informas min, ke dank' al ŝiaj klopodoj efektiviĝas via liberigo.

— Ha! mi ne indas esti lia edzino, diris la bela Sankta-Ivo tremvoĉe. Kaj ŝi denove svenis. Rekonsciiginte, ŝi prezentis la ateston por gratifiko kaj la skribitan promeson por ricevi roton. Senartifikulo, tiel mirigite, kiel kortuŝite, kvazaŭ vekigis el sonĝo, por refali en alian.

— Kial mi estis enŝlosita ĉi tie? Kiel vi povis liberigi min? Kie estas la monstroj, kiuj jetis min ĉi tien? Vi estas diino, kiu malsuprenvenis el la ĉielo por savi min.

La bela Sankta-Ivo mallevis la palpebrojn, rigardis sian amaton, ruĝiĝis kaj deturnis, momenton poste, siajn plorantajn okulojn. Ŝi fine rakontis al li ĉion, kion ŝi sciis kaj ĉion, kion ŝi spertis, esceptinte; kion ŝi volus kaŝi por ĉiam kaj kion alia ol Senartifikulo, pli sperta

pri la vivo kaj pli scia pri la moroj de l' kortego, divenus facile.

— Ĉu eblas, ke fiulo kiel tiu prefekto povis forrabi mian liberon? Ha! mi komprenas, ke rilate al la homoj, same kiel al la plej malŝatindaj bestoj, oni povas diri: ĉiuj povas malutili. Sed ĉu estas eble, ke iu monaĥo, iu jezuito, konfesprenanto de l' reĝo, povis kontribui al mia malfeliĉigo tiom, kiom tiu prefekto, kaj ke mi ne povis imagi sub kiu preteksto tiu malŝatinda fripono persekutis min? Ĉu li famigis min kiel janseniston? Fine, kiel vi memoris pri mi? Tion mi ne meritis; tiam mi estis nur sovaĝulo. Kiel do! vi povis nekonsilite, senhelpe, entrepreni tiun vojaĝon ĝis Versajo! Tie vi aperis, kaj oni elkatendigis min! Ekzistas do en la belo kaj en la virto nevenkebla sorĉo, kiu faligas ferajn pordojn kaj moligas bronzajn korojn!

Ĉe tiu vorto *virto*, la bela Sankta-Ivo ne povis bridi al siaj singultoj. Ŝi ne sciis, kiel virta ŝi estis en la krimo, kiun ŝi riproĉas al si. Ŝia amanto jene daŭrigis:

— Vi, anĝelo, kiu rompis miajn katenojn, ĉar vi havis (pri tio mi ankoraŭ ne akiris komprenon) sufiĉe da influo por atingi, ke mi estu juste traktata, agu same rilate al tiu ĉi maljunulo, kiu, la unua, lernigis min pensi, kiel vi lernigis min ami. La malfeliĉego unuigis nin; mi amas lin kiel patron; mi ne povas vivi sen li nek sen vi.

— Mi! ke mi petu al la sama viro, kiu...

— Jes, ĉion mi volas ŝuldi al vi, kaj volas neniam esti alies ŝuldanto. Vi skribu al tiu potenca homo; superŝutu min per viaj favoraĵoj; elfinu, kion vi komencis; elfinu viajn miregindaĵojn.

Ŝi sentis, ke ŝi devas fari ĉion, kion petis ŝia amato: ŝi volis skribi; ŝia mano ne povis obei. Trifoje ŝi ko-



mencis leteron kaj trifoje disŝiris ĝin; fine ŝi sukcesis, la geamantoj eliris, post kiam ili kisis la maljunan martiron de la efika graco.

La feliĉa kaj senespera Sankta-Ivo sciis kie loĝis ŝia frato; ŝi tien iris; ŝia amato luis apartamenton en la sama domo.

Apenaŭ ili estis alvenintaj, kiam ŝia protektanto sendis al ŝi la ordonon por la liberigo al la bonulo Gordon, kaj petis al ŝi rendevuon por la posta tago. Tiel, por ĉiu honesta kaj bonkora ago, kiun ŝi faris, ŝia malvirtigo estis ties prezo. Kun abomenego ŝi konsideris tiun kutimon vendi la malfeliĉon kaj la feliĉon de homoj. Ŝi donis la dokumenton al sia amato kaj rifuzis la rendevuon de bonfaranto, kiun ŝi ne plu povis vidi ne mortigante pro doloro kaj honto.

Senartifikulo povis disigi je ŝi nur por iri liberigi amikon: tien li flugis. Li plenumis tiun devon, meditante pri la strangaj okazaĵoj el ĉi tiu mondo, kaj admirate la kuraĝan virton de junulino, al kiu du malfeliĉuloj ŝuldis pli ol la vivon.

## ĈAPITRO XIX

### **Senartifikulo, la bela Sankta-Ivo kaj iliaj parencoj estas kuniĝintaj**

La bonkora kaj respektinda malfidelulino estis kun sia frato, abato Sankta-Ivo, la bona prioro kaj fraŭlino Kerkabon. Ĉiuj estis egale mirigitaj; sed ilia situacio kaj iliaj sentoj estis tre malsamaj. Abato Sankta-Ivo priploris siajn malpravaĵojn ĉe la piedoj de sia fratino, kiu pardonis al li. La prioro kaj lia amema fratino ankaŭ ploris, sed pro ĝojo; la malŝatinda prefekto kaj

lia netolerebla filo ne ĝenis tiun kortuŝan scenon. Ĉe la ekscio pri la liberiĝo de sia malamiko ili foriris; ili kuris senĝlore kaŝi en sia provinco sian stulton kaj sian timon.

La kvar personoj, skuite de cent diversaj movoj, atendis, ke revenu la junulo kun la amiko, kiun li iris liberigi. Abato Sankta-Ivo ne kuraĝis rigardi al la vizaĝo de sia fratino; la bona Kerkabon diris:

— Mi do revidos mian karan nevon!

— Lin vi revidos, diris la ĉarma Sankta-Ivo, sed li ne plu estas la sama homo; lia sinteno, lia tono, liaj ideoj, lia spirito, ĉio aliĝis. Li fariĝis tiel respektinda, kiel li estis naiva kaj nescia pri ĉio. Li estos la honoro kaj konsolo de via familio: kial mi ne povas ankaŭ feliĉigi la mian!

— Ankaŭ vi mem ne plu estas la sama, diris la prioro; kio do okazis al vi, por kaŭzi tiel grandan aliĝon en vi?

Meze en tiu interparolo, alvenas Senartifikulo, tenante ĉe la mano sian janseniston. Tiam la sceno fariĝis pli nova kaj pli interesa. Ĝi komenciĝis per la amemaj enbrakigoj de la geonkloj. Abato Sankta-Ivo preskaŭ genuiĝis antaŭ Senartifikulo, kiu ne plu estis senartifika. La geamantoj interparolis per rigardoj, kiuj esprimis ĉiujn sentojn, per kiuj ili estis saturitaj. Aperis kontento, dankemo sur la frunto de unu; embaraso montrigis en la amemaj, iom delirantaj okuloj de la alia. Oni miris, ke ŝi miksis doloron kun tiom da ĝojo.

La maljuna Gordon, post kelkaj momentoj, fariĝis kara al la tuta familio. Li estis malfeliĉa en la kunesto de la juna malliberigito, kaj tio estis granda merito. Li ŝuldis sian liberiĝon al la geamantoj; tio sufiĉis, por repacigi lin kun la amo. La akro de liaj malnovaj opi-

nioj foriris el lia koro: li homiĝis, kiel la Hurono. Ĉiu rakontis siajn aventurojn antaŭ la vespermanĝo. La du abatoj, la onklino, aŭskultis kiel infanoj, kiuj aŭdas rakontojn pri fantomoj, kaj kiel homoj, kiuj interesiĝas pri tiom da malfeliĉegoj.

— Ho ve! diris Gordon, eble estas pli ol kvincent virtaj personoj, kiuj nun estas en samaj katenoj, kiel tiuj, kiujn rompís F-ino Sankta-Ivo: iliaj malfeliĉoj estas nekonataj. Oni trovas sufiĉe da manoj por frapi sur la amason da malfeliĉuloj, kaj malofte unu por helpi.

Tiu pripenso tiel ĝusta pliiĝis lian sentemon kaj lian dankemon: ĉio pli grandigis la triumfon de la bela Sankta-Ivo; oni admiris la noblon kaj la persistemon de ŝia animo. La admiro miksiĝis kun ia respekto, kiun oni sentas kontraŭvole por persono, pri kiu oni kredas, ke ŝi havas influon en la kortego. Sed abato Sankta-Ivo kelkfoje diris:

— Kiel faris mia fratino, por tiel rapide akiri tiun influon?

Oni estis frue altablíĝonta: jen alvenas la bona amikino el Versajo, sciante neniom pri tio, kio okazis; ŝi estis en sesĉevala kaleŝo, kaj oni facile ekkonas, al kiu ŝi apartenas. Ŝi eniras kun la impona mieno de korteganino, kiu prizorgas gravajn aferojn, iomete salutas la ĉeestantaron, kaj tirante flanken la belan Sankta-Ivon:

— Kial tiom longe vi atendigas vin? Venu kun mi; jen estas viaj diamantoj, kiujn vi forgesis.

Ŝi ne povis eldiri tiujn vortojn tiel mallaŭte, ke Senartifikulo ne povus aŭdi ilin: li vidis la diamantojn. La frato estis konsternita; la geonkloj spertis nur surprizon, kiel bonuloj, kiuj neniam vidis tian luksegon.

La junulo, kiu kleriĝis per unu jaro da pripensoj, kontraŭvole pripensis, kaj ŝajnis dum momento esti maltrankvila. Lia amantino rimarkis tion; ŝia bela vizaĝo morte paliĝis; ŝi ektemis; apenaŭ ŝi povis stari.

— Ha! sinjorino, ŝi diris al la fatala amikino, vi pereigis min! vi mortigas min!

Tiuj paroloj trapikis la koron de Senartifikulo; sed li estis lerninta sinregon; li faris pri ili nenium rimarkigon, pro timo maltrankviligi sian amation en la ĉeesto de ŝia frato, sed li paliĝis kiel ŝi.

Sankta-Ivo, duonfrenezigitate de la konsterniĝo, kiun ŝi ekvidas sur la vizaĝo de sia amato, forkondukas tiun virinon el la ĉambro ĝis eta pasejo, ĵetas teren al ŝi la diamantojn.

— Ha! ĝi ne estas ili, kiuj delogis min, tion vi scias; sed kiu donacis ilin, tiu neniam revidos min.

La amikino leve reprenis ilin, kaj Sankta-Ivo aldiris:

— Ke li reprenu ilin aŭ donacu al vi; foriru, vi ne plu igu min honti pri mem.

La senditino fine foriris, komprenante nenion pri la konscienciproĉoj, kiujn ŝi konstatis.

La bela Sankta-Ivo, spirĝenate, spertante en sia korpo revolucion, kiu sufokas ŝin, devis enlitiĝi; sed por timigi nenium; ŝi ne diris kion ŝi suferas, kaj pretekstante nur sian lacon, ŝi petis la permeson ripozi; sed tion ŝi faris, post kiam ŝi estis trankviliginta la ĉeestantaron per konsoloj kaj flataj paroloj, kaj ĵetinte al sia amato rigardojn, kiuj portis fajron en lian animon.

La vespera manĝo, kiun ŝi ne animis, estis komence malgaja, sed laŭ interesa malgajo, kiu donas okazon por logaj kaj utilaj konversacioj, tiom pli valoraj ol la

frivola ĝojo, kiun oni aspiras, kaj kiu ordinare estas nur teda bruo.

Per malmultaj vortoj Gordon faris la historion pri la jansenismo, kaj pri la molinismo,<sup>1</sup> kaj pri la persekutadoj, kiujn ambaŭ partioj reciprokis al si, kaj pri ilia obstinego. Senartifikulo ties kritikon faris kaj kompatis la homojn, al kiuj ne sufiĉas tiom da malpacoj, kaŭzataj de ilia profitemo, sed kiuj kreas novajn malbonojn pro ĥimeraj bonoj kaj nekompreneblaj absurdaĵoj. Gordon rakontis, la alia prijuĝis; la kunmangantoj aŭskultis kun emocio kaj kleriĝis per nova lumo. Oni parolis pri la longo de niaj malfeliĉoj kaj pri la mallongo de l' vivo. Oni rimarkis, ke al ĉiu profesio estas ligita iu malbonaĵo kaj iu danĝero, kaj ke en la stato de princo, kiel en tiu de la plej mizera almozetanto, ĉio ŝajnas atesti kontraŭ la naturo. Kiel povas okazi, ke tiom da homoj, por malmulte da mono, fariĝas persekutistoj, servistoj, turmentistoj de aliaj homoj? Kun kia indiferento malhumana komisiito subskribas ordonon, kiu detruos familion, kaj kun kia ĝojo pli barbara dungitoj ĝin plenumas!

— En mia junaĝo, diris la bonulo Gordon, mi vidis parencon de marŝalo Marijak,<sup>2</sup> kiu, estante persekutata en sia provinco, pro tio ke li apartenis al la partio de tiu glorfama kompatindulo, sin kaŝis en Parizo sub falsa nomo. Li estis sepdek-dujara maljunulo. Lia edzino, kiu akompanis lin, estis proksimume samaĝa kiel li. Ili havis diboĉan filon, kiu, en sia dekkvarjareco forkuris el la

<sup>1</sup> Opinio de Molina, jezuito hispana (1535—1600), kiu celis akordigi la libervolon kun la graco kaj la antaŭscienco de Dio — *Trad.*

<sup>2</sup> Tiu marŝalo konspiris kontraŭ la tiam ĉefministro Riŝeljeŭ kaj pro tio havis la kapon fortranĉita. — *Trad.*

gepatra hejmo; fariĝinte soldato, poste dizertinto, li estis travivinta ĉiujn gradojn de diboĉo kaj mizero: fine, baptinte sin per fantazia nomo, li estis en la gvardio de la kardinalo Riŝeljeŭ (ĉar tiu pastro, same kiel Mazaren, havis gardistojn); li estis akirinta gradon de oficir-anstataŭanto en tiu roto de armitaj akompanantoj. Tiu aventuristo ricevis la komision aresti la maljunulon kaj lian edzinon, kaj li plenumis la ordonon kun la tuta senkompateco de homo, kiu volas plaĉi al sia mastro. Dum li kondukis ilin, li aŭdis tiujn du viktimojn bedaŭregi pri la longa sinsekvo de malfeliĉaĵoj, kiujn ili spertis ekde sia naskiĝo. La gepatroj konsideris kiel unu el iliaj plej grandaj malbonsortoj la malbonan konduton kaj la perdon de sia filo. Li rekonsis ilin; tamen li kondukis ilin en malliberejon, klarigante al ili, ke Lia Ekscelenca Moŝto devas esti servata prefere ol ĉio ajn. Lia Ekscelenco rekompencis lian fervoron.

Mi vidis spionon de patro Laŝez perfidi sian propran fraton, en la espero ricevi prebendon, kiun li vane atendis, kaj mi vidis lin morti, ne pro konscienciproĉoj, sed pro ĉagreno kaŭzita de la jezuita trompo.

La tasko de konfesprenanto, kiun mi longe plenumis, konigis al mi la intimaĵojn de familioj; mi konstatis, ke preskaŭ ĉiuj dronas en disreviĝoj, dum laŭ la ekstero, kovrita per la masko de l'feliĉo, ili ŝajnas naĝi en ĝojo, kaj mi ĉiam rimarkis, ke la grandaj ĉagrenoj rezultas de nia senbrida akiremo.

— Miaopinie, diris Senartifikulo, mi pensas, ke nobla animo, dankema kaj senĉema povas vivi feliĉe, kaj mi esperas ĝuadi perfektan feliĉon kun la bela kaj bonkora Sankta-Ivo, ĉar mi flatas al mi, li aldonis, sin turnante al ŝia frato kun amika rideto, ke vi ne rifuzos,

kiel pasintjare, kaj ke mi kondutos laŭ pli deca maniero.

La abato multigis senkulpigojn, rilate al la pasinto, kaj certigojn pri eterna korligniteco.

Onklo Kerkabon diris, ke estos la plej bela tago el lia vivo. La bona onklino, ekstaze kaj plorante pro ĝojo, ekkriis:

— Mi estis tute prava, pensante, ke vi neniam estos subdiakono; ĉi tiu sakramento plivaloras ol la alia; bedaŭrinde Dio ne favoris al mi per ĝi! Sed mi anstataŭos vian patrinon.

Tiam ĉiuj konkuris en laŭdado al la amema Sankta-Ivo.

Sia amanto havis la koron tro plenigita per tio, kion ŝi faris por li, li tro amis ŝin, por ke la aventuro pri la diamantoj povu fari sur lian koron superregantan impreson. Sed tiuj vortoj, kiujn li tro aŭdis: *vi mortigas min!* sekrete timigis lin ankoraŭ kaj forĝenis lian tutan ĝojon, dum la laŭdoj al sia bela amatino pliigis ankoraŭ lian amon. Fine oni okupigis nur pri ŝi; oni parolis nur pri la feliĉo, kiun tiuj geamantoj meritas; oni interkonsentis por vivi ĉiuj kune en Parizo; oni projektis pri riĉiĝo kaj plialtiĝo; oni sin fordonis al ĉiuj tiuj esperoj, kiujn la plej malgranda eksento de feliĉo tiel facile naskas. Sed Senartifikulo en la fundo de sia koro spertis kaŝan senton, kiu forpuŝis tian iluzion. Li relegis la promesojn subskribitajn de Sankta-Puanĵ, kaj la atestojn subskribitajn de Luvua; oni priskribis al li tiujn du virojn tiaj, kiaj ili estas, aŭ tiaj laŭkrede. Ĉiu parolis pri la ministroj kaj pri la ministraĵo kun tiu ĉetabla libero, konsiderata en Francio kiel la plej grandvalora libero, kiun oni povas ĝui surtere.

— Se mi estus reĝo de Francio, diris Senartifikulo, jen estas la militministro, kiun mi elektus: mi volus homon el la plej altranga deveno, tial ke li ordonas al la nobelaro. Mi postulus, ke li mem estu estinta oficiro, ke li estu traspertinta ĉiujn rangojn, ke li estu almenaŭ subgeneralo en la armeoj, kaj inda esti marŝalo de Francio, tial ke ĉu do ne estas necese, ke li estu mem servinta, por pli bone koni la detalojn de l'servado? kaj ĉu la oficiroj ne obeos kun centfoje pli da kontento al militisto, kiu estas, kiel ili, montrinta sian kuraĝon, ol al studĉambrulo, kiu povas nur diveneti la movojn de militiro, kiel ajn inteligenta li estas? Ne malplaĉus al mi, ke mia ministro estu malavara, kvankam mia financministro estus pro tio iafoje embarasata. Mi ŝatus, ke li estu senpene laborkapabla, kaj ke eĉ lin karakterizus bona humoro, doto de homo superanta la aferojn, kiu tiom plaĉas al la nacio kaj faciligas al ĉiuj la plenumon de la devoj.

Li deziris, ke ministro havu tian karakteron, tial ke li ĉiam rimarkis, ke bonhumoro estas neakordigebla kun kruelo.

Sinjur' Luvua verŝajne ne kontentiĝus per la deziroj de Senartifikulo; lia merito estis alispeca.

Sed dum oni estis ĉetable, la malsano de la kompatindulino alprenis fatalan karakteron: ŝia sango varmiĝis; forkonsuma febro aperis; ŝi suferis kaj ne plendis, atentante por ne malhelpi la ĝojon de la kunmanĝantoj.

Ŝia frato, sciante, ke ŝi ne dormas, iris al ŝia lito; li surpriziĝis pro ŝia stato. Ĉiuj alkuris; la amanto sin prezentis post ŝia frato. Sendube li estis la plej timigita kaj kortuŝita el ĉiuj; sed li estis lerninta kunigi la diskreton al ĉiuj oportunaj dotoj, kiujn malavare la na-



turo donacis al li, kaj la sento pri decreguloj komencis superregi en li.

Oni tuj venigis kuraciston el la najbaraĵo. Li estis unu el tiuj, kiuj vizitas malsanulojn kurante, kiuj konfuzas la malsanon, kiun ili ĵus vidis, kun tiu, kiun ili vidas, kiuj blinde praktikas sciencon, kies malcerton kaj danĝerojn la maturo de sana kaj pripensa intelekto ne povas forigi. Li pliiĝis la malsanon per sia rapidemo preskribi laŭmodan medikamenton. Modo eĉ en medicino! Tia manio estis tro ordinara en Parizo.

La kompatinda Sankta-Ivo kontribuis eĉ pli ol la kuracisto por danĝerigi sian malsanon. Ŝia animo mortigis ŝian korpon. La multego da pensoj, kiuj maltrankviligis ŝin, portis en ŝiajn vejnojn pli danĝeran venenon ol tiun de plej arda febro.

## ĈAPITRO XX

### La bela Sankta-Ivo mortas, kaj kio rezultas de tio

Oni vokis alian kuraciston: ĉi tiu anstataŭ helpi al la naturo kaj lasi ĝin influi sur junan personon, en kiu ĉiuj organoj estis vivaspiraj, li nur celis kontraŭi al sia kolego. La malsano en du tagoj fariĝis mortiga. La cerbo, pri kiu oni kredas, ke ĝi estas la sidejo de la intelekto, estis atakita same fortege kiel la koro, kiu, laŭdire, estas la sidejo de l'pasioj.

Kiu nekomprenebla mekaniko subigis la organojn al la sento kaj al la penso? Kiel povas unu sola penso dolora malardigi la fluadon de l'sango? kaj kiel siavice la sango portas siajn malregulaĵojn en la homan cerbon? Kiu estas tiu nekonata fluidaĵo, kies ekzisto estas certa, kiu, pli rapida, pli aktiva ol la lumo, flugas, en malpli

longa daŭro ol palpebrumo, tra ĉiuj fibroj de l'vivo, produktas sentojn, malĝojon aŭ ĝojon, prudenton aŭ kaptuniĝon, rememorigas kun abomeno, kion oni volus forgesi, kaj faras el pensanta animalo, ĉu admirindan objekton aŭ plorigan kompatindaĵon?

Tiel parolis la bona Gordon; kaj tiu tiel natura ripenso, kiun malofte faras homoj, forprenis nenion de lia kortuŝeco, tial ke li ne estis unu el tiuj kompatindaj filozofoj, kiuj penas esti sensentaj. Li estis kortuŝita de la sorto de tiu junulino, kiel patro, kiu vidas malrapide mortiĝi sian amegatan infanon. Abato Sankta-Ivo mal-esperis; la prioro kaj lia fratino elverŝis riveretojn da larmoj. Sed kiu povus priskribi la staton de ŝia amato? En neniu lingvo ekzistas la esprimoj, kiuj respondas al tiu kulmino el doloroj; la lingvoj estas tro malperfektaj.

La onklino, preskaŭ senviva, tenis la kapon de la agonianta en siaj malfortaj brakoj; ŝia frato estis surgenue ĉe la piedparto de la lito; ŝia amanto prenis ŝian manon, kiun li surverŝis per larmoj, kaj eksingultis; li nomis ŝin sia bonfarantino, sia espero, sia vivo, sia memduono, sia amatino, sia edzino. Ĉe tiu vorto edzino, ŝi ekĝemetis, rigardis lin kun neesprimebla amemo, kaj subite ŝi ekkriis terurige; poste, dum iu intertempo, kiam la senkuraĝiĝo, la sentpremo, kaj la doloroj interrompitaj, lasas al la animo ĝian liberon kaj ĝian forton, ŝi ekkriis:

— Mi, via edzino! Ha! kara amato, tiu nomo, tiu feliĉo, tiu premio, ne plu ekzistis por mi; mi mortas kaj tion mi meritas. Ho dio de mia koro! ho vi, kiun mi oferis al inferaj demonoj, estas finite, mi estas punata; estu vi feliĉa!

Tiuj amplenaj kaj teruraj paroloj ne povis esti komprenataj, sed ili portis en ĉies korojn teruron kaj

kompaton; ŝi havis sufiĉe da kuraĝo por doni klarigon. Ĉiu vorto tremigis pro miro, doloro kaj kompato la aŭskultantojn. Ĉiuj sentis saman malamegon por la potenca viro, kiu repagis abomenan maljustaĵon nur per krimo kaj kiu devigis la plej respektindan senkulpulinon esti lia kunkulpulino.

— Kiu? vi kulpa! diris al ŝi ŝia amanto; ne, tia vi ne estas; la krimo povas esti nur en la koro; la via estas virta kaj ĝi estas mia.

Li konfirmis tiun senton per paroloj, kiuj ŝajnis redoni vivon al la bela Sankta-Ivo. Ŝi sentis sin konsolita kaj miris pro tio, ke ŝi estas ankoraŭ amata. La maljuna Gordon kondamnis ŝin en la tempo, kiam li estis nur jansenisto; sed, fariĝinte saĝa, li estimis ŝin, kaj li ploris.

Meze de tiom da ploroj kaj da timoj, dum la timo pri la mortdanĝero de tiu tiel kara filino plenigis ĉies korojn, dum ĉio estis konsternita, oni anoncas la alvenon de kuriero el la kortego. Kuriero! kaj kies? kaj kial? Li venis, komisiite de la konfesprenanto de l'reĝo, al la prioro de la Monto; ne estis patro Laŝez, kiu skribis; estis la frato Vadbled, lia ĉambroservisto, homo tre grava en tiu epoko, ĉar li sciigis al la ĉefepiskopoj la volojn de la respektinda patro, ĉar li donis aŭdiencojn, ĉar li promesis prebendojn, ĉar kelkfoje li sendigis arestordonojn. Li skribis al la abato de la Monto, »ke Lia Respektinda Moŝto estis informita pri la aventuroj de lia nevo, ke lia malliberiĝo rezultis de eraro, ke tiaj malfeliĉaĵetoj ofte okazas, ke oni ne devas atenti pri tio; ke, fine, konvenos, ke li, prioro, venu, la postan tagon, por prezenti sian nevon, ke li devis konduki la simplanimulon Gordon, ke li frato Vadbled, enkondukos

ilin al Lia Respektinda Moŝto kaj al sinjor' Luvua, kiu diros al ili kelkajn vortojn en sia antaŭĉambro.»

Li aldonis, ke pri Senartifikulo kaj lia batalo kontraŭ la Angloj oni rakontis al la reĝo; ke certe la reĝo favoros lin per alrigardo, kiam li pasos en la galerio, kaj eble eĉ kapsignos al li. La letero finiĝis, donante al li la flatan esperon, ke la korteganinoj sendube invitos lian nevon al sia tualetejo, kaj ke pluraj el ili diros al li: »Bonan tagon, sinjoro Senartifikulo,« kaj ke certe oni parolos pri li ĉe la vespermango de l'reĝo. La letero havis kiel subskribon: »Via sindona Vadbled, jezuita frato.«

La prioro legis laŭte la leteron; lia nevo, furioziĝinte, tamen bridis dum momento sian koleron kaj diris nenion al la kuriero; sed sin turnante al la kunulo de siaj malfeliĉaĵoj, li demandis, kion li opinias pri tia stilo. Gordon respondis al li:

— Tiel do oni traktas la homojn kiel simiojn! Oni batas ilin kaj oni dancigas ilin.

Senartifikulo, reakirante sian naturan karakteron, kiu ĉiam revenas en la grandaj animkirliĝoj, disŝiris la leteron je pecoj kaj ĵetis ilin al la vizaĝo de l'kuriero:

— Jen estas mia respondo.

Terurigite lia onklo kredis vidi fulmotondron kaj dudek arestordonojn fali sur lin. Li rapidis por skribi kaj senkulpigi, laŭpove, kion li konsideris kiel koleriĝon de junulo, kaj kio estis la reliefo de nobla animo.

Sed pli dolorigaj zorgoj kaptis ĉies korojn. La bela kaj malfeliĉa Sankta-Ivo sentis la alproksimiĝon de l'morto; ŝi estis en trankvilo, sed en tiu terura trankvilo, kiu rezultas de malvigliĝinta naturo, kiu ne plu havas forton por lukti.

— Ho mia kara amato! ŝi diris per falanta voĉo, la morto punas min pro mia senenergieco; sed mi foriĝas kun la konsolo scii, ke vi estas libera. Mi adoris vin dum mia perfido, kaj mi adoras vin dirante eternan adiaŭon.

Ŝi ne ornamis sin per vana kuraĝo; ŝi ne konceptis pri tiu mizera gloro, kiu konsistas en ĉi tio, ke kelkaj najbaroj diros: »Ŝi kuraĝe mortis.« Kiu en la dudekjar-aĝo povas perdi sian amaton, sian vivon, kaj kion oni nomas *honorsento*, sen bedaŭroj kaj korŝiroj? Ŝi sentis la tutan abomenon de sia stato kaj sentigis ĝin per tiuj vortoj, per tiuj estingiĝantaj rigardoj, kiuj tiel potence influas. Fine ŝi ploris kiel la aliaj, en la momento, kiam ŝi havis sufiĉe da forto por plori.

Ke aliaj penu laŭdi pri la parade luksa morto de tiuj, kiuj eniras la detruigon kun sensenteco! tia estas la sorto de ĉiuj bestoj. Ni mortas kiel ili kun indiferecento, nur kiam nia maljuno aŭ malsaneco faras nin similaj al ili pro la stulto de niaj organoj. Kiu ajn faras grandan perdon, tiu havas grandajn bedaŭrojn; se li sufokas ilin, tio signifas, ke li estas vantema eĉ en la brakoj de l'morto.

Kiam la fatala momento estis alveninta, ĉiuj ĉeestantoj ekploregis kaj ekkriis. Senartifikulo fariĝis sensenta. La fortanimuloj, se ili estas amemaj, havas multe pli intensajn sentojn ol aliaj homoj. La bonkora Gordon konis lin sufiĉe, por timi, ke post sia rekonsciiĝo li sinmortigos. Oni formetis ĉiujn armilojn; la malfeliĉa junulo rimarkis tion; li diris al siaj parencoj kaj al Gordon, ne plorante, ne ĝemante, trankvile:

— Ĉu do vi pensas, ke ŝurttere ekzistas iu, kiu havas la rajton kaj la povon malebligi, ke mi metu finon je mia vivo?

Gordon gardis sin kontraŭ la emo kontraŭdiri per eldiro de tiuj banalaj argumentoj tedaj, kiujn oni uzas por pruvi, ke ne estas permesite uzi sian liberon, por malestiĝi, kiam oni terure suferas; ke oni ne devas foriri el sia domo, kiam oni ne plu povas tie loĝi; ke la homo estas surtere kiel soldato ĉe sia posteno, kvazaŭ estus grava por la Estulo de la estuloj, ke la kuniĝo de kelkaj partoj de materio estu en iu loko anstataŭ en alia; senpovaj argumentoj, kiujn malatentas fortvola kaj pripensema senesperulo, kaj al kiuj Kato respondis per ponardofrapo.

La malserena kaj timiga silento de Senartifikulo, liaj malgajaj okuloj, liaj tremantaj lipoj, la skuiĝoj de lia korpo, portis en la animon de ĉiuj, kiuj lin rigardas, tiun miksaĵon el kompato kaj timo, kiu katenas la fortojn de la animo, kiu esceptas ĉiun parolon, kaj kiu montriĝas nur per intermitaj vortoj. La hotelmastrino kaj ŝia familio estis alkurintaj; oni tremis pro lia malespero; oni senĉese rigardis al li; oni observis ĉiujn liajn movojn. Jam la malvarma korpo de la bela Sankta-Ivo estis portita en suban ĉambron, for de la okuloj de sia amanto, kiu aspektis, kiel se li ankoraŭ serĉas ŝin, kvankam li ne plu estis en stato ebliganta ŝin vidi.

Meze en tiu spektaklo de l'morto, dum la korpo estas elmetita ĉe la pordo de l'domo, dum du pastroj staras apud sanktakvujo kaj laŭte eldiras preĝojn kun senatenta mieno, dum preterpasantoj ĵetas kelkajn gutojn da benita akvo sur la ĉerkon, por pasigi la tempon, dum aliaj indiferente preterpasas, dum la parencoj ploras kaj dum amanto estas baldaŭ sinmortigonta, Sankta-Puanĵ alvenas kun la amikino el Versaĵo.

Lia nedaŭra amoremo, estante kontentigita nur unu fojon, estis fariĝinta amo. La rifuzo al liaj bonfaraĵoj

pikis lin. Patro Laŝez neniam pensus veni en tiun domon; sed Sankta-Puanĵ, havante antaŭ la okuloj ĉiutage la bildon de la bela Sankta-Ivo, deziregante satigi plene pasion, kiu per unu sola ĝuo puŝis en lian koron la stimulon de la deziroj, ne ŝanceliĝis por veni mem serĉi virinon, kiun eble li ne volus revidi trifoje, se ŝi estus mem veninta al li.

Li elkaleŝiĝas; la unua objekto, kiun li ekvidas, estas ĉerko; li fortunatas la rigardon kun tiu naŭzo de viro satigita per ĝuoj, kiu pensas, ke oni devas domagi al li ĉiun vidaĵon, kiu povus devigi lin rigardadi al la homa mizero. Li volas supreniri. La ino el Versajo, pro scivolemo, demandas, kiun oni estas entombigonta; oni eldiras la nomon Sankta-Ivo. Ĉe tiu nomo ŝi paliĝas kaj aŭdiĝas teruran krion. Sankta-Puanĵ sin turnas posten; la surprizo kaj la doloro plenigas lian animon. La bona Gordon ĉeestis, kun larmoplenaj okuloj. Li interrompas siajn malgajajn preĝojn, por informi al la kortegano pri la terura katastrofo. Li parolas kun la influo, kiun havigas la doloro kaj la virto. Sankta-Puanĵ ne estis denaska malbonulo; la torento de la ŝtataferoj kaj de la amuzoj estis forportinta lian animon, kiu ankoraŭ ne akiris memkonon. Li ne atingis la maljunon, kiu ordinare malmoligas la koron de ministroj; li aŭskultis al Gordon, kun mallevitaj palpebroj, kaj li forviŝis kelkajn larmojn, pri kies elverŝo li miris: li ekkonis penton.

— Mi nepre volas vidi, li diris, tiun eksterordinaran viron, pri kiu vi parolis al mi; li kompatigas min preskaŭ tiom, kiom tiu senkulpa viktimo, kies morton mi kaŭzis.

Gordon akompanas lin ĝis la ĉambro, kie la prioro, la Kerkabon, abato Sankta-Ivo kaj kelkaj najbaroj provis revivigi la svenantan junulon.

— Mi kaŭzis vian malfeliĉon, diris al li la subministro; mi dediĉos mian vivon por ĝin ripari. La unua ideo de Senartifikulo estis mortigi lin kaj poste sin mem. Ĉio estis eksternorma; sed mankis al li armiloj kaj li estis zorge pririgardata. Sankta-Puanĵ ne malkuraĝiĝis pro la rifuzoj, akompanataj de l'riproĉo, de l'malestimo kaj de la abomeno, kiujn li meritis, kaj per kiuj malavare oni superŝutis lin.


La tempo mildigas ĉion. Sinjor'Luvua fine sukcesis fari el Senartifikulo bonegan oficiron, kiu montriĝis sub alia nomo en Parizo kaj en la armeoj, kun la aprobo de ĉiuj honestuloj, kaj kiu estis samtempe kuraĝega militisto kaj filozofo.

Neniam li parolis pri tiu aventuro, ne ĝemante; kaj tamen li konsoliĝis, parolante pri ĝi. Amege li memoris pri la amema Sankta-Ivo ĝis la lasta momento de sia vivo. Abato Sankta-Ivo kaj la prioro ricevis ĉiu po unu bona prebendo; la bona Kerkabon preferis vidi sian nevon honorata militisto ol subdiakono. La piulino el Versajo tenis la orelingojn kun diamantoj kaj ricevis plie belan donacon. Patro Ĉio-por-ĉiuj ricevis skatolojn kun ĉokolado, kafo, kando, konfititaj citronoj kaj ankaŭ du marokene binditajn librojn. *La Meditoj de la respektinda Patro Kruaze kaj Floroj de l'sanktuloj.*

La bona Gordon vivis kun Senartifikulo ĝis sia morto en la plej intima amikeco; li ankaŭ ricevis prebendon, kaj forgesis por ĉiam pri la efika graco kaj samtempa helpo. Li alprenis kiel devizon: *Malfeliĉo iel utilas.* Kiom da honestaj homoj, en la mondo, povus diri: *Malfeliĉo neniel utilas!*

FINO





Presejo »Jože Moškrič« Ljubljana